

V-18679

Esperanto

1974



jarlibro

1974

dua parto

librolisto

uea

La jubilea, la 60a UK:

Se Kopenhago
ne estus tiel
alloga, oni ne
kongresus en ĝi
jam la trian fojon.

60a Universala
Kongreso
de Esperanto
Kopenhago
26.7 - 2.8 '75



JARLIBRO

de
Universala Esperanto-Asocio

1974

DUA PARTO

Prof. Mieczysław Sygnarski
Lektore de Esperanto en Jag. Univ.
str. Francesco Nullo 12/3
KRAKÓW — POLLANDĜ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(En Konsultaj Rilatoj kun Unesko)

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002

Nederlando

Tel. (010) 36 15 39



V-18679

Kompostita kaj fotografita en la Centra Oficejo de UEA.

Presita ĉe Grafika Entrepreno Tuijtel, Nederlando.

Antaŭparolo

Se unu prioritato elstaras en la estonta agado de nia Asocio, ĝi estas interna fortigo. Nombro la Esperanto-parolantoj reprezentas imponan kaj eventuale decidan forton en la kampanjo por enkonduko de Esperanto, sed tiu impona nombro dise kaj izolite laboras. Ofte niaj adeptoj entute ne scias, kiel kontribui sian energion al la komuna klopodo. Estas nia tasko, do, krei en la Esperanto-movado atmosferon de komuna laboro, en kiu ĉiu kontribuas laŭ sia povo kaj apartaj ecoj, kaj en kiu neniu preta kunhelpi trovas sin sen sia tasko aŭ forŝlosita de aliaj. En tiu bone funkcianta UEA la funkcio de la Estraro estas gvidi niajn diversajn laborojn, ne simple mem fari tiun laboron. En tiu agado la Komitato unuavice kunhelpas. Je organiza nivelo, nia Asocio kaj la diversaj landaj asocioj dividas inter si la taskojn, reciproke kunhelpas, kaj tiel evitas duobligojn aŭ neglektojn de agado. Ŝlosilan rolon ludas la lokaj grupoj, kiuj estas, aŭ povus esti, laborantaj teamoj, helpante en tute difinitaj kampoj en la laboro ĉu de la landa, ĉu de la universala, asocio. La lokaj grupoj ankaŭ portas la torĉon en la edukado de niaj homoj pri la problemoj kaj perspektivoj de nia lingvo, kaj de la ĝenerala publiko pri la solvo, kiun prezentas Esperanto. Kaj la argumentojn, materialojn kaj komunikrimedojn liveras ĉiuj tavoloj de la Movado.

En tiu kunlaboranta teamo, ĉiam vastiĝanta per la efikeco de la propra laboro, la vulgara distingo inter amatoroj kaj profesiuloj malaperas. Ni ĉiuj estas, aŭ povas esti, profesiuloj, precipe se ni pretas eduki nin mem kunlabori en la komuna volo, kaj respekti la kapablojn de aliaj, kaj niajn proprajn. Nur per tiu penetro de profesiaj metodoj tra ĉiuj tavoloj, niaj efektivaj fortoj egalos nian propran multnombrecon.

La nova estraro dediĉis sin plene al la starigo de harmonia kaj pli vasta kunlaboro en la Asocio. Ĝi estas malfermita al novaj ideoj kaj iniciatoj. Pro tio ĝi jam komencis dediĉi sian atenton al plivastigo de la financa bazo de la asocio per kapitala kampanjo (detalojn pri tio vi legos post kelkaj monatoj en la revuo *Esperanto*); ĝi esploras la demandon plivigli kaj modernigi niajn kongresajn programojn; ĝi decidis dediĉi pli da atento al faka agado per Esperanto, kaj ĝi komencis esploron de la

Antaŭparolo

membreca sistemo de UEA cele al simpligo de la kategorioj, kaj espereble faciligo de la vojo al plena individua membreco en nia Asocio. Samtempe ĝi ankaŭ kreas laborgrupojn, kiuj etendiĝas tra kaj preter la Komitato, tiel ke niaj laborfortoj kvazaŭ geometrie pligrandiĝas.

En la atento al internaj problemoj ni ne forgesu la celon de la tuta afero: la akceptigon de nia lingvo. La perspektivoj estas escepte favoraj, se ni nur saĝe kaj kolektive utiligas niajn fortojn. Kreskantaj lingvaj problemoj en Unuiĝintaj Nacioj, vera lingva kaoso en pluraj regionaj organizaĵoj (ekzemple la Eŭropa Komunaĵo), ĉiam pli intensa interesiĝo pri la problemoj kaj rajtoj de lingvaj minoritatoj – ĉio ĉi kontribuas al klimato de konscio pri lingvaj problemoj. La senprecedence granda nombro de diplomatoj, kiuj oficiale salutis aŭ partoprenis la inaŭguron de la 59a Universala Kongreso de Esperanto nome de siaj ŝtatoj, estas unu malgranda pruvo pri tiu kreskanta konsciiĝo. En nia ekstera agado, kiel en ĉiuj aliaj kampoj, forta kaj nepra antaŭkondiĉo de nia laboro estas aktiva neŭtraleco: nur se ni zorge gardas nian politikan neŭtralecon ni havos la fortojn kaj la alirvojojn por firme kaj kuraĝe preni starpunkton pri demandoj, kiuj rekte tuŝas la lingvon.

Humphrey Tonkin

Rezolucio

IV. 1.4.422 La Ĝenerala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Ĝenerala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto;

IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de Unesko;

IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Ŝtatoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Ŝtatojn-Membrojn informadi la Ĝeneralan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV. 1.4.4224 Komisias la Ĝeneralan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.

— El: Rezolucioj de la Ĝenerala Konferenco de Unesko, Montevideo, 1954.

Konsultaj Rilatoj kun Unesko

La 8an de decembro 1954 la Ĝenerala Konferenco de Unesko aprobis la proponon de UEA pri establo de konsultaj rilatoj inter la du organizaĵoj. En tiu tempo la rilatoj estis nomataj "konsultaj aranĝoj". En 1960 la Ĝenerala Konferenco akceptis novan principaron pri la rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj. Ĝi estas entenata en la *Direktivoj Koncerne Rilatojn kun Internaciaj Neregistaraj Organizaĵoj*, kiuj estis iom amenditaj en 1966.

Laŭ la menciitaj Direktivoj, ĉiuj organizaĵoj, kiuj pli frue havis konsultajn aranĝojn, estis dividitaj je tri kategorioj de la novaj konsultaj rilatoj: A, B kaj C. Nur tre limigita nombro da organizaĵoj, ĉefe tiuj kun duonŝtata karaktero aŭ fonditaj de Unesko mem, eniris la kategorion A. La plej gravaj internaciaj organizaĵoj troviĝas nun en la kategorio B, dum la malpli gravaj estas en la kategorio C. La grandega plimulto de internaciaj organizaĵoj troviĝas ekster kia ajn kategorio. Dank'al efika kunlaborado de UEA kun Unesko ekde 1954, la Ekzekutiva Komitato de Unesko proponis al la Estraro de UEA la kategorion B, kion la Estraro akceptis. Tio okazis en 1961 kaj, ekde tiam, UEA plu konservas la saman pozicion. La kategorio A nun nomiĝas "konsultaj kaj asociiĝintaj rilatoj"; la kategorio B estas tiu de "informaj kaj konsultaj rilatoj"; la kategorio C estas nomata kategorio de "reciproka informado".

La organizaĵoj en kategorio B ricevas ĉiujn dokumentojn de Unesko; estas konsultataj pri la Programo kaj Buĝeto de Unesko; povas partopreni pere de siaj observantoj en la laboroj de diversaj kunvenoj organizitaj de Unesko; partoprenas en la konferencoj de neregistaraj organizaĵoj; sendas observantojn al la Ĝenerala Konferenco; rajtas, kun la konsento de la koncerna prezidanto, fari deklarojn en la komisiono, komitatoj kaj aliaj organoj de la Ĝenerala Konferenco; povas kun la aprobo de la Ĝenerala Komitato, alparoli la plenajn kunsidojn de la Ĝenerala Konferenco pri demandoj apartenantaj al ilia kompetenteco; povas ricevi subvenciojn por siaj publikaĵoj kaj konferencoj;

Konsultaj Rilatoj kun Unesko

rajtas prezenti skribajn deklarojn al la Ĝenerala Direktoro de Unesko rilate tiujn punktojn de la programo, pri kiuj ili kompetentas, kaj la Ĝenerala Direktoro devas komuniki la esencon de tiuj deklaroj al la Ekzekutiva Komitato kaj, se necese, al la Ĝenerala Konferenco; havas ankaŭ aliajn, malpli gravajn rajtojn.

Aliflanke, tiuj organizaĵoj havas ankaŭ adekvatajn devojn. Ekzemple ili devas kontribui al la realigo de la programo de Unesko en la sferoj de siaj respektivaj kompetentecoj; inviti la reprezentantojn de Unesko al siaj kongresoj kaj konferencoj; raportoj de tempo al tempo al la Ĝenerala Direktoro pri siaj agadoj.

Tiom, plej koncize, pri la jura pozicio de UEA en la rilatoj kun Unesko. Kiel vidiĝas el la Estraraj Raportoj ekde 1955, UEA atente flegis la konsultajn rilatojn. Ĝi rigore observis siajn devojn, sed ankaŭ abunde utiligis siajn rajtojn. La tre kontentiga pozicio de UEA montras ankoraŭfoje, ke la Asocio ĝuas altan prestiĝon kaj ke ĝia laboro estas aprezata de la kompetentaj instancoj de Unesko.

Komitato de UEA

La litero en parentezoj post la adreso indikas la manieron de elekto. (Vidu artikolon 25 de la Statuto de UEA.)

Albault, d-ro André, 32 Av. Etienne Billières, F-31300 Toulouse, Francujo. (A)

Aleksiev, N. B., kv. Istok, blok I, vh II, Sofio, Bulgarujo; tel. 72 21 32. (A)

Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, Wellington, E. 3, Nov-Zelando; tel. 73-679. (A)

Anjer, L., Oberst Rodes Vég 76, Oslo-Nordstrandhögda, Norvegujo; tel. (02) 28 32 59. (A)

Azzi, d-ro ing. Giordano, Viale Giulio Cesare 20, I-22100 Como, Italujo; tel. (031) 27 12 59. (A)

Bácskai, d-ro Stefano, Árpád Fejedelem út. 28/a, H-1174 Budapest, Hungarujo; tel. 281-652. (A)

Berceli, Bela, Minerva út. 1, H-1118 Budapest, Hungarujo. (A)

Boersma, T., Hoeveveg 18, De Hoeve, Post Noordwolde-9521, Nederlando. (A)

Bormann, d-ro Werner, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo; tel. (040) 73 84 508. (A)

Bourdeaux, André, 91-93 rue de la Chapelle, appt. 135, F-75018 Paris, Francujo. (A)

Corral, Angel M., A. Magariños Cervantes 2650, Buenos Aires, Argentino; tel. 59-6339. (A)

Corsetti, d-ro Renato, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italujo. (A)

Denoël, d-ro Pol, 20 rue Victor Raskin, B-4000 Liège, Belgujo; tel. (041) 27 00 79. (A)

Diaz, Amador, 27 Hanley Road, Shirley, Southampton S01 5AP, Britujo. (A)

Dobrzyński, d-ro Marian, str. Izabelli 12 m. 4, PL-01-738 Warszawa, Pollando. (A)

Figuerola-Auque, prof. A., Victor de la Serna 19-7º Izq., Madrid 16, Hispanujo. (A)

Fontes, prof-ino E., Rua Machado de Assis 243-Ap., BR-01000 São Paulo, SP. 11, Brazilo. (A)

Komitato de UEA

Giladi, Jeraĥmiel, Ĉerniĥovski str. 2, Kfar-Saba, Israelo. (A)
Gorov, Ĥristo Marinov, San Stefano 23, Sofia, Bulgarujo; tel. 44 15 56. (A)

Grattapaglia, s-ino Ursula, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraiso, Gojás, Brazilo. (C)

Greutert, Kurt, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco, Svislando; tel. (092) 27 48 78. (A)

Grzębowski, mag. Andrzej, str. M. Curie-Skłodowskiej 10/3, PL-85 094 Bydgoszcz, Pollando. (A)

Hirsch, Richard, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld, FR Germanujo; tel. (06621) 49 95. (A)

Isiguro, Teruhiko, Minami Ōtuka 1-19-2, Tosima-ku, Tokio, -170 Japanujo. (A)

Isobe, s-ino Y., 14-1, Minami Nagasaki 2-chome, Toshima-ku, Tokio, 171, Japanujo. (A)

Jałowiecki, Romuald, ul. Hoża 47, m. 42, PL-25 618 Kielce, Pollando. (A)

Kawamura, prof. S., 424-7, Kinacityō Huzii, Takamatu, 760, Japanujo. (C)

Kočvara, D., Hasičká 50, CS-708 00 Ostrava-Hrabůvka, Ĉeĥoslovakujo. (A)

Kühlmann, G., Løvetandsvej 31, DK-2700 Brønshøj, Danlando; tel. (01) 60 07 02. (C)

Lehtivaara, O., Aleksis Kivenkatu 22 A, 16, Helsinki 50, Finnlando. (A)

Leonov, ing. B., Car Asen 7, Karlovo, Bulgarujo; tel. 26 65. (A)

Leon-Smith, Grahame, "Kinburn", Egham Hill, Egham, TW20 0BD, Britujo. (A)

Li Unsang, prof. d-ro, ĉe Gim Taekeng, 104-43, An Am-dong, Seoul, Koreujo. (A)

Linton, Kenneth G., 11 Poplar St., South Caulfield, Vic. 3162, Aŭstralio; tel. 53-16 78. (A)

Luin, Franko, Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo. (C)

Luin, s-ino Ulla, Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö, Svedujo. (A)

Komitato de UEA

Matte, Guy, 22 Glencairn Ave., Ottawa, Ont. K1S 1M6, Kanado. (A)

Miggas, G., Aharnon 41, Athinai 109, Grekujo. (A)

Minnaja, d-ro Carlo, Via Palermo 26, I-35100 Padova, Italujo; tel. (049) 44 08 2. (C)

Moritz, U.J., Feldstr. 38, D-519 Stolberg 8, FR Germanujo; tel. (49-2402) 72336. (C)

Nógrády, Ottó, Vöröshadsereg út. 141, H-1021 Budapest II, Hungarujo. (A)

Nourmont, f-ino Claude, 8 rue des Frères Lumière, F-77000 Melun, Francujo. (C)

Pallós, s-ino E., Petöfi út. 43, Pécs, Hungarujo. (A)

Pancer, prof. d-ro Oton, Voćarsko naselje 10, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio. (A)

Peeraerts, Paul, Drakenhoflaan 97, B 2100 Deurne, Belgujo. (C)

Pettyn, André, skr. poczt. 46, PL-05-710 Miłanówek, Pollando. (B)

Pool, d-ro Jonathan, Department of Political Science, State University of New York at Stony Brook, NY 11790, Usono. (C)

Popović, prof. B., Ognjena Price 80, YU-11000 Beograd, Jugoslavio. (A)

Régulo Pérez, d-ro Juan, Apartado 25, La Laguna, Tenerife, Kan. Insuloj; tel. 25 93 08. (B)

Rentmeister, F.W., Kauergasse 1/I, St. 2 Stg. 15, A-1150 Wien, Aŭstrujo. (A)

Schleicher, Ib, Ved Bellahøj 21/13, DK-2700 København-Brh., Danlando. (A)

Simeonov, ing. S.D., ul. Gavril Genov 22, Sofio C, Bulgarujo; tel. 87 47 16. (A)

Söderberg, Karl, Luthagsesplanaden 15a, S-752 25 Uppsala, Svedujo; tel. 3 68 43. (B)

Støp-Bowitz, prof. d-ro C., Camilla Collets vei 3, Oslo-2, Norvegujo; tel. (472) 44 80 85, somere (472) 91 21 28. (C)

Strönne, Jan, Amiralsgatan 36, S-211 55 Malmö, Svedujo; tel. (040) 12 92 11. (A)

Komitato de UEA

Szabo-Felső, d-rino Flóra, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungarujo. (A)

Tonkin, d-ro Humphrey R., 35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821, (oficejo) 594-7360. (A)

Triolle, f-ino Renée, 2 Boulevard de Douai, F-59100 Roubaix, Francujo. (C)

Uśpieński, J., Poštokesto 100, Warszawa 12, Pollando. (A)

Válev, K., str. Čatalĝa 5, Sofia 27, Bulgarujo; tel. 44 34 51. (A)

Vítek, J., Čs. armády 26, Mělník, Ĉeĥoslovakujo. (A)

Wensing, E.L.M., Dennenstraat 9, B-3581 Achel, Belgujo. (C)

Woessink, E.J., Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12, (oficejo) (085) 43 50 31. (C)

Zlatnar, d-ro Peter, Rimska c7/II, YU-61000 Ljubljana, Jugoslavio. (A)

Observantoj:

Derks, J.J., Boulevard d'Italie 8, Monte Carlo, Monako; tel. 30 80 97.

Dickson, S-ino M.E., 21 Durban Road, Mowbray, C.P., Sud-Afriko.

Ngangu, Nduantoni-Bakidila, B.P. 13, Lukala (Nkandu), Bas-Zaire, Zairo.

O'Reilly, Patrick J., "Monksilver", Howth Summit, Irlando.

Raveloson, Eugène, B.P. 1678, Tananarive, Madagaskaro.

Zeballos Morales, D-ro Romulo, Fray Marcos (Florida), Urugvajo.

Estraro de UEA

Prezidanto

D-ro Humphrey Tonkin, estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo,
35 Violet Lane, Lansdowne, PA 19050, Usono; tel. (215)
CL9-8821, (oficejo) 594-7360.

Vic-prezidantoj

D-ro Werner Bormann, estrarano pri landa kaj regiona agado,
Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo; tel. (040)
7 38 45 08, (deĵorejo) 34 91 23 71.

D-ro Carl Støp-Bowitz, estrarano pri faka agado, Camilla
Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegujo; tel. (472) 448085, somere
(472) 91 21 28.

Ĝenerala sekretario

E.L.M. Wensing, estrarano pri administrado, pri komerco kaj
industrio kaj diskonigo de la agado de UEA, Dennenstraat 9,
B 3581 Achel, Belgujo; tel. (011) 64 31 50.

Membroj

D-ro P. Denoël, estrarano pri la delegita reto, pri rilatoj kun
Esperanto-organizaĵoj kaj por specialaj agadoj, Rue Victor
Raskin 20, B 4000 Liège, Belgujo; tel. (041) 27 00 79.

D-rino Flora Szabó-Felső, estrarano pri kongresoj kaj
konferencoj, Várady Antal út. 4, H-7621 Pécs, Hungarujo.

S. Świstak, estrarano pri informado kaj pri turismo, ul.
Racławicka 10 m. 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

E.J. Woessink, estrarano pri financo, Onder de Beumkes 29,
Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 74 12, oficejo (085)
43 50 31.

Kotizoj de UEA

KLARIGO DE LA KOTIZ-TABELO

Persono ankoraŭ ne 22-jara povas esti

Juna Membro kun Jarlibro (**J-MJ**), kiu pagas 12,50 gld. kaj
ricevas la Jarlibron, aŭ

Juna Membro-Abonanto (**J-MA**), kiu pagas 37,50 gld. kaj ricevas
la Jarlibron, la monatan revuon "Esperanto", kaj la kvaronjaran
gazeton "Kontakto".

Persono de 22- ĝis inkluzive 25-jara povas esti

Membro kun Jarlibro (**MJ**), kiu pagas 25,- gld. kaj ricevas la
Jarlibron, aŭ

Membro-Abonanto kun "Kontakto" (**MA-K**), kiu pagas 50,-
gld. kaj ricevas la Jarlibron, la revuon "Esperanto", kaj la
junularan revuon "Kontakto".

Persono pli-ol-25-jara povas esti

Membro kun Jarlibro (**MJ**), kiu pagas 25,- gld. kaj ricevas la
Jarlibron aŭ

Membro-Abonanto (**MA**), kiu pagas 50,- gld. kaj ricevas la
Jarlibron kaj revuon "Esperanto".

Persono, kiu volas finance helpi la Asocion, povas fariĝi

Membro-Subtenanto (**MS**), kiu pagas 150,- gld. kaj ricevas la
Jarlibron, la revuon "Esperanto" kaj (se li estas malpli ol 26-
jara) la gazeton "Kontakto",

Patrono (Pat.), kiu pagas 500,- gld. (dekoble la kotizon de
MA) kaj ricevas la samajn eldonaĵojn, kiel MS.

Dumviva Membro (DM) pagas por la tuta vivo per unu fojo
nur 1 000,- gld., sendepende de eventualaj postaj kotizaltigoj.
Li ricevas la Jarlibron, la revuon "Esperanto" kaj (dum li
ankoraŭ estas malpli ol 26-jara) la gazeton "Kontakto".

Dumviva Patrono (D-Pat) pagas por la tuta vivo per unu
fojo 10 000,- gld., ĉar li deziras tre forte subteni la Asocion.
Li ricevas la samajn eldonaĵojn kiel DM.

Kotizoj de UEA

Membroj-Subtenantoj, Patronoj kaj Dumvivaj Patronoj estas samtempe membroj de "Societo Zamenhof".

Ĉiuj membroj, en kiu ajn kategorio, ricevas krom la menciitaj eldonaĵoj ankaŭ membrokarton kaj membro-markfolion (vidu la regularon pri la delegita servo en la unua parto de la Jarlibro).

Ĉiu ankaŭ povas aboni aparte la revuon *Esperanto* kaj la junularan gazeton *Kontakto*. Prezoj: *Esperanto* 37,50 (por Nederlando 39,-), *Kontakto* 13,- (por Nederlando 13,52).

Ĉiuj kotizoj supremenciitaj validas por la kalendara jaro.

Por registrita poŝto, se dezirata, oni aldonu jare 33,- gld. por la revuo *Esperanto* kaj 3,- gld. por la Jarlibro.

Por aerpoŝta ekspedo de la revuo *Esperanto* necesas krompagi:

Por Oceanio	16,50 gld.
Por Sudameriko	13,75 gld.
Por Suda Afriko kaj por Azio	11,- gld.
Por Norda kaj Meza Afriko, Mezoriento, Norda kaj Meza Ameriko	8,25 gld.

TARIFO DE ANONCOJ (en guldenoj)

Eldonaĵo	1 p.	Anoncoj			Anoncetoj	
		1/2 p.	1/4 p.	1/8 p.	1/16 p.	1 vorto
<i>Esperanto</i>	375	200	110	65	40	0,60
Jarlibro*	160	90	55	—	—	—
<i>Kontakto</i>	120	70	40	25	20	0,20
Kongresa Libro*	Tarifo varias laŭ eldonkostoj					

* La kostoj por kovrilaj paĝoj estas duoblaj.

KOTIZ-TABELO

Valuto	MJ	MA	MS	J-MJ	J-MA	K-to
		MA-K			SA	
£ brita	3,60	7,20	21,60	1,80	5,40	1,90
\$aŭs/NZ/rand.	7,00	14,00	42,00	3,50	10,50	3,70
\$US/kanada	9,50	19,00	57,00	4,75	14,25	5,00
guldeno/DM	25	50	150	12,50	37,50*	13*
franko svisa	28	56	168	14	42	15
marko finna	34	68	204	17	51	18
ĝisr./bs.venez.	38	76	228	19	57	20
krono sveda	40	80	240	20	60	21
int.resp.kup.	42	84	252	21	63	22
franko franca	44	88	264	22	66	23
kruzejro	48	96	288	24	72	25
krono norvega	50	100	300	25	75	26
krono dana	58	116	348	29	87	31
peso argentina	108	216	648	54	162	57
dinaro	130	260	780	65	195	68
krono ĉeĥosl.	150	300	900	75	225	80
ŝilingo aŭstra	180	360	1080	90	270	95
eskudo port.	220	440	1320	110	330	115
draĥmo	260	520	1560	130	390	140
franko belga	360	720	2160	180	540	190
solo perua	480	960	2880	240	720	250
peseto hispana	520	1040	3120	260	780	270
eno japana	2700	5400	16200	1350	4050	1400
piastro vjetn.	3000	6000	18000	1500	4500	1600
liro itala	5200	10400	31200	2600	7800	2700

* Por Nederlando aldoniĝas al la prezoj de simplaj abonoj (sen membreco) de *Esperanto* kaj *Kontakto* la enlanda imposto 4%. Por la enloĝantoj de Nederlando tiuj prezoj estas do respektive 39,00 kaj 13,52 gld.

MJ = Membro kun Jarlibro. MA = Membro-Abonanto. MA-K = Membro-Abonanto kun *Kontakto*. MS = Membro-Subtenanto. J-MJ = Juna Membro kun Jarlibro. J-MA = Juna Membro-Abonanto. SA = Simpla Abonanto de *Esperanto*. K-to = Abonanto de *Kontakto* (Sen membreco de TEJO).

Prefere pagu per unu el la landaj oficejoj (p. 16-17).

Vidu ankaŭ la pagrimedojn sur paĝo 128.

PAGU AL LA LANDA KOTIZPERANTO

- Argentina: C.J. Milkuschütz, Pasteur 154,8, Dep. A., Buenos Aires
- Aŭstralia: K.G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield, Vic. 3162
- Aŭstra: Aŭstria Esperantista Federacio, Fünfhausgasse 16-18, A-1150 Wien (pĉk Oesterreichischer Esperantisten Verband, 183,874 Wien)
- Belga: F-ino Andrée Orsolini, rue Paul Pastur 6, B-6000 Charleroi (pĉk 000-0201640-14)
- Brazila: Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Av. Treze de Maio, 47 - Sobreloja 208, Rio de Janeiro.
- Brita: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF (pĉk 54 851 0008)
- Bulgara: Bulgara Esperantista Asocio, Poŝtokesto 66, Sofia
- Ĉeĥoslovaka: F. Sviták, Teplická 272/5, Praha 9, Prosek
- Dana: Arne Kolle, Østergade 22, DK-9370 Hals (pĉk 7 90 06 35)
- Finna: Harri Laine, Tornihaukanti. 8 A 19, SF-02620 Karakallio (pĝk 39135-3)
- Franca: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 Bis, Rue de la Cerisaie, F-75004 Paris (pĉk 855-35)
- Germana (FR): Deutscher Esperanto-Bund, 614 Bensheim, Postfach 253 (pĉk Nürnberg 25 65-854)
- Greka: Kimon G. Eliopoulos, Elefteriu Venizelu 130, Nea Smirni (Ateno)
- Hispana: L. M. Hernández Yzal, Av. Generalísimo 13, Apartado de Correos 83, Vilafranca del Panadés, Sant Pau d'Ordal
- Hungara: Hungara Esperanto-Asocio, Poŝtfako 193, H-1368 Budapest 5
- Irlanda: P.J. O'Reilly, "Monksilver", Howth Summit
- Islanda: Federacio de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavík
- Israela: I. Israeli, Str. Herzel 98, Tel-Aviv (nur por UEA. Por aliaj abonoj restas J. Ben Alter, Petaĥ Tikva, t.d. 379)

- Itala: Itala Esperanto-Federacio, Via Villorresi 38, I-20143 Milano (pĉk 3/43154)
- Japana: Japana Esperanto-Instituto, Hongo 2-2-14, Bunkyō-ku, Tokio
- Jugoslavia: S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32/III, YU-41000 Zagreb
- Kanada: W.D.B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto 298, Ontario
- Kolombia: Ing. Diego Hoyos Escobar, Calle 70 No. 17-48, Ap-to 301, Bogotá
- Korea: Korea Esperanto-Societo, Internacia P.O. Box 1232, Seoul-100
- Kuba: Pedro Pablo Lamas-Díaz, Apartado 223, Ciego de Avila (Camagüey).
- Meksika: F-ino Alicia Zepeda, Altamirano 75-1, México-4 D.F.
- Nederlanda: Nederlanda Esperanto-Asocio "LEEN", p/a W. Rodenhuis, Ruys de Perezlaan 2, Aerdenhout-1541 (pĉk 34563)
- Norvega: Alfred Skyberg, Østensjøvn 118a, Oslo-6 (pĝk 133.29)
- Nov-Zelanda: J.T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington E3
- Perua: S-ino Janette De Skotte, Malecón Paul Harris 336, D-to 200, Barranco (Lima)
- Pola: Pola E-Asocio, Ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1
- Portugala: António da Silva Almeida, Rua Macau 3, 2º, esq., Amadora
- Sud-Afrika: Colin Beckford, P.O. Box 1227, Cape Town-8000
- Sud-Vjetnama: Sajgona Esperanto-Grupo, 386/43 Truong-minh-Giang, Saï-Gòn 3
- Sveda: Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, Malmö (pĉk 14 74 29)
- Svisa: K. Greutert, Via Monte Ceneri, CH-6512 Giubiasco (pĉk 65-1065)
- Turka: Hasan Kocaman, Mühürdar Caddesi 81, Kadıköy-İstanbul
- Urugvaja: D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida)
- Usona: A.F. Doneis, Box 105, Pharr, Texas 78577
- Venezuela: J.E. Bachrich, Apartado 3833, Caracas

Instancoj de UEA

kaj iliaj respondeculoj

Belartaj Konkursoj

Sekr. Alec Venture, 55 Park Hill, Carshalton Beeches, Surrey, Britujo.

Prez. de la prijuĝa komisiono: Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, Reykjavík, Islando.

Membroj de la prijuĝa komisiono: W. Auld, C. Conterno, J.H. Rosbach, I. Rotkvić.

Foto-servo pri Zamenhof

Administras: H. Thien, Uiterwaardenstr. 12, Amsterdam 1010, Nederlando.

Informa Fako de UEA

Respondeca: La Ĝenerala Sekretario.

Informa Centro de UEA en Parizo: A. Bourdeaux, 91 Rue de la Chapelle, appt. A 135, F-75018 Paris, Francujo; tel. 874-73-00 aparato 47-75.

Institucio Hodler

Prez.: G. Maertens, Prins Leopoldstraat 51, St.-Kruis, Belgujo.
Vicprez.: d-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FR Germanujo; tel. (040) 73 84 50 8.

Kasisto: E. HaverSchmidt, Laan van Poot 356, Den Haag-2023, Nederlando.

Administranto: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-3002, Nederlando; tel. (010) 36 45 42.

Internacia Somera Universitato

Sekr.: d-ro Jonathan Pool, Department of Political Science, State University of New York at Stony Brook, NY 11790, Usono.

Komisiito por Agado en Parlamentoj

I. Schleicher, Ved Bellahøj 21/13, DK-2700, Brønshøj, Danlando.

Komisiito por Specialaj Taskoj

F-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II, Rotterdam-3002, Nederlando.

Komisiono pri Eksteraj Rilatoj

Respondeca estrarano kaj gvidanto: d-ro H.R. Tonkin (Usono).

Membroj: B. Berceli (Hungarujo), G. Leon-Smith (Britujo),

I. Schleicher (Danlando), S.D. Simeonov (Bulgarujo), J.

Uśpieński (Pollando).

Komisiono pri Financo kaj Administrado

Respondeca estrarano kaj gvidanto: E.J. Woessink (Nederlando).

Membroj: T. Boersma, S.H. Brongersma (Nederlando), G.

Maertens, P. Peeraerts, E.L.M. Wensing (Belgujo).

Komisiono pri Informado

Respondeca estrarano kaj gvidanto: S. Świstak (Pollando).

Membroj: T. Boersma (Nederlando), F. Luin (Svedujo), L.

Kosieniak, A. Pettyn (Pollando).

Komisiono por la Internacia Ekzameno

Sekr.: J.C. Wells, 5 Poplar Road, Merton Park, London SW19 3JR, Britujo; tel. 01-542 0302.

Membroj: A. Albault, W. Auld, M. Boulton, N. Kawasaki, Ś.

Mijake, P. Neergaard, J. Régulo Pérez, J.H. Rosbach, V. Sadler, A. Venture.

Komisiono pri Kongresoj

Respondeca estrarano kaj gvidanto: d-rino F. Szabó-Felső

(Hungarujo). Membroj: A. Grzębowski (Pollando), s-ino U. Luin

(Svedujo), U.J. Moritz (FRG), s-ino E. Pallós (Hungarujo).

Komisiono pri Landaj Asocioj

Respondeca estrarano kaj gvidanto: d-ro W. Bormann (FRG).

Membroj: d-ro R. Corsetti (Italujo – komisiito pri regiona

agado), R. Hirsch (FRG), s-ino Y. Isobe (Japanujo), O. Nógrády

(Hungarujo).



Instancoj de UEA

Komisiono por Semajno de Internacia Amikeco

E. Carlén, Yxhult, S-692 02 Kumla 2, Svedujo; tel. 019-78013.

Komisiono pri la Statuto

Respondeca estrarano: d-rino F. Szabó-Felső (Hungarujo).

Gvidanto: U.J. Moritz (FRG). Membroj: L. Anjer (Norvegujo), d-ro L. Röhl (FRG), I. Schleicher (Danlando).

Kontrolkomisiono de Lernolibroj

Prez.: Vakas

Membroj: A.D. Atanasov, H. Bakker, D.B. Gregor, V. Setälä.

Koresponda Servo Mondskala

Prizorgantino: f-ino C. Hueter, 12 Rue des Jacobins,
F-63000 Clermont-Ferrand, Francujo.

Lingva Servo

A.D. Atanasov, Poptomov 48, Sofia, Bulgarujo.

H.A. de Hoog, Braveld 16, Castricum-1680, Nederlando.

Prof. N. Kawasaki, II-49 Bandai-higasi, Sumiyosi-ku, Osaka, Japanujo.

W. Schmid, 4537 Kurohama, Hasuda-mati, Saitamaken, Japanujo.

A. Venture, 55 Park Hill, Carshalton Beeches, Surrey, Britujo.

Magnetofona Servo

Gvidanto: Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario L5H 3N6, Kanado.

Komisiito por registrado de la konversacia lingvo: Jim Deer, 12946 NE Hancock St., Portland, Ore. 97230, Usono.

Revizoroj de la Komitato

T. Boersma, P. Peeraerts. (Adresojn oni vidu ĉe la Komitato.)

Serva Centro de UEA

Administranto: J.J. Sturzenegger, Am Wasser 60, CH-8049 Zürich 10, Svislando; tel. (051) 28 53 47; pk. 12-23-10.

Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo

Aganta direktoro:

D-ro J. Pool, adreso ĉe la C.O.

Kunlaborantoj en multaj landoj.

Celo:

A. Sciencaj esploroj: Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado: Enregistriĝo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Elaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado: Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun Unesko, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj; liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝas en la Estrara Raporto en ĉi tiu Jarlibro.

Dumviva Membro-Subtenanto

Smith, s-ro Norman R., Benin City, Nigerio.

Dumvivaj Patronoj

Edler, s-ro Per, Stockholm, Svedujo
González Cantero, s-ro Pedro, Madrid, Hispanujo
Wooding, s-ro N., Leicester, Britujo.

Internacia Diplomo

Pri supera instrukapablo de la Internacia Lingvo Esperanto
DIPLOMITOJ

- | | |
|---|--------|
| 1. Albault, d-ro André, Toulouse, Francujo | (1961) |
| 2. Taverna, f-ino Cornelia, Trieste, Italujo | (1965) |
| 3. Pančev, s-ro Metodi Dimitrov, Sofia, Bulgarujo | (1965) |
| 4. Haupenthal, s-ro Reinhard, Dudweiler, F.R.G. | (1968) |

La Centra Oficejo de UEA

volonte disponigos al via organizaĵo

varbajn materialojn :

- * artikolojn kaj informojn pri UEA por viaj organoj kaj informkampanjoj
- * faldfoliojn kaj aliĝilojn por distribuo al via membraro aŭ en viaj kongresoj
- * specimenojn de *Esperanto*, *Kontakto*, *Jarlibro* kaj aliaj eldonaĵoj de UEA.

La Ĉambroj de UEA

Ricevitaj estas la sumoj de po 5 000 gld. por

1. Ĉambro Kanado (Biblioteko "Hector Hodler"), donacis s-ino Dorothy M. Henderson, King;
2. Ĉambro Hamburgo (ĝenerala administrejo), donacis s-ro Felix Epstein, Hamburg;
3. Ĉambro Erik Salberg (magazeno), donacis s-ro E. Salberg, Primošten;
4. Ĉambro Llech-Walter (libroservo), donacis s-ro R. Llech-Walter, Perpignan;
5. Ĉambro Monte-Carlo (librotena kaj kongresa oficejo), donacis ges-roj Jos Derks, Monaco;
6. Ĉambro Minnaja (redakcia ĉambro), donacis Familio Minnaja, Roma;
7. Ĉambro Svedujo (oficista loĝoĉambro), donacis Sveda Esperanto-Federacio;
8. Ĉambro Arabio (oficista loĝoĉambro), donacis d-ro Nassif Isaac, A.R. Egiptujo;
9. Ĉambro Nov-Zelando (ekspedejo), donacis Nov-Zelanda Esperanto-Asocio;
10. Ĉambro Simon Saft (Biblioteko "Hector Hodler"), donacis amikoj de la forpasinta membro Simon Saft;
11. Ĉambro Stefano La Colla (direktora ĉambro), donacis s-ino Averina Sforza La Colla;
12. Ĉambro Aŭstralio (oficista loĝoĉambro), donacis Aŭstralio Esperanto-Asocio;
13. Ĉambro Frank Netrval (fotografia ĉambro), donacis la forpasinta membro F. Netrval.

La Universalaj Kongresoj

Jaro	Kongresloko	Anoj
1. 1905.	Boulogne-sur-Mer, Francujo	688
2. 1906.	Genève, Svislando	1200
3. 1907.	Cambridge, Britujo	1317
4. 1908.	Dresden, Germanujo	1500
5. 1909.	Barcelona, Hispanujo	1500
6. 1910.	Washington, Usono	357
7. 1911.	Antwerpen, Belgujo	1800
8. 1912.	Kraków, Pollando	1000
9. 1913.	Bern, Svislando	1203
10. 1914.	Paris, Francujo. Ne okazis pro la militdeklaro. Aligis	3739
11. 1915.	San Francisco, Usono	163
12. 1920.	Den Haag, Nederlando	408
13. 1921.	Praha, Ĉeĥoslovakio	2561
14. 1922.	Helsinki, Finnlando	850
15. 1923.	Nürnberg, Germanujo	4963
16. 1924.	Wien, Aŭstrujo	3400
17. 1925.	Genève, Svislando	953
18. 1926.	Edinburgh, Skotlando	960
19. 1927.	Danzig	905
20. 1928.	Antwerpen, Belgujo	1494
21. 1929.	Budapest, Hungarujo	1200
22. 1930.	Oxford, Britujo	1211
23. 1931.	Kraków, Pollando	900
24. 1932.	Paris, Francujo	1650
25. 1933.	Köln, Germanujo	950
26. 1934.	Stockholm, Svedujo	2042
27. 1935.	Roma, Italujo	1442
28. 1936.	Wien, Aŭstrujo	854
29. 1937.	Warszawa, Pollando	1120
30. 1938.	London, Britujo	1602
31. 1939.	Bern, Svislando	765
32. 1947.	Bern, Svislando	1370
33. 1948.	Malmö, Svedujo	1761
34. 1949.	Bournemouth, Britujo	1534

La Universalaj Kongresoj

35. 1950.	Paris, Francujo	2325
36. 1951.	München, FR Germanujo	2040
37. 1952.	Oslo, Norvegujo	1614
38. 1953.	Zagreb, Jugoslavio	1760
39. 1954.	Haarlem, Nederlando	2353
40. 1955.	Bologna, Italujo	1687
41. 1956.	København, Danlando	2200
42. 1957.	Marseille, Francujo	1468
43. 1958.	Mainz, FR Germanujo	2021
44. 1959.	Warszawa, Pollando	3256
45. 1960.	Bruselo, Belgujo	1930
46. 1961.	Harrogate, Britujo	1646
47. 1962.	København, Danlando	1550
48. 1963.	Sofia, Bulgarujo	3472
49. 1964.	Den Haag, Nederlando	2512
50. 1965.	Tokio, Japanujo	1710
51. 1966.	Budapest, Hungarujo	3975
52. 1967.	(Tel-Aviv)-Rotterdam, Nederlando	1265
53. 1968.	Madrid, Hispanujo	1769
54. 1969.	Helsinki, Finnlando	1857
55. 1970.	Wien, Aŭstrujo	1987
56. 1971.	London, Britujo	2071
57. 1972.	Portland, Oregon, Usono	923
58. 1973.	Beograd, Jugoslavio	1638
59. 1974.	Hamburg, FR Germanujo	1651
60. 1975.	København, Danlando	

Junulara Sekcio de UEA

TUTMONDA ESPERANTISTA JUNULARA ORGANIZO

La Organizo estis fondita en 1938 kun la nomo TJO kaj kun la celo krei solidaron kaj amikecon inter la diverslandaj gejunuloj kaj konscion pri tutmonda interfrateco. De 1957 TEJO estis la Junulara Sekcio de Universala Esperanto-Asocio.

Celoj. Disvastigo de Esperanto inter la junularo; enkonduko de Esperanto en la lernejojn; praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo; okazigo de internaciaj junularaj kunvenoj.

Membraro. Estas asociaj membroj la membroj de landa aŭ faka asocio aliĝinta al TEJO kaj Asociaj Membroj de UEA ne preterpasintaj la aĝon de 25 jaroj. Estas individuaj membroj la individuaj membroj de UEA ĝis tiu sama aĝo.

Patronaro. Patronaj membroj estas tiuj pli aĝaj personoj, kiuj pagas 26 guldenojn (kategorio A) aŭ 9 guldenojn (kategorio B) jare por subteni la agadon de TEJO. Patronaj Membroj A ricevas la ĉefajn eldonaĵojn de TEJO; Patronaj Membroj B ricevas dokumentojn de TEJO de tempo al tempo.

Delegitoj. TEJO estas reprezentata de la Junularaj Delegitoj, por kiuj validas la reguloj pri delegitoj en la Ĝenerala Regularo de UEA. JD estas minimume 16-jara kaj maksimume 30-jara. La adresoj de JD troviĝas en la delegita adresaro en la Jarlibro de UEA.

Organoj. Rubriko "TEJO-paĝo" en la revuo "Esperanto"; kvaronjara revuo "Kontakto"; informbulteno "Novaĵoj" en tri eldonoj (angla, franca, Esperanta) sesfoje jare; Bulteno "Inform-Folio" por interna uzo, sesfoje jare.

Sidejo kaj administrejo. Ĉe la CO de UEA.

Honoraj Prezidantoj. Günther Becker, Alter Hangarten 2, D-6653 Blieskastel, FR Germanujo, d-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, I-00176 Roma, Italujo kaj d-ro Humphrey Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne, Pa. 19050, Usono.

TEJO

ADMINISTRAJ ORGANOJ DE TEJO

Estraro

Prezidanto: d-rino Flora Szabó-Felső, Várady Antal út. 4, H-7621 Pécs, Hungarujo (pretigado de la nova statuto, rilatoj kun UEA, kunordigado de la estrara laboro).

Vicprezidantoj: Ulrich Brandenburg, Vadrup 276, D-4401 Westbevern, FR Germanujo (edukado de Esperanto-gvidantoj); Rada Gavrilović, Minahassastraat 1, Poŝtfako 4098, Amsterdam - O., Nederlando (eksteraj rilatoj).

Ĝenerala Sekretario: Brunetto Casini, Via Pietro Colletta 2, I-56010 Ghezzano-Pisa, Italujo (rilatoj kun la komitato, kun la membroj kaj kun la Landaj Sekcioj).

Kasisto: s-ino J-M. Liouville-Cash, 72 rue de Rennes, F-75006 Paris, Francujo (financaj aferoj, varbado, fondusa agado).

Membroj: Juan Azcuénaga Vierna, Capitán Palacios 3, 4°-N., Santander, Hispanujo (regiona agado); Stephan MacGill, 34 Mona Vale Ave., Christchurch 1, Nov-Zelando (regiona agado, varbado); Paul Peeraerts, Drakenhoflaan 97, B 2100 Deurne, Belgujo (eldonaĵoj); Klaus Schubert, Duvensteder Triftweg 26 C, D-2000 Hamburg 65, FR Germanujo (kongresoj, konferencoj); Angel Todorov, bul. Patriarĥ Evtimii 98, Sofia 63, Bulgarujo (transpagaj problemoj, servoj, lerneja kaj studenta agado).

Revuo "Kontakto". Redaktoroj: Wim Jansen, Ulrich Lins, Simo Milojević. Redakcia adreso: S. Milojević, Holysingel 476, Vlaardingen, Nederlando.

Pasporta Servo. Gvidas la servon la kasisto.

KOMITATO DE TEJO

- Altuna, Miguel A., T. Ortiz de Zarate 21-6° izda, Bilbao-3, Hisp.
 Andréasson, f-ino I., Sagogängen 53, S-422 45 Hisinges-Backa,
 Svedujo.
 Azcuénaga, J., Capitán Palacios 3, 4°-N. Santander, Hispanujo.
 Basilio, E.A., Zona Rural, Firmat (S-ta Fé), Argentino.
 Brandenburg, U., Vadrup 276, D-4401 Westbevern, FR Germ.
 Cash-Liouville, s-ino J.M., 72 rue de Rennes, F-75006 Paris, Fra.
 Casini, B., Via Pietro Colletta 2, I-56010 Ghezzano (PI), Italujo.
 Čolić, S., Halilbašica 23, YU-71000 Sarajevo, Jugoslavio.
 Dimoupolos, S., Mitilinis 48, Athene, Grekujo.
 Dobrzyński, M., ul. Izabelli 12 m 4, PL-01-738 Warszawa, Poll.
 Ehrmantraut, Walter, Hauptstrasse 43 A, D-6651 Bierbach, FRG.
 Eöry, I., Sallay út. 37, H-9024 Győr, Hungarujo.
 Felső, P., Várady Antal út. 4, H-7621 Pécs, Hungarujo.
 Gavrilović, s-ino R., Minahassastraat 1, Amsterdam, Nederlando.
 Gončarov, A., pk 11, SU-656099 Barnaul, Sovet-Unio.
 Guiñon, M., Wilfredo 6-3-2°, Barcelona 1, Hispanujo.
 Gutierrez, M., Floranes 57-2° C, Santander, Hispanujo.
 Hamann, J., Püchauer Str. 3, DDR-705 Leipzig, G.D.R.
 Innocenti, F., Via Fiorentina 775, I-51032 Bottegone (PT), Ital.
 Jansen, W., Apollolaan 168, Leiden-2404, Nederlando.
 Jevtić, Z., 7 Jula 36, YU-34000 Kragujevac, Jugoslavio.
 Kruse, Franz, Löwengasse 16, D-6101 Rossdorf, FR Germ.
 Kustan, L., Taberei Blocu c 7/2, Ap. 2, Odorhei Jud. Hargita,
 Rumanujo.
 Lipari, f-ino M., Viale Kennedy 45, I-28100 Novara, Italujo.
 MacGill, S., 34 Mona Vale Ave., Christchurch 1, Nov-Zelando.
 Margot, f-ino N., Chemin des Crets, Champel 39, CH-1206
 Genève, Svislando.
 Matte, G., 214 Gloucester, Ap. 7, Ottawa, Ont. Kanado.
 Mättig Catalán, I., Casilla 13828, Santiago de Chile, Ĉilio.
 Minani, J., Mermoz A. 343, Résidence Universitaire, F-69008
 Lyon, Francujo.
 Möckel, f-ino Gisela, Elsässerst. 10, D-6200 Wiesbaden, FRG.
 Molle, G., Via Piave 157, I-03030 Roccasecca (FR), Italujo.
 Najera, f-ino M., Apartado Postal M. 9310, México 1, DF, Meks.
 Nourmont, f-ino C., 8 rue des F. Lumière, F-77000 Melun, Fran.

- Oberndorfer, A., Ferd. Wiesingerstr. 15, A-4600 Wels, Aŭstrujo.
 Peeraerts, P., Drakenhoflaan 97, B 2100 Deurne, Belgujo.
 Rabevezaha, D., B.P. 32171, Tananarive, Malagasa Respubliko.
 Rehaková, f-ino J., Smetanova 2409, Melnik, Ĉeĥoslovakujo.
 Sasabe, T., 5-5 Ohara 1-chome, Setagaya-ku, Tokio 156, Jap.
 Schödel, f-ino I., Rosa-Luxemburg-Str. 37, DDR-195 Neuruppin,
 Germana Demokratia Resp.
 Schubert, Klaus, Duvenstedter Triftweg 26 c, D-2000 Hamburg
 65, FR Germanujo.
 Skovrind, Å., Ved Kaeret 6, Sengeløse, DK-2630 Taastrup, Dan.
 Spasova, Antonia, u. Benkovski 24, Haskovo, Bulgarujo.
 Stoppoloni, Silvio, Via Guerrazzi 18, I-51100 Pistoia, Italujo.
 Szabó-Felső, s-ino F., Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungarujo.
 Tišljari, Z., Stubicka 75, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.
 Todorov, Angel, bul. Patriarĥ Evtimii 98, Sofia 63, Bulgarujo.
 Tomasella, Y., Le Chalet, Cocumont, F-47250 Bouglon, Fran.
 Vaskó, T., p.k. 193, H-1368 Budapest 5, Hungarujo.
 Verhelst, N., Laarstraat 81, B 2730 Zwijndrecht, Belgujo.
 Zavravec, J., Jocova 65, YU-62000 Maribor, Jugoslavio.
 Zajdman, s-ino Anat, Kirjat Sefer 11-a, Aĥuza, IL-34676 Haifa,
 Israelo.

JUNULARAJ SEKCIOJ

Sekcioj aliĝintaj al TEJO

- Argentina (ArgentinEJO): Av. S. Fé 1329, Firmat.
 Aŭstra (AEJ): A-8010 Hochsteing.16.
 Aŭstralia (AEJA): I. Heldzingen, Lot 7 Marville Court, Boronia
 3155 Vic.
 Belga (BEJA): P. Peeraerts, Drakenhoflaan 97, B-2100 Deurne.
 Brazila (BEJO): Caixa Postal 18, ZC OO, Rio de Janeiro.
 Brita (JEB): 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF.
 Bulgara (BEJ): p.k. 587, Sofia.
 Ĉilia: ĉe I. Mättig C., Casilla 13828, Santiago.
 Dana (DEJ): Helle Rossen, Vestervej 27, DK-4100 Ringsted.
 Franca (JEFO): 4 bis, Rue de la Cerisaie, F-75004 Paris.
 Germana Dem. (JS de CLE): Charlottenstr. 60, DDR-108 Berlin.
 Germana Fed. (GEJ): Postfach 2113, D-85 Nürnberg 2.
 Greka (JS de HEA): Agiu Meletiu 54, 814 Athinai.

TEJO

Hispana (HEJS): Barrencalle Barrena 7-1-D, Bilbao 5.
Hungara (HEJ): p.k. 193, H-1368 Budapest 5.
Itala (IEI): Via Villorosi 38, I-20143 Milano.
Israela (JELI): p.k. 4070, Haifa.
Japano (TEJA): 2-1 Yonban-Tyo, Tiyoda-ku, Tokio 102.
Jugoslava (JEJA): Amruŝeva 5/I, YU-41000 Zagreb.
Kolombia (KolombEJO): J.F. Perrelet, Apartado Aereo 20532, Bogotá.
Korea (KEJ): Internacia P.O. kesto 1232, Seoul.
Madagaskara (JEOM): B.P. 1678, Tananarive.
Meksika (EMJ): Apartado Postal M-9310, Mexiko 1, D.F.
Nederlanda (NEJ): ĉe Gerard Peet, Comeniushof 40, Hilversum-1304.
Nov-Zelanda (EJANZ): P.O. Box 40-181, Upper Hutt.
Pola (PEJ): ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa.
Sveda (SEJU): ĉe Tomas Jansson, Granitvägen 8B 4 tr, S-752 43 Uppsala.
Svisa (SEJ): Cure 5, CH-2035 Corcelles.
Usona (JEN): Th. Goodman, 3218 Shelburne Road, Baltimore, MD 21208.

Faka sekcio aliĝinta al TEJO

Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO): M. Lassak, Olszewskiego 3/43, Bydgoszcz, Pollando.

Faka sekcio observanta

Junulara sekcio de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEJ): J. Mevel, L.R.C. 3, F-73-Trappes Triage, Francujo.

Landaj sekcioj ankoraŭ ne aliĝintaj

Ĉeĥa (JS de ĈEA): poŝtkesto 168, Praha 1.
Norvega (NEJ): Boks 942, Oslo 1.
Sovetunia (SEJM): ĉe Boris Kolker, abonkesto 162, 450025 Ufa.

DUMVIVAJ PATRONAJ MEMBROJ (Kat. A)

S-ino E. Burgler-Jezsó (Geleen, Ned.)
S-ro J. Th. De Goeij (Rotterdam, Ned.)
S-ro R. Moerbeek (Rotterdam, Ned.)

TEJO

KONFERENCOJ DE TEJO (ĝis 1973 nomataj Kongresoj)

- | | |
|-------------------------------|---------------------------------|
| 1. 1938. Groet (Ned.) | 16. 1960. Rotterdam (Ned.) |
| 2. 1939. Tervuren (Belg.) | 17. 1961. Wokingham (Brit.) |
| 3. 1947. Ipswich (Brit.) | 18. 1962. Ystad (Sved.) |
| 4. 1948. Groet (Ned.) | 19. 1963. Vraca (Bulgar.) |
| 5. 1949. Versailles (Franc.) | 20. 1964. Amsterdam (Ned.) |
| 6. 1950. Konstanz (F.R.G.) | 21. 1965. Oocu (Japan.) |
| 7. 1951. Haarlem (Ned.) | 22. 1966. Pécs (Hungar.) |
| 8. 1952. Ry (Dan.) | 23. 1967. Netanja-Rotterdam |
| 9. 1953. Wörgl (Aŭstrujo) | 24. 1968. Tarragona (Hispan.) |
| 10. 1954. Hilversum (Ned.) | 25. 1969. Tyresö (Sved.) |
| 11. 1955. L'Aquila (Ital.) | 26. 1970. Graz (Aŭstrujo) |
| 12. 1956. Büsum (F.R.G.) | 27. 1971. Edinburgh (Brit.) |
| 13. 1957. Villeneuve (Franc.) | 28. 1972. Toruń (Pollando) |
| 14. 1958. Hamburg (F.R.G.) | 29. 1973. Sarajevo (Jugoslavio) |
| 15. 1959. Gdańsk (Pol.) | 30. 1974. Münster (F.R.G.) |



pasporta servo

72 rue de Rennes, F-75006 Paris, Francio

LA ABONO DE ALIAJ ELDONAĴOJ
ALTIĜAS PRO INFLACIO,
KAJ LA ABONO DE

Kontakto

ALTIĜIS PRO LA VALORO
DE LA REVUO.

ĈIUJ REVUOJ HAVAS KOVRILON,

Kontakto

HAVAS ANKAŬ MALKOVRILON.

Eldonas: TEJO, Nwe Binnenweg 176,
Rotterdam 3002, Nederlando.

Abonprezo: 13,- (por Nederlando
13,52) guldenoj, inkluzive la imposton
kaj la aktualecon de la artikoloj.

RAPORTO DE LA ESTRARO
PRI LA AGADO DE
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
dum la jaro 1973/74

I. ENKONDUKO

Konforme al la art. 30 de la Statuto, tiu ĉi raporto estas kunmetita de la ĝenerala sekretario kaj aprobita de la Estraro en la kunsido de la 7a de aprilo 1974.

Ĝi rilatas al la agado de la organoj de la Asocio en la periodo de la 1a de aprilo 1973 ĝis la 1-a de aprilo 1974. Estas aldonita ankaŭ la raporto de CED, pri kiu ĝia direktoro respondecas al la Komitato.

II. ĜENERALAĴOJ

(1) **Honora Patrona Komitato:** En 1973 forpasis prof. Maurice Fréchet, membro de la Honora Patrona Komitato de UEA de post 1958. Li estis mondfama matematikisto, membro de pluraj akademioj de sciencoj kaj prezidanto de ISAE de 1950 ĝis 1953.

(2) **Komitato:** Kvankam ne okazis novaj elektoj en 1973, okazis pluraj ŝanĝoj pro eksigoj kaj anstataŭigoj de komitatanoj A. Eksigis la komitatanoj: Kosieniak, Mażys, Radvánszky, Schmid kaj Toczyski. Eniris kiel novaj: d-ro M. Dobrzyński, mag. A. Grzębowski, s-ro R. Hirsch, s-ro R. Jałowicki, s-ino E. Pallós, s-ro S. Świstak kaj d-rino F. Szabó. En 1974 forpasis la multjara komitatano kaj prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo d-ro C. Domingues. La Komitato nun konsistas el 52 komitatanoj A, 6 komitatanoj B kaj 14 komitatanoj C, entute 72, plus 6 observantoj. Kunsidoj de la Komitato okazis dum la Universala Kongreso en Beograd.

(3) **Estraro:** La Estraro kunsidis en aprilo 1973; dum la UK en Beograd; kaj denove en aprilo 1974. Krome okazis malgranda teknika kunsido de estraranoj kaj aliaj, en Rotterdam en decembro 1973. Prof. Lapenna transprenis ankaŭ la taskon de estrarano pri administrado.

(4) **Laborplano:** La Komitato de UEA, en la 3a de aŭgusto 1973, akceptis novan Trian Laborplanon de UEA, bazitan sur la

Dua Baza Laborplano, kiu validis de 1962 ĝis 1973. La teksto de la nova plano aperis en la revuo *Esperanto*, novembro 1973, p. 189-192.

(5) **Landaj kaj fakaj asocioj:** Kvankam la Komitato en Beograd akceptis plian aliĝon de landa asocio, nome Kultura Kooperativo de Esperantistoj (Brazilo), aliflanke ekzigis Brazilan Esperanto-Ligo, tiel ke la nombro de aliĝintaj landaj asocioj restis la sama: 34. Inter la fakaj kaj neneŭtralaj asocioj restas 3 aliĝintaj, 15 kunlaborantaj fakaj kaj 4 kunlaborantaj neneŭtralaj. Kunlabor-kontrakton subskribis la organizaĵo Monda Turismo, dum sian kontrakton renovigis la ĵurnalista organizaĵo TEĴA.

III. ADMINISTRADO

A. CENTRA OFICEJO

(1) **Oficistoj:** La nombro de la salajritaj kompletaj labortagoj en la kalendara jaro 1973 estis 2 855 (en 1972: 2 195), t.e. ekvivalento de 10,9 konstantaj oficistoj. La alta nombro, kompare kun la lastaj jaroj, estis kaŭzita de la foriro de pluraj oficistoj kaj la neceso altiri kaj enkonduki novajn. En la 1a de aprilo 1974 la oficistaro konsistis el: f-ino M. Frus (Italujo – kompostado), J.Th. de Goeij (Nederlando – administrado, ekspedado), G. King (Britujo – libroservo), s-ino A. Childs-Mee (Britujo – jarlibro, korespondado), L. Mee (Britujo – librotenado), S. Milojević (Jugoslavio – vicdirektoro, redaktado), R. Moerbeek (Nederlando – biblioteko, ekspedado), f-ino P.W. Rietmulder (Nederlando – arĥivo), V. Sadler (Britujo – direktoro), B.J. Wijmer (Nederlando – fotografio), f-ino S. van Wijngaarden (Nederlando – administrado).

(2) **Domo:** Okazis dum la jaro granda nombro da malgrandaj riparoj, por ke la konstruaĵo estu strukture preta por refarbado kaj tapetado.

(3) **Maŝinoj:** En 1973, en ligo kun la transpreno de la eldonejo TK fare de UEA, la Centra Oficejo akiris malnovan, sed bone uzeblan, presmaŝinon ofsetan malgrandformatan. Ĝi estas uzata precipe por internaj presaĵoj, aliĝiloj, dokumentoj de CED k.s. Apud la vertikala fotilo por litografiaj filmoj, aĉetita en 1970, la fotografia fako disponas nun ankaŭ pri teknika portebla fotilo

por pankromataj filmoj kaj pri pligrandigilo. Tiuj estas uzataj interalie por fari samkvalitajn kopiojn de originalaj fotoj, ekzemple por disponigi al ĵurnalistoj. Krome estis aĉetitaj dum la jaro unu nova skribmaŝino, nova kalkulmaŝino kaj malgranda bindaparato por ring-sistema plasta bindado.

(4) **Membraro:** La lastaj ciferoj pri 1973 estas: Asociaj membroj: 22 379; Individuaj membroj: 734 MJ, 4 860 MA; 301 MS, 945 DM, 18 HM, 37 J-MJ, 187 J-MA, 149 MA-K, t.e. entute 7 231 individuaj membroj. La sumo de membroj en ĉiuj kategorioj estis do: 29 610.

(5) **Delegita reto:** La nombro de delegitoj en la diversaj kategorioj laŭ la stato en la Jarlibro 1974, Unua Parto, estis 1275 D, 186 VD, 58 JD, 2002 FD, t.e. entute 3 521 oficoj. (La nombro de personoj estas malpli alta, ĉar multaj havas plurajn oficojn.)

(6) **Jarlibro:** La Unua Parto (368 p.) aperis fine de majo 1973; la Dua Parto (352 p.) bedaŭrinde tre prokrastiĝis pro manko de redakciaj fortoj kaj stagno en la bindejo kaj fine aperis nur komence de februaro 1974.

(7) **Periodaĵoj:** Ankaŭ la revuo *Esperanto* bedaŭrinde malfruiĝis dum la jaro pro la menciitaj kaŭzoj kaj aperadis nur en la fino de ĉiu monato. Feliĉe, en la fino de 1973 kaj komenco de 1974 tiu prokrasto estis plejparte likvidita. La meza eldonnombro estis 8 200 ekz. Kreskis la nombro de simplaj abonantoj de la revuo (sen membreco) – verŝajne dank'al reklamado. La faldadon, enkovertigon kaj afrankadon de la revuo plenumas nuntempe la C.O. Por la plimulto de la landoj la revuo estas ekspedata el Antverpeno pro la malpli alta tarifo de la belga PTT. Ankaŭ la kvaronjara revuo *Kontakto* de TEJO aperadis malfrue, kiel en la antaŭaj jaroj. Ĝia eldonnombro estis 1 200 ekz.

(8) **Eldona fako:** La legolibro *Amuzaj dialogoj* de A. Lienhardt, kiu estis prespreta jam en marto 1973, aperis nur en oktobro pro intertempa bankroto de la koncerna presejo. En la unuaj 5 monatoj vendiĝis ĉ. 750 ekzempleroj el la eldonkvanto de 4070. Intertempe ne estis eble entrepreni aliajn eldonojn pro la laboro kaj investoj por la verko de CED *Esperanto en perspektivo*. Elĉerpiĝis la unua eldono de la kompilaĵo de mag. Dratwer *Pri internacia lingvo – dum jarcentoj*, eldonita en 1970.

(9) **Libroservo:** La kresko de la vendado (je pliaj 12% en 1973) estas tre kuraĝiga, kvankam la sumo de la profito restis proksi-

mume senŝanĝa. Kreskis ankaŭ la perado de gazetabonoj. Superrigardo pri la plej vendataj libroj en 1973 aperis en *Esperanto*, februaro 1974, p. 28. Granda – sed valora – investo estis la aĉeto de la eldonejo TK (Torben Kehlet) fare de UEA, kiu aldonis al la librostokoj de la Asocio verkojn kiel *La Nobla Korano*, *Vole-novele* kaj *ABZ de amo*. En 1974 aperis la granda *Internacia komerca-ekonomika vortaro en 9 lingvoj*, kaj la Libroservo de UEA aparte reklamas kaj disvastigas ĝin laŭ interkonsento kun la nederlanda eldonejo Kluwer.

(10) **Preslaboroj:** Krom propraj kaj kongresaj eldonaĵoj, la C.O. plenumis mendojn pri kompostado kaj aliaj grafikaj laboroj por Belga Esperanto-Federacio, la nederlanda Esperanto-asocio LEEN, la instruista asocio ILEI, Internacia Esperanto-Instituto, por la nederlanda eldono de *Esperanto programita*, por Jugoslavia Aertransporto kaj por pluraj aliaj privataj kaj komercaj mendantoj. La amplekso de tiuj laboroj sufiĉe kreskis kompare kun la antaŭa jaro.

(11) **Biblioteko:** Multaj membroj en ĉiuj mondpartoj utiligis la eblecon aĉeti fotokopiojn de libroj kaj aliaj materialoj ne plu haveblaj, kiel atestas la enspezo de multaj miloj da guldenoj tiucele. Aliflanke, la Biblioteko Hodler en kelkaj kazoj kompletigis sian kolekton per fotokopioj de eldonaĵoj ne plu akireblaj alimaniere. La vendado de libro-duoblaĵoj daŭre liveris rimedojn por bindado kaj aliaj bezonoj.

(12) **Ekspedado:** La C.O. plue prizorgis la ekspedon ne nur de ĉiuj eldonaĵoj de UEA kaj de la UK, sed ankaŭ, laŭmende, de *Internacia Pedagogia Revuo* kaj okaze de aliaj eldonaĵoj.

(13) **Varbado:** Aperis dua eldono de la alloga varbilo *Konstruu kun ni*, kiu estas senpage havebla de la C.O. por ĉiuj, kiuj deziras utiligi ĝin. La C.O. sisteme aranĝis distribuon de materialoj pri UEA en landaj kaj aliaj kongresoj. Rezulte de tio kaj de anoncoj en diversaj Esperantaj gazetoj, plimultiĝis informpetoj pri aliĝo.

(14) **Landaj oficejoj:** La nombro de landaj oficejoj (kotizperantoj) de UEA estas nuntempe 39. En Brazilo transprenis tiun rolon Kultura Kooperativo de Esperantistoj, kiel nova aliĝinta landa asocio. Germana Esperanto-Asocio nomis novan ĉefdelegiton (s-ino Hirsch), kiu transprenis de la antaŭa sekretario de GEA, s-ro Schmid. Du multjaraj ĉefdelegitoj retiriĝis – kun danko pro la fidela servado al la Asocio – nome: s-ro

Ramon Molera (Hispanujo) kaj s-ro Jehiel Ben-Alter (Israelo). Iliajn oficojn akceptis respektive s-ro L.M. Hernández Yzal kaj s-ro Israel Israeli.

(15) **Ĝenerala situacio:** La prezidanto, kiu transprenis la taskon de estrarano pri administrado nur en decembro 1973, prezentos al la Komitato en Hamburgo, konforme al la art. 30 de la Statuto, skriban raporton pri la situacio en la C.O. kaj pri ĝia funkciado kun konkretaj proponoj por plibonigo de la laboro.

B. SERVA CENTRO

La Serva Centro plue ekzistas ĉe s-ro J.J. Sturzenegger en Svislando. Ĝi pritraktas tiujn maloftajn korespondaĵojn, kiuj foje venas al la iama ĝeneva adreso de UEA.

IV. FINANCOJ

A. **Ĝeneralaj rimarkoj:** Dum la preparado de la buĝeto en la 1972a aprilo por la jaro 1973 estis jam klare, kiel malfacile estas atingi ekvilibron inter enspezoj kaj kostoj. Ĉar, kvankam ĉiuj kostoj kaj precipe la salajroj en Nederlando ege altiĝis, la Estraro ne intencis fari proponon pri altigoj de la kotizoj, kiuj restis samaj ekde 1970. Estis du faktoroj, kiuj donis esperon, ke eblos havi ekvilibron en 1973. Ili estis la 58a UK en Beogrado kaj preslaboroj por eksteraj mendantoj. Ni taksis, ke la kongreso estos same granda kiel tiuj en Varsovio, Sofio kaj Budapeŝto. Sur tiu bazo aperis en la buĝeto la du sumoj: kongreso (estas 20% de kotizoj por la CO) 31 200 gld. kaj kongresaj kotizoj SA (ne-individuaj membroj, kiuj ricevas “Esperanto”-n) 16 400 gld., kune 47 600 gld. La preslaboro (kompostado) por eksteruloj per du kompostmaŝinoj (dua aĉetota laŭ estrara decido) estis taksita je 32 000 gld. Anstataŭ esti unu el la grandegaj kongresoj, tiu de Beogrado fariĝis unu el la malgrandaj kongresoj. Tio signifis por la CO malpliajn enspezojn de 23 500 gld., ol buĝetite. La preslaboro por eksteruloj postrestis per 16 500 gld. Ili du kune do donis malpliajn enspezojn de 40 000 gld. (Ĉi tiuj ciferoj kaj postaj ĉiam estas rondigitaj.)

Krome la altiĝo de la salajroj en 1973 estis pli granda ol antaŭvidite. Pluraj geoficistoj forlasis la CO; estis altiritaj aliaj, sed ili devis enkonduki en laborojn, kaj estis inter ili tiuj, kiuj restis nur dum mallonga tempo en la CO.

B. KONTO DE KOSTOJ KAJ ENSPEZOJ

(1) **Granda malprofito:** Pro la supre menciitaj kaŭzoj kaj kelkaj poste menciitaj malpli grandaj, la jaro 1973 finiĝis per rekorda malprofito de 59 500 gld.

(2) **Komparo kun la buĝeto:** En ciferoj, rondigitaj je 500 gld., la grandaj diferencoj inter la buĝeto kaj la realo estas: malpli da enspezoj (t.e. preslaboro 16 500 gld., kongreso 14 000 gld., kotizoj 4 000 gld., libroservo 3 000 gld., donacoj 1 500 gld. kaj rento 500 gld.) kaj pli da elspezoj (t.e. salajroj 24 000 gld., vojaĝkostoj 5 500 gld., diversajoj 3 500 gld., TEJO 1 000 gld. kaj revuo "Esperanto" 1 000 gld.).

Kontraŭe al tiuj grandaj malfavoraj sumoj, estas nur jenaj eroj, kiuj donis avantaĝon kompare kun la buĝeto: pli da enspezoj el dumvivaj membroj 2 000 gld., kaj malpli da elspezoj: oficeja domo 3 500 gld., Jarlibro 4 500 gld. kaj deprezoj 5 000 gld.

(3) **Salajroj:** En la salajroj estas sumo de 5 000 gld. por pago al purigistinoj kaj tiurilataj impostoj kaj pensikotizoj, kiuj en la buĝeto estis metitaj sub oficeja domo. La pagita sumo por sociaj asekuroj estis 7 500 gld. pli alta ol buĝetite. El tio sekvas, ke la sumo de la veraj salajroj estis 11 500 gld. pli ol buĝetite, t.e. 7,8%.

(4) **Oficeja domo:** Pro la fakto, ke el la jaro 1971 ankoraŭ estis rezervo por riparigi la domon kaj ĉiuj elspezoj por la purigistinoj estis librotenitaj sub salajroj, tiu ero povis doni 3 500 gld. malpli ol buĝetite.

(5) **Revuo "Esperanto":** Ke la finaj kostoj estis nur 1 000 gld. super la buĝeto, estas kaŭzite de la fakto, ke la anoncoj donis enspezon de 7 500 gld.

(6) **Jarlibro:** La favora rezulto estas akirita dank'al la ŝparo de sendokostoj pro sendo tra Belgujo, kie la afranko-tarifo estas multe malpli alta ol en Nederlando.

(7) **Vojaĝkostoj:** Pro diversaj malfacilaĵoj rilate al la 58a UK, krom la kongresa sekretario, la direktoro kaj du geoficistoj devis veturi al Beogrado. Tio entute donis pliajn vojaĝkostojn de 5 500 gld.

(8) **Diversajoj:** La diferenco estas grandparte kaŭzita de kostoj de 3 000 gld. el malnovaj jaroj, inter kiuj estas preskaŭ 1 000 gld. da kurzoperdo pro la devaluto de la brita pundo.

(9) **Deprezoj:** Laŭ jam antaŭa decido de la Estraro la deprezo fariĝis 5 000 gld. malpli.

(10) **Kotizoj:** La sumo de la kotizoj estas 4 000 gld. malpli ol buĝetite, sed tiu sumo estas la diferenco inter pliaj kotizoj de individuaj membroj de 6 000 gld. kaj malpliaj kotizoj de kongresanoj de 10 000 gld.

(11) **Libroservo:** Kvankam estas ĝojiga la fakto, ke la vendoj kreskis de 83 000 gld. al 93 000 gld. kaj ke kreskis ankaŭ la perado de abonoj, la (malneta) profito el la libroservo restis sama kiel tiu en 1972.

(12) **Dumvivaj membroj (DM):** Laŭ decido de la Komitato venas en la konton por ĉiu DM centmilono de ĉiuj buĝetitaj kostoj; tio fariĝis $945 \text{ DM} \times 3,04 \text{ gld.} = 2\,872,80 \text{ gld.}$, do proks-e 2 000 gld. pli ol buĝetite.

C. BILANCO

(1) **Malkresko de la kapitalo:** Kompare kun la konto de kostoj kaj enspezoj la bilanco je 1973-12-31 ne donas tiom malĝojigan bildon. La Asocia Kapitalo iom malkreskis, t.e. de 276 000 gld. je la fino de 1972 al 266 000 je la fino de 1973.

(2) **La plej grandaj diferencoj:** La eroj, kiuj donas grandajn diferencojn inter la fino de 1972 kaj la fino de 1973, estas: — Ĉe la Aktivoj: malpli da monrimedoj 48 000 gld. kaj da antaŭ-pagitaj elspezoj 17 000 gld., entute 65 000 gld., sed pli da ricevotaj enspezoj 4 000 gld., da debitoroj 42 000 gld. kaj da provizoj 28 000 gld., entute 74 000 gld.

Ĉe la Pasivoj: pliaj pasivoj: da antaŭricevitaj enspezoj 3 000 gld. kaj da kreditoroj 42 000 gld., entute 45 000 gld.; malpliaj pasivoj: da hipoteko 3 000 gld., da pagotaj elspezoj 5 000 gld. da fondaĵoj 15 000 gld., entute 23 000 gld.

(3) **Debitoroj:** Je la fino de 1972 ni povis kun ĝojo konstati, ke pro pli rapide ricevotaj pagoj la debitora sumo grave malkreskis. Bedaŭrinde je la fino de 1973 ĝi denove kreskis per 42 000 gld. Tio signifas por UEA malpli da monrimedoj kaj ankaŭ malpli da ricevita rento.

(4) **Provizoj:** La kresko de la provizoj estas kaŭzita de transprenita librostoko de la eldonejo T.K.

(5) **Kreditoroj:** Ke la sumo de la kreditoroj nun estas multe pli alta ol je la fino de 1972, trovas sian kaŭzon en la fakto, ke la konto de la 58a UK en Beogrado ankoraŭ nun — je la redakta momento de ĉi tiu raporto — ne estas finaranĝita.

(6) **Fondaĵoj:** Por superrigardo de la en- kaj elspezoj de la plej gravaj fondaĵoj vidu la paĝojn

Pro la ankoraŭ ne farita finkalkulo de la financoj de la 58a UK en Beogrado la saldo de la Propaganda Konto estas negativa.

(7) **Asocia Kapitalo:** Laŭ la statuto de UEA la Asocia Kapitalo enhavas la pagojn de la dumvivaj membroj (DM) kaj la ceteran kapitalon. En 1973 aliĝis 86 novaj DM. Tio donis enspezon de 48 000 gld. La kapitalo ricevita de DM parte estas metita en valorpapirojn. Pro ĝenerala kurzofalo ili donis malprofiton de 6 500 gld.

La cetera kapitalo kreskis per bela – ripetita – donaco de 1 500 gld. kaj per du heredaĵoj de entute 9 000 gld. Sed ĝi kompreneble malkreskis per la malprofito de 59 500 gld.

(8) **Konkludo:** Dum la jaro 1973 jam fariĝis klare, ke kun la samaj kotizoj kiel en 1970 kaj la ĉiama kresko de la kostoj (en Nederlando, kie UEA havas juran personecon kaj devas sekvi la leĝojn de la lando, la deviga minimuma salajro inter 1970 kaj 1973 kreskis per 44%) estis ne eble havi ekvilibron inter kostoj kaj profitoj. Tamen, kiel menciite sub “Ĝeneralaj rimarkoj”, la eroj kongreso kaj preslaboro por eksteruloj kaŭzis la grandegan parton de la tiel bedaŭrata granda malprofito.

V. INSTITUCIO HODLER 68

La Estraro de Institucio Hodler 68 restis sensanĝa en 1973, do konsistis el s-ro G. Maertens, d-ro W. Bormann kaj s-ro E. Haver-Schmidt, dum restis administranto f-ino M.H. Vermaas.

La jarkunveno okazis la 7an de aprilo 1973 en Hengelo, Nederlando, apud la germana limo. Okazis publika kunveno dum la Kongreso en Beograd. Pere de la kongresa dokumentaro varba folio estis disdonita, kiu sama folio estis ankaŭ dissendita tra la mondo pere de la revuo *Esperanto*.

Tiu kampanjo kaŭzis pliajn pruntojn kaj donacojn, tiel ke la kapitalo kreskis de iom pli ol 159 000,– gld. fine de 1972 al preskaŭ 167 500,– gld. fine de 1973. En decembro estis ricevita en Belgujo donaco de pluraj miloj da guldenoj, kiun provizore la prezidanto sekure metis en bankon. Ĝi eniris la librotendon de la Institucio nur en 1974.

La neta profito sumiĝas je 6 506,09 gld., dividota de la institucia Estraro printempe 1974. El la profito de la jaro 1972 estis asignitaj la jenaj subvencioj: al Fondaĵo Prof. Canuto (50 MA de UEA en nepagipovaj landoj) 1 500,– gld.; al Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo 950,– gld.; al la literatura revuo Norda Prismo 1 650,– gld.; al Societo por Internacia Lingvo 800,– gld.;

al Skolta Esperantista Ligo (por eldono de lernolibro kaj disko) 500,– gld.; al Fondaĵo Enciklopedio 300,– gld.; al “Kastora Klubo” (por infanoj) 100,– gld.

Koncerne investadon, la akcioj “Royal Dutch” kaj “Robeco” estis venditaj kun gajno de entute 5 581,80 gld., dum akcioj “Philips” estis aĉetitaj.

Tre favora kaj ĝojiga fenomeno estas, ke 40% el la kapitalo, nome 67 miloj konsistas el donacoj. La pruntoj “a” kaj “b” ambaŭ ampleksas po 50 miloj proksimume. Tio montras fidon je Insitucio Hodler 68, kian laŭ espero de ĝia Estraro esprimos ĉiam pli da esperantistoj.

VI. REVUO

(1) **Redakcio:** Post la retiriĝo de s-ino Woessink-Nagata en aprilo 1973, ĉiujn redaktolaborojn por la revuo *Esperanto* reprenis la ĉefredaktoro, d-ro Sadler, ĝis oktobro 1973. En la lastaj monatoj de 1973 plenumis grandan parton de la laboro s-ino V. Zlotnikova, kaj ekde la januara numero 1974 la tutan redakcian taskon transprenis s-ro S. Milojević sub respondeco de la ĉefredaktoro.

(2) **Aspekto:** La sola ŝanĝo en 1973 estis nova titola kliŝo ekde la maja numero, sed la tuta interna aranĝo de la paĝoj travivis fundan novigon en januaro 1974, kiam unuecigo de la titoloj, novaj rubriktitoloj kaj ĝenerale pli granda litertipo rezultigis novan aspekton, kiu laŭ la reagoj de la legantaro trovis vastan aprobon.

(3) **Amplekso kaj enhavo:** La amplekso restis sensanĝa, nome entute 264 paĝoj jare inkluzive de kovrilaj paĝoj. La 25a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj – kaj la ĉeftemo de la 58a Universala Kongreso en Beograd, “Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko” – estis okazo por pluraj valoraj studoj en la revuo pri lingvaj kaj aliaj rajtoj. Same, *Esperanto* atentigis per ĉefartikolo en la marta numero 1974 pri la Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion. La artikolserio “Por pli efika informado”, verkita de prof. Lapenna, atingis sian konkludon en la maja numero 1973, kaj la rubriko por komencantoj “Komenco bona – ĉio bona” estis provizore ĉesigita en decembro 1973.

Aliflanke, sub la rubriko "Enciklopedio de Esperanto" aperis nombro da interesokaptaj studoj el la materialoj kolektitaj por la estonta nova eldono de tiu verko.

(4) **Kunlaborantoj:** Valoran helpon por unuopaj numeroj donis s-ro Ulrich Lins (julia numero 1973) kaj s-ro Simo Milojević (precipe la septembra numero, dediĉita al la Universala Kongreso en Beograd). La prizorgantoj de la unuopaj rubrikoj restis la samaj, kun la escepto, ke de post la UK mankas redaktoro de la TEJO-paĝo.

(5) **Teknika prizorgo:** Kiel en la lastaj jaroj, la kompostadon, enpaĝigon kaj fotografion prizorgis la C.O., dum la revuon presis kaj bindis la firmo Tuijtel, Nederlando.

VII. KONGRESOJ

(1) **UK en Beograd, Jugoslavio:** La 58a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Beograd, la ĉefurbo de Jugoslavio, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 1973, sub Alta Protekto de la ŝtat-prezidanto de SFR Jugoslavio, Josip Broz Tito. La Honora Komitato konsistis el 17 elstaraj personecoj de la politika kaj kultura vivo de Jugoslavio, inter kiuj estis Džemal Bijedić, la prezidanto de la Federacia Plenuma Komitato (ĉefministro). Ĉar la prezidanto de UEA ne povis ĉeesti, la Kongreson prezidis la du vicprezidantoj de UEA, s-ro E. Carlén kaj prof. B. Popović. La Lokan Kongresan Komitaton prezidis prof. M. Šaponjić, kaj la Konstanta Kongresa Sekretario estis s-ro M. Nevan.

Preskaŭ ĉiuj aranĝoj de la Kongreso okazis en la Domo de Sindikatoj. Aliĝis entute 1 638 personoj el 42 landoj.

En la Inaŭguro vekis apartan atenton la parolado de la reprezentanto de la Alta Protektanto, Veljko Milatović, kiu diris i.a.: "Esperanton kiel lingvon, feliĉe, ne alportas konkerantoj, koloniistoj, la fortaj kaj potencaj, kiuj ankaŭ sur niaj teritorioj provadis forpuŝi la naciajn lingvojn. Esperanto estiĝis kaj evoluas el la bezono mem de la homoj kaj popoloj, kiuj parolas malsamajn lingvojn, interkompreniĝi kaj alproksimiĝi. Ĝuste en tiu libervoleco troviĝas ĝia plej profunda kultura, civiliza kaj humana misio." La ĉeesto de oficialaj reprezentantoj de registaroj en la Inaŭguro estis pli multnombra ol iam antaŭe: 21 ŝtatoj kaj

2 internaciaj organizaĵoj. La festparoladon – ligitan al la etna konsisto de la kongreslando, la solvo de ĝiaj lingvaj problemoj kaj la ĉeftemo de la Kongreso, kun aludo al la Konferenco pri Eŭropa Sekureco en Helsinki – faris d-ro J.C. Wells, estrarano de UEA pri kongresoj.

La ĉeftemo de la Kongreso estis "Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko". Al ĝi estis dediĉita la Dua Generala Kunveno de UEA, kiun prezidis d-ro Wells, kiu prezentis ankaŭ enkondukan raporton pri la temo. La unuopaj raportoj (i.a. el Jugoslavio, Svislando, Kanado kaj Belgujo) estis sur tre alta nivelo kaj prilumis multajn aspektojn de la lingva problemo precipe en multnaciaj ŝtatoj. La Unua Generala Kunveno aŭdis salutojn de fakaj organizaĵoj kaj pridiskutis la Estraran Raporton de UEA. La Debaton, kies temo estis "Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj?", prezidis d-ro W. Bormann. Raportis s-roj G. Becker (FR Germanujo) kaj E.J. Woessink (Nederlando). Vigla diskuto kondukis al la ĝenerala konkludo, ke necesas konservi sed modernigi la lokajn grupojn.

La Komitato de UEA kunsidis 4 fojojn kaj akceptis interalie novan Laborplanon de UEA kaj interkonsenton pri rilatoj kun la junulara sekcio de TEJO. Okazis ankaŭ 3 kunsidoj de la Estraro de UEA.

En la 26a sesio de la Internacia Somera Universitato (rektoro: prof. B. Popović) okazis 8 prelegoj de profesoroj el 7 landoj, plejparte, ĉi-foje, pri natursciencaj temoj. En la Oratora Konkurso venkis s-ro S. MacGill (Nov-Zelando) per parolado pri la temo "Kion celas la hodiaŭa junularo?" Premiojn gajnis ankaŭ f-ino K. Yoda (Japanujo) kaj s-ro I. Carter (Britujo). En la Belartaj Konkursoj partoprenis 56 aŭtoroj el 26 landoj, sed en neniun branĉon estis aljuĝita ĉi-jare la unua premio.

Inter la aliaj kulturaj aranĝoj estas menciinda la Teatra Vespero, kun la komedio *Aŭtobiografio* de Nušić en plenumo de Studenta Esperanto-Klubo el Zagreb; la brila Jugoslavia Vespero, kiun prezentis la folkloro ensemblo "Vukica Mitrović"; kaj la Varia Vespero. Kiel kutime, la programo de la Kongreso enhavis ankaŭ Interkonan Vesperon, Oficialan Balon kaj Bankedon, Junularan Vesperon kaj ekskursojn.

S-ro Branko Pešić, prezidanto de la Magistrato de Beograd, akceptis 200 reprezentantojn de la Kongreso.

La Kongresan Gazetaran Servon gvidis s-ro Marinko Gjivoje (Jugoslavio). La Solena Fermo okazis la 4an de aŭgusto kaj akceptis Rezolucion, kies teksto aperis en *Esperanto*, septembro 1973, p. 141, kaj kiu alvokis la eŭropajn registarojn kaj instituciojn "dediĉi seriozan atenton al la lingva aspekto de kulturaj interrilatoj" – tio en ligo kun la Eŭropa Konferenco pri Sekureco kaj Kunlaboro. Detala raporto pri la tuta Kongreso aperis en la menciita numero de *Esperanto*.

(2) **Aranĝoj en ligo kun la 58a UK:** Paralele kun la Kongreso okazis la 41a Kongreso de Blindaj Esperantistoj kaj la 13a Internacia Infana Kongreseto, kiun partoprenis 31 infanoj el 9 landoj. Oficiala Postkongreso okazis en Ateno (Grekujo) de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto, kun programo kulture turisma.

(3) **TEJO-Kongreso:** La 29a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis en Sarajevo (Jugoslavio) en la semajno antaŭ la UK. (Vidu la Raporton de TEJO).

(4) **UK en Hamburgo, FRG:** La 59a Universala Kongreso okazos en Hamburgo, FR Germanujo, de la 27a de julio ĝis la 3a de aŭgusto 1974. Oficiala Postkongreso okazos en Kronach, Bavarujo.

VIII. INFORMADO

(1) **Enkonduko:** Denove la membroj kaj eksteraj kunlaborantoj de la Konstanta Komisiono pri Informado faris utilan laboron. S-ro Bourdeaux, kiu estras la Informan Centron de UEA en Parizo kaj la francan informan fakon, daŭrigis sian kutimon transdonante informojn al internaciaj agentejoj. Li laboris ankaŭ per nova metodo aranĝante gazetarajn koktelakceptojn ĉe Salonoj Ricard ekz. por prezento de la libro de prof. Janton kaj tiu de Marabout Flash, same por la Eŭropa Esperanto-Kongreso en Luksemburgo. Grandan helpon li donis en Beograd. S-ro Pettyn daŭrigis sian laboron pere de Pola Radio kaj en Pollando. Cetere en la jaro 1973 lernolibroj, legolibro kaj informaj broŝuroj liaj aperis en eldonkvanto de preskaŭ 50 000. S-ro Pickel povis feliĉe repreni siajn aktivecojn multflankajn eldonante regule *Pilo-press*. S-ro Günther Conrad eldonis broŝuron kun titolo *Manlibro de varbado* por prezenti modernajn varbmetodojn. La artikolserio *Por pli efika informado*, kies influo jam estas rimarkebla en informagadoj, aperos broŝurforme.

Prof. Lapenna ankaŭ verkis artikolon por *Impulsoj 3: Kelkajn rimarkojn rilate respondojn pri Esperanto*. Ĝin reprenis *Internacia Ĵurnalisto*, Organo de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA), n-ro 3-4, 1973, p. 10.

La gvidanto de la Informa Fako publikigis kelkajn artikolojn pri lingvoinstruado kaj la lingva problemo, havis radio- kaj televid-intervjuojn (Vidu ankaŭ Inf. pri la Kongreso) ekz. pri Eŭropa Kongreso en Luksemburgo, lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko ktp. Okaze de la Jubileo pri Homaj Rajtoj li faris dek prelegojn en lernejoj klasoj laŭ la Unesko-afiŝoj kun speciala atentigo pri la lingva problemo. Similajn prelegojn li faris pri aliaj okazoj, ekz. rilate la eŭropan lingvan problemon.

Daŭre restas valoraj por informado CED-dokumentoj, ne nur CED-7 kun 17 eldonoj en 13 lingvoj (Vidu rap. de CED, B5), sed ankaŭ aliaj, ekz. nun la hispanlingva *El problema lingüístico en las relaciones internacionales*. Similan informan utilon trovas pli kaj pli artikoloj de la revuo *La Monda Lingvo-Problemo* aŭ ties resumoj.

(2) **Landaj Informaj Fakoj:** La IF de UEA nur povis juĝi laŭ alvenintaj raportoj, pri kiuj ni daŭre petas, kaj la gazetartikoloj, kiujn oni sendas al ni. Feliĉe pro la *Eltondaja Servo de UEA* oni sendas pli da artikoloj (Vidu subĉap. 4). Bonaj agadoj de la lasta laborperiodo estis daŭrigataj. Ni ĉerpas el kelkaj raportoj: El tiu de Pola Esp. Asocio ... En la afero de la ekstera informado oni daŭrigis la dissendadon de nacilingvaj bultenoj al la redakcioj de amaskomunikiloj en Pollando; oni daŭrigis la pli proksiman kontakton kun 10 gazetoj regule aperigantaj inform-materialojn pri Esperanto. Al la pli vasta informado kontribuis ankaŭ la intervjuoj de geaktoroj-esperantistoj. Sume en 1973 aperis en la pola gazeto 3347 informoj, inter kiuj 2 artikoloj kaj 47 mencioj pri la UK en Beograd. Plej multe la gazetaro skribis pri la korespondaj kursoj de Esperanto kaj pri la sporta konkurso. En la preparolata periodo venis al la oficejo de PEA 15312 leteroj kun demandoj pri Esperanto kaj ebloj lerni ĝin. Por kontentigi tiujn demandantojn oni eldonis kaj distribuis 8-paĝan broŝureton pollingvan de A. Pettyn *ABC jazyka Esperanto* en la suma eldonkvanto de 17 000 ekzempleroj

Pri Esperanto programita... Ĝi disradiis al pli multaj landoj. Lingvo-laboratoriaj kursoj estis ofte aranĝataj kune kun diversaj gazetaraj konferencoj. Fine de novembro 1973 Hermann Behrmann, intertempe prezidanto de Germanaj Esperanto-Instruistoj, organizis prelegojn de Harald Schicke, juna abituriento el Hamburgo, kiu vizitis pli ol dek universitatojn por informi tie la studentojn pri Esperanto. Okaze de instruista protestkunveno en Bonn estis aranĝita varbkampanjo por Esperanto.

Plej fama studanto estis prof. d-ro Helmar Frank (Vidu ĉap. XI, 1), kiu jam kelkfoje publike eldiris, ke sciencisto povas per 20-hora studado akiri legkompetentecon pri Esperanto. Li mem faris pere de sia instituto opinisondadon ĉe pli ol 4000 reprezentantoj de la publika vivo en FRG. La ĵus (31-a de marto 1974) publikigitaj rezultoj bone aŭguras por ni....

Mallongaj, tamen gravaj mencioj:

ELNA havas nun konstantan oficejon. La interesiĝo kreskis konsiderinde. La 7an de oktobro la franca radiostacio France-Culture elsendis duhoran programon pri Esperanto. Naci-skala opinisondado okazis en Francujo. *Espéranto-actualités* de januaro-februaro 1974 estis denove tre impresa nacilingva novaĵ-bulteno ĉeftitole pri *L'Espéranto sans peine* (Vidu ĉap. XI, 3). Ekde oktobro 1973 aperas en Hungarujo *Eszperantó Magazin*. La revuo estas ĉefe hungarlingva, grandformata kaj ilustrita. Ĝi estas destinita por tiuj, kiuj interesiĝas pri la monda lingvo-problemo, sed estas ankoraŭ malmulte informitaj pri Esperanto. Kompreneble ankaŭ la agado en la brita parlamento daŭris. Esperanto programita atingis Britujon. Fulmatakto en Londono por atentigi Kongreson de Eŭropo (11-a ĝis 13-a de majo 1973) kun slogano: *Ni bezonas komunan lingvon*. Belga Ministerio pri Nederlanda Kulturo proponis senpagajn prelegojn pri Esperanto. Internaciaj kursoj nun ankaŭ en Portugalujo. Peticio pri enkonduko de Esperanto en Japanujo. Ekspozicio de Korea Esperanto-Societo kaj Korea Esperanto-Junularo en Seulo. Ankaŭ en diversaj respublikoj de Sovetunio granda aktivado en gazetaro kaj parte pere de kursoj.

(3) **Kunlaborantoj:** 92 personoj estas individuaj kunlaborantoj de la Informa Fakto de UEA.

(4) **Informa agado pere de la CO:** La CO ne nur faras la tutan teknikan laboron por helpi en la informa laboro, sed ĝi eldonas ekde 1972 *Eltondajan Servon de UEA* por jarabono de 20,— gld. Ĝi montras per elektitaj specimenoj kiel varie kaj vaste aperas artikoloj pri Esperanto kaj la lingva problemo en la monda gazetaro. Multaj artikoloj en la revuo *Esperanto*, precipe tiaj, kiuj ne perdas tuj aktualecon, estas rekte transpreneblaj por informaj celoj. Pli kaj pli da individuaj membroj utiligas jam tiun eblecon. Daŭre estas haveblaj la Internacia Afiŝo kaj la Seslingva Faldfolio. Portugallingvan eldonon oni notas en Brazilo, simile duan nederlandlingvan.

(5) **Informa laboro de TEJO:** Vidu la raporton de TEJO.

(6) **Informado pri la Kongreso:** La situo de la kongresa urbo en plurnacia ŝtato kun multaj lingvaj problemoj, la persono de la Honora Protektanto, Marŝalo Tito, kaj la ĉeftemo de la Kongreso,

Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko estis iusence bonaj antaŭkondiĉoj por povi efektiviĝi bonan informadon en la lando mem kaj ekstere.

En la novembra numero de Esperanto aperis artikolo de kongreslandano *Reorganizi la Gazetaran Servon*, subtitole *prikongresaj reeĥoj*. Li donas bonan analizon de la artikoloj aperintaj en la lando mem kaj esprimas kelkajn plendojn, ke oni nur emfazis la komencon kaj la finon de la Kongreso kaj ne ties ĉeftemon kaj laborojn, ISU ktp. Tiamaniere ne estis en ĉiuj kazoj.

Havinte jam telefonajn intervjuojn kun *Europa-Welle Saar* (Sarlanda Radio) kaj *Süddeutscher Rundfunk* (Sudgermana Radio) el Beograd mem, en tuta trankvilo post reveno hejmen la ĝenerala sekretario donis ankoraŭ sufiĉe ampleksan intervjuon al *Studio-Welle Saar* speciale pri la ĉeftemo de la Kongreso, pri ISU ktp.

Ankaŭ al la gazetaragentejoj estis transdonitaj tiaj informoj kaj almenaŭ en kelkaj landoj aperis informoj en multaj gazetoj. *Le Figaro* sendis denove specialan korespondanton, kaj *Pola Radio* kunlaboris kun la pola flugkompanio LOT por povi pli rapide transporti la bendojn al Varsovio, ĉar ĉiukaze la originalaj registraĵoj pli impresas ol legitaj informoj. *Radio Zagreb* havis ĉiutagajn elsendojn.

IX. EKSTERAJ RILATOJ

A. ENKONDUKAJ RIMARKOJ

(1) **Formoj kaj celo:** Ĉar la Estrara Raporto estos pritraktita de la nova Komitato, utilas denove koncize prezenti la ĉefajn formojn kaj celon de la eksteraj rilatoj de UEA. Ankaŭ en la pasinta laborjaro la prezidanto estis komisiita prizorgi tiujn rilatojn. Kvankam la ĉefa atento plu estis dediĉita al mondaj organizaĵoj, unuavice al Unesko kaj UN, tamen estis evoluigataj kontaktoj kun multnombraj neregistaraj organizaĵoj (NRO-j), precipe kun tiuj, kiuj havas konsultajn rilatojn kun Unesko kaj UN. Krome, UEA rilatas kun unuopaj registaroj ĉu rekte, ĉu pere de la respektivaj LA. La eksteraj rilatoj estas konstantaj kaj plu vastiĝas en tiu ĉi laborjaro. Ili realiĝas en tri formoj: (i) korespondado; (ii) partopreno en internaciaj konferencoj, seminarioj, simpozioj kaj rondtblaj diskutoj; (iii) personaj kontaktoj kun la

reprezentantoj de registaraj kaj neregistaraj organizaĵoj. La baza celo estas kontribui al agadoj, kiuj progresigas internacian kompreniĝon, atentigante samtempe en konvena formo pri la lingvaj obstakloj kaj pri Esperanto kiel solvo de la problemoj. Komprenible, la eksteraj rilatoj de UEA povas manifesti sian plenan valoron nur en la kadro de la aliaj agadoj de la Asocio konforme al la principo de interdependeco kaj kunligiteco de ĉiuj aktivadoj kiel unu el la bazaj principoj en la laboro de la Asocio por progresigi la lingvon. Se la aktivadoj en la aliaj branĉoj postrestas aŭ eĉ forestas, aŭ se la aliĝintaj organizaĵoj ne utiligas la atingojn en la eksteraj rilatoj, la efikeco de la atingoj malgrandiĝas aŭ eĉ plene neniĝas. En tiu ĉi ĉapitro estos prezentitaj nur la ĉefaj agadoj en la pasinta laborjaro.

(2) **Interna organizo:** La ĉefaj kunlaborantoj de la prezidanto sur la kampo de eksteraj rilatoj estas s-ro J. Thierry kun la helpo de s-ro A. Bourdeaux en Parizo kiel lokaj reprezentantoj de UEA ĉe la Sekretariato de Unesko; kaj s-ro Mark Starr kun la helpo de s-ino M. Gerson (ĝis junio 1973) kaj s-ino Marion Newel-Lorie (ekde junio 1973) kiel lokaj reprezentantoj de UEA ĉe la Sekretariato de UN en New York. Interkonsente kun la prezidanto, ili ankaŭ realigas ĉiujn kontaktojn kun la reprezentantoj de NRO-j en Parizo, resp. en New York. La prezidanto mem havas konstantajn rektajn kontaktojn kun la reprezentantoj de 29 NRO-j kun sidejo en Britujo. La kunlaborado inter la ĉefaj reprezentantoj de UEA estis kaj restas plej harmonia.

(3) **Amplekso kaj financa aspekto:** La nombro de publikaĵoj kaj dokumentoj, kiujn UEA ricevas ĉiujare, atingas plurajn milojn da paĝoj. La nura trarigardo de la tuto kaj la trastudo de unuopaj partoj por eventuala interveno forrabas amason da tempo. Al tio aldoniĝas la verkado de proponoj, personaj intervenoj, partopreno de la Asociaj reprezentantoj en diversaj konferencoj kaj abunda korespondado. Pluraj NRO-j en la sama kategorio kiel UEA havas apartajn geoficistojn por vivteni la konsultajn rilatojn kaj elspezas tiucele konsiderindajn sumojn. Se oni esceptas la afrankon kaj la eventualajn efektivajn vojaĝelspezojn, al UEA tiu tuta ampleksa laboro kostas praktike nenion. Necesas tion diri, ĉar la ekzemplo de eksteraj rilatoj montras, ke multo estas atingebla per sindono kaj oferemo, eĉ se forestas iel adekvataj financaj rimedoj.

B. UNESKO

(1) **Konsultaj rilatoj:** UEA, kiu establis la konsultajn rilatojn en 1954, plu konservas la prestiĝan pozicion en la kategorio B. Esencaj informoj pri la signifo de la konsultaj rilatoj en diversaj kategorioj troviĝas en la Jarlibro, Dua Parto, 1974. El ĉ. 3000 internaciaj organizaĵoj, laŭ la lasta statistiko de julio 1973, entute 35 NRO-j troviĝis en la kategorio A, 167 en kategorio B, kaj 142 en kategorio C, dum la aliaj ne havis kiujn ajn konsultajn rilatojn, kvankam multaj provis akiri ilin. Menciinde estas, ke la *World Interlingua Union* (Monda Interlingua-Unio) klopodis akiri almenaŭ kategorion C, sed estis rifuzita (Dok. de Unesko 17 C/25, p. 4).

(2) **Reprezentigo en konferencoj:** La prezidanto ĉeestis preskaŭ ĉiujn kunsidojn de NRO-j kun sidejo en Londono, entute 5, kaj estis en persona kontakto kun la prezidanto de tiu grupo s-ro E. H. Robertson kaj aliaj reprezentantoj. Komitatano Jean Thierry ĉeestis kiel observanto la kunsidojn de la Konstanta Komitato de NRO-j en Parizo, laste en marto 1974; kiel delegito de UEA li partoprenis la gravan simpozion de NRO-j pri rasismo de la 27a ĝis 29a de marto, kaj de la Konferenco de NRO-j de la 6a ĝis la 9a de novembro 1973.

(3) **Simpozio pri Rasismo:** Ekde la komenco UEA aktive partoprenis en ĝia laboro kaj en Londono kaj en Parizo. Fine de februaro 1973 la reprezentantoj de 29 NRO-j kun sidejo en Londono unuanime elektis la prezidanton de UEA esprimi la komunan starpunkton de tiuj organizaĵoj en la Grupo A (interna leĝaro de ŝtatoj por protekto de homaj rajtoj en plurrasaj komunajoj) de la Simpozio pri Rasismo, okazonta fine de marto. Dum la sama kunsido de NRO-j estis unuanime decidite, ke la Raporto al Grupo C (forigo de obstakloj al rasa egaleco) entenu la rimarkojn de la reprezentanto de UEA pri la lingva obstaklo kiel unu el la kaŭzoj de rasaj kaj/aŭ naciaj antaŭjuĝoj. Bedaŭrinde, malhelpita pro grava profesia tasko, la prezidanto ne povis persone partopreni la Simpozion, kiu okazis de la 27a ĝis la 29a de marto. Lin anstataŭis komitatano Jean Thierry. Per letero de la 28a de junio 1973 la Sekretariato de la Konstanta Komitato informis, ke la Rezolucio de UEA pri la lingvaj obstakloj kiel malhelpo al rasa egaleco estos prezentita al la Komisiono pri Rezolucioj de la sekva Konferenco de NRO-j, okazonta en novembro 1973. Tio fakte estis farita. La

Konferenco okazis de la 6a ĝis la 9a de novembro 1973 en Parizo, kaj Jean Thierry denove estis reprezentanto de UEA. Interkonsente kun la prezidanto, li tre efike intervenis. Rezulte de tiuj klopodoj, kvankam ne estas atingita la maksimuma celo, tamen la elemento de "lingvo" eniris en plurajn lokojn de la fina teksto de la Decidoj, kiujn akceptis la Konferenco (Dok. de Unesko *NGO/Conf. 14/Decisions* de la 10a de decembro 1973).

(4) **Lingva obstaklo kaj rasismo:** Fine de 1972 la Ĝenerala Asembleo de UN decidis realigi vastan programon sub la ĝenerala titolo *Jardeko de Aktivado por Kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion*. Unesko partoprenas en tiu agado. Nun kaj UN kaj Unesko preparas la detalojn de la agadprogramo. UEA estis invitita doni sugestojn kaj informi pri la entreprenotaj agadoj sur tiu kampo en la sekvaj jaroj. En ampleksa letero de la 11a de februaro 1974, adresita al Departemento pri Sociaj Sciencoj de Unesko kaj al Departemento pri Homaj Rajtoj de UN, UEA prezentis sian starpunkton. En la letero estas, konklude, dirite, ke por povi sukcese kontraŭbatali rasismon, estas necese ne sole agadi kontraŭ ĝiajn eksterajn manifestiĝojn per la jam establitaj metodoj, sed ankaŭ — fakte unuavice — forigi ĝiajn radikojn. La lingva problemo estas sendube unu el ili. Tial UEA proponis, ke Unesko kaj UN dediĉu al ĝi la plej seriozan konsideron en la estontaj studoj ligitaj al diversaj aspektoj de rasismo. UEA sendube intensigos sian agadon por helpi la realigon de la celoj de la Jardeko. Konciza agadplano kun emfazo je la lingva aspekto estos pritraktita de la Estraro kaj, post eventualaj amendoj, publikigita por ĝenerala diskuto; fine, ĝi estos prezentita al la Komitato en Hamburgo por decido. Do, oni sekvos la saman demokratian vojon, kiu en la pasinteco donis tiom da utilaj fruktoj por la Internacia Lingvo kaj por UEA. (V. ankaŭ la martan numeron de *Esperanto*).

(5) **Rilatoj kun la Landaj Unesko-Komisionoj:** Dank'al multjaraj klopodoj de nombro da NRO-j, inter kiuj UEA, en junio 1973 okazis en la Sekretariato de Unesko Rondtabla Konferenco por pritrakti la rilatojn inter la landaj branĉoj (en nia kazo LA) de NRO-j kaj la Landaj Unesko-Komisionoj (LUK-j). Ankaŭ UEA estis invitita partopreni. La Konferenco faris nombron da rekomendoj, entenataj en Dok. RMO-73/Conf. 601/17, kies baza celo estas ebligi kiel eble plej firman kunlaboron inter la landaj branĉoj de NRO-j kaj la LUK-j. La eblecoj estas mult-

nombraj kaj inkluzivas reprezentigon en la respektivaj LUK-j aŭ eĉ partoprenon en la oficialaj delegacioj de la Ŝtatoj-Membroj, sendataj al la Ĝenerala Konferenco de Unesko. En la cirk.let. Eksteraj Rilatoj n-ro 1/74 de la 7a de februaro 1974, sendita al ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj LA, estas donitaj ĉiuj necesaj detaloj kaj sugestoj pri agado. Plia pordo estas malfermita. Dependas de la LA, ĉu ili scios eniri.

(6) **Invitoj reprezentiĝi en Beograd kaj Hamburg:** La Ĝenerala Direktoro estis invitita reprezentiĝi en la UK en Beograd. Kiel en la antaŭaj jaroj, la Sekretariato bondeziris, sed ne povis esti reprezentita. Jam estas sendita nova invito al la Ĝenerala Direktoro reprezentiĝi en la UK en Hamburg.

(7) **Reciproka studo kaj prezado de kulturoj:** La verko de d-ro Italo Chiussi, intertempe bedaŭrinde forpasinta, *Je la Flanko de La Profeto*, jam akceptita por la Serio Oriento-Okcidento, ankoraŭ ne povis esti publikigita. Ĝi devus aperi kiel eble plej baldaŭ.

(8) **Unesko-Novajoj:** Aperis 7 pliaj numeroj de la Bulteno, t.e. entute 70. Ankaŭ ĉi-jare la Esperanto-gazetaro multe utiligis la interesajn kulturajn novaĵojn, kiujn komunikas la Bulteno surbaze de artikoloj kaj informoj entenataj en *Unesco Features* kaj aliaj periodaĵoj de Unesko. Vidu ankaŭ la Raporton de CED.

(9) **Unesko-publikajoj pri Esperanto:** UEA kaj Esperanto estis denove multfoje menciitaj en diversaj dokumentoj de Unesko aŭ de NRO-j en konsultaj rilatoj.

(10) **Oriento kaj Okcidento — al Reciproka Kompreno:** Ĝi estas ankoraŭ havebla.

(11) **CED-dokumentoj:** Ili estas regule sendataj al la Sekretariato kaj al la landaj (naciaj) Unesko-Komisionoj.

C. UNUIĜINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj Rilatoj:** Ne okazis ŝanĝoj. En junio 1973 UEA renovigis la proponon konservi la pozicion de konsultiĝoj, kaj la Sekretariato konsentis. En februaro 1974 la propono estis renovigita por la jaro 1974. S-ro M. Starr kaj s-ino Marion Newel-Lorie (ĝis junio s-ino M. Gerson) partoprenas la regulajn semajnajn kunvenojn de NRO-j kaj havigas dokumentojn, aparte interesajn por UEA kaj por CED. La reprezentantoj de UEA en New York daŭre aŭdigas la starpunkton de UEA pri diversaj demandoj traktataj dum la menciitaj kunsidoj.

(2) **Propono al UN:** Dum la UK en Beograd la Komitato rifuzis la proponon de la prezidanto, ke estu formale ĉesigita la kampanjo por atingi pliajn subskribojn je la konata Propono al UN. Ekde tiam venis eĉ ne unu plia subskribo. Observante la decidon de la Komitato, la ŝarĝito pri eksteraj rilatoj sendis al la LA plian cirkuleron kun la peto, interalie, informi pri la progresado de la kampanjo laŭ la decido de la Komitato. Raporto pri la rezultoj estos donita al la nova Komitato en Hamburgo. Depende de tiu rezulto necesos decidi ĉu daŭrigi aŭ ĉesigi la kampanjon.

(3) **Landaj UN-Asocioj:** La Estraro ripetas la konsilon, ke la LA kaj la lokaj Esperanto-societoj establu bonajn rilatojn kun la landaj asocioj por UN kaj iliaj lokaj branĉoj.

(4) **Reprezentiĝo en la UK en Beograd:** S-ro Birger Hallden, reprezentanto de la Informa Centro de UN por Jugoslavio kaj Albanujo, ĉeestis la Inaŭguron de la UK kaj en sufiĉe longa alparolo salutis la Kongreson.

Ĉ. AGADO EN EŬROPO

(1) **Eŭropa Kongreso de Esperanto:** Kiel planite, la Kongreso okazis en Luksemburgo de la 8a ĝis la 11a de junio. Partoprenis ĉ. 450 personoj el preskaŭ ĉiuj landoj aliĝintaj al EEK. La prezidanto de UEA faris paroladon pri "Esperanto – Solvo de la Lingva Problemo en Eŭropo". Estas akceptitaj Rezolucio kaj "Konvencio" (ambaŭ publikigitaj en la oktobra *Esperanto* 1973). La pluan agadon prizorgas Eŭropa Esperanto-Centro por la landoj de Komuna Merkato.

(2) **Nuna situacio:** Laŭ la menciita "Konvencio", "pri la vivo de la Centro ekskluzive kaj solidare kompetentas la asociiĝintaj Landaj Esperanto-asocioj". Tiun situacion akceptis la Komitato en Beograd. Aliflanke, la Komitato rifuzis la proponon pri du centroj de agado – unu en okcidenta kaj unu en orienta Eŭropo – kiujn devus kunordigi UEA en la kadro de regiona aktivado rilatanta al tuta Eŭropo kaj al ĉiuj eŭropaj institucioj kaj organizaĵoj. En tiaj kondiĉoj la prezidanto kiel komisiito pri eksteraj rilatoj, observante la decidon de la supera organo de la Asocio, bedaŭrinde ne povis entrepreni kiun ajn paŝon en la nomo de UEA por realigi la ideojn entenatajn en la lastjara Raporto, kvankam la rilatoj kun d-ro Denoël kaj la Centro estis tre bonaj kaj amikaj. Oni povas nur ripeti, ke la kondiĉoj por

efika agado ĉe la eŭropaj institucioj kaj entute en Eŭropo estas nuntempe pli maturaj ol iam antaŭe. Sed necesas agi sen plia atendado, urĝe kaj laŭplane, por ke la eventoj ne plupasu la nunajn multflankajn eblecojn de la Esperanto-Movado.

D. ALIAJ RILATOJ

(1) **NRO-j:** Ĉi tie nur estu dirite, ke, aldone al la supre prezentitaj aspektoj de la rilatoj de UEA kun aliaj NRO-j, la Asocio flegas kontentigajn kontaktojn kun ĉ. 100 NRO-j kun sidejoj en diversaj landoj. Ofte ni formulas komunajn starpunktojn – ekzemple koncerne la rilatojn kun la landaj Unesko-Komisionoj –, kaj kelkfoje UEA sukcesas venkigi sian opinion.

(2) **UIA:** UEA plu estas koresponda organizaĵo de Unio de Internaciaj Asocioj kun sidejo en Bruselo. Ĝia gravega Jarlibro entenas informojn pri UEA, CED, la Akademio kaj dudeko da internaciaj fakaj aŭ specialigitaj Esperanto-organizaĵoj. La monata periodaĵo *International Associations* sporade publikigis informojn pri UEA, Esperanto-kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj.

(3) **Kontaktoj kun registaroj:** Dank'al la prestiĝa pozicio de UEA kaj al la fakto, ke Prezidento J.B. Tito estis la Alta Protektanto de la UK en Beograd, reprezentantoj de 27 landoj kaj de 2 gravaj internaciaj organizaĵoj ĉeestis la Inaŭguran Solenaĵon de la UK en Beograd. Tio estas la plej granda nombro de oficialaj ŝtataj reprezentantoj en la historio de UEA. Konforme al formulo jam firme establita dum pluraj jaroj, la invitoj al registaroj reprezentiĝi en UK estas farataj laŭ du paralelaj vojoj: pere de la ambasadoj en Hago kaj pere de la ambasadoj en la kongresa lando. La sama metodo estos aplikita por la UK en Hamburgo. La reprezentiĝo de registaroj en la UK ne nur altigas la prestiĝon de la kongreso kaj de la lingvo ĝenerale, sed ankaŭ ebligas utilajn kontaktojn dum la kongresa semajno. Multaj oficialaj reprezentantoj poste raportas al siaj registaroj, kio siavice helpas la laboron de la landaj asocioj kaj faciligas iliajn rilatojn kun la propraj landaj aŭtoritatoj.

(4) **Aliaj kontaktoj:** Multaj diversformaj alispecaj kontaktoj estas flegataj dum la tuta jaro, kiam ajn prezentiĝas taŭga okazo, ekzemple eĉ dum profesiaj vojaĝoj de la funkciuloj de la Asocio.

(5) **SAT:** La rilatoj plu estas bonaj kaj amikaj.

informojn pri la publikigo de la antaŭe aprobitaj verkoj. Ĝi devis ankaŭ kun bedaŭro rifuzi provizon de lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj al petanto. La konsisto de la Komisiono estas la sama. Prezidas ĝin s-ro D.B. Gregor, 34 Watersmeet, Northampton, Britujo.

XI. JUNULARA SEKCIO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo)

(1) **Estraro:** Laboris daŭre naŭ estraranoj. Post unu-jara paŭzo reestraraniĝis Jeanne-Marie Liouville-Cash. Novaj estraranoj estis Ulrich Brandenburg, Miro Hadžihasanović, Silvio Stoppoloni kaj Renée Triolle.

Post plurjara laboro forlasis la estraron Renato Corsetti, kiu elektigis Honora Prezidanto, Senad Čolić, Hans-Michael Maitzen, Ian Parker kaj Janusz Wolak.

La estraro kunsidis dum la 29a IJK en Sarajevo. Dum la tuta jaro inter la estraranoj okazis regulaj skribaj kontaktoj. Personaj kontaktoj inter la estraranoj okazis plurfoje (en Kassel, Parizo, Amsterdam).

Ĉiuj estraranoj agadis laŭ la aparte ellaboritaj laborplanoj.

(2) **Komitato:** La komitato konsistis el 48 membroj, inter kiuj estis 9 komitatanoj C (estraranoj laŭofice) kaj 10 komitatanoj B. Dum la kongreso en Sarajevo ĉeestis 31 komitatanoj aŭ rajtigitaj anstataŭantoj. Okazis 4 kunsidoj dum entute 10 horoj. Krom tio la komitato kunsidis en komisionoj, nome pri regiona agado, ekstera agado kaj pri eldonadoj.

(3) **Membraro:** Manko de statistikaj informoj estas daŭra problemo por ĝusta pritrakto kaj takso de la nombro de asociaj membroj. Kvankam pluraj paŝoj estis faritaj ĉe la landaj sekcioj por ricevi la necesajn informojn, ne ekzistas ebleco kontroli. Jen la membronombro de la landaj sekcioj fine de 1973 kun taksoj por la landaj sekcioj, kiuj ne raportis (taksitaj ciferoj markitaj per demando-signo). Parenteze la ciferoj por '72. Argentina 40? (40); aŭstra 100? (100); aŭstralia 10? (10); belga 150 (150); brazila 100? (100); brita 50? (50); bulgara 1200 (2600); ĉilia 90?; dana 80; franca 60 (55); GDR 200 (200); FRG 1320 (300); greka 80? (80); hispana 232 (170);

hungara 1100 (1300); itala 370 (330); israela 20? (20); jugoslava 1300 (1100); korea 240 (122); madagaskara 400 (40); meksika 120? (120); kolombia 50? (50); nederlanda 66 (45); nordamerika 100? (100); novzelanda 85 (100); pola 1500 (3500); sveda 150 (150); svisa 30 (20).

Ekster la kadro de TEJO estas kelkaj landaj sekcioj en la stato de organiziĝo. Ilia membraro estas proksimume: Ĉeĥoslovakio 1000; Finnlando 50; Norvegio 30; Sovet-Unio 700.

La nombro de individuaj membroj dum la lastaj kvin jaroj estas jena:

	J-MJ	J-MA	MA-K	Sume
1969	42	145	143	330
1970	64	165	144	373
1971	68	148	157	373
1972	40	159	110	309
1973	37	187	148	372

(4) **Varbado:** Sub la gvido de la kasisto, Jeanne-Marie Liouville-Cash, funkciis komisiono pri varbado. Aliaj membroj estis Claude Nourmont kaj Anat Zduński-Zajdman el Israelo.

Kampanjo estis lanĉita dum oktobro kun premioj por rekompenci varbintojn. Laborplano kun fiksitaj limdatoj por kunlaborado aperis en *Info*. Je dispono de la komisiono kaj varbemuloj estas diversa varbmaterio (broŝuro, dosiero, artikoloj, anoncoj ktp.).

(5) **Landaj sekcioj:** Pri la rilatoj kun la landaj sekcioj respondecis la sekretario, nome Flora Szabó-Felső kaj ekde aŭgusto Renée Triolle.

La nombro de LS-oj kreskis ĝis 30. Dum la komitatkunsido en Sarajevo la komitato decidis akcepti la aliĝpeton de sekcio en Ĉilio. Plifortiĝo de la aktiveco estis rimarkebla en Koreio, Danlando, Hispanio kaj Madagaskaro. Vigla agado daŭras en Italio, GDR kaj FRG, Jugoslavio. Reorganiziĝas Svisa Esperanto-Junularo kaj JEJA (Jugoslavio), kiu nun tegmentas respublikajn asociojn.

(6) **Administrado:** La Centra Oficejo administras kaj ekspedas la periodaĵojn de TEJO (Kontakto, NNN/info). Ĝi administras ankaŭ la kontojn de TEJO kaj la individuan membraron. Ekde la 1-a de januaro '74 ekvalidas la novaj rilatoj inter UEA kaj TEJO, akceptitaj de la komitato de UEA en Beogrado.

(7) **Studenta agado:** Pri la rilatoj kun la studenta Esperantomovado respondecis ĝis aŭgusto Janusz Wolak.

En multaj landaj sekcioj de TEJO estas nomitaj respondeculoj pri studentaj aferoj, kaj en kelkaj landoj la ĉefa agado de la LS efektiviĝas nur en studentaj medioj (ekz. Koreio).

(8) **Regiona agado:** Pri regiona agado en la estraro respondecis Renato Corsetti. La efikan laboron faris Nino Vessella. Ekde la kongreso en Sarajevo la respondecon kaj taskon transprenis Miro Hadžihasanović.

(9) **Servoj:** Pri la servoj respondecis Janusz Wolak kaj ekde aŭgusto Silvio Stoppoloni.

Turisma Servo: Ĝin transprenis Andrzej Grzębowski. Sed, same kiel pasintjare, la "Turisma Kalendaro" ne povis esti eldonita ĝustatempe, nome fine de decembro, pro manko de informoj pri la planitaj renkontiĝoj.

Koresponda servo daŭrigis sian laboron.

Pasporta Servo, sub gvidado kaj respondeco de la kasistino, estis reorganizita. La fina celo estas permesi malmultekostan restadon kun personaj kontaktoj. Aperis belaspekta ofsetita libreto kun adresoj en 19 landoj. La libro estas vendata dum renkontiĝoj aŭ mendebla ĉe la kasistino (prezo 5 ff aŭ 6 irk).

Arbitracia Tribunalalo konsistas el kvin personoj: Ivo Osibov, Uwe Joachim Moritz, Humphrey Tonkin, Ulla Luin kaj Roman Dobrzyński. Feliĉe la Tribunalalo ne havis okazon interveni.

(10) **Junularaj delegitoj:** La reton de Junularaj delegitoj pri-zorgis Janusz Wolak kaj poste la sekretario.

(11) **Kongresoj kaj renkontiĝoj:** La 29-a IJK okazis en Sarajevo, Jugoslavio, de la 21a ĝis la 27a de julio '73. La ĉeftemo de la kongreso estis "Junularo kaj la Hommedio". La temo estis pritraktita en diversaj diskutgrupoj laŭ subtemoj. Notindaj estis la seriozeco de tiu kongreso kaj la multnombraj rilatoj kun eksteraj organizaĵoj (studvizitoj al fabrikoj kun varma akcepto; studvizitoj dum la ekskurso; oficiala akcepto de la prezidanto de la Parlamento de Bosnio-Hercegovino; helpo de la loka sekcio de Unesko).

Gazetara servo bonege funkciis; ok gazetoj kaj radio-redakcioj havis konstantajn raportantojn el la Kongreso; lokaj kaj naciaj gazetoj regule raportis; Radio Sarajevo enkondukis ĉiutagajn rubrikojn pri la IJK, kaj televido elsendis plurfoje.

Dum la 58a UK en Beogrado okazis la kutima "Junulara Tago" kun administra kunveno de TEJO, vizito al fabrikoj, debato pri "Lingvo, kulturo kaj politiko" kaj dancvespero.

La 30-a Internacia Junulara Konferenco okazos en Münster (FR Germanio) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto 1974. La ĉeftemo estas "Edukado". La temon oni pritraktos en prelegoj kaj diskutgrupoj. Studvizitoj kaj renkontiĝoj kun la loka junularo ankaŭ estas planitaj.

Dum la UK en Hamburgo okazos la kutima "Junulara Tago". Planitaj estas ekspozicio pri TEJO kaj diskuto pri "Lingvo kaj socio".

Internaciaj seminarioj kaj renkontiĝoj okazis en FRG, GDR, Bulgario, Francio, Koreio, Jugoslavio. Menciinda estas seminario en Ellecom (NL) subvenciita de la germana-nederlanda Fonduso. Diversaj tendaroj internaciaj okazis en Hungario, Italio, Bulgario, Nov-Zelando, Koreio.

Landaj junularaj renkontiĝoj okazis en Aŭstrio, Madagaskaro, Hungario, Bulgario, Nederlando, Svislando, Hispanio, Italio, Nov-Zelando, Jugoslavio, Koreio. Multaj regionaj renkontiĝoj estis organizitaj en la diversaj LS de TEJO tra la tuta mondo.

Dum la kongreso de IFEF okazas regulaj junularaj kunsidoj kaj aranĝoj. En kelkaj landoj la rilatoj inter la LS de TEJO kaj junulara sekcio de IFEF efektiviĝas per intersanĝo de reprezentantoj (ekz. Francio).

(12) **Eldonado kaj informado:**

TEJO-paĝo: regule aperis en la organo de UEA "Esperanto", ĝis aŭgusto 1973 sub la redakto de George Winkler.

Kontakto: la enhavo de la gazeto estas riĉa kaj la teknika pri-zorgado altnivela. Bedaŭrinda estas la neregula apero de la gazeto.

Informfolio INFO: interna organiza bulteno por funkciuloj, aperas ekde aŭgusto kun NNN, nome komence de ĉiuj paraj monatoj.

Novajoj/Nouvelles/News: informas pri la laboro de TEJO en la diversaj landoj. Ĝi estas esence gazetbulteno, kiu aperas dumonate. Ĝin ricevas ĉiuj ricevantoj de *Info*, la Esperantogazetaro, radio-redakcioj kaj Patronaj membroj de TEJO. NNN aperas en angla, franca kaj Esperanta eldonoj. Kelkaj eldonoj

aperis ankaŭ en la germana lingvo. Ĝi aperas en la itala lingvo kunligita kun artikoloj pri la lingvo-problemo.

Aro da landaj sekcioj eldonas proprajn gazetojn kiel ekz.: "Impulso" (brazila), JEN-bulteno (usona), "Kvinpinto" (sveda), "Kial ne?" (brita), "HEJS-bulteno" (hispana), "Korea Junularo" (Koreio), "Koncize" (belga/franca/germana/itala/nederlanda kaj kelkfoje greka), "Jes, sed" (jugoslava). Kelkaj LS eldonas pli modestan informilon.

En multaj eldonaĵoj kaj periodaĵoj de LA de UEA aperas apartaj junularaj rubrikaj sub redaktado de junulo.

Kelkaj landaj sekcioj eldonas specialajn organizajn bultenojn destinitajn al aktivuloj (naskiĝis lastatempe por JEFO). GEJ ekeldonas informilon en la germana lingvo.

(13) Kultura agado, studoj kaj esploroj: Kadre de la IJK okazis diversaj kulturaj programeroj (precipe teatraj prezentadoj). Same dum diversaj aliaj renkontiĝoj.

Daŭre funkciis en la kadro de kultura agado la fako "Studoj kaj Esploroj", pri kiu respondecas Claude Nourmont. Ĝia celo estas disvolvi la esplorojn pri la lingva problemoj kaj disvolvi la per-esperantajn esplorojn.

Kadre de la seminario de GEJ funkciis seminario pri "Lingvo kaj socio" (vidu ĉe punkto 16).

Preparita estas seminario "Lingvo kaj socio", kiu okazos en Münster (GFR) de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto. Tiu seminario celas plian esploron de la kultur-politiko-sociaj fenomenoj ligitaj kun la lingvo. (vidu ĉe 16).

TEJO-anoj kontribuos per referaĵoj al la enketo farata de Unesko pri la opinioj de la junularo rilate pacon kaj pacan kunvivadon.

(14) Lerneja agado: Plurfoje TEJO estis reprezentita dum konferencoj de ILEI aŭ de ĝiaj landaj sekcioj.

La temo de la 30-a IJK, "Edukado", instigis al pli forta kunlaborado kun la instruistoj.

(15) Edukado: La agado pri edukado de gvidantoj daŭre funkcias en du sekcioj, interna kaj ekstera, sub gvidado de Hans Eichhorn kaj Claude Nourmont.

Tiu grava agado restis unu el la ĉefaj dum la pasinta jaro. Konstatinde estas, ke la landaj sekcioj dediĉas ĉiam pli da atento al tiu problemoj. Okazis ne nur sukcesaj seminarioj pri la

temo en GDR, Svislando, Italio, Francio ktp, sed kelkaj LS sendis reprezentantojn al seminarioj pri gvidaduko organizitaj de oficialaj instancoj. Laborplanon preparis Silvio Stoppoloni kaj Claude Nourmont.

(16) Eksteraj rilatoj: Funkciis Komisiono por Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO.

Ekde la unua de majo 1973 Gary Mickle ne plu estis dungita de la KER-oficejo. Malgraŭ intensa serĉado de posteulo, neniu estis preta tiam transpreni la oficejan laboron. Hans Bakker somere kaj komence de la aŭtuno plenumis plej urĝajn surlokajn taskojn. La Komitato en Sarajevo ankaŭ substrekis la neceson trovi homo(j)n kompetenta(j)n por la oficejo. Pro tio kaj pro ekstra informkunsido enkadre de la IJK, kelkaj kandidatoj anoncis sin en Sarajevo. Se oni ne konsideras interrompojn kaŭzitajn de burokrataĵoj, oni povas diri, ke Jelena Arandjelović kaj Rada Tomić estis dungitaj ekde la aŭtuno 1973.

TEJO en majo 1973, nome de kvin okcidenteŭropaj LS-oj, petis pri monsubvencio ĉe la Eŭropa Junulara Fonduso por organizi seminarion pri "La estonteco de eŭropaj kulturoj kaj lingvoj". La seminario okazis paralele kun la IS de GEJ en Kassel, FRG, 1973-12-27 - 1974-01-03. Aparta raporto pri ĝi aperis en *InFo-NNN*. Antaŭ la seminario aperis tri broŝuroj; "Lingva kaj kultura imperiismo" (enkonduka artikolo), "Potencrilatoj en Eŭropo sur lingva kaj kultura terenoj", "Potencrilatoj inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj sur lingva kaj kultura terenoj". La broŝuroj aperis en la franca, angla, nederlanda kaj germana lingvoj kaj en Esperanto.

Enkadre de la IJK en Münster venos sekvo de la seminario en Kassel. Okazos seminario pri similaj demandoj, espereble kun partopreno de reprezentantoj de pluraj neesperantistaj organizaĵoj.

Diskutoj kun reprezentantoj de Socialista Asocio de Polaj Studentoj, SAPS, okazis en Sarajevo. Oni subskribis komunan protokolon kun ideoj pri eventuala estonta kunlaboro, sed ĝis nun (aprilo 1974) nenio konkreta okazis.

La kutima reprezentigo en internaciaj neesperantistaj konferencoj daŭris, sed ne en vasta skalo. Reprezento kaj aktiva partopreno okazis en konferenco de JK/FUEV (aprilo 1973). TEJO ricevis inviton al Internacia Kongreso de Pacfortoj en Moskvo, sed ne partoprenis.

XII. ĜENERALA TRARIGARDO

(1) **Ĝeneralaj rimarkoj:** En la lastaj jaroj en ĉi tiu rubriko ĉiam estis atentigate pri la neceseco sekvi kiel eble plej intense la evoluon de la lingva problemo en la scienco kaj en la socia vivo. Ni menciis speciale klopodojn inter lingvistoj, interalie lingvistajn kongresojn en Usono kaj Sovetunio. Tiu okupiĝo pri Esperanto fare de lingvistoj daŭris. La jara kongreso de Asocio pri Modernaj Lingvoj de Usono, ĉifoje en Ĉikago, denove pritraktis Esperanton en aparta Esperanto-seminario, sed ankaŭ en la Interlingvistika Seminario oni faris tre interesajn konkludojn pri Esperanto – (vidu rev. *Esperanto* de februaro 1974) – interalie prof. d-ro Julius Balbin pruvis, ke jam en 1908 oni ne konsentis pri la vortoj *natura* kaj *artefarita* por diferencigi lingvojn.

En Svislando kreiĝis internacia renkontiĝejo interlingvistika. Studenta Interlingvistika Seminario okupas la varsoviajn studentojn. *Scienca Revuo* publikigis diversajn filologiajn numerojn kun tre atentindaj artikoloj.

Pluraj lingvistoj okupiĝis per aliaj metodoj pri la facila lernebleco de Esperanto: Prof. d-ro Janton de la Universitato de Clermont-Ferrand en sia verko *L'Espéranto* aperinta en la prestiĝa serio *Que sais-je* de Presses Universitaires de France, ne nur priskribas la historion de Esperanto kaj de Esperantismo, sed li ankaŭ analizas la teknikan lingvostrukturon atentigante daŭre pri la facila lernebleco de Esperanto. Prof. Falkenhahn de la Humboldt-Universitato de Berlino (GDR) komparas la lernunuojn en la germana kaj en Esperanto. En liaj konkludoj kaj el tiuj de aliaj konataj lingvistoj, ekz. de Prof. Max Mangold de la Universitato de Sarlando, ni povas konstati, ke ĝenerale ni estis tro modestaj en la prijuĝo de la facila lernebleco de Esperanto. Prof. Falkenhahn ekz. taksas la rilaton de la lernado de Esperanto kaj de la angla lingvo kiel 1:40.

Niaj amikoj ankaŭ aktiviĝis en lingvo-politiko. Socialisma Unuiĝo de Jugoslavio diskutas pri la reala forigo de lingva diskriminacio. Daŭre estas klopodoj en la kadro de la Socialista Internacio. Prof. d-ro Helmar Frank, direktoro de la Instituto por kibernetika pedagogio en Paderborn (FRG), elpaŝis kun *Tezoj por germana lingvo-politiko*. Kiel racian elirvojon el la lingva dilemo li vidas enkondukon de facile lernebla neŭtrala interkomprenilo. (Vidu rev. *Esperanto*, februara numero 1974, p. 27 kaj marta p. 57).

(2) **Literaturo:** Denove estis kelkaj libroj, kiuj furoris sur la Esperanto-merkato. Inter ili estas kompreneble kelkaj verkoj, kiuj jam komencis ĝui pli vastan intereson en antaŭaj jaroj (ĉiukaze rekomendindas legi la koncernan artikolon en la februara *Esperanto* de 1974). La lasta tempo estas markita per reeldono de originalaj romanoj. De Julio Baghy: *Viktimoj, Sur sanga tero, Printempo en la aŭtuno*, de Stellan Engholm: *Al Torento, Infanoj en Torento, Junuloj en Torento*, de Jean Forge: *Abismoj, Saltego trans jarmiloj, Mr. Tot aĉetas mil okulojn* (laŭ kiu Fritz Lang produktis filmon *Die tausend Augen des Dr. Mabuse*, lastatempe ankaŭ elsenditan de la Dua Germana Televido kaj de la Dua Franca). Tio en si mem estas tre salutinda fakto, kaj ĝi espereble allogas multe da romanlegantoj, tamen eldono de novaj altkvalitaj romanoj estus ankoraŭ pli salutinda; eĉ la longe atendata *Granda Kaldrono* de John Francis ankoraŭ ne bolas sur la merkato.

Oni rimarkas, ke okupiĝo pri problemoj de originala Esperanto-literaturo estas pli ofta. En la Universitato de Sarlando la instrukomisiito pri Esperantologio, Reinhard Haupenthal, aranĝis tutan kurson pri Esperanto-romanoj. *Hungara Vivo* dediĉis tutan numeron (n-ro 1 de 1974) al romanoj kaj noveloj en la kadro de serio pri la originala literaturo. Pliriĉiĝis ankaŭ la elekto de tradukitaj romanoj, ĉu reeldone kiel *Patroj kaj Filoj* de Turgenjev en la traduko de Kabe aŭ novapere kiel la romano de Géza Gárdonyi *Sklavoj de Dio*, el la hungara literaturo tradukita fare de J. Hamvai.

Kompreneble eldono de romano ĉiukaze estas ĉiam granda risko por eldonisto. Aliflanke nia leganta publiko devos fariĝi ankoraŭ pli konscia, aŭ nia publiko devos entute pli legi. Feliĉe la librovendado kreskas; eldonado de libro-katalogo certe helpis, sed ankaŭ bonaj recenzoj kaj speciale aperigo de jam preparitaj artikoloj por la Enciklopedio. (Por pli detala informo konsultu nepre la menciitajn fontojn).

(3) **Lernolibroj kaj vortaroj:** Plej granda evento verŝajne estis la nova *Assimil*-kurso *L'Espéranto sans peine*, kiu kun ĉiuj akcesoraj aŭdmaterialoj bone enviciĝas en la konata speciale meminstrua metodo, delonge establita en Francujo kaj Germanujo, sed ankaŭ pli modeste en kelkaj aliaj landoj, per kiu en FRG de kelkaj radiostacioj estis disaŭdigataj en la lastaj jaroj franca, angla, itala kaj rusa kursoj ... Post *L'Espéranto* de Prof. Janton, *Je parle esperanto* de Jean Thierry kaj la laŭtema esperanta-franca

vortareto de Michel Duc Goninaz, tiu verko same de Jean Thierry denove montras la dinamisman agadon de niaj francaj geamikoj. Oni anoncas, ke adaptiĝoj en la germana, portugala kaj serbo-kroata lingvoj estas antaŭviditaj.

Finfine aperis ankaŭ la longe atendata *Internacia komerca-ekonomika vortaro en naŭ lingvoj*, kies graveco estas evidenta en medioj, kiuj estas speciale interesaj por ni. Ĝin projektis, kompilis per Esperanto kaj redaktis F. Munniksma (Nederlando) kun multaj kunlaborantoj.

Aliaj eldonaĵoj meritas similan intereson:

Amuzaj dialogoj en Esperanto de A. Lienhardt, *La tuta Esperanto* de Henrik Seppik, *Secondary School Esperanto, Book 2*, de R. Markarian, *Esperanto en lingvolaboratorio* de Hermann Behrmann, *Rozmówki Esperanckie* de A. Pettyn, laŭtema frazaro pola-esperanta, *Vortaro Esperanto-kroata* de Zlatko Tišljar. Krom tio aperis nova lernolibro en Estonujo de Jaan Ojalo, *Terminaro por bibliaj studoj*, *Radiamatora Esperanto-terminaro*, *Esperanto-lingva muzika leksikono k.a.*

(4) **Diskoj:** En la branĉo de gramofondiskoj eble eĉ ne plu estas surprizo, ke la unuan lokon denove okupas *Internacia elparolo*, sed ke ĝin sekvas du aliaj ankaŭ parolaj diskaj (Univox kaj ABC de Esperanto). Konsiderante la fakton, ke kelkaj kantodiskoj aperis nur antaŭnelonge, bonegajn rezultojn notis *Kantanta mia bird'*, longdaŭra disko kun britaj popolkantoj (Margaret Hill) en traduko de William Auld. *Litova kanto en Esperanto* estas nova stereofonia disko kaj *La Voĉoj de prof. K. Kalocsay* aperis en la internacia voĉalbumo.

(5) **Periodaĵoj:** Sub redaktado de Reinhard Haupenthal *Internacia Pedagogia Revuo* komencis en nova serio aperi kunlabore kun UEA. Portugala Esperanto-revuo komencis sian vivon espereble longedaŭran. *El Popola Ĉinio*, en siaj numeroj por 1974, reaperigis kelkajn rubrikojn, kiuj forestis el la revuo dum pluraj jaroj.

(6) **Radio kaj televido:** Prezidento Jonas salutis persone en Esperanto okaze de la jarkomenco 1974 antaŭ la mikrofono de la novaj ĉiusemajnaj Esperanto-elsendoj de Radio Vieno. Radio Kuvajto havis unuan fojon elsendon pri la Internacia Lingvo. Esperanto ludis rolon de lingvo de nenomita fremda ŝtato en kolortelevida felietono en Britujo. Denove okazis kursoj de diversaj usonaj radiostacioj. Studmaterialoj de ambaŭ televidaj

kursoj, de TELEAC en Nederlando kaj de la Slovaka Televido atendas ankoraŭ utiligantojn. (Vidu ankaŭ rap. CED, B 9)

(7) **Praktikaj aplikoj:** Denove aperis nombro da prospektoj kaj gvidfolioj. La asocio Monda Turismo, kiu kunlaboras kun UEA, nun aktivigis, kaj oni povas esperi, ke post iom da tempo Monda Turismo faros vere efikan laboron por diskonigi la Internacian Lingvon en la turismo. Ankaŭ Pasporta Servo de TEJO aktivigis. La Esperantokalendaro kiel ĉiam estis alloga en multaj partoj de la mondo por vojaĝemuloj. La servoj de la Delegitoj pliagrabilis tiujn vojaĝojn. Pupteatroj pli vaste utiligis Esperanton (Vidu januaran *Esperanto*, 1974, p. 10) kaj vojaĝanta ekspozicio de infandeseĝnaĵoj havis sukceson.

Sekve de Someraj Universitataj Kursoj aperis ankoraŭ: *Enkonduko en la komputeran lingvistikon* de H.D. Maas kaj *Bazaj nocioj de biologio*.

(8) **Semajno de Internacia Amikeco:** La interesiĝo por la Semajno kaj ĝia celebrado ŝajnas kreski. Ĝojige estas, ke denove kelkaj grandaj urboj en Usono oficiale rekonis la Semajnon. (Vidu la artikolon en marta *Esperanto*, 1974, p. 48: "Formo, kiu serĉas ĝustan enhavon").

XIII. KONKLUDO

La agado en la lasta laborperiodo estis rimarkinde markita per la strebado de niaj organoj, niaj kongresoj, konferencoj kaj laborgrupoj, en mondaj kaj regionaj kadroj, en kaj ekster la Esperantomovado konsciigi pri diversaj aspektoj de la lingva problemo en internaciaj rilatoj, en plurnaciaj ŝtatoj, en scienco kaj tekniko surbaze de la egalrajteco lingva en teorio kaj praktiko, kaj konsciigi niajn konkludojn al la vasta monda publiko.

En ĝin falas la kunfestado de la 25jara jubileo de la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kaj la komenciĝo de la Jardeko de Aktivado por kontraŭbatali Rasismon kaj Rasan Diskriminacion, en kiuj la lingva problemo ludas decidan rolon kaj en kiuj UEA kiel organizaĵo en konsultaj rilatoj kun Unesko aktive partoprenas. En la nuna malfacila situacio tamen necesas amasa apogo de la tuta movado por povi dediĉi daŭre fortojn al afero, kiun ni rigardas unu el la plej gravaj en la historio de la homaro kaj unu el la decidaj por ĝia estonteco. Nur tiel pervaloras daŭrigi laŭ tiu

vasta vojo de progreso konforme al niaj konataj principoj kaj energie plukonstruadi surbaze de la ĝisnunaj atingoj.

Prof. d-ro Ivo Lapenna
Prezidanto

Günther Becker
Ĝenerala Sekretario

Rimarko de la prezidanto

Mi kunsukribis la Estraran Raporton konforme al la art. 30 de la Statuto, sed mi atentigas, ke jam dum la aprila kunsido de la Estraro mi deklaris, ke mi distancigas min de la financa administrado por 1973, pri kio respondecas la estrarano pri financoj. Kvankam pluraj neeviteblaj faktoroj sendube influis malfavore la ekvilibron inter la enspezoj kaj elspezoj, tamen la senprecedence grandega deficito de preskaŭ 60 000 gld. estas neniel pravigebla, precipe ne, se oni prenas en konsideron la rezultojn de la laboro de la C.O. en tiu jaro. Bedaŭrinde, mi ne povas ne distancigi min ankaŭ de tiuj partoj en la raporto de TEJO, kiuj ŝajnas al mi nefidindaj, ekzemple la informoj rilate la membronombron.

Tiom por orientiĝo de la Komitato kaj de la membraro.

La prezidanto

RAPORTO PRI LA AGADO de la CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO pri la MONDA LINGVO-PROBLEMO por la periodo de la 1.IV.1973 ĝis 1.IV.1974

A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

(1) **Oficejo:** Ĝi restas je la sama adreso, parte en Londono, parte en la CO en Rotterdam. La teknika laboro de multobligado aŭ presado kaj ekspedado de la dokumentoj estas farata en la CO, dum la tuta cetera laboro estas plenumata en Londono.

(2) **Kunlaborantoj:** Aligiĝis s-ro U. Lins. La nombro estis 70 en 22 landoj.

(3) **Kontaktoj:** Ili estas realigataj per korespondado, cirkuleroj kaj personaj renkontiĝoj. Kiel en la antaŭaj jaroj, la rilatoj inter ĉiuj kunlaborantoj estis kaj plu restas harmoniaj, amikaj kaj inspiraj, kio estas esence grava por efika laboro de tiaspeca scienca institucio kun minimuma financa bazo.

(4) **Financa situacio:** La buĝeto por 1973 antaŭvidis enspezojn kaj elspezojn en la alteco de £900. Estis antaŭviditaj donacoj de £250 kaj subvencio de £650 el la propaganda konto. Fakte, kiel oni povas vidi el la konto de CED, publikigita en la financa parto de la Estrara Raporto, la tuta sumo de elspezoj estis £851.06 minus negativa saldo de £1.34 el la pasinta jaro, do precize £849.72. Sekve, la sumo de elspezoj restis malpli alta ol buĝetite. La sumo de donacoj estis £180.92, do malpli alta ol buĝetite. Tamen, pro la maksimuma ŝparado, la antaŭvidita subvencio ne nur ne estis pli granda, sed iom malpli alta ol buĝetite. La nomoj de ĉiuj donacintoj aperis en la rubriko de CED en la organo de la Asocio. CED ankoraŭfoje esprimas tutkoran dankon al ĉiuj donacintoj. Necesas, fine, ne nur mencii, sed emfazi, ke, dank'al la sindono de ĉiuj kunlaborantoj, kiuj kreas originale aŭ tradukas en diversajn lingvojn absolute sen kompenso, CED sukcesas jam dum multaj jaroj havi praktike same altan buĝeton kaj resti en la limo de tiu buĝeto, malgraŭ la altiĝo de la afranko, salajroj kaj ĉiuj prezoj ĉie en la mondo. La tuta sumo de la elspezoj de CED, inkluzive la kompenso de la sekretariino, estas malpli ol duono de la plej malalta salajro de

la CO, dum la subvencio de UEA al CED estas ĉ. 1/3 de la plej malalta salajro en la CO. Necesas aldoni, ke en la Londona oficejo de CED estas, krom ĉio alia, tajpitaj ĉiuj leteroj de la honorofica direktoro kaj samtempe prezidanto de la Asocio (pli ol 2000 ekde la UK en Londono), ĉiuj prezidantaj cirkuleroj kaj aliaj tekstoj, kiel ankaŭ ĉ. 2/3 de la verko *Esperanto en Perspektivo*. La elspezoj de CED inkluzivas ankaŭ la afrankojn por la korespondaĵoj de la prezidanto. Tiom por pli bona orientiĝo de la Komitato kaj de la membraro.

(5) **Tekniko de eldonoj:** La ĉefaj dokumentoj en la angla estas plu publikigataj en presita formo; la Esperanta versio grandparte aperas stencilite. Nur escepte, presitaj dokumentoj aperas du-lingve.

(6) **Ripeto de propono pri ŝanĝoj:** En la pasintjara raporto la honorofica direktoro faris proponon pri transdono de la plua gvidado de CED al alia kompetenta persono kun la necesaj kvalifikoj en la sfero, pri kiu okupiĝas CED. La Komitato en Beograd malakceptis tiun proponon. Nun la honorofica direktoro ripetas ĝin. Li varme deziras transdoni la pluan gvidadon de CED al alia persono, se iel eble ekde la 1-a de januaro 1975, aŭ eĉ pli frue. Plej bone estus transporti la arkivon kaj la oficejan ilaron en la CO, kie CED povus esti taŭge ligita al la Biblioteko de la Asocio.

B. PLENUMITAJ LABOROJ

(1) **Dokumenta materialo:** Entute estis kolektitaj kaj katalogitaj 61 pliaj dokumentoj, tiel ke la tuta arkivo konsistas el 4408 dokumentoj. Krome, entute ĉ. 5 350 eroj el diversaj periodaĵoj kaj aliaj fontoj estas katalogitaj.

(2) **“Esperanto en Perspektivo”:** Detaloj pri la verko *Esperanto en Perspektivo: Faktoj kaj Analizoj pri la Internacia Lingvo* aperis en la lastjara Raporto de CED kaj en la novembra numero de *Esperanto*, 1973. Ĉi tie necesas doni kelkajn pliajn, lastmomentajn informojn. Pro aldono de plia ĉapitro kaj pro la nombro de ilustraĵoj, la verko havos ne ĉ. 600 paĝojn, kiel unue taksite, sed pli ol 800. En la definitiva finredakto ĝi konsistas el 6 partoj. Pro la translokiĝo de la presejo kaj gravaj prokrastoj en la CO, siavice kaŭzitaj de teknikaj-organizaj problemoj en ligo kun la UK en Beograd, la verko ne povis aperi en 1973, sed d-ro V. Sadler kiel teknika redaktoro, de kiu nun ĉefe dependas la

publikigo, firme antaŭvidas, ke la libro aperos en 1974. Pro tiu ĉi prokrasto necesas fari ĝisdatigojn en multaj lokoj, plurfoje eĉ en kazoj de jam enpaĝigitaj partoj. Tio, aldone al la korektado de la presprovaĵoj, postulis tre multe da plia laboro. Dank'al ĝi, la verkego, tiu ĉi krono de multjara agado de CED sur la kampo de sciencaj esploroj kaj dokumentado, estos maksimume ĝisdata en la momento de publikigo. *Esperanto en Perspektivo* prezentas amason da zorge kontrolitaj faktoj, realecaj analizoj kaj prudentaj antaŭvidoj. Ĝi evidentigas la multflankajn rimarkindajn atingojn de la Internacia Lingvo kaj fortikigas la fidon je ĝia estonteco.

(3) **CED-dokumentoj:** Malgraŭ la temporaba laboro je *Esperanto en Perspektivo*, CED tamen sukcesis publikigi 18 pliajn dokumentojn en Esperanto kaj en la angla, do entute 391 dokumentojn, inkluzive tiujn en la serio CED/INT. Inter la dokumentoj menciindaj estas tiuj pri la lingva seminario en New York, pri la Esperanto-Movado en Ĉinujo, pri la vasteco de kultura agado, radio-elsendoj, servoj de la delegita reto, ISU, nombro kaj karaktero de internaciaj renkontiĝoj kun Esperanto kiel oficiala lingvo. Ĉ. 330 institucioj kaj individuaj personoj ricevas la dokumentojn en la angla, kelkfoje ankaŭ en aliaj lingvoj. Ĉiuj Landaj Asocioj ricevas senpage la Esperantan version. La dokumentojn oni povas aboni je la prezo de 6,— gld. jare. La abonon akceptas nur la CO de UEA en Rotterdam. La nombro de abonantoj por la Esperanto-versio estas 116 kaj por la angla versio 48.

(4) **Partopreno en internaciaj kongresoj kaj aliaj renkontiĝoj:** La enketo pri la internaciaj Esperanto-kongresoj kaj alispecaj renkontiĝoj en 1972, entreprenita en 1973, povis esti finita en tiu ĉi laborjaro. La fina statistiko montras, ke en 1972 entute okazis 50 internaciaj renkontiĝoj en 24 landoj. La nombro de ĉiuj partoprenintoj estis 11 285. Detaloj kun statistika tragardo en formo de tabelo aperis en Dok.I/II/32. La dokumento konkludas, ke nuntempe ĉ. 12 500 personoj partoprenas internaciajn kongresojn, konferencojn kaj alispecajn renkontiĝojn kun Esperanto kiel oficiala lingvo, ĉar la meza nombro de partoprenantoj en la UK estas 2 100 personoj, dum la UK en Portland havis escepte malgrandan nombron da aliĝintoj kaj partoprenintoj.

(5) **Bazaj Faktoj pri la Internacia Lingvo (Esperanto):** En tiu ĉi jaro ne aperis plia eldono. Restas, do, la sama situacio: 17 eldonoj en 13 lingvoj. Tiu ĉi dokumento — la plej populara el ĉiuj — multege helpis en la laboro sur la kampo de informado. Estus tre utile, ke la dokumento reaperu, ĝisdatigite, en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj, en kiuj ĝi jam estas eldonita, kaj ke ĝi estu publikigita ankaŭ en aliaj lingvoj. Rilate ĝisdatigojn la eldonontoj bv. sin turni al CED.

(6) **La Lingva Problemo en Internaciaj Rilatoj:** en 1972 aperis reviziita eldono en Esperanto kaj en la angla kaj nova eldono en la hispana. Ankaŭ tiun dokumenton necesus eldoni en kiel eble plej multaj naciaj lingvoj. CED volonte helpos rilate 2-3 ĝisdatigojn.

(7) **LMLP:** Aperis du pliaj kajeroj po 64 paĝoj de *La Monda Lingvo-Problemo*, nome vol. 4, n-ro 12, kaj vol. 5, n-ro 13. La du kajeroj entenas pliajn valorajn kontribuojn de 11 diversnaciaj aŭtoroj en la angla, franca kaj germana kun ampleksaj resumoj en la Internacia Lingvo. La redakta komitato plu konsistas el 12 personoj, specialistoj pri diversaj aspektoj de la lingva problemoj, plejparte mondkonataj en siaj respektivaj fakoj. La ĉefredaktoro estas d-ro V. Sadler. La revuo ĝuas tre bonan reputacion en la medioj de scienco. LMLP estas bonege utiligebla ne nur por dokumentado, sed ankaŭ por serioza informado. La resumoj kutime estas tiel ampleksaj ke ili ofte povas esti senŝanĝe kaj sen kompletigoj publikigitaj en nacilingvaj tradukoj. La jara abono estas 30 gld. aŭ egalvaloro, kaj oni povas mendi ĉe CO-libri, Postbus 482, Den Haag-2076, Nederlando; aŭ ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, kiu peras abonojn. Ankaŭ kompletoj de vol. 1,2,3 kaj 4 estas haveblaj. Ilia enhavo estas aktuala kaj restos tia dum multaj jaroj. Fine de 1973 LMLP havis 463 abononatojn por vol. 5. En 1973 estis venditaj ankaŭ 13 jarkolektoj de la unua volumo, 18 jarkolektoj de la dua volumo, 29 jarkolektoj de la tria volumo kaj 48 jarkolektoj de la kvara volumo.

(8) **Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj:** Mag. I. Dratwer, multjara sindona kunlaboranto de CED, finpretigis la manuskripton por la dua eldono de tiu ĉi grava verko. Ĝi estas konsiderinde pli ampleksa ol la unua eldono. La dua eldono estos publikigita kiel eble plej baldaŭ post la publikigo de *Esperanto en Perspektivo*, kies kompletigo ĝi estas.

(9) **Radio:** Laŭ la statistiko, ellaborita de s-ro G. Larglantier, alia sindona kaj multjara kunlaboranto de CED, la nombro de ĉiuj elsendoj en 1973 estis 3 259 kompare kun 2 354 en 1972. La elsendoj entute daŭris 1 110 horojn kompare kun 875 horoj en 1972. Necesas aldoni, ke en la nombro de elsendoj estas inkluzivitaj la kursoj de Esperanto, kiujn disaŭdigis minimume 8 radio-stacioj en Usono kaj kiuj konsistis el minimume 1 200 elsendoj dum 300 horoj. La nombro de stacioj estis 22 en 12 landoj, inkluzive la menciitajn 8 staciojn en Usono, kompare kun 17 stacioj en 14 landoj en 1972. Pliaj detaloj en Dok.G/V/20.

(10) **Enciklopedio de Esperanto:** La laboro plu progresas. Pluraj kunlaborantoj de la Enciklopedio kontribuis diversmaniere en verkado de *Esperanto en Perspektivo*. Ĉefredaktoro estas U. Lins, redaktoro R. Hauptenthal.

(11) **Esperanto en Unesko-publikaĵoj:** Ankaŭ en la pasinta jaro plurfoje aperis informoj aŭ pri UEA aŭ pri Esperanto en diversaj dokumentoj kaj publikaĵoj de Unesko. Aliflanke, la Esperanto-gazetaro plu utiligas diversajn informojn en la bulteno de UEA Unesko-Novajoj, kiun nun prizorgas la kunlaboranto de CED s-ro J.G. Fowler. CED notis entute 1 101 novaĵojn, kiujn publikigis Esperanto-periodaĵoj el tiu bulteno.

(12) **Ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco:** La laboro estas daŭrigata. Aldone al la informoj en la Dok.A/II/5, baldaŭ aperos nova dokumento.

(13) **Bibliografio:** La laboro estas daŭrigata. Abundaj ĝisdataj informoj estos publikigitaj en *Esperanto en Perspektivo*.

(14) **Tradukmaŝino:** CED plu sekvas la evoluon.

(15) **Universala Ekspozicio:** La landaj asocioj kaj organizantoj de seriozaj internaciaj renkontigoj povus pli ofte utiligi la materialojn de la Ekspozicio. La lasta elmontro (sepa) estis en Ljubljana en oktobro 1971.

(16) **Traduka laboro:** Inter la kunlaborantoj de CED troviĝas pluraj kompetentaj tradukantoj por diversaj lingvoj. CED deziras aparte menci la grandegan helpon, kiun donas al ĝi f-ino A. Solaf kaj s-ro J.G. Fowler, ambaŭ en Londono, kiuj jam dum multaj jaroj sindone kaj sen ia ajn kompenso faras la tradukojn precipe el Esperanto en la anglan.

(17) **Konkluda rimarko:** Fine de tiu ĉi konciza raporto estas utile diri, ke la rezultoj de la multjara laboro de CED, inkluzive

la lastan laborperiodon, troviĝas en la verko *Esperanto en Perspektivo*. Eĉ nura listigo de la titoloj de ĉapitroj, subĉapitroj, sekcioj kaj subsekcioj postulus multoble pli longan tekston ol estas tiu ĉi Raporto de CED.

C. LABORPLANO POR 1974-75

- (1) **Kunlaborantoj:** Altiri novajn, precipe kompetentajn junajn fortojn.
- (2) **Dokumenta materialo:** Daŭrigi la kolektadon laŭ la ĝisnuna sistemo.
- (3) **Dokumentoj:** Eldoni 20-24 dokumentojn laŭ la ĝisnuna sistemo.
- (4) **Esperanto en Perspektivo:** Publikigi la verkon.
- (5) **Pri Internacia Lingvo dum Jarcentoj:** Publikigi la duan, ampleksigitan kaj reviziitan eldonon.
- (6) **LMLP:** Daŭrigi la eldonadon.
- (7) **Bibliografio:** Ĝisdatigi post la eldono de *Esperanto en Perspektivo*.
- (8) **Index Translationum:** Publikigi dokumenton pri la verkoj aperintaj en la periodo 1971-1974.
- (9) **Ekonomiaj malavantaĝoj:** Daŭrigi la kolektadon de dokumentaj materialoj kaj utiligadi laŭbezzone.
- (10) **Enciklopedio:** Daŭrigi la laboron.
- (11) **Maŝintradukado:** Sekvi la evoluon, eventuale publikigi plian artikolon en LMLP.
- (12) **Radio:** Statistiko por 1974.
- (13) **Bazaj Faktoj:** Kuraĝigi pliajn nacilingvaj eldonojn surbaze de la dua Esperantlingva eldono, revizii kaj ĝisdatigi.
- (14) **Aliaj gravaj dokumentoj:** Kuraĝigi nacilingvaj eldonojn de aliaj pli ampleksaj kaj gravaj dokumentoj.
- (15) **Translokigi la londonan oficejon de CED en la CO en Rotterdam aŭ en alian lokon.**
- (16) **Aliaj taskoj:** Laŭbezzone.

Prof. d-ro Ivo Lapenna
Honorofica Direktoro

FINANCOJ

SPEZOJ DE UEA EN 1973 (PROVIZORAJ CIFEROJ)

ELSPEZOJ	Rezultoj	Buĝeto
Salajroj malnete	159 756,09	147 000
Purigistinoj	5 023,23	-
Sociaj asekuroj	33 409,91	26 000+
	<u>198 189,23</u>	<u>173 000+</u>
Kompenso (malsanoj)	- 1 990,08	- 1 000
		<u>172 000+</u>
Oficejaj elspezoj		
Afranko kaj telefono	9 890,06	11 400
Presadoj	3 321,28	} 11 000
Materialoj	6 479,79	
Riparo de maŝinoj	1 951,95	1 500
Diversaj elspezoj	<u>1 013,58</u>	<u>1 500</u>
		22 656,66
Fotokopiado	12 583,86	25 400
Minus vendoj	<u>- 10 325,64</u>	
		2 258,22
Oficeja domo		
Varmigo, lumo k.s.	3 459,44	3 800
Riparoj, purigiloj	2 037,62	5 000*
Impostoj	1 008,18	900
Hipotekrento, asekuro	<u>514,32</u>	<u>800</u>
	7 019,56	10 500*
Ludono de loĝoĉambroj	<u>- 2 539,83</u>	<u>- 2 600</u>
		4 479,73
Revuo "Esperanto"		
Preskostoj ekster C.O.	23 492,50	22 300
Sendokostoj	20 777,55	19 800
Kovertoj	1 650,63	1 600
Redakciaj elspezoj	<u>603,22</u>	-
	46 523,90	43 700
Anonc-enspezoj	<u>- 7 782,47</u>	<u>- 6 000</u>
		38 741,43
		37 700

+ Ekskluzive de purigistinoj. * Inkluzive de purigistinoj.

Financoj

	Rezultoj	Buĝeto
Jarlibro 1 kaj 2		
Preskostoj ekster C.O.	21 886,00	23 100
Sendokostoj	7 319,48	10 500
Kovertoj	1 241,46	1 000
	<u>30 446,94</u>	<u>34 600</u>
Anonc-enspezoj	- 7 673,17	- 7 300
	22 773,77	27 300
Vojaĝ- kaj restad-kostoj		
Oficistoj (ĉiutage)	4 483,14	} 3 600
Oficejaj (specialaj)	2 811,47	
KKS-aj	5 101,14	3 000
Estraraj	<u>2 368,27</u>	<u>2 600</u>
	14 764,02	9 200
TEJO		
½ de kotizoj J-MA, MA-K	4 338,75	4 000
Deskribo de prunto	8 900,00	-
	<u>13 238,75</u>	<u>4 000</u>
Rezervo debitoroj	- 8 318,84	-
	4 919,91	4 000
Diversaĵoj		
Estraraj elspezoj	5 322,10	5 000
Diferencoj el malnovaj jaroj	2 980,14	-
Bankkostoj, kurzdiferencoj	2 231,07	1 500
Ceteraj elspezoj	<u>1 075,93</u>	<u>1 600</u>
	11 609,24	8 100
Deprezoj		
Domo (ĉ. 1%)	1 400,00	1 400
Inventaro (10%)	<u>6 041,06</u>	(20%) <u>11 000</u>
	7 441,06	12 400
Sumo de la elspezoj	Gld. 325 843,19	304 000

Financoj

	Rezultoj	Buĝeto
ENSPEZOJ		
Kotizoj (nete)		
Asociaj membroj	11 154,37	12 500
MJ	9 971,67	
MA	134 618,63	
MA-K	4 169,57	
MS	12 383,24	
J-MJ	256,01	
J-MA	<u>3 882,65</u>	
Individuaj membroj	165 281,77	159 200
Abonoj "Esperanto"	3 467,43	2 500
Abonoj UK	6 828,00	16 400
Fakaj organizaĵoj	<u>701,88</u>	<u>600</u>
	187 433,45	191 200
Donacoj		
Ĝenerala kaso	1 464,87	1 000
Kampanjo 100 x 100	<u>4 201,12</u>	<u>6 000</u>
	5 665,99	7 000
Libroservo		
Libroj ktp.	21 781,75	23 700
Abonoj	<u>2 337,56</u>	<u>3 400</u>
	24 119,31	27 100
Preslaboroj (por eksteraj mendantoj)	15 573,74	32 000
Kongreso		
30% de kotizoj	25 827,00	46 755
Al Propaganda Konto ⅓	- 8 609,00	- 15 585
	17 218,00	31 170
Rento	6 140,85	6 600
Vendo de poŝtmarkoj	3 367,48	3 000
Aliaj enspezoj	81,72	200

Financoj

Kompenso de kostoj el kapitalo		
Dumvivaj membroj	2 872,80	1 000
El Propaganda Konto:		
Kostoj CO por LMLP	2 000,00	3 000
Kostoj CO por CED	1 200,00	1 200
El Fondaĵo Biblioteko	<u>500,00</u>	<u>500</u>
	6 572,80	5 700
Sumo de la enspezoj	266 173,34	303 970
Deficito 1973	<u>59 669,85</u>	<u>—</u>
Gld.	325 843,19	303 970

BILANCO DE UEA JE LA 31-a DE DECEMBRO 1973

AKTIVAJ

Monrimedoj		
Kurantaj bankkontoj	27 915,71	
Ŝparkontoj ĉe bankoj	42 454,54	
Poŝtaj ĉekkontoj	16 629,92	
Kaso kaj respondkuponoj	<u>625,03</u>	
		87 625,20
Valorpaperoj		48 892,14
Ricevotaj enspezoj		15 734,18
Antaŭpagitaj elspezoj		22 286,43
Debitoroj		104 893,41
Provizoj		
Libroj, diskoj ktp.	105 514,05	
Presadoj, materialoj k.a.	<u>14 066,43</u>	
		119 580,48
Inventaro (maŝinoj, mebloj)		39 400,41
Garantiaj sumoj		1 753,00
Domo de UEA		134 400,00
Tereno en Aspremont		<u>1,00</u>
Sumo de la aktivoj		Gld. 574 566,25

Financoj

PASIVAJ

Antaŭricevitaj enspezoj		52 184,19
Pagotaj elspezoj		22 916,30
Rezervo por riparo de la domo	2 882,00	
Uzita por riparoj en 1973	<u>2 882,00</u>	
		—
Kreditoroj		196 107,40
Ŝparkontoj de membroj		20 927,66
Fondaĵoj por specialaj celoj		
Eldona Fondaĵo	3 077,65	
Propaganda Konto (provizore neg.)	- 2 510,75	
Fondaĵo Prof. Canuto	1 133,92	
Fondaĵo Por Vastigo de la Agado	240,42	
Kongresa Rezerva Fondaĵo	12 789,07	
Fondaĵo Azio-Afriko	479,17	
Fondaĵo Biblioteko Hodler	1 523,10	
Fondaĵo Enciklopedio	<u>15,67</u>	
		16 748,25
Asocia kapitalo		
Dumvivaj membroj	214 694,52	
Cetera kapitalo	<u>110 657,78</u>	
		325 352,30
Deficito 1973	<u>- 59 669,85</u>	
		<u>265 682,45</u>
Sumo de la pasivoj		Gld. 574 566,25

DETALIGO DE FONDAĴOJ KAJ KAPITALAJ KONTOJ

FONDAĴO PROF. CANUTO	Elspezoj	Enspezoj
Saldo je 1973 01 01		2 794,67
Subvencio el Propaganda Konto		3 500,00
Donaco de Instituto Hodler 68		1 500,00
Ceteraj donacoj		<u>2 003,20</u>
Membrokotizoj por nepagipovaj	8 663,95	
Saldo je 1973 12 31	<u>1 133,92</u>	

Financoj

	Elspezoj	Enspezoj
PROPAGANDA KONTO		
Saldo je 1973 01 01		7 074,95
Transporto de fondaĵoj Filma Servo, Teatra Trupo, Lernejoj kaj Universala Ekspozicio		468,20
El profito de UK Beograd		pormemore
10% de kotizoj Beograd		8 609,00
Po 5,— gld. el krompagoj Beograd		1 365,00
Donacoj		3 466,62
Subvencio al Fondaĵo Canuto	3 500,00	
Senpagaj lernolibroj k.s.	1 582,87	
Subvencio al CED (Londono)	4 077,41	
Kostoj de la C.O. por CED	1 200,00	
Deficito de la revuo LMLP	12 400,99	
Vojaĝo Haudebine (malnova ŝuldo)	733,25	
Saldo je 1973 12 31 (provizore neg.)	- 2 510,75	
DUMVIVAJ MEMBROJ	Elspezoj	Enspezoj
Saldo je 1973 01 01		176 225,95
86 novaj dumvivaj membroj		47 915,95
Kurzperdo je valorpapiroj	6 574,58	
Kontribuo al kostoj de revuo kaj jar- libro por DM-oj: 945 x 3,04 gld.	2 872,80	
Saldo je 1973 12 31	214 694,52	
CETERA KAPITALO	Elspezoj	Enspezoj
Saldo je 1973 01 01		114 307,12
Deficito 1972	14 168,78	
Donaco Henderson		1 382,63
Heredaĵo Steffering		8 085,78
Heredaĵo Clewe		611,03
Heredaĵo Rüz		440,00
Saldo je 1973 12 31	110 657,78	

Financoj

KONTROLA RAPORTO PRI 1972

Ni kunvenis en la Centra Oficejo en Rotterdam, la 26.5.1973, en la ĉeesto de s-ro E.J. Woessink, estrarano de UEA, kaj de d-ro Sadler, direktoro de la Centra Oficejo.

Ni ricevis la necesajn informojn kaj detalojn, escepte de la atesto de la oficiala revizoro.

La diferencoj de la el- kaj enspezoj, kompare al la buĝeto, estis klarigitaj, kaj akceptitaj, escepte de la jena:

ENSPEZOJ: Kompenso de kostoj el la kapitalo:

Buĝetita por la kompenso de kostoj por la liverado de eldonaĵoj al la dumvivaj membroj: 1000 gld. — enkontigo de 2000 gld.

Tiu konto estas tro arbitre fiksita:

1969: 9 530 gld.; 1970: 8 606 gld.; 1971: 1 000 gld.;

1972: 2 000 gld. Buĝeto 1974: 5 000 gld.

Tiu konto influas rekte la rezultaton, tiel ke la deficito, post adapto de tiu konto, estus:

Numa deficito:	14 168,78
Kompenso ekz. 5 000 gld. do + 3 000	3 000,—
	<hr/>
	11 168,78

Sekve ni proponas:

— fiksi konstantan, se eblas realan, kompencon por la liverado de eldonaĵoj al dumvivaj membroj.

Krome ni proponas la likvidon de kvar fondaĵoj por specialaj celoj, kiuj dum jaroj restis senŝanĝaj, per transskribo al propaganda konto, nome: Universala Ekspozicio; Filma Servo; Teatra Trupo; Lernejoj.

Fine ni proponas la plialtigon de la kapitalo per la tereno en Asprenmont (Francujo), por la unua fojo en la bilanco de 1973.

M.H. Vermaas

G. Maertens

REVIZORA RAPORTO
pri la librotenado kaj la agado de la Centra Oficejo
dum la jaro 1973 (Statuto art. 40)

La subskribintoj kunvenis en la Centra Oficejo en Rotterdam la 22an de junio 1974 en ĉeesto de s-ro E.J. Woessink, estrarano de UEA pri financoj, kaj d-ro V. Sadler, direktoro de la C.O.

Ni ricevis la necesajn informojn kaj detalojn kun escepto de la atesto de profesia revizoro.

Ni konstatis deficiton de 59 669,65 gld., kiu estas deprenita de la kapitala konto, tiel ke la asocia kapitalo, konsistanta el Kapitalo Dumvivaj Membroj (netuŝebla rezervo) kaj cetera kapitalo, montras foruzon de pli ol duono de tiu cetera kapitalo.

Ni opinias, ke en ekonomiaj cirkonstancoj kiel ili prezentiĝis en la jaro 1973, la buĝeto devus esti adaptita dum la jaro mem, tiel ke la totalo estu respektita, do, kun ŝanĝoj de apartaj eroj (ŝparoj, kie estas eble, por ekvilibrigi tiujn elspezojn, kiuj devas nepre superi la buĝetitan sumon).

Se oni ne ŝanĝos la nunan sistemon, la cetera kapitalo estos komplete foruzita eble jam proksiman jaron, ĉar necesas preni en konsideron la kreskantan inflacion.

Ni konstatis cetere, ke por la jaro 1973, ankoraŭ ne okazis sistema kontrolo fare de profesia revizoro; ni krome ankoraŭ ne ricevis la ateston pri la kontrolo en 1972, pro malsaniĝo de la profesia revizoro.

Sekve de tiuj ĉi konstatoj kaj la fakto, ke dum la jaro 1973 ekestis gravaj prokrastoj en la librotenado de la C.O., kiu dum certa periodo eĉ ne disponis pri kvalifikita librotenisto, ni deklaras, ke ni ne povas proponi malŝarĝon de la Estraro pro la financa gvidado de la C.O.*

G. Maertens

M.H. Vermaas

Rotterdam, la 22an de junio 1974

*Noto: Tamen la Komitato de UEA en la UK en Hamburgo decidis malŝarĝi la Estraron.

Revizora Deklaro pri 1972

La subskribinto, S.H. Brongersma, federa impostokonsilisto en Leiderdorp, per ĉi tio deklaras laŭ la dokumentoj disponigitaj al li kaj laŭ la notoj de s-ro B.C. Storm, federa impostokonsilisto en Leiderdorp, ke la administrado de la unuiĝo Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam estas kontrolita de s-ro B.C. Storm.

Leiderdorp, la 17an de julio 1974a

S.H. Brongersma

Membro de Unuiĝo de Impostokonsilistoj

Revizora Deklaro pri 1973

La subskribinto, S.H. Brongersma, federa impostokonsilisto en Leiderdorp, per ĉi tio deklaras, ke li per ĉiufoje specimenaĵoj kontrolis konstatis, ke la librotenado pri la jaro 1973 donas ĝustan bildon pri la administra prilaborado de la financaj donitaĵoj de via unuiĝo, Universala Esperanto-Asocio en Rotterdam. Koncerne la deficiton, oni rimarkigas, ke ĝin kaŭzis tro malalta buĝetado de la ero pri salajroj, kiun estigis atendata reorganizo de la personaro kaj malfavora rezulto de la kongreso en Beograd, kiu restis multe sub la atendita. Ambaŭ aferoj tamen ne estis antaŭvideblaj. La mendoj pri presadoj simile restis grave sub la nivelo antaŭvidebla dum la buĝetado.

Leiderdorp, la 17an de julio 1974a

S.H. Brongersma

Membro de Unuiĝo de Impostokonsilistoj

BUĜETO DE UEA POR 1975

ELSPEZOJ

Salajroj kaj sociaj asekuroj (ink. purigistinojn)	217 800
Oficejaj elspezoj (afranko, presaĵoj k.s.)	26 800
Fotokopiado: diferenco inter kostoj kaj vendoj	2 000
Oficeja domo (varmigo, riparoj k.s.)	7 700
Revuo <i>Esperanto</i>	48 000
Jarlibro kaj Estrara Raporto	14 600
Revuo <i>Kontakto</i>	7 500
Vojaĝkostoj kaj restadkostoj oficejaj kaj estraraj	10 000
Diversaĵoj (estraraj elspezoj, bankkostoj k.s.)	8 500
Deprezoj: domo kaj inventaro	7 400
	<u>Gld. 350 300</u>

ENSPEZOJ

Kotizoj	261 100
Donacoj al la ĝenerala kaso	2 000
Libroservo: libroj kaj abonoj	39 000
Grafikaj laboroj por eksteraj mendantoj	5 000
Kongresoj: UK kaj IJK	17 800
Rento	4 000
Vendo de uzitaj poŝtmarkoj	4 000
Kompenso de kostoj el kapitalaj kontoj	5 200
Deficito	12 200
	<u>Gld. 350 300</u>

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Konto de la CO 1.1. — 31. 12. 1973
(en britaj pundoj)

	Enspezoj	Elspezoj
CED entute ricevis de UEA	737,33	
Donacoj, kiujn UEA ricevis por CED		113,92
Subvencio		623,41
	<u>£ 737,33</u>	<u>737,33</u>

Spezoj de CED por la periodo 1.1. — 31.12.1973

Donacoj	180,92	
Subvencio	623,41	
Negativa saldo		1,34
Skribmaterialo		18,87
Poŝtelspezoj, telefono		111,79
Oficejo		156,00
Kompenso al la sekretariino		450,00
Aliaj elspezoj		113,06
	<u>804,33</u>	<u>851,06</u>
Negativa saldo	46,73	
	<u>£ 851,06</u>	<u>851,06</u>

La 31an de decembro 1973

Sekretariino: Ljuba Lapenna

Ni kontrolis la librojn kaj ĉiujn dokumentojn kaj ni atestas, ke ĉi tiu spezkonto estas ĝusta.

La 9an de marto 1974
A. Diaz; Alec Venture

Financoj

BUĜETPROONO DE CED POR LA JARO 1975

	Enspezoj	Elspezoj
Donacoj	250,00	
Subvencio el Propaganda Konto	650,00	
Skribmaterialo		25,00
Poŝtelspezoj kaj telefono		130,00
Oficejaj elspezoj		160,00
Kompenso al la sekretariino		450,00
Aliaj elspezoj (libroj, abonoj, socia asekuro, imposto, efektivaj elspezoj de la kunlaborantoj)		135,00
	<u>£ 900,00</u>	<u>900,00</u>

SPEZOKONTO DE LA REVUO LMLP, JARKOLEKTO 1973

Elspezoj	Rezulto	Buĝeto
Preskostoj	16 533,00	16 000
Pago al Mouton (pro reklamado, pres- aĵoj, administrado, pakado, afranko kaj ekspedo):		
50% de 5 648,60	2 824,30	3 250
60% de 7 063,17	<u>4 237,91</u>	<u>4 200</u>
	7 062,21	7 450
Redakciaj kostoj kaj servoj de C.O.	<u>1 792,55</u>	<u>3 500</u>
Sumo de la elspezoj Gld.	25 387,76	26 950

Enspezoj	Rezulto	Buĝeto
Abonoj per UEA	5 648,60	6 500
Abonoj per Mouton	<u>7 063,17</u>	<u>7 000</u>
	12 711,77	13 500
Vendo de depresaĵoj, anoncoj	275,00	200
Deficito el Propaganda Konto	<u>12 400,99</u>	<u>13 250</u>
Sumo de la enspezoj	25 387,76	26 950

Financoj

BUĜETO DE LA REVUO LMLP, JARKOLEKTO 1975

	Elspezoj	Enspezoj
Preskostoj	19 000	
Al Mouton: 50% de 8 000 (abono 30 gld.)	4 000	
60% de 9 000	5 400	
Servoj de C.O. kaj eksteraj kostoj	2 000	
Abonoj per UEA		8 000
Abonoj per Mouton		9 000
Vendoj de depresaĵoj; anoncoj		200
Deficito el Propaganda Konto		<u>13 200</u>
	<u>Gld. 30 400</u>	<u>30 400</u>

INSTITUCIO HODLER 68

SPEZOKONTO 1973

	Elspezoj	Enspezoj
Elpagitaj rentoj je pruntoj "a"	248,35	
Estraraj elspezoj	296,70	
Kompenso '73, administrado	750,00	
Revizoro	205,20	
Bankkostoj	108,56	
Varba folio, preskostoj	379,90	
Afranko	4,15	
Rento oblig. rento-konto		2 462,40
Rento ŝparbanko Rotterdam		3,32
Rento hipoteko		1 823,25
Kuponoj akcioj Philips		376,45
Akci-dividendo Philips		25,79
Kuponoj Obligacioj AmRo		1 588,00
Profito domo		2 219,74
	<u>1 992,86</u>	<u>8 498,95</u>
Profito	6 506,09	
	<u>Gld. 8 498,95</u>	<u>8 498,95</u>

Financoj

BILANCO JE LA 31.12.1973

	Aktivoj	Pasivoj
Poŝtĉekkonto	2 800,44	
Mees, kuranta konto	1 618,14	
Mees, oblig. rento-konto	26 478,02	
Ŝparbanko	3 086,38	
Obligacioj AmRo, 8%	19 962,00	
Obligacioj B.N.G. 58/59, 4½%	15 038,61	
Akcioj Philips	39 998,49	
Hipoteko 8½%	40 000,00	
Domo	34 924,49	
Pruntoj (a)		50 127,46
Pruntoj (b)		49 959,32
Donacoj		67 397,65
	<hr/>	<hr/>
	183 906,57	167 484,43
Risko-rezerva fondaĵo		6 425,74
Subvencio pagota al LMLP		2 400,00
Subvencio pagota al S.U.K.		950,00
Neta profito		6 506,09
	<hr/>	<hr/>
Gld.	183 906,57	183 906,57

AKADEMIO DE ESPERANTO

Financa raporto por 1973 (en francaj frankoj)

	Elspezoj	Enspezoj
Saldo je 1973 01 01		6 964,52
Cirkuleroj 106-111	745,-	
Materialoj	380,28	
Adresoj	96,65	
Ceteraj poŝtelspezoj	46,-	
2 "Aktoj de la Akademio"	14,18	
Saldo je 73 12 31	5 682,41	
	<hr/>	<hr/>
Fr.fr.	6 964,52	6 964,52

Landaj Asocioj

1. ALIĜINTAJ AL UEA

ARGENTINA ARGENTINA ESPERANTO-LIGO, Casilla de Correo 17, Sucursal 53, Buenos Aires. Fondita en 1941. Membroj 246.
Organo: Argentina Esperantisto.
Prez.: C.J. Milkus Schutz, Pasteur 154, 8a. "A" Buenos Aires.
Skr.: Elena Izarriaga, Ayacucho 330, Fcio. Varela (Bs).
Kasistino: Maria Teresa Bignami, José Bonifacio 1914, Buenos Aires.

AŬSTRALIA AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO, Box 415, P.O. Manly, N.S.W. 2095. Fondita en 1918. Membroj 481.
Organo: The Australian Esperantist.
Prez.: Prof. R.G. Robertson, 7 Euroka St., Northbridge, N.S.W. 2063. Tel. 95 4716.
Ĝen. Skr.: R.W. Baxter, P.O. Box 415, Manly, N.S.W. 2095. Tel. 977 1259.
Kasisto: Les Scott, 34 Ocean Road, Manly, N.S.W. 2095. Tel. 977 3338.

AŬSTRIA AŬSTRIA ESPERANTISTA FEDERACIO, Fünfhausgasse 16-18, A-1150 Wien. Tel. 83 44 75. Fondita en 1937. Membroj 300.
Organo: Aŭstria Esperanto-Revuo.
Prez.: d-ro Leopold Grimme, A-1190 Wien, Escherichgasse 5.
Afergvid. estro: Walter Mudrak, Beatrixgasse 19/9, A-1030 Wien III.
Skr.: prof-o d-ro Karl Beckmann, Keinergasse 33, A-1030 Wien.
Kasistino: Maria Loibel, Schönbrunner Str. 242, 3 Stg., A-1120 Wien.

BELGA BELGA ESPERANTO-FEDERACIO, St. Bernardsesteenweg 1078, B 2710 Hoboken. Fondita en 1961. Membroj 600.
Organo: Sonorilo
Federacia Prez.: d-ro Pol Denoël, rue Victor Raskin 20, B 4000 Liège. Tel. (041) 27 00 79.

Landaj Asocioj

Ĝen. sekr.: Jules Verstraeten, St. Bernardsesteenweg 1078,
B 2710 Hoboken (Antwerpen).
Kasisto: René Balleux, Oude Donkiaan 83, B 2100 Deurne. Tel.
(031) 21 33 03. Pĉk 000-0163434-86.

BRAZILA KULTURA KOOPERATIVO DE ESPERANTISTOJ,
Av. Treze de Maio 47 - sobreloja 208ZC 06, BR-20000 Rio de
Janeiro, GB. Tel. 252-0829.

(Dejorhoraro: ĉiutage de la 9a ĝis la 18a escepte dimanĉe).
Fondita en 1951. Membroj 600.

Organo: Dialogo. (aperonta en 1974)

Prez.: d-ro Braz Cosenza.

Sek-oj: Cedilha Neto kaj Jair Salles.

Kasisto: d-ro Dilermando de Castro.

BRITA BRITA ESPERANTO-ASOCIO, 140 Holland Park Ave.,
London W11 4UF. Tel. (01) 727 7821. Fondita en 1905.
Membroj 1256.

Organoj: La Brita Esperantisto, "Newsletter".

Prez.: G. Leon-Smith, c/o Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland
Park Ave., London W11 4UF.

Hon. Sekr.: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster,
Essex RM14 3DS. Tel. (04022) 24645.

Hon. Kasisto: A. Díaz, 27 Hanley Road, Shirley, Southampton
SO1 5AP.

BULGARA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, Poŝtkesto
66, Sofia, Bul. Ĥristo Botev 97. Tel. 31 00 29.
Fondita en 1907. Membroj 5100.

Organo: Bulgara Esperantisto.

Prez.: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, Bl. 1, vh. 2, Kvartal
"Iztok", Sofia 13. Tel. 72 21 32.

Sekr.: Stojan Kostadinov, str. Graf Ignatiev 53/III, Sofia 42.
Tel. 89 91 97.

Kasistino: Vasja Cvetkova, Bl. 16, vh. B, ap. 36, komplekso
"Mladost", Sofia 84.

ĈEĤA ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, CS-110 00
Praha 1. Fondita en 1969.

Membroj 2 500.

Organo: Starto.

Landaj Asocioj

Prez.: Josef Vitek, Ĉs. armády 26. CS-276 01 Mělník.
Sekr.: Zdeněk Křimský, sídliště Brabčcov 2751/2. CS-276 01
Mělník.

DANA DANA ESPERANTO-ASOCIO, Ved Bellahøj 21. 13.,
DK-2700 Brønshøj, København. Fondita en 1908.
Membroj 600 kaj 3000 kolektivaj.

Organo: Eŝo.

Prez.: Ib Schleicher, Ved Bellahøj 21. 13., DK-2700 Brønshøj.
Tel. (01) BE 8301.

Kasisto: Poul Jørgensen, Tordenskjoldsgade 2, DK-8200
Aarhus N. Tel. (06) 16 57 08.

FINNA ESPERANTO-ASOCIO DE FINNLANDO, adreso: pf
13048, SF-00131 Helsinki 13, Fondita en 1907.
Membroj 540.

Organo: Esperanta Finnlando.

Prez.: Pekka Virtanen, Maaherrankatu 37 A 6, SF-70100
Kuopio 10. Tel. 971-13056.

Sekr.: s-ino Heta Kesälä, Koivukuja, SF-04310 Tuusula. Tel.
(90) 25 34 41.

Kasisto: Aleksii Romonen, Tulemantie 7, SF-70800 Kuopio 80,
Tel. (971) 32 3 42, poŝtĉekkonto KU 505143-6.

FRANCA UNUIĜO FRANCA POR ESPERANTO, 4 bis Rue
de la Cerisaie, F-75004 Paris. Tel. (1) 278 68 86.
Fondita en 1898.

Membroj 1 287.

Organo: Franca Esperantisto.

Prez.: J. Guillaume, Pavillon n-ro 66, Résidence "de Grasse",
F-78810 Feucherolles; tel. 461 44 74.

Ĝen. Sekr.: f-ino Claude Nourmont, 8 rue des Frères Lumière,
F-77000 Melun. Tel. (1) 439 54 74.

Kasisto: J. Rousseau, 64 Av. Jean Moulin, F-75014 Paris.
Tel. (1) 842 54 54.

GERMANA (F.R.G.) GERMANA ESPERANTO-ASOCIO,
adreso ĉe la Ĝenerala Sekretario. Fondita en 1906. Membroj
1500.

Prez.: d-ro Werner Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80.
tel. (0411) 73 84 50 8.

Landaj Asocioj

Ĝen. sekr.: Richard Hirsch, Lambertstr. 12, D-6430 Bad Hersfeld.
Tel. (06621) 49 95.

GREKA HELENA ESPERANTO-ASOCIO, Sankta Meletio 54,
Poŝtdistr. 814, Athinai. Tel. 86 27. 983. Fondita en 1927.
Membroj 400.

Organo: Helena Revuo Esperantista.

Prez.: s-ino Roksani Manusu, Rodou 23, Athinai (821). Tel.
870 - 160.

Ĝen. Sekr.: Georgios Miggas, Aharnon 41, Athinai (109). Tel.
826 - 398.

Kasisto: Karavas Haralambos, str. Fokionos Negri 58, Athinai
(811). Tel. 834 - 971.

HISPANA HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO, ĉe la prezidanto.

Fondita en 1948. Membroj 392.

Organo: Boletin.

Prez.: prof. A. Figuerola Auque, Victor de la Serna 19-7° Izq.,
Madrid 16.

Sekr.: prof-o Manuel Figuerola-Palomo, Victor de la Serna 19,
7° Izq., Madrid 16.

Kasisto: Raimundo Ibáñez Crespo, Princesa 78, Madrid 8.

HUNGARA HUNGARA ESPERANTO-ASOCIO, Kenyérmező
u. 6, Budapest VIII. Poŝtadreso: H-1368 Budapest, pf. 193. Tel.
137-872; 141-078. Fondita en 1960.

Membroj 3100. Organo: Hungara Esperantisto.

Prez.: d-ro József Mátéffy, Szamuely u. 7, H-1093 Budapest IX.

Ĉefsekr.: Béla Berceli, Minerva u. 1, H-1118 Budapest XI.

Kasisto: d-ro Tibor Réthelyi, Jurányi u. 9, H-1027 Budapest II.

IRLANDA ESPERANTO-ASOCIO DE IRLANDO, ĉe la koresponda sekretario. Fondita en 1970. Membroj 25.

Organo: Bulteno kvaronjara.

Koresp. sekr.: Patrick J. O'Reilly, "Monksilver", Howth Summit.

Informa sekr.: Sean Lenehan, "St. Jedes" Beech Park, Foxrock,
Co. Dublin.

Kasisto: Derek Smith, 31 Reid Street, Belfast, BT6 8PE.

Landaj Asocioj

ISRAELA ESPERANTO-LIGO EN ISRAELO, IL-61390 Tel-Aviv,
Poŝtokesto 39004. Fondita en 1949.

Membroj 200.

Organo: Israela Esperantisto.

Prez.: Aleksander Manor, Manja Veisrael Str. 5, 69 342 Tel-Aviv.

Sekr.: Jeraĥmiel Giladi, Ĉerniĥovski 2, 44 360 Kfar Saba.

Kasisto: Hanania Haroun, IL-61160 Tel-Aviv, poŝtokesto 16041.

ITALA ITALA ESPERANTO-FEDERACIO, Via Villorosi 38,
I-20143 Milano. Tel. (02) 8 35 08 57. Fondita en 1910.

Membroj 1600. Organo: L'Esperanto.

Prez.: d-ro Giordano Azzi, Viale Giulio Cesare 20,
I-22100 Como.

Sekr.: Felice Bertoletti, Via Diaz 13, I-20294 Corsico

JAPANA JAPANA ESPERANTO-ISTITUTO, Hongo 2-2-14,
Bunkyō-ku, Tokio 113. Tel. (03) 814-4581. Fondita en 1919.

Membroj 1537 + 291 vicmembroj.

Organo: La Revuo Orienta.

Prez.: d-ro Fujio Egami, Nukui-Minamimati 3-1-7, Koganei-si,
Tokio, 184.

Sekr.: Torao Kitao, Minami-senzoku 3-16-6, Oota-ku, Tokio, 145.

Kasisto: Kasaburo Ueda, ĉe JEI.

JUGOSLAVIA JUGOSLAVIA ESPERANTO-LIGO, Terazije 42,
YU-11000 Beograd. Tel. 32 69 84. Fondita en 1923.

Membroj 1 500.

Prez.: prof. d-ro B. Popović, Ognjena Price 80, YU-11000
Beograd. Tel. 43 98 97.

Ĝen. sekr.: s-ino Jelena Šaponjić, Sv. Save 25/I, Loĝ. 4,
YU-11000 Beograd. Tel. 44 49 88. Jugoslavia Esperanto-Ligo

konsistas el: Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, Vase
Pelagića 8, YU-71000 Sarajevo; Kroatia Esperanto-Ligo,

Amruševa 5, YU-41000 Zagreb; Makedonia Esperanto-Ligo
(ĉe Adžimitreski). Tiranska kula 3/III, YU-91000 Skopje;

Serbia Esperanto-Ligo, Terazije 42, YU-11000 Beograd;

Slovenia Esperanto-Ligo, YU-61001 Ljubljana, Poŝtfako 239;

Vojvodina Esperanto-Ligo, Zmaj Jovina 4, YU-21000 Novi

Sad; Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio (JEJA), Amruševa

5, YU-41000 Zagreb.

Landaj Asocioj

KANADA KANADA ESPERANTO-ASOCIO, P.O.B. 174, Roxboro 900, Qué. H8Y 3E9. Fondita en 1958.

Membroj 216.

Organo: Lumo.

Prez.: ing. U. Paul Ronald, 45 10th Ave., Roxboro 900, Qué.

Sekr.: G. Matte, 214 Gloucester, Apt. 7, Ottawa, K2P OA8, Ont.

Kasisto: G. Kinsey, 14 7th St. Roxboro 900, Qué.

KOREA KOREA ESPERANTO-SOCIETO, IPO-kesto 1232, Seoul-100, Koreo. Tel. 92-3973. Fondita en 1963. Membroj 178.

Organo: Korea Esperanto.

Prez.: prof. d-ro Unsang Li, 104-43, Anamdong, Seoul-132.

Vicprez.: Manyong Park, 135-25, Itewondong, Seoul-140.

Sekr.: prof. Taekeng Gim, Myoung-Ji Universitato, Seoul-120.

Direktoro: Jumbo Li, IPO-kesto 1232, Seoul-100.

Kasisto: Byoung-Young Li, 104-43, Anamdong, Seoul-132.

Redaktoro: Degil Hwang, IPO-1232, Seoul-100.

Prez. de Junularo: Seongcung Jung, 137-7, 2-ga, Bomundong, Seoul-132.

Estraranoj: Zeongkil Park; Younghwan Gim; Younchan Gu;

Donghyoung Li; Zeongho Li; Youngtae Ma; Eukeng Gu.

MADAGASKARA ESPERANTISTA ASOCIO DE MADAGASKARO, B.P. 1678, Tananarive. Fondita en 1959. Membroj 25.

Organo: Malagasa Esperantisto.

MONAKA ESPERANTO-GRUPO DE MONAKO, Hotel Splendid, Monte-Carlo. Fondita en 1955. Membroj 32.

Prez.: s-ino Olga de Monty, Hotel Splendid, 4 Avenue de Roqueville, Monte-Carlo.

Sekr.: f-ino H. Betbeder, 13 rue Florestine, Monaco.

Kasisto: Robert Masino, 20 rue Grimaldi, Monaco.

NEDERLANDA NEDERLANDA ESPERANTO-ASOCIO "LA ESTONTO ESTAS NIA, L.E.E.N.", Escamplaan 164, Den Haag-2030. Fondita en 1905. Membroj 691.

Organo: Komuna Esperanto-Gazeto (kun aliaj asocioj nederlandaj).

Prez.: J. Calado, Citroenkruid 7, Rotterdam-3014. Tel. (010)

21 43 67.

Landaj Asocioj

1) Nomo kaj adreso de la lernejo; 2) Nomo de la respondeca E.-instruist(in)o; 3) Listo de la gelernantoj, kiuj deziras korespondi — nomo, antaŭnomo, eventuale hejma adreso, sekso, aĝo, ĉefaj intereso, grado de Esperanto-scio, kun kiuj landoj, ktp.; 4) Kiom longe validas la korespondpeto; 5) Apartaj rimarkoj.

Por ricevi rektan respondon, aldonu unu internacian respondkuponon (aŭ samvalorajn francajn poŝtmarkojn) por ĉiu duo da anoncitaj gelernantoj. El landoj, el kiuj respondkuponoj ne estas sendeblaj, ne-uzitaj poŝtmarkoj estas akceptataj.

Aparta rimarko de la korespondservo: Kiam temas pri kolektiva klaskorespondado, KSM starigas kontaktojn nur inter la respon-

Kulturaj agadoj

decaj E-instruistoj. Koncerne la individuan korespondadon inter lernejoj, KSM transdonas, laŭ la disponebla materialo, individuajn adresojn, laŭplaĉe al la respondeca E.-instruisto aŭ al la hejma adreso de la gekorespondemuloj.

KSM ne povas rekte respondi al petantoj, kiuj ne aldonas la ĉi-supre menciitajn internaciajn respondkuponojn aŭ samvaloraĵojn.

MAGNETOFONA SERVO DE UEA

(fondita en 1957)

Komisiito: Rüdiger Eichholz, 2040 Springbank Rd., Mississauga, Ontario, Kanado, L5H 3N6. Tel.: 416-822-9330.

Taskoj:

1. Kolektado de sonbende registritaj prelegoj, radio-dissendoj, kantoj, kursoj, teatraĵoj kaj ĝenerale interesaj sondokumentoj en aŭ pri Esperanto.
2. Vendado de kopioj de tiuj programoj.

Metodo:

Ĉiu esperantisto estas petata, kontribui al la pliriĉigo de la jam ekzistanta kolekto. La surbendigoj devas esti lingve senriproĉaj kaj laŭ la teknika vidpunkto de la registro sufiĉe bonkvalitaj.

Ĉiu sendinto, kies programo estas akceptita, rajtas ricevi senkoste programojn ĝis la duobla tempodaŭro de la akceptitaj surbendigoj. Sed, se la ensendita sonbendo ne estas sufiĉe longa por surbendigi ĉiujn deziratajn programojn, li devas eventuale pagi por la kroma sonbendmaterialo.

Por ke la Magnetofona Servo povu subteni sin mem, kluboj kaj individuaj esperantistoj aĉetu kopiojn de la haveblaj programoj.

Kiel kalkuli la koston?

Ĝi konsistas el tri eroj: materialkosto, kopikosto kaj sendkosto.

1. La materialkosto.

Oni povas sendi la sonbendmaterialon al la Magnetofona Servo. Sed okazis kelkfoje, ke la kanada dogano postulis doganpagon por tiaj sendaĵoj, tial oni prefere pagu por la sonbendmaterialo.

Kulturaj agadoj

La prezoj estas indikitaj en la sekvanta tabelo.

2. La kopikosto.

Ĝi estas \$ 1,00 por 30-minuta programo. Kopio de duhora programo libere elektelebla do kostas \$ 4,00. Por malaltigi tiujn kostojn la komisiito kunkopiis multajn programojn al duhoraj programaroj. Kopio de tiaj du-horaj programaroj kostas \$ 3,00 anstataŭ \$ 4,00.

3. La sendkosto.

La sendkostoj por ne-prioritata ekspedo (laŭeble oni sendos la paketojn aerpoŝte) estas indikitaj en la tabelo. La sendkostoj por certe aerpoŝta ekspedo estas konsiderinde pli altaj. La sendkostoj al Usono kaj interne de Kanado estas pli malaltaj. Ankaŭ se oni mendas kelkajn bendojn kune, la sendkostoj ofte estas pli malaltaj. Kontrolu do, kiom da poŝtmarkoj troviĝos sur via pakaĵo, kaj je la venonta mendo pagu la tropagon malpli. Por registrita ekspedo aldonu \$ 0,50.

Tabelo indikanta la minutojn de la surbendigeblaj programoj ĉe diversaj sonbendlongoj kaj la sendkostojn:

Longoj de la haveblaj sonbendoj	Surbendigebla program- daŭro, se la rapido de la kopio estas:			Prezroj (\$)	Sendkostoj (\$) por ne-prioritata aerpoŝta ekspedo	
	4,75	9,5	19 cm/s			
45m	30	15	7	0,60	0,15	0,24
90m	60	30	15	0,90	0,15	0,30
180m	120	60	30	1,70	0,30	0,70
270m*	180	90	45	2,40	0,30	0,70
360m	240	120	60	2,50	0,55	1,40
540m*	360	180	90	4,00	0,55	1,40
720m*	480	240	120	7,80	0,55	1,40

Ĉi tiuj daŭro-indikoj validas por *du-traka* registro, por *kvar-traka* registro duobligu la daŭrojn de la surbendigeblaj programoj.

* La 270-, 540- kaj 720-metraj sonbendoj estas 'majlaraj' (varnomo de E.I. Du Pont).

Bobendiametroj: 8cm. (por 45m), 10cm (por 90m), 13cm (por 180-270m), 18cm (por 360-720m).

Kulturaj agadoj

La komisiito povas registri ankaŭ sur kasetoj:

60-minuta kaseto kostas \$1,80, sendkostoj \$0,15 aŭ \$0,24

90-minuta kaseto kostas \$2,60, sendkostoj \$0,15 aŭ \$0,24

Kun la sekvantaj programoj li povas liveri presitajn tekstojn: 49, 65, 85, 125, 130, 137, 138, 142, 143, 159. Prezo de ĉiu teksto \$0,10. Por kvantoj li donas rabaton.

La libroj por la programoj 82, 145, 146, 200, 285, 347 estas haveblaj de la libroservo de UEA.

La Magnetofona Servo liveras nur kontraŭ antaŭpago de la kostoj aŭ al la germana poŝtĉekkonto de R. Eichholz, Mississauga, Ontario, Kanado, Hannover 1173 68-306. aŭ rekte al: R. Eichholz, 2040 Springbank Rd, Mississauga, Ont., Kanado.

Listo de disponeblaj diversaj programoj estas ricevebla kontraŭ afranko de la komisiito por la Magnetofona Servo aŭ de la Centra Oficejo de UEA.

Komisiito por Registrado de la Konversacia Lingvo: S-ro Jim Deer, 12946 NE Hancock St., Portland, Ore. 97230, Usono.

La Estraro de UEA komisiis s-ron Deer pri registrado de la konversacia lingvo-uzo en Esperanto, kunlabore kun la Magnetofona Servo. La komisiito havas la taskon aranĝi la surbendigon de la vivanta lingvo de la konversacia uzado. Tiuj registritaj konversacioj respegulu kiel eble plej fidele la parolatan lingvon, kiel ĝi ekzistas kaj evoluas en diversaj medioj kaj regionoj. En la kadro de la Magnetofona Servo li kunlaboras por la disvastigo de tiuj registraĵoj.

LA MAGNETOFONA SERVO DE UEA

Ĉeestu perbende la Universalajn Kongresojn...

Aŭskultu famajn parolistojn...

Perfektigu vian prononcon...

Vivigu la klubvesperojn...

Libroservo de UEA

Listo de Eldonaĵoj

Universala Esperanto-Asocio

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando

(Jarlibro 1974/II)

La enhavo de la Librolisto estas indeksita en la ĝenerala indekso de la Jarlibro, ĉe la fino.

MENDOJ KAJ PAGOJ

MENDOJ

Mendoj klare skribitaj ŝparas tempon. Tial oni prefere mendo per la specialaj mendo-folioj de UEA. Petu provizon!

Se vi havas kreditan konton ĉe UEA, ni povas tuj trakti mendojn kontraŭ fakturo. Ni pretas malfermi konton post ricevo de modesta antaŭpago kune kun promeso pagi postajn fakturojn. Se vi deziras havi konton ĉe UEA aŭ ne intencas regule mendi ĉe UEA, prefere petu provizoran fakturon antaŭ ol sendi la pagon de via mendo, por ke vi sciu la precize ĝustan sumon.

Al ĉiuj prezoj (escepte se temas pri periodaĵoj) necesas aldoni 10% kiel sendokostojn (por afranko, pakmaterialoj kaj paklaboro). Se oni deziras sendon per registrita poŝto, oni aldonu krome po 1,75 gld. por ĉiu aparta pakajo.

Pagante al Nederlando per banko aŭ ĉeko, bv. aldoni 5,— gld. aŭ egalvaloron por la bankkostoj.

Nederlandanoj!

Pro la enlanda imposto "B.T.W." bonvolu aldoni al la netaj prezoj de libroj kaj gazetoj de UEA celitaj al nederlandaj adresoj 4%, kaj 16% por diskoj, insignoj aŭ aliaj materialoj.

PAGOJ

Ĉiam klare indiku sur la pagilo la celon de la pago. Mencio de via konto-numero sufiĉas, se vi havas konton ĉe ni.

Nuntempaj rimedoj por pago al UEA:

Bankoj: Bank Mees & Hope, Coolensingel 93, Rotterdam-3001, Ned. (konto n-ro 25.52.89.804); Crédit Lyonnais, Agence Internationale, 29 X, F-75460 Paris, Cedex 10, konto n-ro 738.022 F je la nomo de UEA. (Pagante al Cr. Lyonn. ĉiam indiku la sumon en francaj frankoj.) (Poŝtĉekkonto de Crédit Lyonnais: Paris 947). Midland Bank, Leytonstone, London E11 3AB, Britujo (filia kodo 40.04.17, konto UEA n-ro 829552). **Ĉekoj:** Ĉiuj ĉekoj enkasigeblaj en Nederlando. Poŝta ĝiro: Nederlando 37 89 64; Svedujo 74 3 74-0; Svislando 12-2310. **Poŝtmandatoj:** internaciaj, sterlingaj aŭ nederlandaj. **Monbiletoj:** nederlandaj aŭ aliaj ŝanĝeblaj en Nederlando. **Uneskokuponoj:** kiujn disponas naciaj komisionoj por Unesko. **Respondkuponoj** internaciaj, aĉeteblaj en poŝtoŝtancoj de multaj landoj. Valoro: po 0,60 gld. **Poŝtmarkoj:** nur nederlandaj, neuzitaj kaj aktuale validaj. **Aliaj rimedoj:** nur laŭ anticipa interkonsento.

Se neniu el la menciitaj rimedoj estas uzebla, oni petu konsilon de la landa asocio, ĉefdelegito aŭ peranto de UEA en la koncerna lando.

1. LIBROJ

LERNOLIBROJ, VORTAROJ, INFORMILOJ

Vidu ankaŭ la rubrikojn "Terminaroj" kaj "Diskoj".
Libroj por instruistoj de Esperanto aperas sub "Movado".

Afrikansa

Ŝlosilo 0,50 gld.

Angla

ABC's of Esperanto, The (1971) Eld. Channing Bete, Usono. 15p. 21cm. 0,90 gld. Tre klara kaj okulfrapa ĝenerala informilo pri la lingva problemo kaj Esperanto, kun koncizaj, objektivaj argumentoj kaj amuzaj desegnaĵoj.

About Esperanto, the international "second language" (1972) Eld. K-io Channing Bete, Usono. 15p. 28cm. Ilus. 3,60 gld. Studkajero uzebla kiel ĝenerala informilo aŭ enkondukilo por kursoj. Bonegaj enhavo kaj prezento.

Accepted Esperanto Dictionary, The. Leksikono de oficialaj vortoj (1971) Komp. Edward Ockey. 20p. 21cm. 1,80 gld. Listo de la 4 535 radikoj oficialigitaj de la Akademio, kune kun la oficialaj anglalingvaj difinoj.

American lag in solving the language problem Esperantic Studies Foundation. 41p. Ksero. 28cm. Ilus. 5,10 gld. Preparita laŭ peto de Roman C. Pucinski, membro de la Ĉambro de Reprezentantoj. Enhavas statistikojn pri E-o.

Common language for Africa. Tibor Sekelj. 11 p. 21 cm. 0,15 gld. Informilo pri E-o.

Complete seven-day Esperanto course for international correspondence (1971) L.T. Tanaka. 247p. 28cm. 21,60 gld. Fidinda ekspresa kurso eldonita en Usono, kun gramatikaj aldonajoj, tre utilaj vortlistoj kaj informmaterialo pri la movado. Celas tuj ebligi internacian korespondadon.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Concise dictionary of 26 languages in simultaneous translations, The. Kompilis Peter M. Bergman. 406p. 20 cm. Broŝ. 6,00 gld. Al 1000 anglaj vortoj (de *able* ĝis *zero*) estas aldonitaj la respondaj vortoj en 25 lingvoj (ara., ĉeĥa, dana, E-a, finna, fra., germ., gre., heb., indonezia, his., hungara, ita., jap., jida, ned., nor., pola, por., rum., rusa, serbokroata, ŝahila, sveda, turka). Kun kompleta indekso en ĉiuj 25 lingvoj. Uzebla por iu ajn lingvo el la 26 lingvoj.

Edinburgh Esperanto pocket dictionary. (15a eld., 1933). 288p., 16cm. Kartone bind. 4,68 gld. Poŝvortaro malnova sed vere enpoŝigebla.

English-Esperanto Dictionary F. Fulcher kaj B. Long 336p. 18cm. 9,30 gld. Tolbind. Pli ol 30000 vortoj.

English-Esperanto Vocabulary. 35 p. 10cm. 0,30 gld. Angla/E-a vortareto (3 600 vortoj), eldonita aldone al la angla *Ŝlosilo*.

English phrases and expressions in Esperanto (1969) Felix Woolf. 119p. 21cm. Broŝ. 7,50 gld. Idiotismaro angla kun traduko E-a. Ĉiu paĝo estas dukolona.

Esperanto: A complete grammar. (1968) Ivy Kellerman Reed. 166p. 22cm. 21,60 gld. Tolbind. 25 lecionoj, vortaretoj angla/E-a kaj E-a/angla, demandaro por ekzercado kaj la antaŭparolo de Mario Pei.

Esperanto and English dictionary. J.C. Wells. 419p. 18cm. 6,90 gld. E-a/angla (9000 vortoj), angla/E-a (19 500 vortoj). Volumo en la serio *The Teach Yourself Books*.

Esperanto-English dictionary (1967) Montagu C. Butler. 450p. 18cm. Tolbind. 8,40 gld. Unudirekta vortaro kun ofte ampleksaj ekzemploj, sinonimoj kaj preskaŭsinonimoj, kio estas ebligita per propra mallongiga sistemo de la aŭtoro.

Esperanto for beginners Montagu C. Butler. 24p. 16cm. 0,30 gld. 10 lecionoj plus vortareto de pli ol 300 vortoj.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Esperanto teacher, The Mason Stuttard. 104p. 17cm. 2,10 gld. 20 lecionoj, ekzercoj kun respondoj, vortareto E-a/angla (ĉ. 1 300 vortoj) plus gramatika indekso.

First course in Esperanto, A William Auld. 32p. Ilus. 28cm. 6,72 gld. Dekleciona, tre alloge prezentita kurso, facile adaptebla por internacia uzo. Celas instrui en 14 horoj kiel eble plej utilan kvanton da materialo. Taŭga por lernantoj de ĉiuj aĝoj kaj ankaŭ por lernejoj klasoj.

Estas mendeblaj ankaŭ 6 kasetoj kun la kompleta parolita teksto (voĉo de la aŭtoro). Komplete (6 kasetoj, 1 lernolibro, 2 informbroŝuroj, ktp. en skatolo) kostas 144 gld.

First foreign language, A Bernard Cavanagh. 32p. 21cm. 1,80 gld. Informilo por anglalingvanoj.

Home study course in basic Esperanto; an introduction to the international "second language" of the world (1972) John L. Lewine. 131p. 28cm. Kun 14 diskoj longedaŭraj, duflankaj, monofonaj. 33 t/m., diam. 30cm. Ĉi tiu moderna usona kurso instruas la lingvon per 14 konversaciaj lecionoj en lernolibro kaj sur la samnombraj diskoj. Ĝi taŭgas precipe por memlernantoj sen instruisto; la diskoj enhavas paŭzojn por respondoj. Sur la diskoj parolas angle kaj Esperante d-ro H. Tonkin, s-ino Tonkin kaj d-ro J. Pool. La komplete en skatolo kostas 150 gld.

International language for scouts. (1935) Rust. 69p. Ilus. 19cm. Broŝ. 0,66 gld.

Junulkurso Lernolibro 91p. 24cm. Ilus.; kun tradukekzercoj 21p. kaj solvo de la ekzercoj 5p. Komplete en dosierujo 14,10 gld. Rektmetoda kurso por geknaboj.

Ni parolu Esperanton: A first book of oral Esperanto (1964) R.H.M. Markarian. 41p. 21cm. Ilus. 2,70 gld. Redaktita por buŝa ekzercado en kursoj. 10 lecionoj kun 10 bildoj.

Nixon Esperanto vocabulary, The (1967) 195p. 14cm. 2,— gld. Angla/E-a (ĉ. 3 500 vortoj), E-a/angla (ĉ. 3 000 vortoj).

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Notes on English grammar for students of Esperanto (1957) Gabriel Dawson Lewis. 48p. 18cm. 1,20 gld. Traktas anglajn idiotismojn, kiuj kaŭzas malfacilaĵojn en E-lernado.

Practical course in Esperanto: with reading exercises and illustrations (11-a eld., 1964) Ferenc Szilágyi. 99p. 18cm. Ofset. Ilus. 2,10 gld. Populara memlernolibro kun multe da amuzaj ilustraĵoj kaj amuzaj legaĵoj, sen malfacilaj klarigoj gramatikaj. Adaptis la libron al anglalingvanoj Fred Wadham.

School Esperanto course, A (2-a eld., 1962) A.G. Batt. 63p. 18cm. 1,35 gld. Lernolibro kun instruisto. 31 lecionoj kaj E-a/angla vortareto.

Secondary school Esperanto I (1968) R.H.M. Markarian kaj J.H. Sullivan. 143p. 21cm. Ilus. 4,80 gld. Verkita por la lerneja uzado, aplikebla por rektmetoda instruado. 20 lecionoj, ekzercoj, versoj, kantoj, vortaretoj. 800 bazaj vortoj ellerneblaj.

Secondary School Esperanto, Book 2 (1971) R.H.M. Markarian kaj J.H. Sullivan. 181 p. Ilus. 22 cm. 11,80 gld. Ĉi tiu dua volumo de la kurso por lernejoj 11-jaraj aŭ iom pli aĝaj aldonas 500 pliajn vortojn al la jam instruita provizo. Laŭeble adaptita ankaŭ por usona uzo. Fortike broŝurita.

Step by step in Esperanto (8a eld. 1965) M.C. Butler. 280p. 18,5 cm. 7,20 gld. Fama lernolibro, kiu atingis sian 8an eldonon post nur 17 jaroj. Ĝi estas dividita laŭ sekcioj laŭgradaj kun ekzercoj, kantoj, ŝercoj ktp. Ĝia amplekso kaj ĝisfundeco igas ĝin ofte uzata kiel gramatika konsultlibro.

Structure of Interlingua compared with Esperanto's structure Faldfolio. 0,15 gld.

Ŝlosilo 0,50 gld.

Teach yourself Esperanto (2-a eld., 1968) John Cresswell kaj John Hartley. 205p. 18cm. Broŝ. Ilus. 5,70 gld. Unu el la serio *Teach yourself books*. 16 lecionoj, 16 reguloj, ekzercoj kun respondoj, vortareto E-a/angla.

Thematic dictionary Esperanto English Français Español
Vidu sub "Internacia": *Laŭtema vortaro*.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Wanted: a world language (1969) Mario Pei. 21 p. 18cm. 1,— gld. Verko de la fama lingvisto. Kelkaj el la subtitoloj: *The present need, Why not a natural language, The structure of Esperanto*. Tre taŭga kiel informilo konvinka.

Araba

Esperanto-araba lernolibro Nassif Isaac. 68p. 24cm. Ilus. 2,10 gld. Bone aranĝita lernolibro kun multo da bildoj. Taŭga ankaŭ por la lerneja kurso.

Esperanta-araba poŝvortaro (1968) Nassif Isaac. 285 p. 17 cm. 2,70 gld. 6 000 vortoj. Kartone bindita.

Bulgara

Bulgaro-esperancki reĉnik. Grigorov. 207p. 11cm. Broŝ. 2,40 gld. Poŝvortaro, unudirekta.

Bulgara-esperanta vortaro (1961). Div. aŭtoroj. 629p. 21cm. Bind. 9,60 gld.

Esperanta-bulgara vortaro (1963) Div. aŭtoroj. 441p. 21cm. Bind. 14,— gld.

Esperanto-bulgara konversacilibro Vidu sub "Lerniloj de naciaj lingvoj".

Esperanto-bulgarski reĉnik. (1970) Grigorov. 160p. 14cm. Broŝ. 2,40 gld. Poŝvortaro unudirekta.

Gramatiko de Esperanto (1966) Violin Oljanov kaj Kunĉo Vâlev. 213p. 20cm. 3,60 gld. Taŭga por tiuj, kiuj finis la elementan kurson.

Lernolibro de Esperanto (1963) Ivan Sarafov kaj Simeon Hesapĉiev. 154p. 23cm. 4,14 gld. 26 lecionoj, plus legaĵoj, kantoj kun muziknotoj, vortaretoj E-a/bulgara kaj bulgara/E-a.

Lernolibro de Esperanto (1969). Zaĥariev. 83p. Kolorilus. 22cm. Broŝ. 2,52 gld. Dudekkvarleciona kurso kun legaĵoj, traduk-ekzercoj kaj ĉe la fino kelkaj kantoj.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Ĉeĥa

ABC de la internacia lingvo Esperanto (1967) Theodor Kilian. 54p. 17cm. Ilus. 2, - gld. 20 lecionoj plus kanto *La Espero* kun la muziknoto.

Esperanta/ĉeĥa, ĉeĥa/Esperanta poŝvortaro (1964) R. Hromada. 349 + 37p. 12cm. 3,90 gld. Eld. Ŝtata Pedagogia Eldonejo.

Dana

Arbejdsbogen i Esperanto (2-a eld., 1950) L. Friis. 32p. 21 cm. 0,90 gld. Kolekto da danlingvaj ekzercoj tradukotaj al Esperanto kun konsiloj.

Esperanto-Grammatik (1953) Svend Dragsted. 40p. 21cm. Tolbind. 3,50 gld. Konciza enkonduko al prononcado, morfologio, sintakso ktp., kun indekso.

Esperanto lærebog (9-a eld., 1963) L. Friis. 134p. 21cm. 4,56 gld. Kompleta lernolibro kun gramatiko, ekzercaro, nia himno kaj vortaro.

Esperanto lærebog (1951) K. Langgård. 116p. 19cm. 3,54 gld. Gramatika lernolibro por lernejo kaj memstudo.

Esperanto-ordbog (4-a eld., 1958) L. Friis kaj P. Frey. 167p. 16cm. 2,40 gld. Vortaro Esperanta-dana kaj dana-Esperanta.

Miniatura vortareto dana-Esperanta 16p. 12cm. 0,50 gld.

Nøgle til L. Friis' Esperanto lærebog (3-a eld., 1969). 22p. 21 cm. 1,65 gld. Traduko de ĉiuj ekzercoj de la elementa lernolibro.

Nøgle til Progresu (1959) L. Friis, 15p. 21 cm. 1,65 gld. Traduko de ĉiuj ekzercoj de "Progresu".

Progresu (3-a eld., 1954) L. Friis. 88p. 21cm. 3,96 gld. Lernolibro por progresintoj kun ekzercaro.

Store Esperanto-dansk ordbog L. Friis kaj P. Frey. 268p. 21 cm. Bind. 12,30 gld. Vortaro Esperanta-dana.

Ŝlosilo 0,50 gld.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Estona

Esperanto keele õpik (1973) J. Ojalo. 135p. 21cm. Bind. 1,80 gld. 22-leciona kurso laŭ gramatika metodo, kun ampleksaj legotekstoj, solvo de la ekzercoj kaj vortareto.

Finna

Esperanto-kurso V. Setälä. 48p. 14cm. Ilus. 1,02 gld. 22 rakontetoj, ĉefe popolaj fabeloj pri bestoj.

Esperanton kielioppi (1969). V. Setälä. 8,62p. 14cm. Broŝ. 3,90 gld. Gramatiko bazita sur la strukturo de Esperanto, laŭ modernaj lingvistikaj principoj. Kun la Fundamenta gramatiko (en Esperanto) kaj indekso.

Malŝlosilo finna 30p. 11cm. 0,60 gld. Finna-Esperanta vortareto kun ĉ. 2 500 vortoj.

Suomi-Esperanto-Suomi (1969) Joel Vilkki. 204p. 13 cm. Plaste bind., 7,50 gld. Dudirekta poŝvortaro.

Ŝlosilo 0,50 gld.

Via dua lingvo (1969) Veli Kolari. 102p. 21cm. Ilus. 6,36 gld. Konversacia lernolibro por finnoj, kun ekzemploj, frazoj, gramatiko.

Franca

ABC d'espéranto G. Waringhien. 72p. 21cm. 2,04 gld. Klarigo kaj pravigo de ĉiu regulo de la gramatiko de Esperanto, kompare kun la ĉefaj kulturlingvoj. Tre taŭga informilo por kleraj homoj.

Dictionnaire Français-espéranto (1961) Léger kaj Albault. 672p. 17cm. 12,30 gld. La vortaro entenas la plej modernajn vortojn kaj listojn de geografiaj, sciencaj kaj muzikaj terminoj; sur mal-dika papero, havas etan volumenon.

Dictionnaire pratique d'Espéranto (1959) SAT-Amikaro. 516p. 16cm. 8,40 gld. Dudirekta vortaro franca-esperanta.

Dictionnaire thématique Esperanto English Français Español Vidu sub "Internacia": *Laŭtema vortaro*.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Espéranto I, manuel d'initiation (1955) Bernard Thaillet. 64p. 18cm. 1,50 gld. Baza lernolibro laŭ la gramatika metodo.

Espéranto II, manuel d'étude (1955) Jean Couteaux. 128p. 18 cm. 3,60 gld. Studlibro por progresantoj, kun detalaj gramatikaj klarigoj kaj vortareto dudirekta.

Espéranto III, manuel de perfectionnement (1946) Jean Couteaux. 95p. 18cm. 2,70 gld. Studlibro por perfektigantoj, kun tekstoj por tradukoj, klarigo pri gramatikaj detaloj, kaj notindaj esprimoj.

Espéranto dans l'enseignement, L' (1968) Pol Denoël. 24p. 23cm. 1,26 gld. Informbroŝuro pri Esperanto kaj instruado.

Esperanto manuel Reeld. 1961. Chavet kaj Warnier. 165p. 18cm. 5,85 gld. Praktika kaj elementa kurso en 15 lecionoj, kun ekzercoj kaj legaĵoj. Rev. eld. 1961.

L'Espéranto sans peine (1974) J. Thierry. Libro 420p. 19cm. Bind. 19,— gld., kun aŭ 16 diskoj 17cm. 33 t/m aŭ 4 sonbendoj aŭ kasetoj 211,20 gld. 98-leciana kurso laŭ la konata metodo "Assimil" por franclingvanoj.

Falsaj amikoj en Esperanto (1971) R. Bernard & A. Ribot. 39 p. 15 cm. 2,04 gld. Listo de 278 vortoj, kun franclingvaj tradukoj, konfuzebaj kun similaspektaj vortoj francaj. La dua parto listigas verbojn, kies (ne)transitiveco heziligas franclingvanojn.

Initiation théorique et pratique (4-a eld. 1970) Pol Denoël. 96p. 22cm Ilus. 6,54 gld. Gramatika lernolibro, kun bonaj klarigoj pri gramatikaj konceptoj.

Junulkurso (3-a eld. 1961) SAT-Amikaro. 91p. 24cm. Ilus. 4,26 gld. Rektmetoda kurso por geknaboj. Kun gramatika resumo en la franca lingvo.

Junulkurso, suplemento (1963) SAT-Amikaro. 23p. 24cm. 2,16 gld. Suplemento franclingva.

Langue Internationale, Une. 35p. 23 cm. 2,22 gld. Informilo iom detala.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Lexique fondamental espéranto-français (1957) Léger. 110p. 18cm. 3,75 gld. Praktika laborilo enhavanta multajn radikojn kaj en enpoŝigebla formato.

Ni parolu en Esperanto (1959) A. Ribot. 157p. 15cm. 3,— gld. 12 lecionoj kun korektoj de la ekzercoj. Elementa kaj progresiga kurso en unu libro, kies tekstoj alportas Esperantan kulturon pri d-ro Zamenhof, Esperantaj literaturo, gazetaro, la Kulturdomo Grésillon ktp. (Nur por franceparolantoj.)

Nos premiers pas en espéranto (1968) A. Ribot. 36p. 17cm. 1,80 gld. En 34 frazoj, registritaj sur fleksebla disko mikrokanala, la aŭtoro rakontas historion pri pluraj gejunuloj. Post ĉiu frazo, ĝia traduko kaj la necesaj klarigoj gramatikaj.

Nouveau cours rationnel d'espéranto (1973) 177p. Ilus. 21cm. 9,— gld. 8a rev. eld. La unua eldono de tiu ĉi lernolibro por franclingvanoj estis publikigita de Revolucia Esperantista Federacio en 1921, sub la titolo *Cours rationnel et complet d'espéranto* kaj kun antaŭparolo de Henri Barbusse. La aŭtoroj, siatempe ne indikitaj, estis Jean Habert kaj Marcel Boubou.

Précis grammatical (1962) A. Ribot. 60p. 15cm. 0,75 gld. La celo de ĉi tiu libreto estas ebligi rapidan revizion de la tuta gramatiko kaj esti kompleta prezento de Esperanto-gramatiko por iom kleraj personoj.

Une humanité, une langue (1973) Simone Glodeau. 47p. 21cm. 2,22 gld. Franclingva informa libreto pri la lingva problemo kaj Esperanto.

Vocabulaire du cours d'Espéranto E. Privat. 19p. 17cm. 0,25 gld.

Vocabulaire espéranto (1971) M. Duc Goninaz. 118p. 24cm. Broŝ. 8,40 gld. Laŭtema Esperanta-franca vortareto.

Germana

Ausführliche Sprachlehre des Esperanto (1932, represo 1973) H. Göhl. 295p. 20cm. Broŝ. 6,— gld. Tre detala germanlingva gramatiko de Esperanto.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Deutsch-Esperanto Handwörterbuch (1949) 354p. 15cm. Broŝ. 3,18 gld. 20 000 vortoj.

Deutsch-Esperanto Taschenwörterbuch (1971) Erich-Dieter Krause. 279p. 14cm. 6,60 gld. Poŝformata vortaro germana-Esperanta, komplementa al la alidirekta vortaro de la sama aŭtoro. Enhavas 12 000 artikol-vortojn, ankaŭ parolturnojn el diversaj flankoj de la ĉiutaga vivo. Kun aldonitaj klarigoj pri la prononco de Esperanto kaj nombrotabelo.

Dokumente-Informationen (1970) 20p. 21cm. 0,90 gld. Bonkvalita informbroŝuro eldonita de Germana Esperanto-Instituto. I.a. ĝi enhavas dokumenton CED/7 en germana traduko.

Enciklopedia vortaro Esperanto-germana Eugen Wüster. Partoj 1 ĝis 4 (A ĝis K), entute 576p. 26cm. Ĉiu parto po 13,50 gld. Tre detala kaj fidinda, kun speciala elmonro de la zamenhofa lingvouzo. Bedaŭrinde la eldono restis nekompleta post litero K.

Esperanto-Deutsch Handwörterbuch (1947) 104p. 15cm. 1,20 gld. Kun la 16 reguloj.

Esperanto in der Tasche W. kaj H. Wingen. 48p. 23cm. Ilus. 1,90 gld. Frazaro. Konversaciaro laŭ temoj, germana/E-a.

Esperanto: Mittler der Weltliteratur (1952) W.T. Oeste. 96p. 21cm. Broŝ. 4,50 gld. Post ampleksaj gramatikaj kaj teoriaj klarigoj, pli ol duonon de la libro konsistigas paraleltekstaj tradukoj poeziaj el pluraj lingvoj.

Esperanto programita. Lehrprogramm für den Selbstunterricht. Hermann Behrmann. 4 studkajeroj, testfolioj, informa kaj lega materialo, kaj 4 diskoj (33t/m., 18 cm.). Prezo de la tuto 23,— gld.

Granda vortaro germana-Esperanta (1894, fotorepreso 1968). L.L. Zamenhof (1859-1917). Kajero 1, nur de A ĝis Ablativ. 16p. 21cm. 3,15 gld. Interesa por esperantologoj.

Langenscheidts Lilliput Wörterbuch: germana/E-a 640p. 4cm. 2,10 gld. Miniaturaro.

Moderne Menschen sprechen Esperanto (2a eld. 1965) Germana Esperanto-Asocio. 38p. 21cm. Ilus. 1,— gld.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Post la kurso W. & H. Wingen. 98p. 21cm. Broŝ. 5,40 gld. Lernolibro por progresantoj, laŭ tre tradicia stilo, kun gramatiko, tradukoj kaj germanlingvaj klarigoj. Preskaŭ senŝanĝa reeldono: la ĉapitro pri "ita" estas reverkita.

Taschenwörterbuch Esperanto-deutsch (1967) Erich-Dieter Krause. 190p. 14cm. 5,40 gld. Eld. Enzyklopädie, Leipzig. 12 000 vortoj.

Technisches Wörterbuch / Teknika vortaro germana-Esperanta Rudolf Haferkorn (1967), 84p. 16cm. 6,— gld. Ofset. La vortaro nepre plenigas bezonon de fakuloj (fiziko, kemio, maŝinfako, elektrotekniko ktp.), kiuj intencas traduki Esperanten el la germana.

Verhältnswörter des Esperanto, Die (1968) E. Wüster. 36p. 21cm. 3,50 gld. Studo pri la rolo de la prepozicioj ĉu memstare ĉu en kunmetaĵoj kaj derivaĵoj.

Wir lernen Esperanto; Für Lehrgänge und zum Selbstunterricht (7a eld. 1966) Wilhelm kaj Hans Wingen. 76p. 21cm. 6,30 gld.

Wörterbuch Deutsch-Esperanto Hans Wingen. 176p. 17cm. Tolbind. 8,50 gld. Kun multaj kunmetaĵoj kaj idiotismoj.

Wörterbuch Esperanto-Deutsch M. Butin kaj J. Sommer. 244p. 17cm. Tolbind. 11,10 gld.

Wörter der Gegenwart; Deutsch-Esperanto; Aktuala terminaro (1962) Hans Wingen. 55p. 16cm. 3,90 gld. Kvazaŭ suplemento al *Wörterbuch Deutsch-Esperanto* de la sama aŭtoro.

Greka

Esperanto-Elinikón leksikón (1971) S. Sakellaropoulos. 72p. Mimeo. 24cm. 2,40 gld. Vortaro Esperanta-greka, unudirekta.

Í dietnís glóssa Esperanto (1965) S. Sakellaropoulos. 70p. 22cm. 1,92 gld. Greklingva lingvistika studo pri Esperanto.

Métodos tís dietnús glóssis Esperánto, metá i ánef didaskálu (1967) S. Sakellaropoulos. 176p. Mimeo. 25cm. Greklingva lernolibro de Esperanto por uzo kun aŭ sen instruisto. 4,80 gld.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Plíres Elino-Esperantikón leksikón (1971) S. Sakellaropoulos. 156p. Mimeo. 24cm. 4,80 gld. Vortaro greka-Esperanta, unu-direkta.

Silojí fráseon mé léksis elinikís proeléfseos ke dietnís tiáftas S. Sakellaropoulos. 36p. Mimeo. 24cm. 1,44 gld. Frazaro kun grekdevenaj kaj internaciaj vortoj. Pli ol mil Esperantaj frazoj, sen traduko, tiel elektitaj, ke ili estu facile kompreneblaj por greklingvanoj.

Síntomos métodos tís dietnús glóssis Esperánton horís daskalo (1970) S. Sakellaropoulos. 47p. Mimeo. 25cm. Konkiza lerno-libro por greklingvanoj sen instruisto. 1,92 gld.

Hebrea

Ekzercaro de Esperanto 50p 18cm. 1,50 gld. La "Ekzercaro" de Zamenhof kun hebrelingvaj klarigoj.

Esperanto: dulingva lernolibro Dvora Šor. 100p. 24cm. 3,60 gld. Hebrea/E-a. Lernolibro por memlernado, plus ŝlosilo kun 1 400 radikoj.

Esperanto Lingvo Internacia (2a eld. 1965) L. Turno kaj H. Mašler. 96p. 24cm. 3,60 gld. Lernolibro. Enhavas ankaŭ vortaron kun 1900 radikoj kaj 20-paĝan literaturan parton.

More sfas esperanta (1909) D. Gurevič (Hurvic). 79p. 21cm. 3,72 gld. Malnova hebrelingva lernolibro kun trilingva vortaro hebrea-jida-Esperanta. Fotorepreso 1970. Ne taŭga por instruado, sed interesa por bibliofiloj k.a.

Praktika vortaro hebrea-Esperanta J. Murzan. 242p. 16cm. 3,— gld. 12 000 hebreaj vortoj.

Hispana

Clave de Esperanto (unua eld. 1968) A. Gómez Cruz. 12 + 58p. 21cm. Broŝ. 1,20 gld. Ĉi tiu unua eldono povas servi kiel memorigilo por la jam sperta esperantisto, ankaŭ kiel interesajo: por aliaj povus esti erarigaj la lingvo-ŝanĝoj kiuj estas enkondukitaj en ĝi. Unudirekta, Esperanto-hispana.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Clave de Esperanto (dua eld., 1973) A. Gómez Cruz. 14+45+47 p. 21cm. Broŝ. 2,70 gld. Malgraŭ la titolo la libro estas du-direkta oportuna vortareto kun tre konciza prezento de la gramatiko. Ĉi tiu eldono ne enhavas la reform-proponojn, kiuj aperis en la unua.

Compendio de Esperanto para adelantados. Reglas - Ejercicios - Lecturas - Conversaciones Daniel Quarello. 193p. 20cm. 9,18 gld. Hispanlingva studlibro por progresintoj, uzebla ankaŭ de komencantoj.

Curso completo de idioma internacional E. Rodríguez Ontoria. 164p. 23cm. 6,24 gld. Libroforma versio de 26-leciona koresponda kurso por hispanlingvanoj. 26 lecionoj bazitaj sur gramatikaj kategorioj. Ampleksa vortlisto kaj proverbaro. Eldonita en Argentino, 1972.

Curso de Esperanto Gómez. 116p. 24cm. 8,10 gld. Tradicia metodo, kun gramatiko, ekzercoj kaj dulingvaj tekstoj.

Curso práctico de Esperanto (2a eld. 1970) F. Szilágyi. Trad. J. Hess. 99p. 18cm. Ilus. 2,70 gld. Populara lernolibro kun multe da amuzaj ilustraĵoj kaj amuzaj legaĵoj, sen malfacilaj gramatikaj klarigoj.

Diccionario de bolsillo; Diccionario Esperanto-Español y Español-Esperanto; selección de 25 000 voces con los términos usuales y científicos; reglas de pronunciación y gramática del Esperanto (1967) J. Paluzie-Borrell. 381p. 14cm. Broŝ. 3,— gld. Kun plasta ŝirmilo 3,30 gld.

ESPERANTO-FAKO DE LA FOMENTO MARTINENSE

Str. Provenza, 595, Barcelona -13

Kunvenas lunde, merkrede, vendrede, de la
20,30 ĝis la 21,30 horo.

VIZITANTOJ ESTAS ĈIAM BONVENAJ

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Diccionario elemental (1963) E. Tudela Flores. 71p. 17cm. 1,- gld. Dudirekta baza vortaro hispana-esperanta.

Diccionario temático Esperanto English Français Español
Vidu sub "Internacia": *Laŭtema vortaro*.

Elementos de Esperanto (4a eld. 1966) Fernando Soler y Valls. 30p. 16cm. 0,75 gld.

Esperanto al alcance de todos Fernando Soler y Valls. 113p. 21cm. Broŝ. 3,90 gld. Dektrileciona kurso, laŭ gramatika metodo.

¿Habla usted en Esperanto? (Ĉu vi parolas en Esperanto?)
Ergoto (de Bonaero). 182p. 18cm. Ilus. 6,80 gld. Baza kurso klasikstila: 20 lecionoj kun vortaretoj, gramatikaj klarigoj kaj ekzercoj; kelkaj legaĵoj; ĝenerala vortareto ĉe la fino. Argentina.

Homo sur sia vojo, La Vidu ĉe "Legolibroj".

Junulkurso: suplemento J. Hess. 10p. 22cm. Broŝ. 0,90 gld. Por uzo kun la libro *Junulkurso* (v. sub *francaj*).

Lando de Alvargonzález, La Antonio Machado (1875-1939). Elhispanigis F. De Diego. 47p. 18cm. Ilus. 2,10 gld. Al la tradicia formo de la romano Machado aldonis alegorian tavolon kaj rezultigis lia plej grava verko. La tradukinto fidele redonis la tradician formon, inkluzive de la asonanco, kiu ĉi-okaze ankaŭ en Esperanto bone konvinkas.

Llave del Esperanto (Ŝlosilo de Esperanto) (1971) 32p. 13cm. 0,50 gld. Nova hispanlingva eldono el Urugvajo.

Manual del Esperantista argentino (1974) R. Feldman González. 8p. 23cm. Broŝ. 0,72 gld. Konkiza prezento de la celoj kaj eblecoj de la nuna Esperanto-movado, kun sudamerika emfazo sed utila por ĉiuj hispanlingvaj landoj.

Mercado común y diversidad lingüística (1973) Unupaĝa informfolio. 0,06 gld.

¿Qué es el Esperanto? (1971) Eld. Hispana Esperanto-Instituto kaj eldonejo Sopena. Informfolio. 0,06 gld.

¿Sabe Ud. Esperanto? ; Curso práctico de la lengua internacional
Jorge Hess. 156p. 17cm. 3,60 gld.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Problema de la comunicación en el mundo, El (1974)
Informfolio. 0,06 gld.

Síntesis de esperanto para principiantes: curso preparatorio
(1962) Daniel Quarello. 118p. 17cm. 3,12 gld. Lerta enkonduko en ĉies lingvon je elementa nivelo: 16 reguloj, ekzercoj, legaĵoj, vortaro kun 750 fundamentaj radiko-vortoj kaj iliaj derivaĵoj.

Ŝlosilo. Vidu ĉe 'Llave del Esperanto'.

Vocabulario español-Esperanto (2a eld. 1966) Ernesto Tudela Flores. 527p. 17cm. 6,30 gld.

Hungara

Esperanto-hungara vortaro (4a eld. 1968) Pechan A. 544p. 14cm. bind. 6,- gld. 19 519 vortoj (8 644 radikvortoj plus 10 875 kunmetaĵoj kaj derivaĵoj) kaj 3 214 esprimoj, entute 22 733 informoj. Aparta listo pri novaj neologismoj.

Eszperantó, bevezetés és nyelvgyakorlatok (1972) I. Szerdahelyi. 307p. 24cm. Broŝ. 5,40 gld. Tre detala studlibro pri la lingvo kaj literaturo, por universitata kurso.

Eszperantó-magyar diáklevelzés (1971) Lerneja korespondado Esperanta-hungara. Kaszab andor; Benczik vilmos. 171p. 14cm. 1,50 gld. Kolekto de esprimoj kaj letermodeloj. Dulingva frazaro por korespondemaj gejunuloj.

Eszperantó-magyar kézikötár (1957) Kovács. 179p. 14cm. Broŝ. 1,50 gld. Poŝvortaro unudirekta.

Eszperantó nyelvkönyv (7a eld. 1968) Julio Baghy. 200p. 24cm. 36 ilus. bind. 5,40 gld. 32 lecionoj plus legaĵoj, kantoj kun muziknotoj. Tre funda lernolibro por hungaroj.

Eszperantó nyelvkönyv 1 Szerdahelyi I. 213p. 24cm. 5,70 gld. Hungara versio de la libro "*Esperanto 1 Internacia*" (v. sub "*Internacia*"). La enkonduko kaj gramatikaj klarigoj estas en hungara lingvo, kaj la indekson de vorteroj anstataŭas vortareto Esperanta-hungara.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Esperanto nyelvkönyv 2. Szerdahelyi I. 227p. 24cm. 5,50 gld. 24 lecionoj por du lernojaroj, sistema gramatiko, nur esperantlingvaj kaj Esperanta-hungara vortareto. Krom la ĉiutagaj temoj ĝi entenas tekstojn pri la historio de Esperanto kaj literaturo. Multaj poemoj, kantoj, anekdotoj kaj spritaj tekstoj vigligas ĝian materialon.

Esperanto szakpróba (1973). B. Hegedüs. 103p. Ilus. 19cm. Broŝ. 1,74 gld. Lernolibro por la Pionira movado.

Esperanto társalgási zsebkönyv (1968) J. Mátéffy, I. Nagy. 112p. 17cm. bind. 3,— gld. Laŭtema frazaro dulingva, kaj mallonga gramatiko

Gramatika demandaro resuma Julio Baghy. 44p. 20cm. 1,60 gld. 50 demandoj-respondoj el gramatika parto de mezgrada kaj supera ekzamenoj plus dulingva vortareto kaj indekso de gramatika terminaro.

Hungara-Esperanta vortaro (4a eld. 1968) Pechan A. 544p. 14cm. bind. 6,— gld. Ĉirkaŭ 30 000 vortoj kaj esprimoj plus aparta listo pri proponataj neologismoj kaj fakvortoj.

Rendszeres esperanto nyelvtan (2a eld. 1968) Kálmán Kalocsay. 246p. 20cm. Bind. 5,60 gld. Sistema gramatiko kun tre multaj utilaj ekzemploj por apliko de gramatiko en fonetiko, morfologio, sintakso kaj vortfarado. Kvazaŭ "Plena gramatiko" por hungarlingvanoj.

Turista vortaro Esperanto-hungara-Esperanto (1968) Pechan A. 586p. 12cm. Bind. 6,60 gld. Ĝi enhavas krom ĉiutagaj vortoj terminojn de fakoj kunligitaj kun turismo: ĉiuj branĉoj de trafiko, somerumado, kuracado, gastindustrio, modo kaj riĉa vortostoko pri gastronomio kaj sporto. En la Esperanta-hungara parto estas 13 427 vortoj, el kiuj 8 210 estas el la suprenomitaj fakterminoj kaj 5 217 enestas en la baza Esperanta-hungara vortaro. En la hungara-Esperanta parto, inter 13 996 vortoj 7 171 vortojn enhavas la baza vortaro, dum 6 825 estas turismaj vortoj. Ĝi enhavas krome suplementon de geografiaj nomoj kaj tabeloj de landoj kun adresoj de landaj Esperanto-organizaĵoj kaj UEA-delegitoj.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Útmutató az úttörő esperanto nyelvi szakkörök vezetői részére (1972) B. Hegedüs. 23p. 19cm. Broŝ. 0,60 gld. Gvidlibro por gvidantoj de Esperanto-rondoj de Pioniroj.

Indonezia

Fundamento de Esperanto L.L. Zamenhof. Trad. Liem Tjong Hie. 97p. 20cm. 2,40 gld. Eld. Indonezia Esperanto-Instituto.

Selajang pandang bahasa Esperanto Liem Tjong Hie. 80p. 16cm. 1,20 gld. Eld. Indonezia Esperanto-Instituto.

Internacia

Ĉu vi parolas tendare? (2a eld. 1974) R. Corsetti, M. La Torre. 57, 8, 25p. 21cm. Broŝ. 2,50 gld.

Daŭriga kurso post Cseh-kurso (3-a eld. 1966) Margarete Saxl. 56p. 28cm. Ofset. 6,— gld. Dekdu lecionoj de iom Cseh-stila kurso, sed kun pli eksplicita traktado gramatika.

Du malsanoj en Esperanto (1954) H.A. de Hoog. 140p. 18cm. 4,— gld. Profunda pritrakto de uzado de la korelativaj paroj tia/kia kaj tiom/kiom, kaj provo pruvi la zamenhofecon de la formo tiel/kiel por esprimi gradon.

Ekzercaj taskoj por daŭrigaj kursoj. Serio el 7 diversaj taskoj. 1,14 gld.

Ekzercoj L.L. Zamenhof. 32p. 19cm. 1,08 gld. Ĉi tiu broŝuro enhavas la kompletan Esperantan tekston de la fama Ekzercaro el la Fundamento de Esperanto.

Elementa legolibro de Esperanto Mijake Ŝihej. 20p. 21cm. 0,66 gld. Kun bildafiŝaro por klaso: 4,98 gld. 9 lecionoj kun ekzercoj. Uzebla en elementa kurso nur kun gvidanto.

Ellernu! (1968) Ferenc Szilágyi. 121p. 23cm. Ilus. 6,— gld. Progresiga kurso laŭ la sama stilo kiel de *Konversacia Esperanto-kurso* de la sama aŭtoro: demandoj-respondoj, amuzaj rakontoj kaj humuraj desegnaĵoj.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Esperanto 1, Internacia eldono. Szerdahelyi I. 260p. 24cm. 6,— gld. Riĉe ilustrita sistema lernolibro por la lerneja junularo laŭ moderna metodo. Konsistas el: (a) 24 lecionoj kun studmaterialo por du lernojaroj; (b) klarigoj kaj ekzercoj; (c) indekso de uzitaj vorteroj. La libro estas devige uzata en la kvinlanda (Aŭstrujo, Bulgarujo, Hungarujo, Italujo, Jugoslavio) Pedagogia-Didakta Eksperimento kaj proponita de ILEI kiel unuece uzenda lernolibro.

Esperanto 2. v. "Esperanto nyelvkönyv 2" ĉe *lernolibroj hungaraj*.

Esperanto en lingvolaboratorio (1973) H. Behrmann. 75p. 21cm. Broŝ. 5,40 gld. Tekstoj de 69 magnetofonaj bendoj por laboratoria kurso.

Esperanto laŭ metodo Friis L. Friis. 384p. 21cm. Ilus. 26,— gld. Dek volumetoj kune en kartona skatolo. Rektameta kurso.

Esperanto-lernolibro por popollernejoj (1930) Arthur Degen. 67p. 22cm. Ilus. 1,25 gld. Rektmetoda lernolibro kun multaj ekzercoj.

Esperanto por infanoj (6a eld., 1968) G. Gladstone Solomon. 68p. 18cm. Broŝ. 2,10 gld.

Esprimo de sentoj en Esperanto. Edmond Privat (1889-1962). 62p. 17cm. 2,88 gld. Libroj pri stilistiko en kaj pri Esperanto estas maloftaj: sed jen la verko de poeto, kiu pritraktas la esprimkapablon de la internacia lingvo elinterne: pure lingvaj, kutimaj, logikaj, afiksaj gramatikaj kaj sintaksaj apartaĵoj igas Esperanton esti mature esprimova lingvo.

Fundamenta krestomatio (17-a eld. 1954, fotorepreso 1969) L.L. Zamenhof k.a. 442p. 20cm. 11,70 gld. Grava verko por la serioza studanto de Esperanto, kun ampleksaj notoj de W. Bailey kaj P. Downes.

Fundamento de Esperanto (9a eld. 1963) L.L. Zamenhof. 355p. 22cm. Bind. 11,10 gld., broŝ. 8,40 gld. La fundamenta gramatiko, ekzercaro kaj universala vortaro, en la lingvoj franca, angla, germana, rusa, pola, kun enkonduko kaj lingvaj rimarkoj de A. Albault.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Gramatika demandaro resuma Julio Baghy. Vidu ĉe *Hungara*.

Intensiva kurso de Esperanto Nakamura t. 40p. 18cm. 1,56 gld. Konversacia lernolibro kun japanaj klarigoj, sed uzebla internacie.

Junulkurso Vidu sub *Franca*. Ekzistas ankaŭ diverslingvaj suplementoj kaj adaptoj, kiuj aperas ĉe la koncernaj lingvoj.

Jamborea lingvo (2-a eld. 1969) J.K. Hammer. 60p. 20cm. Ofset. Ilus. 2,50 gld. Rektmetoda kurso por skoltoj.

Kompleta lernolibro de regula Esperanto (1973) L. Mimó. 189p. 21cm. Broŝ. 17,70 gld. 31-leciona gramatiko sistema, verkita laŭ logikisma vidpunkto. Fine troviĝas kelkaj specimenaj literaturajoj.

Konversacia Esperanto-kurso F. Szilágyi. 68p. 22cm. Ilus. 4,— gld. La celo de la libro estas ekzerco de konversacio. Abunda je demandoj, kaj plenplena de ilustraĵoj, preskaŭ ĉiuj gajaj, i.a. el la serio pri Adamson.

Konversacia literaturo Internacia Esperanto-Instituto. 8 broŝuroj po 8p. 15cm. po 0,30 gld. Facilaj legolibretoj.

Laŭtema vortaro Esperanto-angla-franca-hispana (1972) A. Hryniewicz (Ergoto de Bonaero). 234p. 17cm. 10,20 gld. 6 800 vortoj en Esperanto kun paralelaj tradukoj en la 3 aliaj lingvoj. La vortoj estas klasifitaj laŭ ĉ. 90 temoj kaj alfabeto ordigitaj en ĉiu temsekcio.

Lerneja korespondado Vidu sub "hungara" ĉe *Eszperantó-Magyar diáklevelezés*.

Lingvaj respondoj L.L. Zamenhof (1859-1917). 10 + 134p. 20cm. Bind. 6,72 gld.; broŝ. 5,16 gld. Ĉefe en la unuaj tempoj, la iniciatinto de Esperanto estis supersūtita de lingvaj demandoj: al ili, li respondis en pluraj revuoj. La jenan kolekton redaktis akademioprof-o G. Waringhien, kaj ĝi enhavas respondojn pri leksikologiaj, gramatikaj kaj jurisprudencaj demandoj.

Lingvo Stilo Formo. (3a eld., 1970) Kálmán Kalocsay (1891-). 144p. 18cm. 5,10 gld. Nia granda poeto estas ankaŭ granda lingvisto: la jena studkolekto enhavas eseojn pri Esperanta vortfarado, pri la evoluo de nia poezia lingvo, pri lingvaj (sintaksaj, leksikologiaj) demandoj, pri rimo, pri elparolo, pri ritmo en Esperanto. Aparte epokfara estas la pri-vortfarada eseo.

Metodiko de la Esperanto-instruado Vidu ĉe "Movado, lingvo..."

Naŭlingva etimologia leksikono. Louis Bastien. XVIII + 320p. 18cm. Bind. 5,70 gld. Post mallonga enkonduko pri la filologia aparato de la verko, pri la lingvoderivado, kaj pri la fonetikaj diferencoj inter Esperanto kaj la pritraktitaj lingvoj, sekvas kompara vortaro Esperanta – latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla kaj rusa. Paĝpiede estas prisencaj notoj.

Ne tiel, sed tiel ĉi! – konsilaro pri stilo (1965) F. Faulhaber. 63p. 21cm. 3,78 gld. La aŭtoro, ano de la Akademio, klarigas, kio estas bona stilo, kaj recenzas diversajn stildifektojn, kiujn oni ofte renkontas en E-verkoj.

Ni parolu Esperanton (reprezo 1971) R.H.M. Markarian. 41p. 21cm. Ilus. 2,70 gld. Lernolibro por uzo en lernejoj. Kvankam la vortlistetoj havas anglajn tradukojn, la libro estas uzebla internacie.

Oportuna vortaro de ordinara Esperanto (1969) Vilho Setälä. 96p. 15cm. Ofset. Ilus. 3,25 gld. Vortato Esperanto/Esperanto, kun simplaj difinoj kaj multaj bildetoj. Tre taŭga por la progresanta lernanto.

Perfektiga kurso; plena traktato pri la sintakso (dua eld., 1973). D. Quarello. 191p. 22cm. Broŝ. 13,80 gld. Priskribo de la frazostrukturetoj de Esperanto.

Petro (8-a eld. 1956) SAT. 112p. 17cm. Ilus. 2,70 gld. Kurso lernolibro por laboristoj.

Plena ilustrita vortaro (1970) Diversaj kunaŭtoroj; ĉefred. G. Waringhien. Eld. SAT. 37 + 1299p. 20cm. 86,70gld. Nuntempe en la E-movado la plej granda, plej ampleksa vortaro, kiu enhavas ankaŭ novajn sciencajn kaj teknikajn terminojn. Posedinda por ĉiu. 30 paĝoj da ilustraĵoj.

Plena vortaro de Esperanto kun suplemento (1934, suplemento 1954). E. Grosjean-Maupin, G. Waringhien k.a. Fotorepreso 1971. 511 + 63p. 17cm. 14,10 gld. Ankoraŭ la plej oportuna – preskaŭ poŝformata – vortaro por ĝenerala uzo kun difinoj en Esperanto. La 'malgranda frato' de *Plena ilustrita vortaro*.

Por la praktikantoj (2-a eld. 1967) P. Babin. 85p. 27cm. Ilus. 5,40 gld. Vigla lernolibro por la progresanto.

Privilegia vojo V. Setälä. 132p. 18cm. Ilus. 4,74 gld. Jam de longe unu el la plej vendataj lernolibroj, taŭga por memlernado kaj por kursoj. Instruas la novajn vortojn per simboloj, ilustraĵoj aŭ jam lernitaj vortoj. Plena de ĉarmaj desegnaĵoj. Instruĉifolio estas havebla en la lingvoj angla, araba, ĉeĥa, dana, Esperanto, franca, germana, hebrea, hispana, itala, japana, nederlanda, norvega, portugala aŭ rusa. Mendante, indiku la lingvon.

Raciaj derivaĵoj kaj verbuzo (1964) Émile Gasse. 8p. 21cm. 0,55 gld. Broŝuro, kiu traktas ĉefe vort-derivadon laŭ propra teorio de la aŭtoro.

Sepa oficiala aldono al la Universala Vortaro (1958) 4p. 21cm. 0,50 gld. Oficiala bulteno de la Akademio de Esperanto, entenanta 118 fundamentajn radikojn, kiuj ne troviĝas en Universala vortaro, plus kelkajn internaciajn radikojn oficialigitajn.

Slipara vortaro (ekde 1968) Diversaj kunaŭtoroj; ĉefred-o R. Eichholz. Eld. Esperanto Press. La kreskanta, aktuala, faka kaj ilustrita suplemento al ekzistantaj vortaroj. Ĉiu termino troviĝas sur aparta slipo kune kun difino kaj ilustraĵo kaj kun tradukoj en la angla, franca kaj germana lingvoj, fontindikoj kaj klasifikaj numeroj laŭ la Universala Decimala Klasifiko (UDK). Ĉiu serio konsistas el 144 terminoj sur 432 slipoj. Prezo de unu serio 2,30 gld. Abonantoj de 10 serioj ricevas senkoste la 121 gvidkartoj, kiuj listigas 1 500 fakojn laŭ UDK.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Sub la verda standardo P. Korte. **Laborilo I** 41p. 15 x 21 cm. 3,18 gld. **Laborilo II** 65p. 15 x 21 cm. 3,84 gld. **Laboriloj I kaj II (kune binditaj)** 106p. 15 x 21 cm. 5,76 gld. **Gvidilo** 98p. 15 x 21 cm. 4,20 gld. Duparta, ŝatata elementa kurso por infanoj, por instruado laŭ la rekta metodo. Abunde ilustrita per desegnaĵoj. En la Gvidilo troviĝas konsiloj por la instruanto. Jam multfoje represita.

Teksto unua, La (1967) 31p. 19cm. 1,20 gld.
Ekzercoj kaj facilaj legaĵoj, por uzo en kurso.

Teksto dua, La (2-a eld. 1966) 31p. 19cm. 1,20 gld. Plej diversaj tekstoj, sufiĉe facilaj, por uzo en kurso.

Tom kaj Tina Ole Nederland. 46p. 23cm. Ilus. 3, — gld.
Lernolibro en bonega kaj moderna metodo, kun amaso da desegnaĵoj, kiuj ilustras la ludojn de la geknaboj Tom kaj Tina. La aŭtoro estas ne nur eminenta pedagogo, sed ankaŭ eminenta desegnisto.

Tom kaj Tina; Instrukcio Ole Nederland. 18p. 21cm. Ofset.
1,50 gld. Metodikaj konsiloj akompane al *Tom kaj Tina*. Necesa libreto por ĉiu, kiu instruas laŭ la lernolibro de Ole Nederland.

Tom kaj Tina en la flugmaŝino Ole Nederland. 70p. 23cm. Ilus. Broŝ. 4,25 gld.; bind. 6, — gld. Dua parto de la internacia lernolibro por geknaboj *Tom kaj Tina*. Ankaŭ en ĉi tiu libro abundas humurplenaj desegnaĵoj de la aŭtoro.

Universitata lernolibro de Esperanto (1973) T. Gim. 174p. 21cm. Broŝ. 8,10 gld. Tute en Esperanto, ĉi tiu libro verkita por kursoj en Koreujo taŭgas ankaŭ por aliaj landoj.

Unua lernolibro de Esperanto. L.L. Zamenhof. 72p. 18cm. Broŝ. 1,80 gld.

Vortareto kun ekzemploj Vd. sub "Japana".

Zamenhof-radikaro kun derivaĵoj kaj fontindikoj Eugen Wüster. 84p. 24,5cm. 5,50 gld. La granda esperantologo kaj lingvisto Wüster pretigis kun atenta kaj preciza filologia metodo plenan katalogon kun fontindikoj de ĉiuj vortoj uzitaj de Zamenhof, kun pridevena komento.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Islanda

Islanda Esperanto-vortaro (1965) Baldvin B. Skaftfell. 479p. 22 cm. 56,50 gld. Eld. Federacio de Islandaj Esperantistoj.

Itala

Esperanto, la lingua internazionale (1973) 4p. 30cm. 0,12 gld. Informilo.

Il latino lingua internazionale? Carlo Agostini, Pierluigi Marelli. 31p. 25cm. 1,50 gld. Eld. Itala Esperanto-Federacio.

Lingua internazionale, La (1968) Ivo Lapenna. Trad. Itala Esperanto-Federacio. 44p. 15cm. 0,90 gld.

Manuale della lingua internazionale Esperanto G. Pacelli. 336p. 22cm. 10,50 gld. La plej grandioza itallingva lernolibro: gramatiko, sintakso kaj vortfarado riĉekzemple prezentitaj. Plue, fine, aperas notoj pri la Esperanta literaturo kaj eseo pri la arto poezia en Esperanto.

Manuale pratico della lingua Esperanto (4a eld. 1965). Unione Esperantisti Cattolici d'Italia. 111p. 17cm. 3, — gld. Krom la gramatiko en 26 lecionoj, ĝi enhavas ankaŭ la plej kutimajn preĝojn de kristano (Esperante), la statuton de UECI (itale), vortareton dudirektan ktp.

Japana

Elementoj de Esperanto Kawasaki Naokazu. 173p. 19cm. Bind. 6,72 gld. Eld. Daigakusyōrin, Tokio. 40 lecionoj. Ne taŭga por lerni la prononcadon.

Esperanta verbosistemo, La (1963) Nakamura T. Japanlingva kun Esperanta resumo. 30p. 23cm. 1,50 gld. Kernotuŝa komentario pri la "ata-ita problemoj", kun konkludo por la zamenhofa sistemo.

Lernolibroj, vortaroj, informiloj

Esperanto-binran (1967) Kompilis Sakai M., Hukuta M., Kato K. 243p. 19cm. Tolbind. 7,20 gld. Pri: la historio de internaciaj lingvoj, la Esperantaj movado, gramatiko kaj literaturo. Malgranda enciklopedio de Esperanto, japanlingva.

Esperanto en 4 semajnoj Ooŝima Joŝio. 370p. 18cm. Tolbind. 13,50 gld. Kurso en 4 semajnoj (= 28 tagoj) kun legaĵoj, gramatiko, ekzercoj. Uzebla por memstudado. Jam aperis pli ol deko da eldonoj de post 1961. Eld. Daigaku Syorin.

Klaso de interparolo en Esperanto (1971) Takeuti yosikazu. 121p. 18cm. 4,80 gld. Konversacia instruo por japanoj, dividita en 34 lecionojn, kun 17 laŭtemaj vortaretoj Esperanto-japanaj.

1500 elektitaj vortoj 110p. 4,50 gld. E-a/japana

Nova kurso de Esperanto Ooŝima Joŝio. Vol. 1: (1968) 122p. 21cm. 6,54 gld.; enkonduko, gramatiko, prononcado ktp. en 19 lecionoj. Vol. 2: (1969) 134p. 21cm. 6,54 gld.; 15 lecionoj, en ĉiu leciono legaĵoj kun gramatikaj klarigoj. Taŭga por memstudantoj.

Nova kursolibro de Esperanto (1972) Rondo Harmonia, 26p. Ilus. Mimeo. 25cm. 2,52 gld. 8a eld. Lernolibro por japanoj laŭ rekta metodo.

Nova vortaro Esperanto-japana (1966) Okamoto Joŝicugu. Radikale rekompilita kaj pligrandigita de Nukina Yoshitaka kaj Miyamoto Masao. 399p. 16cm. 6,- gld. Enhavas *La Espero* kaj *La Tagiĝo*, kun muziknotoj.

Prepozicioj laŭ uzoj (1966; 2a eld. 1969) Ossaka Kenji. 6 + 64p. 18cm. 1,75 gld. Eld. Japana Esperanto-Instituto.

Vortareto kun ekzemploj (1964) Nomura Rihej. 106p. 15cm. 3,36 gld. 262 plej ofte uzataj vortoj kun ekzemploj. Eld. Librejo Pirato.

Tra la mondo 96p. 1,50 gld. Anekdotoj k.s.

Universala legolibro (1922) Fricke. 176p. 19cm. Broŝ. 1,68 gld. Modelaj tradukaĵoj kaj originalaĵoj prozaj kaj versaĵaj.

Legolibroj

Unua legolibro (5a eld., 1922) Kabe (K. Bein). 159p. 17cm. Broŝ. 1,80 gld. Diversaj prozaĵetoj, utilaj frazoj kaj letermodeloj.

Verda koro, La J. Baghy. 80p. 14cm. Ilus. Ofset. 3,24 gld. Facila romaneto el la vivo de esperantistoj en Siberio, por komencantoj kaj daŭrigaj kursoj.

Zamenhofa legolibro Kidosaki m. (1901-). 106p. 17cm. 2,25 gld, Kompilita de japana zamenhofologo. Taŭga kiel enkonduko al niaj majstraĵoj. Komentoj – japanlingve, sed ne ĝene por alilingvanoj.

POEZIO

Aliŝer Navoj; granda pensulo kaj poeto de mezepoko A.Navoj (1441-1502). Eluzbekigis P. Poliŝĉuk. 7p. ofs. 24cm. 0,30 gld. 5 poemoj, kun 5-paĝa prezento.

Animo prisma Sylla Chaves (1929-). 111p. 22cm. Broŝ. 3,- gld. Pasiaj, tumultaj lirikoj originale verkitaj en Esperanto de brazila poeto. Rimtintado karakterizas iom trude la plimultajn poemojn, tamen tre ofte la fina efiko estas forte stimula.

Apenaŭ bukedeto . . . (1971) Roger Bernard. 48p. 27cm. 5,10 gld. Mimeo. Poemoj tradukitaj el la franca literaturo (plus du originalaj). Poetoj klasikaj kaj modernaj.

Arĉoj. Geraldo Mattos (1931-). 144p. 19cm. Broŝ. 5,10 gld. 109 sonetoj originale verkitaj en Esperanto. Etose iom memorigas pri la poemoj de Baudelaire. La brazila poeto eluzas verŝajne ĉiujn variantojn kaj eblecojn de la klasika sonetformo. Du el ili estas eĉ verkitaj en la pra-Esperanto de 1881 – kuriozaĵoj, sed poemoj tre sukcesaj.

Atta Troll Heinrich Heine (1799-1856). 95p. 16cm. Broŝ. 0,90 gld. Versrakonto en 27 ĉapitroj, unu el la plej famaj verkoj de la mondfama germana lirika poeto. Traduko de Zaroni, en formfidelaj kaj fluaj versoj.

Aŭtuna foliaro; poemaro (1970) Julio Baghy. 153p. 19cm. 5,40 gld. Eld. Pirato, Oosaka. Kolekto el la lastaj poemoj de Baghy, kun kelkaj pli fruaj.

Poezio

Bapto de caro Vladimir Karel Havlíček Borovský (1821-1856). 20p. 11cm. Ilus. 1,62 gld. Tre sprita verko, brile tradukita el la ĉeĥa de Tomáš Pumpr per lingvaĵo gaja kaj esprimiva. Primokas la absolutismon surbaze de la tradicia kristanigo de Rusujo en 988 p.K. fare de la caro Vladimir.

Bone! V. Majakovsky. 108p. Ofs. 20cm. Broŝ. 3,60 gld.

Burĝonoj Vd. ĉe "Foto-libroj kaj albumoj".

Cigana romancaro Federico García Lorca (1898-1936). El la hispana tr. Fernando de Diego. 110p. 19cm. 7,80 gld. (Beletraj kajeroj de Stafeto, n-ro 43). Verkon samtempe pure hispanan kaj universale aklamitan de unu el la ĉefaj eŭropaj poetoj de la 20-a jarcento esperantigis unuaranga tradukanto.

Ĉielarko. Julio Baghy (1891-1967). 111 p. 19cm. Broŝ. 4,50 gld. Dek du fabeloj de dek du popoloj, verse rekreataj de la granda Esperanta romantika poeto, novelisto kaj romanisto. Li uzas plej diversajn rimedojn de la versarto por vigle kaj varie kapti la atenton kaj intereson de la legantoj, kaj multloke rivelas ankoraufoje sian suverenecon pri la onomatopeo kaj vortmuziko.

Dia Komedio, La Dante Alighieri (1265-1321). 709p. 28cm. 41,40 gld. Tre luksaj papero kaj bindo. La monde konata verko de la granda itala poeto, tradukita en Esperanton de Giovanni Peterlongo, – verse, sed sen rimoj. Dulingva eldono kun paralelaj tekstoj Esperanta kaj itala kaj pli ol 100 tutpaĝaj ilustraĵoj de Sandro Botticelli.

Duonvoĉe. G.E. Maura (1905-). 179 p. 12 cm. Ilus. 5,10 gld. Unu el la gravaj poemaroj, originale verkita en Esperanto de iom mistera panamano. La unuan eldonon de tiu ĉi libro englutis la dua mondmilito, sed tiu ĉi dua eldono estas multe pliampleksigita, kaj – precipe en la poemoj verkitaj post 1957 – la poezia lingvaĵo de la aŭtoro estas riĉa kaj figuroplena. Aparte brilas la sekcio *Skarpo tempokolora* kaj la *unuversaj universo*.

Edelvejso. Masao Nisimura (1907-1940). 209 p. 12,5 cm. 4,75 gld. Poemoj originale verkitaj en Esperanto de japana poeto. Facilfluaj versoj, rim-abundo. Kelkfoje la poemoj tro klare montras sian derivecon de aliaj poetoj, kiuj inspiris kaj influis la aŭtoron. Ĝenerale malpezaj temoj, malkoncize traktitaj. Karakteriza minora talento de la tridekaj jaroj.

Ekzilo kaj azilo. Emba (ps. de Imre Baranyai) (1902-1961). 164 p. 12 cm. 5,70 gld. Originale verkitaj poemoj de hungara socialisto, kiu eble pli realece kaj poezie, ol iu ajn alia, interpretas la laboristan medion kaj la vivon de malriĉuloj. Sentemaj kaj obsede memorindaj strofoj, voĉo aŭtentika kaj sana.

Elektitaj poemoj. Castro Alves (1847-1871). 186 p. 17 cm. Bind. 7,50 gld; broŝ. 5,— gld. Unuarangaj tradukoj fare de L.H. Knoedt de poemoj de brazila poeto, kies reputacio devus esti mondskala — kaj estus, se li estus verkinta en unu el la pli devastigitaj lingvoj. Romantikulo, komparinda kun la romantikaj eŭropaj samtempuloj.

Elektitaj Poemoj To Huu. Elvjetnamigis Dao Anh Kha (1964) 228p. 19cm. 3,90 gld. Poemoj jen politikaj, jen diversaj, en flua traduko.

Elektitaj versaĵoj M. Lermontov. Tradukis K. Gusev k.a. (1964) 28p. 21cm. Broŝ. 1,50 gld.

Elektitaj Versaĵoj N. Vapcarov. El la bulgara div. trad. (1960). 71p. 20cm. 2,30 gld. Poemoj politikaj kaj batalaj el la dua mondmilito.

El Manjoo Komp. kaj trad. Miyamoto masao (1971) 110p. ofs. 18cm. 3,60 gld. Elekto el tradicia japana utaaro.

El orienta florbedo 104p. 19cm. 2,46 gld. Antologio japana.

En frua majmateno 16p. Ilus. Broŝ. 2,40 gld. Antologieto el la mezepoka nederlanda literaturo.

Eroj. Marjorie Boulton (1924-). 367 p. 15,5 cm. 7,80 gld. Gravega poemaro de elstara originala poetino, kiu estas unu el la ĉefaj figuroj de la nuntempa Esperanta literaturo. Krom la longa titolpoemo, kiun devus koni ĉiu poeziamanto, la 367-paĝa volumo (ŝia tria poemaro) enhavas preskaŭ 200 diversspecajn poemojn. Eble ne estas troigo pretendi, ke f-ino Boulton estas unu el la malmultaj vere konindaj poetinoj eĉ en mondliteratura kadro.

Esperanta antologio. Redaktis William Auld (1924-) 640 p. 23cm. Ilus. Bind. 14,40 gld. Pli ol 350 originale verkitaj poemoj de 90 poetoj el 35 landoj, el la periodo 1887-1957, kolektitaj el revuoj kaj volumoj plejparte ne plu haveblaj. La antologio donas superrigardon tra la poezia kulturo de Esperanto, kaj ĉiu iom grava poemo kaj poeto el la periodo estas trovebla en ĝi. Kun historia enkonduko kaj abundaj notoj kaj bibliografiaĵoj. Fundamenta verko por ĉies biblioteko.

Esploroj (1973) B. Ragnarsson (1930-). 122p. 19cm. Broŝ. 7,50 gld. (Beletraj kajeroj, 44). Poemaro originala.

Eta bukedo (1970) Lydia Senes. Tr. L. Minnaja. 26p. 21cm. 1,— gld. Odoj al naturo kaj amo kun eskapisma impreso.

Eta vivo (1969) Clelia Conterno Guglielminetti (1915-). 134p. 19cm. 7,20 gld. Eld. Régulo, La Laguna; Beletraj kajeroj n-ro 37. Poemaro de la aŭtorino itala dum 1935-1969. Antaŭparolo de G. Waringhien.

Eterneco Nuñez-Dubús (1889-) 13p. 18cm. 0,60 gld. Originale verkita laŭ antikva navarra legendo el la 10a jarcento. Al tiu tempo tamen apartenas nur tiu ĉi legendo, ĉar similaj troviĝas en la tradicioj de multaj popoloj kaj kulturoj.

Etudo '68. Hajkista klubo, Oosaka. 61 p. 10,5 cm. 1,80 gld. Tradukoj de japanaj hajkoj (fiksformaj, 17-silabaj poemetoj) fare de ses lertaj tradukintoj. Japanecaj poemoj estis tre popularaj inter la Esperantaj poetoj; per tiu ĉi valora volumeto oni povas vere reiri al la fontoj — eĉ, se oni konas la japanan, kompari kun la originaloj.

Fabletoj por etuloj kaj plenkreskuloj. Ferdo Škrliac (1913-). 48 p. 16 cm. Ilus. 1,90 gld. Simplaj versaĵoj tradukitaj de Josip Velebit, kun ĉarmaj ilustraĵoj de Ivan Večenaj. La kroata originalo aperas paralele kun la traduko. Rolas plej diversaj bestoj, laŭ la kutima maniero de fabletoj.

Fajro sur mia lango. Edwin de Kock (1930-). 119 p. 12 cm. 5,70 gld. Dua originala poemaro de konata sudafrika Esperanto-poeto. En posteseo la poeto denove pritraktas siajn teoriojn pri la metriko, jam multe modifitajn de post la unua poemaro. Sed pli gravaj ol teoriaĵoj estas la poemoj mem, kiuj troviĝas inter la plej sukcesaj de la sesdekaj jaroj. De Kock estas majstro de la vortfiguroj.

Finalo '73 (1973) Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. Broŝ. 1,20 gld. La lasta volumeto de sukcesa serio.

Girlando da Sonetoj (1833), France Preŝern (1800-1849). El la slovena tradukis J. Velebit (1973). 43p. Ofs. 22cm. Broŝ. 3,96 gld.

Gruk. Kumbel (Piet Hein, 1905-) 72p. 17cm. Ilus. Broŝ. 2,70 gld. Spritaj versaĵoj de konata dana humoristo, tradukitaj de Poul Thorsen. La kutimojn kaj morojn de la nuntempa mondo mokenas la ĵurnalisto-filozofa per viglaj strofoj 4- ĝis 8-versaj.

Hirundlibro, La. Ernst Toller (1893-1939). 64p. 23cm. Ilus. 4,20 gld. Konata moderna versrakonto de kaptito, kies ĉelon ekloĝis paro da hirundaj persekutotaj de la gardistoj. Ili inspiris la kaptiton pere de sia obstino kaj samtempe de sia fido kaj efemera beleco. Tradukis el la germana Helene Wolff.

Homo sur sia vojo, La Enhavas 40 poemojn el hispanlingvaj landoj. Vidu detalojn kaj prezon sub la rubriko "Legolibroj".

Humoroj (1969) William Auld. 113p. 19cm. 7,20 gld. Eld. Régulo, La Laguna; Beletraĵ kajeroj n-ro 39. Poemaro sentiga pri vakuo de la homaj vivoj kaj de la tuta universo.

Infana raso, La. William Auld (1924-). 121 p. 12 cm. Ilus. 5,40 gld. Longa originala poemo en 25 ĉapitroj, en kiu la poeto esprimas sian opinion pri la rolo de la homaro kaj ĝia rilato al la tempo kaj la spaco. Laŭ multaj, unu el la plej gravaj verkoj originale verkitaj en Esperanto, ĉar kvankam ĝi eluzas ĉiujn eblecojn de la „moderna” poezio, ĝi firme baziĝas sur la lingva kulturo de la Internacia Lingvo kaj „nur en Esperanto povis esti verkita”.

Invit' al japanesko (1971) Miyamoto masao (1913-). 110p. 19cm. 7,80 gld. La unua originala poemkolekto de la plej elstara figuro en la japana Esperanto-literaturo, la aŭtoro de *Pri arto kaj morto*. Japanstilaj versoj kun lerta lingvo-ekspluato. (Beletraĵ kajeroj de Stafeto, n-ro 42).

Kalevala. 368 p. 15 cm. Ilus. Tolbind. 25,— gld; leda dorso 35,— gld. La fama finna nacia epeo, brile tradukita de Joh. Edv. Leppäkoski, kun ornamoj de Akseli Gallen-Kallela. Unu el la ĉefverkoj de Eŭropo, kies karakteriza ritmo multe influis poetojn en plej diversaj landoj. La traduko estas formfidela eĉ ĝis la aliteracioj, kaj legiĝas kvazaŭ bona romano.

Kantoj kaj romanoj; poemkolekto Heinrich Heine. Trad. el la germana Gaston Waringhien kaj Kálmán Kalocsay. 381p. 23cm. Broŝ. 17,28 gld.; bind. 21,60 gld. Eld. Régulo, La Laguna; Belliteratura serio 27-28. Kun detala tabelo historia kaj biografia. La famaj ampoemoj kune kun malpli konataj politikaj poemoj, kaj aliaj el la lasta, Pariza, periodo.

Kapriĉo '70 (1970) Div. aŭtoroj. 52p. 18cm. 1,20 gld. Hajkaro de Hajkista Klubo, Oosaka. La hajko rapide internaciĝas kaj ne nur per la Internacia Lingvo mem.

Kien la poezio? Brendon Clark (1904-1956). 156 p. 13 cm. 5,94 gld. En 35-paĝa enkonduko la aŭtoro klarigas siajn tre personajn principojn rilate al la Esperanta poezio. Poste per poemoj originalaj kaj tradukitaj li ekzempligas tiujn principojn. Lia laboro ne estas sur la ĉeflinio de nia literatura evoluo, tamen li influis unu-du atentindajn talentojn.

Kremo de Kalocsay, La (1971) Elektaĵo el la poeziaj tradukoj kaj originaloj de K. Kalocsay. 56p. 23cm. 2,10 gld. Eld. Bristola Esperanto-Societo, Britujo.

Krioj el mallumo. Damjan Vahen-Svetinov (1913-). 64 p. 12 cm. 3,60 gld. Romantikaj korelverŝaj poemoj originale verkitaj en Esperanto de jugoslavia poeto. Maldensa lingvaĵo kaj — rimarkinde en Esperanto — senrimaj versoj; trafaj figuroj. Pasia sentemeco.

Kun sopira koro Gustavo Adolfo Becquer (1836-1870). 93p. 18cm. 6,— gld. El la hispana tr. Fernando de Diego. (1972). Poemaro de la plej elstara hispana lirikisto. Originala titolo: *Rimas*. Enkonduko de José Ignacio Ciordia.

505 elektitaj poemoj el Mannjoo-ŝuu. 212 p. 13,5 cm. Bind. 9,60 gld; broŝ. 6,60 gld. Mannjoo-ŝuu estis la unua poezia antologio de la japana popolo, kompilita en la 8-a jarcento p.K., kaj enhavas 4 516 poemojn. La tradukinto, Kenji Ossaka, elektis 505 por Esperantigo rimriĉa, sed bedaŭrinde ne ĉiam formfidela. La originalaj tekstoj estas apudaj.

Kvin elementoj (1970) Edwin de Kock. 55p. 17cm. 3,25 gld. Poemkolekto dividita en kvin sekciojn Akvo, Aero, Tero, Fajro kaj Tempo. Ĝia motoro estas la koro kaj unuavice reprezentas moralajn kaj filozofiajn nociojn kiel la amon, la vivon, la kruelon kaj la morton.

Kvinteto '69. Hajkista klubo, Oosaka. 46 p. 10,5 cm. 1,60 gld. Originalaj hajkoj de kvin japanaj esperantistaj poetoj. Vere alt-nivelaj sugestio kaj lingvaĵo. Kvankam ĉiu poemo ampleksas nur 17 silabojn, la personecoj de la individuaj poetoj tralumas tre karakterize. Tiu ĉi japana skolo faras atentindan kontribuon al la Esperanta kulturo.

Landlimo jam pasis.... Yamada tempu. 16 p. Ilus. 19 cm. 1,20 gld. Hajkoj (17-silabaj poemetoj) originalaj kaj tradukitaj el japanaj poetoj de la 17a ĝis la nuna jarcentoj.

Latva poezio, 1945-1966 67p. 14cm. Ilus. 1,80 gld. 22 poemoj de 22 latvaj poetoj, tradukitaj de E. Lippe, M. Jakubcova k.a.

Libero kaj amo; poemoj elektitaj (1970) Sándor Petőfi. Trad. Kálmán Kalocsay. 160p. 19cm. 7,20 gld. Kun enkonduko biografija kaj literatura; 130 poemoj ordinare mallongaj, kun kelkaj multe pli ampleksaj.

Libro de amo, La. Peter Peneter (1891-1953); Georgo Peterido Peneter. 262p. 13cm. 16,50 gld. Ampleksa kolekto de poemoj amoraj kaj erotikaj. Ĝi enhavas la duan eldonon de la famaj *Sekretaj sonetoj*, kiu surprizis la Esperantan mondon en 1931; la duan eldonon de *La travestiita muzo*, en kiu aperas tradukoj de *La trofeoj* de Heredia kune kun travestioj amortemaj; kaj multajn aliajn erotikaĵojn originalajn kaj tradukitajn. La literatura valoro de la kolekto estas altnivela, sed pruduloj prefere ĝin evitu.

Liriko Lesja Ukrainka (1871-1913). Komp. N. Andrianova. El la ukraina tr. K. Gusev k.a. 86p. Ilus. 21cm. 1,80 gld. Poezio tute trapenetrita de ukraina folkloro kaj amo al la popolo kaj al libero.

Maristo surmaste. Vesna Skaljer-Race (1911—). 62 p. 17 cm. Ilus. Broŝ. 2,70 gld; bind. 4,80 gld. Originalaj poemoj de jugoslaviana poetino, kiu eldonas ankaŭ nacilingve. La plej bonaj siaj poemoj atingas fortan efekton per aluda traktado.

Martín Fierro. José Hernández (1834-1886). 289 p. 22 cm. Ilus. 14,40 gld. La eposo de la argentinanoj. Ĝi priskribas la sorton de la gaŭĉoj, iom primitivaj loĝantoj de la sudamerika kamparo, kiujn oni ekspluatis kaj turmentis, sed kiuj restis lojalaj al siaj idealoj kaj vivmaniero. La originalo estas verkita grandparte en dialekto. La traduko de Ernesto Sonnenfeld evitas esoteriaĵojn kaj legiĝas vikle.

Mediuma poemaro (1972) Luís da Costa Porto Carreiro Neto (1895-1964). Red. A.K. Afonso Costa. 119p. Frontispico. 23cm. 5,28 gld. Originalaj poemoj atribuitaj al la spiritoj de diversaj mortintaj aŭtoroj, inkl. L.L. Zamenhof.

Memkritiko Victor Sadler (1937—). 60p. 18cm. 6,00 gld. Originale verkita poemaro, elstare matura. La lingvaĵo de la aŭtoro estas konciza sed multesprima. Pro la idiotisma ekspluatado de la lingvo, kiun li vere proprigis al si, oni devas tre atente studi ĉi tiujn mallongajn lirikojn, sed kompanse oni ricevas vere valorajn komunikaĵojn. Sub subjektiva mantelo la poemoj trafas kritikis la homan sorton. La aŭtoro prinotas ĉiun poemon, sprite sed klare.

Miniaturoj. Geraldo Mattos (1931-). 77 p. 16 cm. 0,85 gld. Kolekto de originalaj tankaĵoj (japaneskaj poemoj), kiuj certe plaĉos al ŝatantoj de la miniatura signifo de tiu ĉi jam tradicia versformo.

La "Mio" kaj lia pretero kaj La pralampo en la muzeo Dun Karm (1871-1961). El la malta traduko de C. Mallia (1973). 35p. 22cm. Broŝ. 3,30 gld. Du poemoj de la nacia poeto de Malto, kun konciza enkonduko.

Mio mia Włodarczyk. 66p. Ofset. 1,75 gld. Originalo.

Mi volus... Sipke Stuit. 1,50 gld. Poemo 3-lingva. Faldfolio.

Monosilaboj. Diderto Freto. 45 p. 19 cm. 2,94 gld. Unika kolekto de 108 originale verkitaj sonetoj. Soneto estas fiksfirma poemo konsistanta el 14 rimantaj versoj: en la sonetoj de Freto, ĉiu verso konsistas el unu silabo! Oni povas diri, ke li verŝajne eluzadis la limigitajn eblecojn de sia ideo – tamen en la kolekto ne mankas vere sukcesaj poemoj.

Montara krono, La Petro Petroviĉ Njegoŝ (1813-1851). El la serba tr. Svetislav S. Petroviĉ. 273p. 20cm. Ilus. Bind. 14,40 gld. Drama poemo pri la ekstermo de turkiĝintoj en Montenegro (Jugoslavio) fine de la 17a jarcento. Majstroverko de la serba literaturo. Kun ampleksaj enkondukoj kaj komentario.

Morto de Smail-agao Ĉengiĉ, La Ivan Majuraniĉ (1814-1890). El la kroata tr. Josip Velebit. Nova traduko de grava eposo, originale eldonita en 1846 kaj jam tradukita en 38 lingvojn. Ĝi priskribas, en 5 kantoj kaj 1134 versoj, la persekutojn de la turkaj regantoj al kristanoj en Montenegro. 53p. 20cm. 4,20 gld.

Nokturno '71 Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. 1,20 gld. 150 originalaj haĵoj de 5 poetoj: Miyamoto masao k.a. Jam la 4a originala volumeto de tiu skolo.

Norda naturo. Hilda Dresen (1896-). 143 p. 18,5 cm. 5,40 gld. La poeto, jam de 50 jaroj konata pro siaj brilaj tradukoj el la estona kaj aliaj lingvoj, ĉi tie prezentas rikolton de la originalaĵoj, kiujn ŝi verkis – plejparte antaŭ 1934. Ŝia muzo estas trankvila sed pasia, kaj, kiel la titolo supozigas, ŝin inspiras la naturo en ŝia norda lando. Observemo kaj natursimpatio karakterizas ĉi tiujn agrablajn poemojn.

Nova antologio Grabowski. 31p. 20cm. Broŝ. 1,25 gld. Tradukoj el Mickiewicz, Goethe, La Fontaine, k.a.

Nova Ezopo. Ŝtefo Urban (1913-). 128 p. 19 cm. Ilus. 3,80 gld. Kolekto de spritaj originale verkitaj bestfabeloj versaj. Kun sufiĉe forta satira enhavo.

Nur tri kolorojn. Eli Urbanová (1922-). 139 p. 19 cm. 3,80 gld. Pasiaj subjektivecaj originalaj poemoj de ĉeĥa poeto. Volupto kaj ardo. La libro enhavas la faman ciklon *Hetaĵro dan-cas*, poemoj en salfaj versoj. Oni admiras samtempe la sinceron kaj la artismon de virina animo.

Ombroj de la kvara dimensio. Edwin de Kock (1930-). 159 p. 19cm. 5,10 gld. 159-paĝa poezia kolekto de sudafrikano. Inkluzivas la nefinitan longan poemon *La konflikto de la epokoj*. Kun aparta postparolo, en kiu la aŭtoro prezentas siajn poetikajn konceptojn. Originalo verkita en Esperanto.

Ora duopo Julio Baghy (1891-1967) kaj K. Kalocsay (1891-). 183p. 19cm. 6,50 gld. Bind. Kolekto de la ĉefaj verkoj de la du elstaraj talentoj el la intermilita kaj postmilita periodoj, kun valoraj enkondukaĵoj studoj pri la verkistoj. Poemoj, dramoj, fragmentoj el romanoj kaj tradukoj. Multaj eroj ne troveblaj aliloke.

Pacon, sinjoro! (1970) Luigi Minnaja. 25p. 21cm. Ilus. 1,— gld. Eld. Centro Esperantista Cattolico Romano. 10 religiaj poemoj: 5 originalaj kaj 5 tradukitaj el la itala lingvo.

Panjo. Jaroslav Seifert (1901-). 77 p. 19 cm. 2,70 gld. Poemkolekto el la ĉeĥa, lerte tradukita de Jiří Kořínek. En ĝi la poeto traktas universalan temon: amo de kaj al la patrino. Li rememoras pri sia infanaĝo, kaj kiel la patrino lin protektis; kiel viro li ankaŭ rememoras ŝin en momentoj dolĉaj kaj malfacilaj.

Parnasa gvidlibro. Kalocsay/Waringhien/Bernard. 157 p. 20 cm. 5,75 gld. Ĝisdatigita eldono de grava studo pri la Esperanta po-etiko. Unue la metrikon (ritmon, versojn, strofojn) analizas Waringhien; poste „C.E.R. Bumy” (= Kalocsay) en longa didaktika sed sprite atentokapta poemo donas valoregajn konsilojn en sia „Arto poetika”; fine Waringhien kaj Bernard liveras ĝisdatan rimvortaron. Ĉiu versamanto kaj aspiranta poeto devas koni ĝin.

Pinta krajono. Reto Rossetti (1909-). 128 p. 19 cm. Ilus. 3,80 gld. Ano de la konata „skota skolo” prezentas pluan sortimenton de siaj originalaj poemoj. Krom seriozaj poemoj, la volumo enhavas multajn spritaĵojn, parodiojn, kaj la unuan versforman historion de la Esperanto-movado, *La jubilea eposo*. Menciindas ankaŭ la ciklo *Mestizo de la mondo*, en kiu la aŭtoro pritraktas siajn konceptojn pri la arto kaj la belo.

Pluk Poul Thorsen (1915-) 93p. 3,— gld. Originalaj poemetoj movadaj kaj aliaj, kiuj konsilas, kritikis, kaj, precipe, ŝercas.

Poemaro kaj prozeroj (1970) Edwin de Kock. 103p. 16cm. 4,85 gld. Poemkolekto pri bedaŭro pri forvaporiginta junco kaj esplorado de la moralaj kaj politikaj problemoj de nia baraktanta mondo de individuisma poeto jam bone konata kaj aprezata. Karakterizaj estas kaj liaj tute mallongaj liriko-kaj la iom pli longaj diskursaj poemoj.

Poemo de l'plugisto Ĥ.M. Ĥrima (1907-) 63p. 15cm. Broŝ. 0,90 gld. Sinceraj sed iom naivaj versaĵoj originalaj el la dudekaj jaroj, de juna bulgara laboristo, inspirita de socialismaj ideoj kaj la internacia lingvo.

Poemoj Eugeniusz Matkowski (Matwiejczuk). 108p. 3,— gld. Altpatosaj, prolet-etosaj poemoj, grandparte por-okazaj, korelverŝe verkitaj de fajra socialisto.

Poemoj Giovanni Pascoli (1855-1912). 47p. 1,50 gld. Sentimentaj poeziaĵoj de itala poeto, tradukitaj de Giordano Azzi. Lia temo estas plej ofte la natura mondo, kiun li interpretas pere de imagoj kaj simboloj. Karakterize, lia plejofta formo estas la tercinoj.

Poemoj, kantoj kaj satiroj Burns (1759-1796) Tradukis R. Rossetti. 27p. Mim. 26cm. Broŝ. 2,04 gld.

Poeziaĵoj: Versaĵoj propraj kaj tradukitaj Julian Tuwim (1894-1953). 130p. 21cm. 2,40 gld. La pola aŭtoro estis grava nacilingva poeto, kaj ankaŭ esperantisto. Ĉi tiu volumo enhavas tradukojn de iuj liaj nacilingvaj verkoj fare de aliaj esperantistoj, kaj ankaŭ la proprajn tradukojn de Tuwim en Esperanto, de nacilingvaj poemoj.

Por pli bona mondo tra poezio kaj Esperanto (1970) Sylla Chaves. 259p. 21cm. 11,52 gld. Dulingva: Esperanta/portugala. Enhavo: 1-a parto, originaloj; 2-a parto, tradukoj.

Preĝo Teo Jung (1892-). 15p. 17cm. 1,50 gld. Emocia homaraneca poemo en kvar partoj, originale verkita en Esperanto, per kiu la aŭtoro himnas la belon de nia mondo, vide kaj aŭde, kaj patose alvokas por frateca kunlaborado de ĉiuj homoj kaj paca kunvivado de ĉiuj kreaĵoj.

Preĝo sub la verda standardo 0,60 gld. Faksimilo de manuskripto de L.L. Zamenhof.

Pri la tomboj (1970) Ugo Foscolo. Trad. L. Minnaja. 13p. 21cm. Ofset. 1,— gld. Longa poemo, unu el la juveloj de la itala literaturo. La traduko bone konservas la ritmon de la originalo.

Prologo Eŭgeno Miĥalski (1897-). 62p. 15cm. 0,75 gld. Gravega poemaro de elstara poeto originala. Karakterizas la poemojn abundaj figuroj kaj diboĉe riĉa kaj signifoplena lingvouzado. Lin koncernas antaŭ ĉio la dialektiko, la reciproka influo de kontraŭaĵoj, kiuj komplementas unu la alian. Antaŭ ĉio la dialektika reciproko de viro kaj virino. Granda vortmuziko, kun profunda senco. Sovetuniano.

Provo alfronti la vivon Ivan St. Georgiev. 111p. 19cm. 3,80 gld. Originalaĵoj de bulgara poeto. En siaj plej sukcesaj verkoj li kreas siajn efektojn per oblikvaj rimedoj; en ĉiuj li forte regas la rimadon, kaj scias krei formon konforme al la penso anstataŭ konformigi sian penson al la formo. Viveca lingvaĵo.

Reeĥoj Jugoslavia poemaro. 112p. 19cm. 3,80 gld. Versajne Jugoslavio naskis multe pli da poetoj originale verkantaj en Esperanto ol iu ajn alia lando. Tiu ĉi antologio enhavas poemojn de 19 el ili, el kiuj la plimulto estas jam tutmonde konata kaj ŝatata. La verkoj estas agrable individuecaj, kaj pluraj el ili estas ĉefverkoj.

Ritmoj de vivo. Geraldo Mattos (1931-). 196 p. 19 cm. Ilus. 8,70 gld. Preskaŭ ducent originalaj poemoj de brazila poeto. Rimarkinde, li estas unu el la maloftaj poetoj, kiuj verkas surbaze de forte trasantita kristanismo. Liaj temoj estas plej ofte la religia travivaĵo, la arda amo kaj la naturo. Kvankam ne ĉiuj poemoj liaj estas sonetoj, li tre multe eluzas tiun formon.

Roseroj (1930) A. Smit. 64p. 15cm. Broŝ. 0,90 gld.

Sen paraŝuto Poul Thorsen (1915-). 143p. 18,5cm. 3,90 gld. La volumo enhavas 20 poemojn tradukitajn el la dana, kaj ankaŭ tri sekciojn da originalaĵoj: porokazaj poemoj; liriko; satiraj miniaturoj. Sprito karakterizas la aŭtoron, sed ankaŭ de tempo al tempo li surprizas per vere tenera aŭ idealisma belaĵo.

Septembra ribelo, poemaro (1973) Bulgaro Nekonata. Red. Canko Murgin. 19p. Ksero. 19cm. 2,82 gld. Originala poemareto pri la kontraŭfaŝisma ribelo en 1923. Aldonitaj estas kelkaj originaloj de C. Murgin kaj tradukoj el aliaj bulgaraj poetoj.

Sileziaj kantoj (1903). Petr Bezruč (1867-1958). Div. trad. (1970) 123 p. 21cm. bind. 3,- gld., broŝ. 2,- gld.

Soifo Lajos Tárkony (1902-). 23p. 22cm. 9,10 gld. La kolektita originala poemaro de unu el la gravaj intermilitaj poetoj, kies kreado daŭris ankaŭ post la Dua Mondmilito. Sonora riĉeco de lingvo kaj obseda interesiĝo pri la formo. Liberaj ritmoj, tankaĵoj, sonetoj kaj la "tririmoj" (kvarversoj laŭ la modelo de Kajjam), kaj la grava ciklo *Haŭtsanĝo*. Nepre unu el la konendaj talentoj.

Somera simfonio; sonetaro Anton A. Leenhard. 27p. 22cm. Ilus. 4,69 gld. La nederlanda aŭtoro majstras la sonetan kordon. Antaŭparolo de P. Thorsen. Frontpaĝon kaj dek vinjetojn desegnis Ole Nederland.

Sonato '72: hajkaro (1972) Hajkista Klubo, Oosaka. 44p. 18cm. 1,32 gld. Originalaj poemoj de Miyamoto masao, Tanaka sadami, Tomita tomu, Ueyama masao.

Sonoj novaj kaj malnovaj Herbert Hesse. 24p. 18cm. 1,38 gld. Simplaj versaĵoj sufiĉe senpretendaj. Tro da adasismo. Temoj kelkfoje emociaj, sed mankas vera regado de la poeziaj rimedoj.

Spegulo homarana J.H. Erkkö (1849-1906). 32p. 14,5cm. Ilus. 1,- gld. "Senkatene redonis en Esperanto", laŭ finna originalo Vilho Setälä. Temas pri simplaj homaranismaj poemetoj. La ornamoj de Akseli Gallen-Kallela, kaj la dukolora presado igas la volumeton belaĵo, sed la versaĵoj impresas iom leĝere.

Spleno de Parizo, La Charles Baudelaire (1821-1867). 125p. 21 cm. 12,50 gld. Post la fama *La floroj de l' malbono* la ŝlosila franca poeto, ĝenata de la klasikaj poeziaj formoj, kiujn li tiel lerte uzadis, komencis verki "prozpoemojn", per kiuj li trovis pli da libereco kaj la eblecon plidetaliĝi. Tiuj prozpoemoj, kiuj valore aldoniĝas al la *Floroj*, nun prezentiĝas en *La spleno de Parizo*, tradukitaj de Paul Lobut.

Sub stelo rigida Þorsteinn frá Hamri (1938-). 131p. 19cm. Ilus. 4,50 gld. Du poemaroj de juna islanda poeto, *Donaco por nova mondo* kaj *Lando de vivantoj*, tradukitaj en Esperanton de Baldur Ragnarsson. Post miljara izoleco, Islando post la Dua Mondmilito trovis sin subite envolvita kun la moderna mondo, kio kaŭzis abruptan ŝanĝon en la tiea vivado, kaj animpeturbigo en la loĝantoj. Tion spegulas ĉi tiuj potencaj liberformaj poemoj.

Sur la vivovojo Aleksandro Logvin (1903-). 115p. 18,5cm. 3,90 gld. Originalaj poemoj de ukraina poeto. Ili prezentas la rikolton de 30-jara verkado. Aŭtentikaj poemoj. La aŭtoro firme regas sian metion, kaj lia stilo estas tiel rekta, kvankam la pensado estas subtila, ke rezultiĝas potencaj verkoj inspiraj kaj instigaj. En la fino de la libro estas prezentataj 17 tradukoj el famaj rusaj poetoj.

Sveda poemaro 112p. 18cm. Bind. 3,90 gld. Miniatura sveda antologio, kolekto de 74 poemoj de 30 poetoj, plus du anonimaj, plus du versaĵoj tradukoj el la Biblio. Vere majstre tradukitaj de Magda Carlsson.

Ŝtupoj sen nomo Baldur Ragnarsson (1930-). 127p. 19 cm. Ilus. 3,30 gld. Grava originala poemaro de islanda poeto. Siatempe avangarda, ĝi restas kaj restos perturba korokrio de homo, kies potenca lingvaĵo kaj konsternaj figuroj esploras la fundon de animo turmente sentema.

Thallusa Giovanni Pascoli (1855-1912). 7p. 21cm. 1, - gld.
Latinlingva poemo en heksametroj de la itala poeto, tradukita de Luigi Minnaja. La volumeto enhavas ankaŭ la lirikon *Ne tute mi mortos*. *Thallusa* priskribas la sorton de sklavino en la antikva Romo.

Tra l'silento Edmond Privat (1889-1962). 29p. 15cm. 1,50 gld.
Junaga poemaro de elstara esperantisto. Eblas pretendi, ke ĝi estis la plej grava originala poemaro, kiu aperis antaŭ la Unua Monda Milito; ĉiukaze la sincera freŝo de ĉi tiuj lirikoj ankoraŭ hodiaŭ validigas ilin.

Unufingraj melodioj William Auld (1924-). 126p. 19cm. Ilus. 3,80 gld. La tria poemaro de ĉi tiu konata originala poeto el Skotlando. Enhavas kelkajn grandajn, brustokaptajn poemojn, sed tra la tuta libro sentiĝas profunda anima krizo. La volumo enhavas ankaŭ la unuaktan dramon *Kvazaŭ birdoj konstruas* kaj la longan poemon *Konĉerto por unu fingro kaj orkestro*.

Utaaro de Takuboku Isikawa takuboku (1886-1912). El la japana trad. Miyamoto masao (1974). 118p. 17x17 cm. Broŝ. 6,90 gld. Utaoj de aŭtoro, kiun la tradukinto nomas "la japana Heine".

Utafesta poemaro 106p. 22cm. Ilus. 7,98 gld. Premiitaj kaj aliaj verkoj kontribuitaj de poetoj konataj kaj nekonataj al internacia konkurso organizita de Oomoto en 1965. Bela volumo, bind.

Vagabondo kantas, La (1937) J. Baghy (1891-1967) 105p. 15cm. Broŝ. 2,10 gld.

Versaĵoj Elektitaj. Sergej Jesenin (1895-1925) 64p. ofs. 3, - gld.

Vesperkanto Hendrik Adamson (1891-1946). 131p. 19cm. 5,70 gld. Estona poeto, kiu verkis en la estona kaj Esperanto. Liaj pasiaj, rimoriĉaj versoj havas apartan tonon kaj allogon, kaj forta intelekto tralumas la unuavide emociajn poemojn. Bedaŭrinde la redaktoro de ĉi tiu postmorta kolekto kelkloke ŝanĝis la tekstojn; ĝi tamen restas koninda testamento.

Vojo kaj vorto (1972) R.P. Nogueira (1949-). 110p. Broŝ. 7,50 gld. (Beletraj kajeroj, 41). 17 originalaj poemoj kaj tradukoj el 18 diverslandaj modernaj aŭtoroj.

Zejnab' kaj Aman' Ĥamid Alimĝan (1909-1944). 30p. 23cm. 0,60 gld. Longa poemo en kvarversaj rimantaj strofoj, tradukita el la uzbeka de Petro Poliŝĉuk. Temas pri poezia biografio de Zejnab' Amanova, kiu estis premiita en 1935, pro sia sindona kaj fervora laboro por la socialisma konscio, per la ordeno je la nomo de Lenin.

TEATRAĴOJ, FILMOSCENAROJ

Analfabeto: Butono Branislav Nuŝić (1864-1938). Elserbigis B. Trudiĉ (1955). 31p. 17cm. Broŝ. 1,20 gld. Du unuaktaj komedietoj kun malmultaj roluloj kaj simplaj rekvizitoj.

Aŭtuna vespero Ogrizović. Elkroatigis I. Rotkvić (1924). 39p., 15cm. Broŝ. 0,48 gld.

Botistoj, La A. Kivi (1834-1872). Trad. H. Hall. 142p. 19cm. 1,80 gld. Finna komedio en 5 aktoj de la fondinto de la finna belestristiko, ankoraŭ prezentata en finnaj teatroj. Humurplena verko.

Ĉe doktoro Ŝalom Aleĥem (1853-1915). 12p. 0,72 gld. Jida monologo de la popola humoristo Aleĥem.

Dekkvin komedietoj (1974) R. MacKay. 82p. 20cm. Broŝ. 4,20 gld. Kolekto de facile prezentablaj komedietoj por kursfino aŭ klubvespero.

Dio rekompencu vin Joracy Camargo. 172p. 19cm. 3, - gld. 3-akta komedio de brazila dramisto Camargo, tradukita el la portugala.

Doktoro Rosales (1973). G. Silber. 24p. Ofs. 25cm. Broŝ. 3,30 gld. Originala dramo.

Edelvejso kaj la tri vagabondinoj; teatraĵeto (1963) Pierre Delaire. 55p. 21cm. Ilus. 2,40 gld. Skeĉo. Eld. Esperantista Libroklubo "Edelvejso", Orléans.

Eksperimento Damoklo Petro Karvaš. Elslovakigis L. Izák (1969). 83p. mim. 29cm. 4,32 gld.

Teatraĵoj, filmscenaroj

El dramoj El la germana trad. L.L. Zamenhof (dua eld., 1924) 48p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Fragmentoj el *Ifigenio en Taŭrido* de Goethe kaj *La Rabistoj* de Schiller.

El Komedioj Fragmentoj el 'Revizoro' (Gogol) kaj 'Georgo Dandin' (Molière). Trad. L.L. Zamenhof. 2a eld. 1924. 48p. 14cm. 0,30 gld.

Faŭsto (Unua parto) Goethe (1749-1832). 190p. 18cm. Bind. 5,40 gld. Tragedio reellaborita surbaze de la jam tradicia Faust-rakonto, en kiun plektiĝis, eble en rememoro al lia "ŝtorm-angora" periodo, la delikata am-idilio kun Grete. Tradukis N. Bartelmes en 1923 kaj reverkis en 1949.

Faŭsto: Konkiza komentario al Faŭsto 1 Max Butin. 18p. 18cm. 1,20 gld.

Gajaj klubvesperoj; skeĉoj kaj ludoj (1970) G. Riisberg k.a. 32 p. 21cm. Ofset. 2,- gld. Kolekto da skeĉoj amuzaj. Utila por parolekzerco kaj por vario de klubaj kunvenoj.

Gauche, la ĉelisto Miyazawa Kenzi (1896-1933). 0,95 gld. Scenaro laŭ ĉarma fabelo japana.

Gefratoj, La; Komedio en unu akto (1-a eld. 1889; fotorepreso 1967) J.W. Goethe. El la originalo tradukis A. Grabowski. 5,- gld.

Hamleto, princo de Danujo William Shakespeare (1564-1616). 252p. 22cm. 8,10 gld. La unua traduko de la granda tragedio ŝekspira aperis jam en 1894, tradukita de Zamenhof. Jen nova, moderna traduko de L.N.M. Newell, produkto de modera fidelisma metodo, kiu sukcesis transdoni la belecon de la originalo, kreante samtempe individuan artverkon. La metriko uzita estas jamba pentametro kun fina kromsilabo. Multaj notoj kaj ampleksa enkonduko faciligas la legadon.

Hamleto, reĝido de Danujo William Shakespeare (1564-1616) 206p. 20cm. Bind. 7,80 gld. La unua traduko de tiu teatraĵo, farita de L.L. Zamenhof en 1894. Ĉi tiun okan eldonon editoris D.B. Gregor, kun grava antaŭparolo kaj klarigoj pri dubaj lokoj.

Teatraĵoj, filmscenaroj

Imperiestro kaj Galileano H. Ibsen (1828-1906) Trad. H.J. Bulthuis (1930) 276p. 23cm. Bind. 4,50 gld. La volumo enhavas la du historiajn dramojn *Apostatiĝo de Cezaro* kaj *Imperiestro Johano*.

Ivan la sesa Geraldo Mattos (1931 -). 144p. 18cm. Bind. 6,36 gld. Broŝ. 4,86 gld. La unua verko originala de Mattos estas 5-akta historia teatraĵo en versoj. La tragika vivo de Ivan la sesa, kiu praktike la tutan vivon pasigis en karceroj, kaj estis fine mortigita, estas prezentita en versoj profundsonoraj, kelkfoje iom bombastaj, kiuj bone reliefigas talentan verkiston, kies poezia vejno tiam (1953) ne estis jam plene matura.

Jolanto (1845) H. Hertz (1798-1870) El la dana trad. H.J. Runeberg (1908). 104p. 19cm. Broŝ. 1,20 gld. Historia dramo.

Jozefo J.D. Applebaum (1877-1965). 120p. 22cm. 3,80 gld. La aŭtoro prezentas sian dramon, kun biblia sceno, en heksametroj versoj, en teatra formo. La aŭtoro sukcesis krei ĉefpersonojn, kiuj ne seke marionetas, aŭ patose deklamas, sed agas nature, pelitaj de propraj pasioj kaj interesoj, surbaze de la tiama socio.

Kokeriko en Noktomezo (1973) 68p. Ilus. 13 x 19 Broŝ. 0,60 gld. Ĉina bildrakonto, kun sepiaj fotoj el pupdrama filmo, kaj konciza suba teksto.

Kvar pupteatraĵoj A. Popescu. El la rumana trad. J. Petrin (1972). 65p. Mimeo. 30cm. Broŝ. 2,10 gld.

Kvazaŭ birdoj konstruas William Auld. En *Unufingraj melodioj*; vidu ĉe "Poezio".

Malriĉa en spirito Hendrik J. Bulthuis (1865-1945). 68p. 18cm. 1,50 gld. Bulthuis, originala verkisto esperantlingva, verkis ĉi tiun triaktan teatraĵon ĉerpante la materialon el sia nederland-kampana, simplekristana mondo, kiun li sukcesis artisme elabori psikologie kaj lingve.

Malŝparulo, La Ferdinand Raimund (1790-1836). 97p. 18cm. 1,25 gld. 3-akta aŭstra ŝerca fabelo.

Teatraĵoj, filmscenaroj

Melo antaŭ tribunalo P. Kočić (1877-?). El la serba tradukis N. Korasić (1973). 32p. 17cm. Broŝ. 4,20 gld. Dramo pri Bosnio sub aŭstra regado en la pasinta jarcento.

Meteoro Peter Karvaš. Elslovakigis Vladimír Gazda. 60p. mim. 21cm. 1,50 gld. Tri-akta dramo pacisma, kun fono de militaj teruraĵoj.

Militirado norden kaj suden (1972) 170p. 13 x 19 cm. 1,08 gld. Bildrakonto laŭ samnoma filmo pri bataloj en 1947 en la ĉina revolucia milito.

Mil papergruoj Moroi Zyôzi. 1,50 gld. Filmscenario kontraŭ-atombomba.

Mina milito (1971) 178p. 13 x 19 cm. 1,15 gld. Bildrakonto laŭ samnoma ĉina filmo, pri la permina batalado de vilaĝanoj en 1942, dum la kontraŭjapana rezistmilito.

Misisipi Lejb Malaĥ (1894-1936). 62p. 21cm. 2,10 gld. 3-akta dramo pri rasmalamo en Usono. La aŭtoro estas pola judo multe migrinta.

Mohajra plejdo; Grotesko en 2 partoj (1968) Ján Kákoš. Trad. Eduard V. Tvarožek. 61p. 21cm. Mimeo. 1,80 gld.

Mokindaj preciozulinoj, La J-B. Molière (1622-1673). El la franca tr. André Ribot. 36 p. 1,- gld. Komedio de la granda klasikulo, satiro kontraŭ afektismo.

Natan la saĝulo Gotthold Ephraim Lessing (1729-1781). 1,- gld. Klasikstila drama poemo, tradukita el la germana.

Ni aktorinoj Marjorie Boulton. 36p. 21cm. 2,- gld. Tri komedietoj. La dua libreto en la serio *Gajaj klubvesperoj*. Bona ekzercmaterialo en daŭrigaj kursoj kaj konversaciaj programoj.

Nia teatro 0,72 gld. Skeĉoj, versaĵoj, originalaj kaj tradukitaj.

Ni komedietoj (1971) Zora Heide. 32p. 21cm. 2,- gld. 8 skeĉoj por klubkunvenoj. Eld. Dansk Esperanto-Forlag.

Teatraĵoj, filmscenaroj

Ni ludas teatraĵojn E.V. Tvarožek. 31p. 21cm. 2,- gld. Kvar originalaj unuaktaĵoj de slovaka aŭtoro, el kiuj du atingis sukcesojn en la Belartaj Konkursoj de 1969 kaj 1970. N-ro 4 en la serio *Gajaj Klubvesperoj*.

Nova teatro (1974) E. Lapenna. 55p. 17cm. Broŝ. 2,40 gld. Naŭ monologoj originalaj.

Otelo. Vidu ĉe 'Tragedio de Otelo'.

Paĉugo kaj Paĉuga M. Tiranti. El la ĝenova dialekto de la itala tradukis G.B. Briano (1973). 13p. Mimeo. 33cm. Broŝ. 1,92 gld. Radia komedieto.

Pasko August Strindberg (1859-1912). 88p. 1,50 gld. 3-akta dramo de la mondekonata sveda Strindberg.

Peer Gynt Henrik Ibsen (1828-1906). El la norvega tr. E.A. Haugen (1951). 258p. 19cm. Bind. 13,20 gld. Dramo en versoj, la centra ĉefverko de la norvega literaturo, sprite prezentanta la norvegan popolkarakteron. Laŭ prof. Collinson, la plej bona traduko de la verko, kiu ekzistas en iu ajn lingvo.

Pro Dio! Ne Esperantisto! (1924) K. Minor. 13p. 15cm. Broŝ. 0,30 gld. Unuakta komedieto originala.

Reaperantoj Henrik Ibsen (1828-1906) 111p. 14cm. 0,66 gld. Familia dramo tragedia, tradukita el la norvega originalo.

Reĝo Edipo; Antigona Sofoklo (496-406 a.K.). 216p. 22cm. 6,60 gld. Ambaŭ antikvagekajn tragediojn tradukis Douglas B. Gregor, kiu ilin provizis per elĉerpa enkonduko kaj abundaj notoj. La traduko estas eleganta, form- kaj enhav-fidela, en poezia formo. Interesa kvankam ne perfekte sukcesinta estas la provo traduki la ĥorojn rime.

Reĝo Judea, La K.R. (pseŭdonomo). Elruŝigis V. Devjatnin (1923) 182p. 19cm. Broŝ. 1,26 gld. Bind. 1,74 gld.

Reĝo Lear, La William Shakespeare. Trad. K. Kalocsay. 160p. 21cm. Broŝ. 9,- gld.; bind. 12,- gld. Konata tragedia. Eld. UEA; Serio Oriento-Okcidento n-ro 6.

Teatraĵoj, filmscenaroj

Renaskita Manfred K.R. El la germana tradukis V.V. de Majnov (1891, fotorepreso 1973). 18p. 22cm. Broŝ. 3,— gld. Triakta dramo kiu daŭrigas *Manfred* de Byron.

Reto, La Bukar. 32 p. 21 cm. 2,— gld. Originala teatraĵo surscenigita en Parizo en 1971, pri kripla virino, kiu provas sin liberigi el la reto de la patrino superregado.

Salome (1893) Wilde (pseŭd., 1854-1900). El la angla tradukis T. Chif (1922, fotorepreso 1973) 51p. 18cm. Broŝ. 2,40 gld. Teatraĵo laŭ la biblia rakonto.

Senĉenaj Dialogoj (1973) V. Dall'Acqua. 32p. 25 cm. Broŝ. 3,60 gld. Humura teatraĵo pri la Esperanto-movado, precipe en Italujo. Enestas multaj aludoj al itallingvaj vortoj kaj diraĵoj.

Sen eliro; La respektema p..... Jean-Paul Sartre (1905-). El-francigis Roger Bernard. 111p. 20cm. 4,80 gld. Du dramoj ekzistadismaj. La tezo de la unua estas, ke oni por ekzisti devas elekti ian vivstilon, eĉ elektante laŭ la bela hazardo. La dua estas satiro kontraŭ konformemuloj.

Somermeznokta sonĝo William Shakespeare. Trad. K. Kalocsay. 99p. 19cm. 5,10 gld. Eld. Régulo, La Laguna; Beletraj kajeroj n-ro 30.

Suspektinda persono Branislav Nuŝić (1864-1938). 56p. 1,20 gld. 2-akta komedio, tradukita el la serba originalo.

Ŝakludado Josefo Giacosa (1847-1906). 47p. 1,50 gld. Versa dramo el la itala originalo.

Teatro Machado de Assis (1839-1908). 155p. 3,75 gld. 4 komedioj de la brazila romanisto Assis.

Tempesto, La William Shakespeare. El la angla verse tradukita de Kálmán Kalocsay. 119p. 19cm. 6,60 gld. Beletraj kajeroj de Stafeto, 40. Enhavas, krom la kvinakta "La Tempesto", 15-paĝan postparolon kaj komenton de la tradukinto.

Topaze; Ŝipego "Tenacity" *Topaze* estas verko de Marcel Pagnol (1895-); *Ŝipego "Tenacity"*, de Charles Vildrac (1882-). 292p. 22cm. 7,60 gld. Ambaŭ teatraĵojn tradukis en Esperanton Roger Bernard, kiu sukcesis redoni la originalajn franclingvajn nuancojn. La unua komedio pritraktas satire la valoron de la honesteco en burĝa socio, dum la dua, popularlingve verkita, pritraktas la vivon kaj la sentimentojn de havena laboristaro.

Teatraĵoj, filmscenaroj

Tragedio de l'homo, La Imre Mádach (1823-1864). Elhungarigis K. Kalocsay. 259p. 21 cm. 8,10 gld. Drama poemo alegoria pri la lukto inter bono kaj malbono. Rolas Adamo, Eva, Lucifero kaj aliaj.

Tragedio de Otelo, la maŭro de Venecio, La William Shakespeare (1564-1616). 208p. 22cm. 6,70 gld. Unu el la plej modernaj dramoj de Shakespeare estas sendube la Otelotragedio, kiu prezentas esence raskonflikton, surbaze de establiĝo en fremda socio. La antaŭparolon verkis Roy Walker. La eleganta poezia elangligo estas de Reto Rossetti, kiu pretigis ankaŭ la enkondukon; la tradukinto sukcesis rekrei artverkon Esperantan.

Tri pupteatraĵoj (1971). Popoviĉi. Div. tradukintoj, 35p. Mim. 29cm. Broŝ. 5,52 gld. Rumanaj.

Turo inter la nuboj, La; Dramo pri Sankta Barbara en prologo kaj kvin aktoj Jan (1911-) kaj Karel Filip. 95p. 19cm. 4,26 gld. Eld. IKUE, 1964. Originala verko de ĉefaj aŭtoroj.

Virino ĉe la landlimo Marjorie Boulton (1924-). 196p. 21cm. 7,98 gld. La aŭtorino prezentas ĉi tiun verkon, kiu konsistas el kolekto de drametoj kaj skeĉoj, por progresigi la teatran verkadon en Esperanto. Fakte ŝiaj drametoj, kelkaj tre seriozaj (tragedioj), kelkaj lirikaj, kelkaj amuz-satiraj aŭ eĉ farsecaj, estas sendube riĉigo por nia literaturo kaj movado (se grupoj ĉerpos el ili por siaj prezentadoj teatraĵ!).

ROMANOJ, NOVELOJ, RAKONTOJ

Abismoj (1923, fotorepreso 1973). J. Forge. 150p. 18cm. Broŝ. 6,— gld. (Serio Forge, 1). Amromano kun frapante klara stilo kaj populare profunda psikologio.

Ago kaj reago Francisco Cândido Xavier (1910-). El la portugala tr. L.C. Porto Carreiro Neto. 233p. 19cm. 6,30 gld. Lernolibro de la kristana spiritisma doktrino en la formo de romano, diktita de la spirito Andreo Ludoviko al la brazila mediumo F.C. Xavier.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Akbar P.A.S. van Limburg Brouwer (1829-1873). 215p. 21cm. Bind. 3,50 gld. Romano pri hinda imperiestro, tradukita el la nederlanda originalo.

Alia pasinteco, La Rico Bulthuis. 291p. 20cm. Bind. 5,- gld. Psikologia romano de la nederlanda filmverkisto Bulthuis.

Al Torento; novelo (1930) Stellan Engholm (1899-1960). 95p. 20cm. 5,10 gld. Tria eldono de originala romaneto de sveda aŭtoro pri 16-jara terlaboristo.

Amara pano J. Darvas. Elhungarigis L. Somlai. 110p. 21cm. Broŝ. 4,56 gld. Hungara kampara romano kun socikritika fono, flue tradukita.

Amo en la jaro dekmil, La Coronel Ignotus (pseŭd. J. de Elola Gutiérrez, 1859- ?). El la hispana trad. J.F. Berenguer (1932). 352p. 20cm. Broŝ. 3,- gld. Aventuroj de gefianĉoj subite transportitaj en la foran estontecon.

Amoro kaj Psiĥe Lucius Apulejus (ĉ. 124-?p.K.) 53p. 14cm. 0,30 gld. Romano el la "Metamorfozoj" de la oratoro-filozofo Apulejus. Tradukita el la latina.

Anni kaj Montmartre (1930) R. Schwartz (1894-1973). 126p. 20cm. Broŝ. 8,10 gld. Fotorepreso 1974 de tre ŝatata romano originala.

Ano de l'ringludo D. Šimunoviĉ (1873- ?). Elkroatigis F. Janjiĉ (1926). 86p. 18cm. 0,78 gld. Kampara novelo, emociiga sed iom neflue tradukita.

Anstataŭa edzino E. Maxwell (pseŭd. de Lilian M. Pyke, ? - 1927). El la angla trad. M. Sampson (1930). 212p. 20cm. Broŝ. 2,10 gld.

Antaŭ dumil jaroj Francisko Cândido Xavier (1910 -), 400p. 18cm. Broŝ. 7,50 gld. Kristana romano, de la brazila medio Xavier.

Antologio de brazilaj rakontoj 304p. Broŝ. 6,50 gld. Diversaj aŭtoroj.

Antologio de portugalaj rakontoj 215p. Broŝ. 3,- gld.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Arbo de la sciado, La (1911) P. Baroja (1872-1956). El la hispana tradukis F. de Diego (1972). 231p. 23cm. Broŝ. 13,20 gld. (Belliteratura serio, 31). Filozofia romano, laŭ la eldonisto "unu el la plej allogaj verkoj de la romanisto".

Ariel J.E. Rodó (1871-1917). El la hispana trad. M. Fernández Menéndez (1950). 157p. 20cm. Broŝ. 4,20 gld. Filozofia romano de fama urugvaja verkisto.

Aventuroj de malspertulo Robert Reitzel. Elangligis T. Sigel (1924). 32p. 18cm. Broŝ. 0,84 gld. Angla rakonto.

Bagatelaro Johan Hammond Rosbach (1921-). 176p. 19,5cm. 3,60 gld. La jena originala novelaro estas la unua de fekunda serio. La ĉefaj trajtoj de la talento de la aŭtoro jam ĉeestas: mal-longeco, trafaj esprimoj, lingvo simpla kaj ĉiutaga, sed zorge flegata, realismo senpatosa kaj, funde, humuro iom skeptika pri la homo.

Bambufluto, La (1973) Diversaj aŭtoroj. 207p. Ilus. 19cm. Broŝ. 3,- gld. Naŭ tradukitaj noveloj el Suda Vjetnamio.

Barbaraj prozaĵoj Prudenci Bertrana. Elkatalunigis J. Grau Casas (1926). 59p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld. Novelaro.

Batalo de l'vivo C. Dickens (1812-1870). Tradukis (el la germana) L.L. Zamenhof (1891). 128p. 20cm. Bind. 3,36 gld.

Batalo pri la domo Heikkilä J. Linnankoski. V. Setälä. 69p. 19cm. 0,85 gld. Lakona sed sentoplina priskribo de homaj sentoj kaj agado karakterizas la aŭtoron, unu el la famaj finnaj verkistoj.*

Belan pacon, La Jamaguti, 31p. 18cm. 1,20 gld. Atombombaj spertoj.

Besto-farmo, La (1970) George Orwell. 95p. 17cm. 6,- gld. Amara, akra, sed ĉarma rakonto, kiu disvolviĝas en bieno, kie la bestoj ribelas kontraŭ siaj mastroj: la homoj. Majstre verkita, ĝi forte kritikis fabelforme la subtilajn manierojn de aŭtoritataj reĝimoj. La angla originalo jam estas klasikaĵo.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Bofilino (1942) G. Karaslavov. Elbulgarigis S. Simeonov, A. Simeonov (1959). 327p. 17cm. bind. 9,90 gld. ilustr. Socia dramo en bulgara vilaĝo.

Bona sinjorino E. Orzeszko. Elpoligis K. Bein (1909). 56p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Trafa kaj tragika prezento de virina kapricemo.

Brilo de fantomo Margid Thoræus-Ekström. 72p. 21cm. 4,50 gld. La aŭtorino, sveda verkistino, prezentas sian unuan romaneton originale esperantlingvan. Temas pri sveda bienulo, kiu klopodas "kapti" siajn novajn servistinojn. Unu el ili estas la ĉefpersono. En stilo vigla, ŝi rakontas pri la bona vivo, pri la kampara mondo en riĉa farmo.

Brulanta sekreto kaj aliaj rakontoj S. Zweig (1881-1942). El la germana tradukis K.R. kaj P.E. Schwerin (1949). 159p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld. Kvar noveloj.

Bulgaraj rakontoj I.M. Vazov (1850-1921). El la bulgara trad. A.D. Atanasov (1923). 52p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Kvin noveloj.

Bulgara prozo 19 noveloj ekde Vazov. 248p. 21cm. Bind. 7,80 gld.

Cikonikalifo, La M. Babits (1883-1941). Elhungarigis K. Bodó (1929). 187p. 17cm. Broŝ. 1,50 gld. Brile penetra bildigo de disduobliganta personeco, sed kun iom lama fino. Arte tradukita.

Colomba (1840) P. Mérimée (1803-1870). El la franca trad. J. Beau (1938). 184p. 18cm. Broŝ. 0,90 gld. Konata novelo.

Ĉe doktoro Grgurina (1887-1957). 60p. 4,— gld. Originala.

Ĉe la sanktaj akvoj Heer (1859-1925). 213p. 23cm. 5,85 gld. Svisa romano pri dramaj konfliktoj inter vilaĝanoj en la montaro.

Dekkinga fuĝas Tjeerd Adema. 220p. 20cm. Broŝ. 5,40 gld. Fantazia humura romano el la nederlanda originalo.

Deklaracio Ariŝima (1878-1923). 123p. 19cm. 1,50 gld. Japana romano.

Dektria mortis, La Vetter. 187p. 18cm. 4,— gld. Germana krimromano.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Diabet' en la botel' (1893). R.L. Stevenson (1850-1894). Elangligis J. Seka. 48p. 18cm. Broŝ. 0,90 gld. Magia rakonto.

Disko; Ciklo da skizoj (1970) Johan Hammond Rosbach. 110p. 22cm. 6,00 gld. Enhavas 17 noveletojn, kiuj formas ĉenrakonton en la tuto. "Disko" estas la nomo de kaduka ŝipo, kiu antaŭ jaroj regule veturis inter Danlando kaj Gronlando. Entuziasmiga originala verko.

Don Kihoto en Barcelona M. de Cervantes Saavedra (1547-1616). El la hispana trad. F. Pujulà y Vallès (1924). 55p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Ĉapitroj 51-55 el la majstra romano.

D-ro Dorner H.L. Eggerup. 208p. 21cm. 4,50 gld. La celo de ĉi tiu originala romano estas prezenti drame la problemon de arta gravedigo. La romano, en glata Esperanto, solviĝas favore al ĝi, post multaj travivaĵoj kaj preskaŭ neverŝajnaj favorŝancaj okazaĵoj.

Dorse kontraŭ la muro (1966) Red. P. Wybenga. 164p. 20cm. Broŝ. 9,90 gld. Dum militaj spertoj el la nordnederlanda provinco Frislando.

Drinkejo de l'mutulo, La (1969). Nguyen Sang (1933-). 187p. 19cm. 1,80 gld. Noveloj el la bata kampo.

Drole kaj petole Giorgio Silfer. 18p. Ilus. 25 cm. 2,64 gld. Originalaj anekdotoj.

Du amosentaj noveloj (1947) 41p. 23cm. Broŝ. 1,80 gld. Enhavas *Imenlago* de T. Storm kaj *Maruška* de M. Escherisch, el la germana tradukitajn de A. Bader.

Dudek horoj; Kroniko Ferenc Sánta (1927-). Trad. el la hungara originalo V. Benczik, I. Botos, L. Somlai, L. Tárkony. 234 p. 17cm. Bind. 6,30 gld. Fidela kroniko de la nuntempaj hungaraj vilaĝanoj; kun fono de la aktuala socia kaj politika sistemo.

Du majstro-noveloj T. Storm (1817-1888). El la germana trad. H. Heitmüller (1929). 158p. 21cm. 2,10 gld. La noveloj estas *La Blankĉevala rajdanto* kaj *Violo trikolora*.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Du noveloj A. Gajdar (1904-1941). 94p. ofs. Ilus. 21cm. 2,40 gld. Kun postnoto pri la aŭtoro.

Du noveloj (1955) Radakoviĉ. 31p. 17cm. Broŝ. 0,60 gld. Originalaj, jugoslaviaj.

Ebura kombilo, La 160p. Ilus. 1,50 gld. Vjetnamaj noveloj.

Elektitaj noveloj I.S. Turgenjev (1818-1883). El la rusa trad. A. Mexin (1923). 81p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld. La noveloj *Mumu* kaj *Beĵin-herbejo* plus naŭ *Poemetoj en prozo*.

El la "Camera Obscura" Hildebrand. 64p. 19cm. 0,75 gld. Nederlanda novelo.

El la skizlibro (1819). Washington Irving (1783-1859). Elangligis H.L. Elvin (1924) 65p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld. Usona novelaro.

El tero kaj etero Julia Pióro (1902-). 114p. 18,5cm. 4,50 gld. Ĉi tiu kolekto enhavas 8 originalajn novelojn, kelkajn delikat-literikajn, kelkajn kun signifo kaŝita de simbola rakontado. La literatura nivelo ne estas ĉiam egala: temas ja pri la unua verko de la aŭtorino, kies arta matureco ne estas jam plena. Malgraŭ tio, kelkaj noveloj impresas jam arte valoraj.

Elzasaj legendoj (2a eld., 1924) C. Pulvers. 47p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Dek popolaj legendoj magiaj kaj miraklaj, simple rakontitaj.

En ombro kaj en lumo Gama. 274p. 18cm. 4,50 gld. Brazila romano.

Eta princo, La A. de Saint-Exupéry. Elfrancigis Pierre Delaire. 98p. 22cm. ilus. 15,18 gld. Franca 'fabelo' por junuloj kaj plenkreskuloj, kun abundo da interesaj kaj pensigaj asertoj.

Fabeloj de Andersen Hans C. Andersen (1805-1875). Tradukis L.L. Zamenhof. Unua volumo 237p. Kvara volumo 240p. Ilus. 21cm. Broŝ. Po 10,50 gld. La klasikaj tradukoj de L.L. Zamenhof el la verkaro de la dana fabelisto, nun en moderna, eleganta eldono. En la unua volumo estas 18 fabeloj, en la kvara 24.

Fabiola; aŭ la eklezio de la katakomboj Wiseman. El la angla trad. E. Ramo (dua eld., 1928). 436p. Ilus. Mapo. 20cm. 7,80 gld. Rakonto pri fruaj kristanoj.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Fajra Elprovo, La (1965). Diversaj aŭtoroj. Trad. Minh Kinh. 57p. Ilus. 20cm. Broŝ. 0,90 gld. Batalkampaj rakontoj vjetnamaj.

Fajrolumo en la fronto (1950) Liu Beĵü (1915-). El la ĉina tr. S.J. Sü. 148p. 19cm. 2,- gld. Vigla rakonto pri la revolucia milito en 1948-49 kaj la transiro de la rivero Jangci fare de la Popola Liberiga Armeo, verkita de ĵurnalisto ĉe la fronto.

Fanny E. Ferber. El la angla trad. B. Fabo. 240p. 21cm. Bind. 6,- gld.

Faraono, La (1895) Prus (1847-1912). Elpoligis K. Bein. 3 vol. 296, 358, 307 p. 21cm. Bind. Kune 18,- gld.

Faulhaber rakontas... (1972) 32p. 21 cm. 1,86 gld. Konata nederlanda esperantisto, membro de la Akademio, rakontas ok gajajn historietojn.

Fera kalkanumo, La (1908) J. London (pseŭd., 1876-1916). El la angla trad. G. Saville (1930). 359p. 20cm. Broŝ. 3,60 gld.

Ferio kun la morto Carl Lindqvist. 72p. 22cm. 3,25 gld. La romano de Lindqvist, originale verkita, estas kriminalromano sen literaturaj pretendoj. Ĝi estas tamen streĉa kaj intereskapta, kaj krome facile legebla ĉar en klara lingvo.

Filozofio de fantomo Fernández Flórez (1886-1964) 23p. ilus. 17cm. 1,50 gld. El serio da funebre-humoraj rakontoj titolita 'Fantomoj': en ĝi la aŭtoro esprimas sian literaturan spiriton per buŝo de spektroj.

Fingro de la diablo, La (1957) Nils Christensen. 29p. 18,5cm. 1,50 gld. Novelo el la mezepoka Hamar, precipe en la katedralo kaj la monaĥejo. Tradukita el la norvega de la verkinto.

Firmao de la kato, kiu pilkludas Balzac. 73p. 18cm. Broŝ. 0,78 gld. Franca.

Flirto Lord. 48p. 15cm. Broŝ. 0,42 gld. Angla katolika rakonto.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Forto de l' vero, La Adi. 60p. 20cm. 4,— gld.

Ĉi tiu libreto prezentas simplan, facile legeblan novelon kun enhavo iom sentimentalata pri reciproka, sed malhelpata amo de du gejunuloj, kiuj fine, dank'al multaj cirkonstancoj (inter alie Esperanto), fine retroviĝas. Bonstila legolibro por komencantoj, sen literatura pretendo.

Franjo Tu Haŭ Bui Duc Ai (1935-). Elvjetnamigis Nhuyen Minh Kinh kaj Minh Tung. 192p. 3,— gld. Romano pri gerilo kaj hejma vivo en sudazia vilaĝo.

Freŝa mateno R. Kritz. Trad. O. Ginz. 280p. 19 cm. Ilus. Bind. 4,50 gld. Travivaĵoj de juda knabo, forpelita el Aŭstrujo (dum la regado de naziistoj), en israela kibuco.

Friponeto de Tormes, La (1553) El la anonima hispanlingva originalo tradukis Ergoto de Bonaero (1973). 72p. 18cm. Broŝ. 6,36 gld. Klasikaĵo de la hispana literaturo ĝis hodiaŭ tre ŝatata.

Frisaj rakontoj (1964) 184p. 18cm. 6,— gld. Dudek rakontoj el la nordnederlanda provinco Frislando: pri amo, milito, maraferoj, lerneja vivo.

Geedzoj Afu, La To Hoai. 186p. 19cm. Broŝ. 2,46 gld. Vjetnama.

Gösta Berling (1891) S. Lagerlöf (1858-1940) El la sveda trad. S. Engholm (1934). 551p. 20cm. 11,10 gld. La unua romano de Lagerlöf, en multajn lingvojn tradukita.

Granda aventuro, La Ferenc Szilágyi (1895-1967). 143p. 19cm. Broŝ. 5,82 gld. Bind. 6,96 gld. Originalaj noveloj.

Hebreaj rakontoj Ŝalom-Alejĥem (1853-1915) kaj I.L. Perc (1851-1915). El la hebrea trad. I. Muĉnik (1923). 78p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld. Ses noveloj de Ŝalom-Alejĥem kaj kvin de Perc.

Hispana tragedio, La J. Last (1898-1972). El la nederlanda trad. G.J. Degenkamp. 187p. 21cm. Bind. 5,10 gld. Rakontecaj memoraĵoj de nederlandano partopreninta en la interna milito en Hispanujo.

Romanoj, noveloj rakontoj

Homoj en milito kaj **Marcia Reale** A. Latzko (1876-?) El la germana trad. C. Minor, N. Bartelmes. 190p. 21cm. Bind. 5,10 gld. Noveloj de hungardevena aŭtoro germanlingve verkinta.

Homoj sur la tero Stellan Engholm (1899-1960) 235p. ilus. 23cm. Bind. 10,65 gld., broŝ. 7,60 gld. Belliteratura serio de Stafeto n-ro 21. Historio de sveda kampara familio dum tri generacioj. La ĉefrolanto, la tero, kunligas ilin per ĝojoj kaj suferoj.

Hon Dat; romano Anh Duk. Trad. Nguyen Minh Kinh. 446p. 19cm. 3,60 gld. Vjetnama romano pri batalo en 1961. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo.

Horloĝisto de Djen Bjen Fu, La 413p. 19cm. 3,30 gld. Elektitaj vjetnamaj noveloj el la periodo 1945-1964. 19 noveloj de 19 aŭtoroj. Eld. Fremdlingva Eldonejo, Hanojo, 1971.

Hungaraj rakontoj F. Herczeg. El la hungara trad. A. Panajott (2a eld., 1925). 48p. 14cm. 0,30 gld. Kvar noveletoj.

Indaj gefiloj de la Lao-popolo 101p. 19cm. 0,55 gld. Milit-rakonto.

Infanoj de la malriĉuloj (1933) John A. Lee (1891-). El la angla tr. Bertram Potts (1972). 271p. 17cm. 9,18 gld. Koscienceveka aŭtobiografia romano pri la vivo en Nov-Zelando dum la granda ekonomia krizo intermilita.

Infanoj en Torento (1934) Stellan Engholm (1899-1960). 100p. 20cm. 6,42 gld. Fotorepreso 1972. Originale verkita romano pri kvar geknaboj: ilia kreskado, ludoj, lerneja kaj hejma vivoj.

Infanoj en vento, La Cubota (1890-). Trad. Ito Kinzo (1966) 3,60 gld. Amuza kaj edifa rakonto pri la vivo de japanaj infanoj.

Inferio Hendrik J. Bulthuis (1865-1945). 150p. 21cm. 4,50 gld. "Inferio" estas nia civilizita mondo, kiu, en ĉi tiu originala romano, kontrastas kun la necivilizita socio de blindula insulo, kie tamen regas justeco kaj egaleco. La aŭtoro celas satiri nian kulturon, pere de argumentoj verŝajne derivitaj de la Rousseau-a mitologia "bona sovaĝulo". Libro bone verkita kaj bele presita.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Instituto Milner, La Jullien. 36p. 14cm. 0,30 gld. Franca novelo.

Inter sudo kaj nordo Ferenc Szilágyi (1895-1967). 185p. 6,60 gld. Originalaj noveloj.

Intervidiĝo, La kaj Nekonita dialogo A. de Vigny (1797-1863). El la franca trad. S. Meyer (2a eld., 1924). 35p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Fragmentoj el la historia romano *Cinq-Mars*.

Iu finna infanaĝo (1969) E. Rasku. 14p. 21cm. Broŝ. 2,10 gld. Memoroj el ordinara infanaĝo agrable rakontitaj.

Ivan la malsaĝulo Leo Tolstoj. Elrusigis V.A. Ŝrikov (1934). 61p. 15cm. 0,60 gld.

Japanaj malnovaj rakontoj (1965). Dua eldono, 1973. Yanagita (1875-1962). 127p. Koloril. 19cm. Broŝ. 3,06 gld. 42 mallongaj anekdotoj. Diversaj tradukintoj.

Japanaj rakontoj (3a eld., 1923) Red. T. Ĉif. Div. aŭtoroj kaj tradukintoj. 70p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Diversaj noveletoj, grandparte surbaze de antikvaj legendoj verkitaj.

Judoj sen mono M. Gold. El la angla trad. G. Saville. 221p. 21cm. Bind. 4,80 gld. Usona romano.

Juneca ardo Norbert Barthelmess (1897-). 120p. 19cm. 1,80 gld. La jena originala rakonto priskribas en la proleta vidpunkto la problemojn de edukado al revolucio pere de "pozitivaj" herooj, laboristo-organizaĵoj, edukaj instancoj. Libro atentokapta kaj interesveka.

Junulejo (1882) M. Cané (1851-1905); **La buĉejo** E. Echevarría (1805-1851). Tradukis Ergoto de Bonaero. 127p. 17cm. Broŝ. 9,54 gld. Argentinaj romano kaj novelo.

Junuloj en Torento (1939) Stellan Engholm (1899-1960). 144p. 20cm. 8,58 gld. Fotorepreso (1972) de la dua parto de *Infanoj en Torento*, nun sub nova titolo. La infanoj rolintaj en la unua parto nun fariĝis junuloj kaj laboristoj kaj ekinteresiĝas pri sociaj kaj politikaj problemoj. Originala verko en Esperanto.

Kaiĵin-maru Nogami (1885-). 2,50 gld. Japana novelo.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Kanako el Kananam Kenneth G. Linton. 200p. 19cm. Ilus. Bind. 7,80 gld. Dumilite la aŭtoro estis en kanaka regiono de Nov-Gvineo, kie li sukcesis lerni la tie parolatan piĝinan dialekton, kaj povis tiamaniere rekte kontakti kun la loĝantoj. Bone verkita, instruciĉa originala rakonto.

Kan Lik Ho Phuong (1930-). Eld. 1969, trad. el la vjetnama. 320p. 19cm. 1,65 gld. Biografia romano.

Kantistino, La Hauff (1802-1827). 62p. 0,60 gld. Germana.

Kapao, La Akutagawa (1892-). 93p. 19cm. 1,80 gld. Japanaj rakontoj.

Karnavalo (1973) Lina Gabrielli. 77p. 20cm. Broŝ. 7,20 gld. Novelaro.

Karnavalo kaj la somnambulino Immermann. Elgermanigis A.E. Wohlthat. 100p. 18cm. 0,90 gld.

Kaŝmira kanto, La Raŝidov. 26p. 22cm. Broŝ. 0,78 gld. Rusa legendo.

Kaŭkazaj rakontoj Miĥail J. Lermontov (1814-1841). Elrusigis S. Staritsky (1964). 70p. Plaste bind. 5,- gld. La rusaj vivo kaj pejzaĝo: la traduko estas flua, sed iom obstaklas multaj rusaĵoj kaj regionaj vortoj.

Kie boacoj vagadas Eija Salovaara. 72p. 21cm. 3,60 gld. Ĉi tiu originala novelkolekto prezentas al ni la tradician vivon de la laponoj, la loĝantoj de la nordo de Finnlando: la pejzaĝo, la rilatoj kun la nelapona loĝantaro de la lando kaj la vivmaniero estas la materialo de la noveloj, verkitaj en lingvo glata kaj klarstila.

Kiel akvo de l'rivero Raymond Schwartz (1894-1973). 488p. 22cm. Broŝ. 10,50 gld.; bind. 14,40 gld. Schwartz, nia konata novelisto kaj satira poeto, verkis rimarkindan originalan romanon aŭtobiografian. Ĝi rakontas la spertojn de franca junulo, kiu iras al Germanujo tuj antaŭ la militeksplodo (1914), kie li konatiĝas kun junulino, kiun li tamen fine retrovas nur en 1945. Surfone: la milito, la popolo suferanta, la detruoj, la rekonstruoj. Temas pri literature valora verko.

ESPERANTO LEAGUE
for North America
P.O. Box 508
Burlingame,
CA 94010
(415) 343-3844 aŭ
342-1796



ESPERANTO BOOK SERVICE



Elstara stoko
de lernolibroj,
literaturo,
diskoj kaj
specialaĵoj

Romanoj, noveloj, rakontoj

- Kiel esti amata** Brandys. Elpoligis J. Grum (1964) 65p. Ilus. 20cm. 3,30 gld. Pola rakonto.
- Kiso de la reĝino** Naĵivin (1874-?). Elrusigis D. Staritsky (1950). 188p. 18cm. Broŝ. 0,78 gld.
- Kit vivas** Jytte Lyngbirk. El la dana tr. Gudrun Riisberg (1973). 92p. 21cm. 11,58 gld. Junulino en rondo de haŝiŝofumantoj decidas dronigi sin, sed amiko savas ŝin kaj invitas ŝin kunvojaĝi al Ameriko. Dumvojaĝe la interrilatoj ŝanĝiĝas. . .
- Knaboj de Paŭlo-strato, La** (1907) F. Molnar (1878-1952) El la hungara trad. L. Spierer. 180p. 18cm. Broŝ. 0,90 gld.
- Kombilo, La** (1962) Lina Gabrielli. 72p. 21cm. Broŝ. 6,- gld. Rakonto kun esperantista fono.
- Konscienco ripročas, La** Strindberg. Elsvedigis G. Backman (1928). 58p. 19cm. Broŝ. 1,50 gld.
- Kosmoŝipo 'Edeno n-ro 5', La** Konisi gaku. 46 p. 21 cm. 2,20 gld. Kvin originalaj sciencfikciaj rakontoj, verkitaj en 1963-65 de japana aŭtoro.
- Kristo el bronzo** (1922) Nagayo yosio (1888-1961). Eljapanigis Ueyama masao (1969). 108p. 18cm. 4,50 gld. Romano.
- Krucumo** Drozdov. 55p. 0,50 gld. Rusa novelo.
- Kun la defendantoj de Kon Ko** 115p. 0,75 gld. Vjetnama.
- Kuŝanta tigro** Lilli Promet (1922-). 75p. 17cm. Ilus. 1,86 gld. El la estona tr. Alma Lekko. Dek kvar mallongaj noveloj de ŝatata verkistino.
- Kvardekunua, La** B. Lavrenev (1891-?) 80p. Ilus. 28cm. Broŝ. 1,80 gld. Rusa novelo.
- Kvin virinoj de amoro** Ihara Saikaku (1642-93). Trad. Miyamoto Masao. 159p. 22cm. Ilus. 13,- gld. Klasikaj popularaj rakontoj amoraĵ. 42 samepokaj ilustraĵoj. Eld. Pirato, Oosaka. Serio Oriento-Okcidento n-ro 7.
- Lanternisto, La** Diversaj aŭtoroj. El la pola trad. K. Bein (1905). 207p. 20cm. Broŝ. 10,20 gld. 23 noveloj, de Sienkiewicz, Niemojewski, Orzeszko, Prus, k.a. Fotorepreso 1973 de la dua eldono, kiu estis reviziita fare de la Literatura Komitato de FLE.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Lasta, La; Rakonto. W. Reymont. 15 p. 20 cm. 0,80 gld.
Dua eldono (la unua aperis en 1910) de novelo tradukita el la pola de d-ro K. Bein (Kabe). Temas pri emocia rakonto pri fiŝista boato, kiu malfruiĝas pro ŝtormo, kaj la efiko de tio inter la atendantoj. Bela stilo, bele tradukita.

Lasta Usonano, La J.A. Mitchell. El la angla trad. L. Wendell (2a eld., 1924). 48p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Usona novelo.

Legendoj. A. Niemojewski. 74p. 19cm. 0,75 gld.
Kvar noveloj pri la epoko kaj vivo de Jesuo, tradukitaj el la pola de Bronisław Kuhl. En la plej bona tradicio de historiinterpretaj rakontoj, ili rekreas konatajn okazintaĵojn laŭ vidpunkto de la samtempuloj.

Leono de Flandrujo, La H. Conscience (1812-1883) El la flandra trad. H.J. Bulthuis (1929). 310p. 24cm. 3,30 gld.
Romano.

Libro de apokrifoj Karel Čapek (1890-1938). El la ĉeĥa trad. Josef Vondroušek. 105p. 20cm. 2,70 gld. 29 novelminiaturaj kun temoj mitaj, historiaj aŭ literaturaj, ekde Prometeo kaj prahomoj, tra helenaj, romiaj, mezepokaj kaj ŝekspiraj figuroj ĝis Napoleono.

Longa vojo, La (1935) R. Mey. 138p. 20cm. Broŝ. 2,10 gld.
Romano.

Malgranda Johano, La F. van Eeden (1860-1932).
El la nederlanda trad. H.J. Bulthuis (1926). 183p. 17cm.
1,20 gld. Alegoria romano nederlanda.

Malprudenta scivolulo, La Miguel de Cervantes (1547-1616). 64p. Ilus. 20cm. 2,10 gld. La novelo aperas en la verko "Don Kifoto", en ĝi stranga edzo volas per kompleza amiko elprovi la fidelecon de sia edzino, kun bedaŭrindaj rezultoj.

Malsata ŝtono Robindranath Tagore (1861-1941). 128p. 21cm. Ilus. Bind. 12,30 gld. La aŭtoro, mondfama verkisto, estis humanisma kaj laboris por interkultura kompreniĝo. Tiuj ĉi sep rakontoj spegulas la morojn kaj homtipojn bengalajn. Ili estas tradukitaj el la bengala de Lakshmiswar Sinha.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Maria kaj la grupo (1936) Emba (pseŭd. de I. Baranyai, 1902-1961). 172p. 20cm. Broŝ. 1,50 gld. Originala romano.

Maro, La (1928) Div. aŭtoroj kaj tradukintoj. 172p. 21cm. Bind. 2,70 gld. Kolekto da mar-temaj rakontoj, originalaj kaj tradukitaj.

Marta E. Orzeszko (1842-1910) El la pola trad. L.L. Zamenhof. 213p. 21cm. Ilus., bind. (4a eld.) 9,— gld.; broŝ. (3a eld.) 6,90 gld. Unu el la famaj tradukoj de Zamenhof: iom sentimentala rakonto pri juna vidvino en tempo, kiam la socia situacio de la virino ne estis leĝe protektata.

Marvirineto, La H.C. Andersen (1805-1875). 73p. 27cm. Ilus. 7,80 gld. Grandformata eldono de la fama rakonto, tradukita el la dana de Ib Schleicher. Kun multaj tupaĝaj koloraj ilustraĵoj, kiuj bele ornamas posedindan libron. Ankaŭ plenkreskuloj ĝin ŝatos.

Maskerado ĉirkaŭ la morto Teodoro S. Švarc (m. 1968) 247p. 22cm. 10,20 gld. Vera historio aŭtobiografia, nefikciaĵo. Originale verkita en Esperanto. La aŭtoro priskribas siajn travivaĵojn kiel judo en Budapeŝto dum la Dua Mondmilito. Tute senpatose li priskribas, kiel li sukcesis savi sin kaj aliajn de la persekuto.

Maŝinmondo. Sándor Szathmári (1897-). 187 p. 19 cm. 5,40 gld. Kvar longaj rakontoj, tri originale verkitaj en Esperanto kaj unu tradukita el la hungara de Kalocsay, de elstara Esperanta satiristo. Oni povus nomi ilin fantazisciencaj. La konceptoj de Szathmári estas ĉiam surprizaj, tamen logikaj.

Mateo Falcone kaj aliaj rakontoj P. Mérimée (1803-1870)
El la franca trad. J. Borel (1926). 62p. 17cm. Broŝ. 0,60 gld.

Meze de l' flamoj 213p. 2,— gld. Vjetnamaj noveloj.

Mia poŝhorloĝo. La fumo. Maria Konopnicka (1842-1910) 45 p. 20 cm. 1,50 gld. Du rakontoj de eminenta pola poetino. La unuan tradukis Kabe, la duan Jerzy Grum. Ambaŭ tradukintoj, la klasika kaj la moderna, estas vere imitindaj stilistoj. Apud la rakontoj oni presigis vortaron Esperanta-polan, por ke polaj komencantoj povu profiti la legadon.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Mirinda eliksiro, La J.H. Rosbach. 98p. 21cm. 5,— gld. 14 noveloj de unu el la plej eminentaj verkistoj en la Internacia Lingvo. Ĝi pritraktas diversajn facetojn de tio, kion oni nomas la homa feliĉo.

Mi serĉis oron kaj oleon, sed trovis... David Flood. 132p. 20cm. Bind. 6,30 gld.; broŝ. 4,80 gld. El la sveda trad. K. Gustafsson. Aŭtobiografia rakonto pri aventuroplena vivo en Ameriko en la komenco de ĉi tiu jarcento.

Misteroj de l' vivo Agnes Bøgh-Høghsted. 102p. 21cm. 3,75 gld. La aŭtorino verkis ĉi tiujn novelojn dane. Tradukis ilin en glatan Esperanton C.Graversen. La noveloj priskribas simplajn homojn realisme, tamen ne sen delikateco kaj kelkfoje lirikeco. Kelkaj el ili estas etaj juveloj.

Mondo rakontas, La (LMR): 50 rakontoj el 5 kontinentoj Kompilis Theodor Kilian. 46p. 17cm. 3,— gld. Konsistas el unu letero kaj 50 diversaj rakontoj.

Morto de Jankio, La 125p. 19cm. 1,30 gld. Vjetnamaj rakontoj de 6 aŭtoroj.

Mr. Tot aĉetas mil okulojn (1931, fotorepreso 1973). J. Forge. 242p. Ofs. 18cm. Broŝ. 12,— gld. (Serio Forge 3). Detektivromano.

Naŭzo, La Jean-Paul Sartre (1905-). Elfrancigis Roger Bernard. 222p. 21cm. 7,50 gld. La aŭtoro estas ĉefulo de la ekzistadisma skolo. La poezie verkita kaj tradukita romano bildigas la laŭgradan konsciigon de la ĉefrolulo pri la homa soleco kaj pri la absurdeco de la ekzisto.

Necenzurita humoro H. Maŝler. 89p. 18cm. 1,50 gld. Enhavas humuraĵojn kaŝe rakontatajn en Sovetunio kaj Pollando. Enestas sufiĉe da lingvaj eraroj.

Neĝa blovado A. Puŝkin. Trad. A. Grabowski. 21p. 5,— gld.

Neĝa lando Kawabata yasunari (1899-), Nobel-premiito. El la japana tr. Konisi gaku. 118p. 22cm. Tolbind. 14,50 gld. Serio Oriento-Okcidento, n-ro 11. Romano. Delikatsenta majstroverko pri homaj rilatoj.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Nekonata konato, La (1932) Douglas P. Boatman. 120p. 21cm. Bind. 2,40 gld. Mistera rakonto, "unu el la plej eksterordinaraj, kiuj iam aperis sur papero", originala.

Nekonatino, La Reinhold Conrad Muschler (1882- ?). 66p. 19cm. 3,30 gld. Iom naŭva, cele tragedia, amrakonto, tradukita el la germana de Ludwig Goppel.

Ne plu ludo . . . kaj aliaj noveloj (1927-1947). N. Barthelmess (1897-). 127p. 17cm. 5,76 gld. Kvin originalaj noveloj de konata sennaciista aŭtoro: 2 jam antaŭe eldonitaj (*Diablidoj* kaj *Milito kaj paco*) kaj 3 aliaj el la jaroj ĉirkaŭ la Dua Monda Milito, kun tiurilataj temoj.

Nevenkebla ĝeno, La Theo Thijssen (1879-1943). 31p. 20cm. 5,95 gld. Ĉarma aŭtobiografia rakonto pri malriĉa knabeto, kiu fariĝas instruisto. Tra la vivo, ĉio kvazaŭ okazadas ĉirkaŭ aŭ pro la vestoj, kiuj formas la "nevenkeblan ĝenon". Vive tradukita el la nederlanda de F. Faulhaber.

Nia hejmo Francisco Cândido Xavier (1910-). 237p. 18cm. 7,14 gld. Brazila spiritisma romano pri la vivo en la transmondo, proksime de la tero, kie oni tamen vivas "tre materiale".

Niĉjo Mensogulo I.A. Brătescu-Voinești (1868-1946). El la rumana trad. T. Morariu (1927). 63p. 18cm. Broŝ. 0,60 gld. Ses noveloj.

Ni en Skandinavio Breinholst. 19p. 23cm. 3,— gld. Danaj humuraĵoj.

Nigra galero, La Wilhelm Raabe (1831-1911). 64p. 18,5cm. 0,75 gld. El la germana tradukita de Fritz Wicke. Historia rakonto pri la hispanaj-nederlandaj militoj de la 16a jarcento.

Ni homoj..... Zora Heide, 72p. 21cm. 4,92 gld. Originala novelaro de danino naskiĝinta en Jugoslavio. Kvankam temas pri unua verko, la aŭtorino montras jam rimarkindan rakontkapablon, kiu demontras baldaŭan artan maturiĝon.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Nobela peko Mihail Sadoveanu (1880-1961). 63p. 18,5 cm. Broŝ. 0,90 gld. Tri noveloj de elstara rumana verkisto, tradukitaj de Tiberio Morariu. La titolrakonto priskribas feŭdisman socion en emocie pasia historio pri la rilatoj inter nobelo kaj kamparano. Atentokaptaj priskriboj.

Nokto da timo B. Potts. 80p. 21cm. 5,— gld. Tri originalaj noveloj. La scenejo de la unua estas arktaj regionoj, de la dua Nov-Zelando kaj de la tria estas Anglujo. Ĉiu historio estas surprizo, ĉar la solvo de la problemo estas alia ol la atendita.

Norda vento Karinthy (1888-). Elhungarigis K. Bodó (1926). 94p. 17cm. Broŝ. 1,02 gld. (*Biblioteko tutmonda n-roj 7/8*). Novelaro.

Nordgermanaj rakontoj H. Bandlow. Tradukis E. Scheerpeltz (1924). 48p. 15cm. Broŝ. 0,30 gld. Kvin humuraj rakontoj.

Normandaj rakontoj Guy de Maupassant (1850-1893). 218p. 23cm. Bind. 13,50 gld. 19 noveloj de la influa realisto Maupassant.

Nova jaro, La Prus kaj Sienkiewicz. 20p. 20cm. Broŝ. 5.04 gld. Polaj.

Noveletoj el la Nigra Arbaro H. Christaller. Elgermanigis W. Christaller (1923) 47p. 14cm. 0,30 gld. 4 rakontoj.

Noveloj Lusin (1881-1936) Div. tradukintoj (2a eld., 1974). 488p. Ilus. 22cm. Bind. 8,10 gld. Ĉi tiu dua eldono de la noveloj de la elstara ĉina verkisto enhavas ĉiujn liajn 33 novelojn, kun biografiaj notoj pri la aŭtoro.

Noveloj Sienkiewicz (1846-1916). Elpoligis Lidja Zamenhof. 64p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld.

Nuda inter lupoj (1959) B. Apitz (1900 -). El la germana trad. K. Schulze (1974). 480p. 20cm. Bind. 12,— gld. Romano el la koncentrejo Buchenwald.

Nuntempaj rakontoj Stamatov (1869-1942). Elbulgarigis I.H. Krestanoff (1922). 80p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Obstino, La Nakazima (1909-1942). 95p. 3,80 gld. Kvar japanaj rakontoj pri malnovaj ĉinaj temoj: 'La luno super monto', 'La vivo de arkomajstro', 'Li Ling' kaj 'La aĝulo kaj la maro'.

Okuloj Marjorie Boulton (1924-). 177p. 6,85 gld. 13 originalaj noveloj pri tre variaj temoj, jen sciencofikciaj, jen fantazie spritaj, jen kortuŝaj.

Okuloj de la eterna frato, La (1922) S. Zweig (1881-1942). El la germana trad. H. Wolff (1932). 65p. 20cm. Broŝ. 2,10 gld.

Okupacio (1969) Erni Krusten (1900-). El la estona tr. Hillar Saha. 90p. 17cm. 2,16 gld. Romaneto de elstara prozverkisto, kiu priskribas homajn sentojn kaj idealojn dum la germana okupacio en Estonio en 1941-44.

Orientaj fabeloj Doroŝević (1863-1921). Elrusigis N. Hohlov (1924). 66p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld.

Palaco de danĝero, La Wagnalls. Elangligis E.S. Payson. 206p. 19cm. Bind. 4,02 gld. Historia romano, pri Madame de Pompadour.

Papalagoj, La Erich Scheurmann. Esperantigis F. Faulhaber. 80p. 17cm. 2,— gld. Interesaj opinioj de oceania tribestro pri la eŭropa civilizo kaj pri ĝiaj hipokritaĵoj. La libro atentigas pri la neceso reveni al la naturo.

Patrino, La E. Zahn (1867-1952) El la germana trad. J. Schmid. 56p. 14cm. 0,30 gld. Novelo de ŝatata svisa verkisto.

Patrino kun fusilo Nguyen T. 0,50 gld. Vjetnama rakonto.

Patroj kaj filoj I.S. Turgenjev (1818-1883). El la rusa trad. K. Bein (1909). 215p. 20cm. Broŝ. 10,80 gld. Fotorepreso de la dua eldono, kiun lingve reviziis la Literatura Komitato de SAT.

Patromurdo en la nigra muelejo Ráth-Végh, 46p. 14cm. 1,90 gld. Hungara.

Paŭlo kaj Stefano, historia romano diktita de la spirito Emmanuel (1966) F.C. Xavier (1910-). Trad. L.C. Porto Carreiro Neto. 543p. 19cm. 15,— gld. Brazila romano.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Petro Schlemihl Adelberto de Chamisso (1781-1838) 82p. 19cm. 0,75 gld. El la germana tradukita de Eugen Wüster. Mondkonata historio pri la viro, kiu forvendis sian ombron, kiu figure estis lia nacieco.

Pli ol fantazio Bøgh-Høgsted. 70p. 4,50 gld. Danaj.

Pluvas sur la arbaron 88p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld. Pri la Lao-popolo.

Premiitaj kaj aliaj noveloj (1974) T. Sekelj. 52p. 17cm. Broŝ. 5,40 gld. Sep originalaj noveloj.

Pri arto kaj morto (1967) Miyamoto. 170p. 19cm. 10,80 gld. Novelaro pri famaj artistoj kaj beletristoj.

Princino de Marso E.R. Burroughs (1875-1950). El la angla trad. K.R.C. Sturmer (1917). 183p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld.

Princino Mary M. Lermontov (1814-1841). Elrusigis E. de Wahl (1889). 32p. Ofs. 19cm. Broŝ. 4,50 gld. Fotorepreso de la unua eldono.

Princo kaj Betty, La P.G. Wodehouse (1881-). El la angla trad. G. Badash. 192p. 18cm. Broŝ. 0,90 gld. Romano de tre ŝatata angla humoristo.

Printempo de morto (1922) Lajos Zilahy (1891-). elhungarigis L. Somlai (1947). 120p. 19cm. Bind. 7,80 gld.; broŝ. 5,10 gld. Hungara romano.

Printempo en la aŭtuno, rakonto pri dolĉe melankolia renkonto (1931) Julio Baghy (1891-1967). 116p. 19cm. 6,42 gld. Romaneto originale verkita en Esperanto, desegnanta per paŝtelaj koloroj la burĝonan amon de knabo kaj knabino. Fotorepreso 1972.

Procezo Tada. 38p. 18cm. Bind. 3,60 gld. Japana aŭtobiografia novelo.

Pro Iŝtar Heinrich A. Luyken (1864-?). 304p. 19,5 cm. Bind. 7,50 gld. Originala romano de Luyken, kiu pritraktas la sorton de la judoj en la antikva Babelo. Reaperas, tamen iom mildigitaj, la kutimaj temoj kaj rakontmaniero de la aŭtoro: "pozitivaj" kaj "negativaj" herooj, transpono de puritanismo al epoko, kiu ne konis ĝin, profunda religieco de la aŭtoro inspiro. Romano interesa, leginda.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Provinca gastejo Trudiĉ. 17p. Broŝ. 0,78 gld. Originala rakonto.

Radiana lotuso, La J.D. Degreef. El la nederlanda tr. P. van de Vijver. 193p. 20cm. 4,20 gld. (Ideala Esperanto-Biblioteko, n-ro 5). Populara aventurromano kun tibeta fono.

Rakontoj de Eroŝenko Komp. Miyamoto M. 121p. (ĉ. 60p. en Esperanto). 17cm. 7,26 gld. Verkoj de la blinda rusa poeto V. Eroŝenko (1890-1952): *Rakontoj de velkinta folio*, malgrandaj fabelaj skizoj de ŝanhaja vivo, kaj *La destinata vivi*, pri siberia gento. Dulingva eldono kun paralelaj tekstoj en Esperanto kaj la japana. Originale verkitaj en Esperanto.

Rakontoj el la naciliberiga batalo 0,80 gld. Jugoslaviaj.

Reĝo de la Ora Rivero, La (1841) J. Ruskin (1819-1900) El la angla trad. I. Kellerman (1926). 40p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Ruskin famiĝis pro siaj verkoj pri arto kaj kulturo: sed ĉi tiun rakonteton li verkis por amuzi knabinon.

Riĉa kaj sen mono E.P. Oppenheim (1866-1946) El la angla trad. F. Wadham. 222p. 21cm. Bind. 6,— gld. Oppenheim estis aŭtoro de pli ol cent suspensromanoj: ĉi tiu estas unu el ili.

Romeo, Julieta kaj la tenebro Jan Otčenašek (1924—). 176p. 19cm. 6,50 gld. La aŭtoro, ĉeĥo, verkis ĉi tiun romanon en 1958. Temas pri amo de du gejunuloj (ŝi estas juda) en Prago, dum la nazia regado, kiu tragike finiĝas. Prologo de Louis Aragon. Traduko, lerte farita, pruvo de la matureco de nia prozlingvo, estas de Vladimír Váňa.

Rusaj rakontoj (Fabeloj al Helenjo) M. Sibirjak (1852-?) 47p. 14cm. 0,30 gld.

Sageoj kaj rakontoj laŭlonge de l'Rejno (1958). J. Pagenstecher. 46p. 19cm. Broŝ. 2,94 gld. Diversfontaj anekdotoj originale rerakontitaj: ilustris la aŭtorino.

Saltego trans jarmiloj Jean Forge (ps. de Jan Fethke: 1903—). 192p. Broŝ. 3,— gld; bind. 4,50 gld. Forge prezentas en ĉi tiu romano, originale verkita en Esperanto, fantazian inventaĵon: tempomaŝino, kiu kondukas la ĉefpersonojn en la antikva-romian epokon. Tio kompreneble ne povas okazi sen multaj aventuroj. Verko klara, simpla, elegantlingva.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Sango kaj sablo Blasco Ibañez (1867-1928). Elhispanigis R. de Salas. 228p. 22cm. 4,50 gld. La romano priskribas tipajn hispanajn morojn, ĉefe el Andaluzio, kaj diversajn travivaĵojn de fama toreadoro.

Senlingvulo, La V. Korolenko (1853-1921) El la rusa trad. M. Ŝidlovskaja (1926). 191p. 21cm. Bind. 4,80 gld.

Senmatrikulaj artilerianoj 117p. 19cm. Broŝ. 1,02 gld. Vjetnama batalrakonto.

Sep fratoj A. Kivi. Trad. Ilmari Ekström. 360p. 18cm. Ilus. Bind. 4,20 gld.; broŝ. 2,70 gld. La ĉefverko de la unua vera beletristo finna. Humura rakonto pri vivo en nordaj praarbaroj en la 19-a jarcento. Spertinte malfacilan vivon, la aŭtoro nur post la morto estas konsiderata kiel genia fondinto de la finna literaturo.

Sep vangofrapoj K. Aszlányi (1908-1938) El la hungara trad. L. Spierer. 148p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld.

Servokapabla! : Marcus Tybout Georges Eekhoud (1854-1927). Elfrancigis L. Bergiers (1927). 71p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld. Belgaj rakontoj.

Sklavoj de Dio Géza Gárdonyi (1863-1922). El la hungara tr. J. Hamvai. 409p. 20cm. 10,50 gld. Romano, rigardata kiel unu el la modernaj klasikajoj en la hungara lingvo, pri la monaĥa kaj laika vivo kaj kutimoj de la 13a jarcento en Hungarujo.

Skota legendaro Philippa Galloway. El la angla tr. Guy B. Tordoff. 127p. Ilus. 21cm. Bind. 10,44 gld. Dek kvin popolaj legendoj el Skotlando kaj la apartenantaj nordaj insuloj.

Skurila libro, La Adolf Sproeck. 96p. 17cm. Broŝ. 7,20 gld. Esperanto estas lingvo, kiu ŝajne altiras satirverkistojn. Jen kolekto el noveloj, poemoj, epigramoj satiraj, kiujn ĝis nun aperigis originale la germana aŭtoro.

Sonĝo de Makaro Korolenko (1853-1921). Elrusigis M. Ŝidlovskaja (1927). 48p. 17cm. Broŝ. 0,54 gld. Kristnaska rakonto.

Sonĝo kaj maldormo sub la karpeneto Ivo Andrić (1892-). El la serba tr. Roger Imbert kaj Zlatko Tišljarić. 79p. 17cm. 9,72 gld. Novelkolekto de nobelpremiita aŭtoro pri la vivo de bosnia vilaĝano en la tempo de la aŭstrohungara okupado.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Sorĉistino el Kastilio, La S. Asch (1880-1957). El la jida trad. I. Lejzerowicz. 147p. 19cm. Broŝ. 2,10 gld. Romano.

Stranga Heredaĵo (1922) H.A. Luyken. 320p. 19cm. Bind. 3,60 gld. Romano originala.

Strato de fiŝanta kato, La J. Földes. El la hungara trad. L. Halka, L. Spierer (1937). 269p. 20cm. Bind. 6,- gld. Premiita romano, tradukita en dek lingvojn.

Sub la jugo Ivan Vazov (1850-1921) 464p. 20cm. Bind. 10,-gld. Traduka komitato pretigis esperantlingvan eldonon de la bulgara literatura romanĉefverko, kiu temas pri la vivo kaj la luktoj de Bulgarujo por la liberigo el la turka jugo. Antaŭparolo de Petăr Dinekov. Romano eposa, vasta, intereskapta el literatura, arta kaj historia vidpunktoj.

Sub la neĝo J.J. Porchat. El la franca trad. J. Borel (1907). 120p. 14cm. Broŝ. 0,60 gld.

Sub la signo de la verda stelo Vd. ĉe "Movado".

Sunkrono, La M. Koenen (1879-1959). El la nederlanda trad. P.C. van de Vijver (1937). 99p. 20cm. Bind. 2,40 gld.

Suno kaj pluvo (1972) Gudrun Riisberg. 80p. 22cm. 6,50 gld. Dek kvin originalaj noveloj de dana aŭtorino, verkinto ankaŭ de klubaj skeĉoj. Temoj melankoliaj, dramaj, humuraj, alterne.

Sur insulo malproksima (1957). J. van Hemert-Remmers. 79p. Kun mapo. 21cm. Broŝ. 3,- gld. Spertoj el japana okupacio en Sumatro post 1941.

Surprizoj I. Boudier-Bakker (1875-1966) El la nederlanda trad. T. Flint (1936). 207p. 20cm. 3,90 gld.

Synnøve Solbakken Bjørnson (1832-1910). 96p. 21cm. 5,- gld. Norvega.

Ŝipestro rakontas (1962) F.T. Lundquist (1882-1965). 72p. 20cm. Bind. 6,78 gld., broŝ. 5,60 gld. Kvar rakontoj kun realaj aventuroj de ŝipestro kiu pasigis la plej grandan parton de sia vivo suroceane.

Ŝippereo Smuul. 35p. Broŝ. 2,40 gld. Estona.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Ŝolandro Bonsels (1880-1952). 47p. 20cm. Broŝ. 0,48 gld.
Germana novelo.

Taglaboristoj Hans Kirk. Tr. L. Friis kaj W. Jensen. 218p. 21cm. tolebind. 11,50 gld. Traduko el la dana. La scenejo de la romano, verkita de konata kaj ŝatata dana verkisto, estas kamp-ara loko, kie oni trovis kreton; jen komenco de cementindustrio. Cilius, kiu scias "konsumi brandon kiel ĉevalo akvon", fariĝas eĉ laborgvidanto.

Taglibro de vilaĝpedelo (1824) S. Blicher. Eldanigis H. Bulthuis (1922). 48p. 19cm. Broŝ. 1,02 gld.

Teatra korbo, La (1934) J. Baghy (1891-1967). 110p. 17cm. Broŝ. 2,40 gld. Novelaro.

Tempo-maŝino, La (1895) kaj **La lando de la blinduloj** (1896) H.G. Wells (1866-1946) El la angla trad. E.W. Amos. 187p. 19cm. Broŝ. 0,90 gld. Du el la plej konataj rakontoj de Wells.

Tiel profunda estas la nokto (1956) V. Riŝør. Div. tradukintoj (1959). 110p. 21cm. Broŝ. 4,50 gld. Dana novelaro kun afrika fono.

Tra lando de indianoj (1970) Tibor Sekelj. 186p. 20cm. Bind. 23,40 gld.; broŝ. 15,90 gld. Rakontoj pri la travivaĵoj de la aŭtoro kun indianoj en tropika arbaro en la centr-okcidenta regiono de Brazilo, kiu ankoraŭ restis neesplorita. El la hispana trad. Ernesto Sonnenfeld; reviziis la aŭtoro.

Trans la fabeloceano . . . (1931) Ferenc Szilágyi (1895-1967). 135p. 20cm. 9,78 gld. Ledimita bind. Originalaj fabeloj kun vigla stilo, por infanoj kaj plenaĝuloj. Fotorepreso 1972.

33 rakontoj 352p. 22cm. Bind. 13,20 gld.; broŝ. 9,60 gld. Interesa kaj varia antologio: plej bone reprezentigas la periodo post la unua mondmilito, la hungara skolo kaj la polurita romantiko.

Trifoje akurate je la dekdua horo W. Galdert. Elgermanigis F. Ellersiek. 150p. 19cm. Broŝ. 5,40 gld.

Tri noveloj Puŝkin (1799-1837). Elrusigis A. Fiŝer (1923) 67p. 19cm. Broŝ. 0,78 gld.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Tri satiroj Diversaj aŭtoroj kaj tradukintoj. 38p. Ilus. 19cm. Broŝ. 0,96 gld. Jugoslaviaj.

Tri verkoj de Volter Voltaire (1694-1778). Elfrancigis E. Lanti. 312p. 19cm. Broŝ. 7,20 gld. Enhavas: *Kandid*, *Zadig* kaj *La senartifikulo*.

Turo de Londono, La S. Natume (1866-1916). 1,20 gld. Japana.

Vagabondo kaj sinjorino (1929) Walther Klopffer. El la germana tradukis L. Goppel (1931). 204p. 21cm. Bind. 5,70 gld.; broŝ. 3,60 gld.

Vartejoj Norbert Barthelmess (1897-). 129p. 18cm. 1,80 gld. En ĉi tiu originala romaneto la aŭtoro priskribas la estiĝon de kamaradeco inter junula grupo, ilian konstruŝtaron al la pun-edukejoj por junuloj (kiuj fakte estas nuraj krimulcreaj institutoj), kaj la kreskon de tiu amikeco al vera kamaradeca klas-konscia solidareco. Romano neegalece valoras, sed ĉiam interes-kapta.

Verda raketo, La (1961, fotorepreso 1973). J. Forge. 145p. Ofs. 18cm. Broŝ. 7,02 gld. (Serio Forge, 4) Noveletaro.

Verda robo (1974) J.H. Rosbach. 93p. 21cm. Broŝ. 12,- gld. Novelaro.

Victoria Knut Hamsun (1859-1952) 100p. 19,5cm. 3,- gld. El la norvega tradukita de Olav Rygg (1938). Kortuŝa, forte lirika rakonto de la mondfama norvega verkisto; ofte nomata la plej bona amrakonto en la literaturo.

Viktimoj kaj Sur sanga tero Julio Baghy (1891-1967). 504p. 18cm. Tolbind. 27,- gld. Represo, kune en unu volumo, de du teme interligitaj romanoj originalaj, unue aperintaj respektive en 1925 kaj 1933. Vivoplenaj bildoj pri homaj suferoj en la Unua Monda Milito kaj Rusa Revolucio. Forta rakonta stilo.

Virineto en bluo, La (1946) M. Stuttard. 150p. 18cm. Broŝ. 0,90 gld. Originalaj rakontoj.

Vitrilo John Islay Francis (1924-). 136p. 19cm. 4,50 gld. Poeto kaj novelisto, Francis proponas sian unuan novelkolekton. Liaj noveloj, lirike realismaj, kelkaj ĉerpitaj el amema observo de la vivo, kelkaj el propra fantazio, simbolece, estas unu el la plej maturaj artverkoj de nia literaturo. Enkonduko de F. Szilágyi.

Romanoj, noveloj, rakontoj

Vivo kaj opinioj de Majstro M'Saud Jean Ribillard (1904-1962). 144p. 19cm. Ilus. 5,40 gld. Ĉi tiu eksterordinare riĉenhava romano originala, kiun la aŭtoro ne sukcesis fini, estas verkita en lingvo neologisme riĉa, kiun li regis kun granda klero kaj lingva memdisciplino. Temas pri la filozofia kompreno de la vivo, el la vidpunkto de fatalisme klera, maljuna araba azeno. Ĉi tiun ĉefverkon editoris Reto Rossetti.

Vivo vokas Engholm (1899-1960). Bind. 6,90 gld.; broŝ. 5,70 gld. Originala romano.

Vojaĝo al Kazohinio Sándor Szathmári (1897-). 320p. 21cm. 6,90 gld. Originala soci-kritika romano de hungara aŭtoro, ĉefverko de la originala literaturo en Esperanto, stile kaj lingve elstara. Kvazaŭ nova Gulivero, la ĉefpersono post ŝippereo troviĝas en insulo, kie vivas du kontraŭaj socioj: unu ekstreme racia, kie la tekniko malhomigis la homojn; la alia ekstreme malracia, kie superregas 'artaj' kaj 'religiaj' ekscesoj.

Vojoj estas nekonataj, La L. Kassak (1887-). El la hungara trad. L. Spierer. 177p. 21cm. Bind. 3,60 gld.

Vole...novele: aŭ, kvindek jaroj da noveloj, 1920-1970 (1971) Raymond Schwartz. 192p. 21cm. Artlede bind. 24 gld. Duono de la tuta volumo estas la dua eldono de *Prozo ride anta* (1928), reviziita, kaj la alia duono konsistas el noveloj verkita pli poste. Entute 35 originalajn novelojn prezentas intereskapte la franca verkisto, konata en la Esperanto-literaturo.

Vuk Fekete. 83p. 18cm. Bind. 5,52 gld. Hungara romano pri bestoj.

MIKSITA LITERATURO

Angla antologio (1957) redaktis W. Auld kaj R. Rossetti. 319p. 21,5cm. 5,- gld. Superrigardo de anglaj prozo kaj poezio de la jaro 1000 ĝis 1800, kun enkonduka resuma skizo pri la angla literaturo en tiu periodo fare de Marjorie Boulton.

Miksita literaturo

Antologio de amoro (1972) Diversaj aŭtoroj pseŭdonomaj. 51p. 21cm. Broŝ. 3,60 gld. Dua reviziita eldono de kolekto de erotikaj poemoj kaj rakontoj.

Arabaj maksimumoj de la sepa jarcento kaj aliaj diversaj maksimumoj (1967) Imamo Ali. Trad. Husen Al-Amili. 77p. 20cm. 7,14 gld. Eld. Araba Esperanto-Asocio, Bagdad. Interalie ankaŭ maksimumoj por la revoluciemuloj, de George Bernard Shaw.

Argenta duopo Vol. 2. Baghy kaj Kalocsay. 3,-gld. Ĝis 1937. Originala.

Belarto Red. William Auld. Du kajeroj, kune 140p. 26cm. Ilus. per fotoj kaj desegnaĵoj. 1,- gld. por ambaŭ kajeroj kune. Verkoj originalaj kaj tradukitaj, prozaj kaj poeziaj.

Bonhumora Injektilo (1973). Ergoto de Bonaero. 192p. Ksero. 18cm. 12,72 gld. Kolekto da spritaj dialogoj kaj amuzaj anekdotoj.

Ĉina Antologio 1949-1959 Div. aŭtoroj kaj tradukintoj. 412p. Ilus. 24cm. Bind. 12,-gld. Poemoj kaj noveloj.

Dana antologio (1961) redaktis J. Christoffersen kaj H.E. Jensen 259p. 23,5cm. Bind.: 10,50 gld.; broŝ. 9,30 gld. Elstaraj danaj literaturaĵoj de la 17a ĝis la 20a jarcento, kompilitaj en unu grandan verkon. Enkonduko pri la disvolviĝo de la dana literaturo kaj de la dana lingvo ĝis la 18a jarcento.

Elektita verkaro Ĥristo Botev (1848-1876) Elbulgarigis I. Dobrev kaj I. Sarafov (1969) 83p. 20cm. 6,54 gld. Poemoj kaj prozeroj.

El japana literaturo (1965) redaktis Miyamoto Masao kaj Isiguro Teruhiko. 264p. 21,5cm. Bind. 19,50 gld. Japana prozo ekde la Meizi-epoko (1868-1912) ĝis la dua mondmilito. Enkonduko kaj klarigoj pri la koncerna periodo kaj la tiama literaturo.

El la vivo de Syunkin (1968) Tanizaki Zyun'itiro (1886-1965). Trad. Miyamoto Masao kaj Isiguro Teruhiko. Lingve kontrolis D.B. Gregor. 145p. 21cm. Broŝ. 11,- gld. tolbind. 14,- gld. Serio Oriento-Okcidento n-ro 9. Eld. Pirato, Oosaka. Enkonduko de I. Lapenna, 2 dramoj "Okuni kaj Gohei" kaj "Mumyô kaj Aizen" kaj 2 rakontoj "Knaboj" kaj "El la vivo de Syunkin", apartenantaj al la japana klasika literaturo.

ELDONAĴOJ DE AMO-AKADEMIO

- Libroj: Japanaj fabeloj, 2,50; Ĉefaj fabeloj, 2,60; Japanaj malnovaj rakontoj, 5,20; Japana kantaro, 2,34; El orienta florbedo, 2,85 guldenoj. La sesdek tradiciaj popolkantoj, 6,20 guldenoj.
- Diskoj: Fundamenta prononco de Esperanto, 1,50; Impreso per Esperanta vojaĝo, 1,50; Amata voĉo de d-ro H. Jagi, 1,50; La Espero kaj La Tagiĝo, 1,50; Japanaj popolkantoj, 3,— guldenoj. Voĉalbumoj de niaj pioniroj S-noj Lapenna, K. Kalocsay, Baghy, Szathmari, Isaj Dratwer, Sancho-Izquierdo kaj aliaj, 2,30 guldenoj.

El propra kaj fremda (1971) Hans Amund Rosbach. 74p. 22cm. Ilus. 6,30 gld. Kolekto de prozo kaj poezio, parte originale verkita, parte reverkita, parte tradukita de la kompilinto, precipe el norvegaj aŭtoroj. Enestas religiaj temoj.

Homo sur sia vojo, La vidu ĉe 'Legolibroj'

Islandaj pravooĉoj tradukis: Baldur Ragnarsson (1930—). 110p. 19cm. Broŝ. 5,70; bind. 7,80 gld. La antikva norda literaturo ne estas tre reprezentita en nia lingvo: jen tamen stile kaj literature elstara traduko de tri rakontoj kaj unu poemo de la antikva Islando. La tradukinto sukcesis rekrei en Esperanto lingvon kaj esprimmanieron arkaisman kaj antikvetosan de la originalaj sagaĵoj.

Japana kvodlibeto (1965) 127p. 19cm. 4,50 gld. Kontribuoj de naŭ prozistoj kaj naŭ poetoj. Ornamentaj poemoj, kaj prozo kun japana etoso. Elstaras du noveloj, unu pri malriĉa pentristo, la alia pri maldungito.

Miksita literaturo

Junaga verkaro Edmond Privat (1889-1962). 144p. 19cm. 4,50 gld. Ĉi tiu kolekto, kun antaŭparolo de Baghy pri la stilo de Privat, enhavas la faman prelegon pri la Esperanta literaturo, kelkajn prozaĵojn (novelojn), kelkajn poemojn, la tutan poemaron "Tra l' silento", kiu estis mejloŝtono en la Esperanta literaturo, kaj la lirikan kontraŭmilitan teatraĵon "Ginevra kaj Lanceloto".

Kalejdoskopaj Varieteo (1974) E. de Bonaero. 160p. 18cm. Broŝ. 9,— gld. Kolekto de mallongaj eseoj, recenzoj, poemoj kaj humuraĵoj, originalaj kaj tradukitaj el diversaj lingvoj.

Kruko kaj Baniko el Bervalo (1970, dua preso 1974) L. Beaucaire. 143p. Ilus. 21cm. Broŝ. 16,— gld. Korektita represo de maldeca anekdotaro, kies unua preso elĉerpiĝis en malpli ol unu jaro.

... kun siaspeca spico! (1971) R. Schwartz (1894-1973). 215p. 23cm. Broŝ. 11,40 gld. (Belliteratura serio, 29). Antologio el la humuraĵoj de Schwartz, represitaj ĉefe el diversaj revuoj; interalie troviĝas la tuta serio de *Laŭ mia ... ridpunkto*.

Kvara Rapsodio Div. aŭtoroj. 48p. 21cm. Broŝ. 1,20 gld. 37 aŭtoroj kaj tradukintoj, i.a. Shakespeare, Baghy, Kalocsay, Waringhien, Szilágyi.

Literatura Mondo, vol. 1 (1922-1923) 368p. 31cm. Bind. Por ĉiuj ses volumoj 300,— gld. Unua volumo de la kompleta represo de altnivela kaj influa periodaĵo.

Mi amis junulinon (1966) Walter Trobisch. 140p. 18cm. Broŝ. 3,— gld.; bind. 5,— gld. Enhavas la korespondaĵojn de pastoro Trobisch kun afrika junulo pri la personaj problemoj de amo kaj seksa moralo. El la germana tradukis A. Burkhardt.

Modesta bukedo: prozo kaj poemoj. K. Jost. 79p. 15cm. Broŝ. 1,02 gld. Antologieto originala kaj tradukita.

"Monda Kulturo" literaturo, teatro, filmo: Bindita kolekto 1962-64 (9 numeroj) 19,— gld. Bindita kolekto 1965-66 (6 numeroj) 19,— gld. Unuopaj numeroj 1 ĝis 15 (kelkaj elĉerpitaj) po 0,50 gld.

Miksita literaturo

Multekolora libro, La (1935) Div. aŭtoroj kaj tradukintoj. 128p. 21cm. Broŝ. 1,50 gld. Tre varia sortimento de poemoj kaj prozaj eroj ĉefe unu-du-paĝaj.

Nica Literatura Revuo: kompleta serio. Redaktis G. Waringhien. 42 numeroj po 40p. 19cm. Broŝ. 40,20 gld. por unu serio.

Ni kaj ĝi (1972) G. Waringhien (1901-). 344p. 23p. Broŝ. 16,80 gld. (Belliteratura serio, 30). Ĉi tiu tria granda volumo de la eseoj de Waringhien prezentas temojn religiajn kaj artajn.

Oriento (1927) Div. aŭtoroj kaj tradukintoj. 167p. 20cm. Bind. 2,10 gld. Kolekto de noveloj kaj teatraĵeto kun oriento-temaj fonoj, originalaj kaj tradukitaj.

Paperoj de d-ro Ramljak, La Ante Ramljak (1893-1972). Kun prologo de Marinko Ĝivoje. Versojn esperantigis Emilija Lapenna. 80p. Ilus. 17cm. 3,— gld. Poemoj kaj diverstemaj fragmentoj el la postlasaĵo de konata jugoslavia esperantisto.

Profeto, La (1934). 31p. 15cm. Broŝ. 0,60 gld. "Paĝoj el la hungara laboristtendenca belliteraturo" versaj kaj prozaj.

Paperoj de Wappers, La Carlos Wappers (1898-1964). 128p. 18cm. 4,80 gld. Wappers estis esperantista originalverkisto, kiu tre malmulton publikigis dumvive. Post lia morto, iuj amikoj aperigis la jenan kolekton, kiu enhavas interesajn prilingvajn kaj prisciencajn artikolojn, krome kelkajn noveletojn, el kiuj kelkaj estas aparte interesaj pro la aŭtoraj inventemo kaj stilefektoj.

Rakontoj kaj poemoj Ĝ. Ĥalil' Ĝibran'. El la araba tr. Georgo Abraham (1972). 150p. Ilus. 22cm. 10,80 gld. Poeziaj prozaĵoj kaj prozformaj poeziaĵoj de la monde konata libana verkisto.

Ridu per Esperanto (1973) T. Sekelj. 55p. 17cm. Broŝ. 5,40 gld. Humuraj anekdotoj kaj karikaturoj primovadaj.

Sovaĝa herbaro Lusin (1881-1936). 65p. 19cm. 1,— gld. El la ĉina tr. S.J. Sü. Eld. Ŝanhaja Esperantista Ligo, 1951. Noveletoj, poemoj, skizoj kaj skeĉo de unu el la grandaj figuroj de la monda literaturo: Lusin.

Miksita literaturo

Specimene (1962) Henri Baupierre. 132p. 19cm. 5,10 gld. Parodiario primovada.

Tartarin de Taraskono Alphonse Daudet (1840-1897). Bind. 5,70 gld. Fantazia satiro, franca.

Tornistro, La; n-ro 1 (1973) Redaktis Ergoto de Bonaero. 48p. Ilus. Ksero. 21cm. 5,— gld. Tradukoj, recenzoj kaj artikoloj, seriozaj kaj amuzaj, novaj kaj reprisitaj.

Tornistro, La; n-ro 2 (1974) Red. E. de Bonaero. 48p. Ilus. 21cm. 5,— gld. Nova miksa sortimento laŭ la maniero de la unua numero.

Verdaj donkiĥotoj (1933) J. Baghy (1891-1967). 221p. 17cm. 2,40 gld. Humuraĵoj primovadaj.

Verkoj de Heinrich Heine en Esperanto (1973). A. Holzhaus. 317p. 25cm. Bind. 17,70 gld. Dulingva kolekto de poemoj kaj prozaĵoj de Heine, kun Esperanto-tradukoj prenitaj el Esperanto-gazetoj de post 1889.

BIBLIOGRAFIO; HISTORIO KAJ KRITIKO PRI BELARTO

(Vidu ankaŭ sub la rubriko "Geografio" iujn verkojn pri la belartoj de difinitaj landoj, kaj sub "Biografio".)

Alfabeta katalogo de Internacia Esperanto-Muzeo Vieno: A-L 462p. Bind. 47,40 gld.

Bibliografio de Internacia Lingvo (1929) P.E. Stojan (1884-1961). 560p. 23cm. Bindita. 56,— gld. La bibliografia ĉefverko de interlingvistiko, kun unupaĝa aldono de R. Hauptenthal. Fotorepreso 1973.

Bibliografio de la beletraj tradukoj de jugoslaviaj verkistoj en la Esperanta gazetararo (1964) M. Ĝivoje. 32p. ofs. 25cm. 1,80 gld. En du partoj A. Poezio kaj B. Prozo, ambaŭ alfabeto laŭ aŭtoro.

Bibliografio

Bibliografio de la Internacia Lingvo en Jugoslavio, II: 1954-1967 (1967) M. Gjiwoje. 59p. 24cm. 1,62 gld. Parte en la serbokroata, iomete laŭtema.

Catalogi kunsttalen Vol. I: E-libroj en la Universitato de Amsterdam. 338p. 24cm. Broŝ. 27,30 gld. Vol. II: E-periodaĵoj en la sama Universitato. 56p. 24cm. Broŝ. 6,90 gld. Eldono de la Universitato.

Decimala katalogo Internacia Esperanto-Muzeo Vieno (1957). 463p. 29cm. Bind. 30,36 gld.

Disfloro de nacia vivmaniero en Uzbekistano
24p. 15cm. Broŝ. 1,02 gld.

Dua gvidlibro de ezopologio Esperanta, La Hukuta-Masao. 106p. 21cm. 4,26 gld. Ilus. Kompara studo pri la Esperanto-tekstoj de ezopaj fabloj fare de Nakagaki-Koziro kaj K. Ossaka, kun japanlingva komentario.

Enkonduko en la Libroskiencon de Esperanto Reinhard Hauptenthal. 44p. 21cm. 3,90 gld. Por iu, kiu volas profundigi en la studon de pri-Esperanta temo, ĉi tiu verketo estas tre utila dank'al abunda bibliografio kaj komentario, kiun la aŭtoro pretigis: ĝi enhavas bibliografiajn informojn pri historio, lingvo, interlingvistiko, literaturo kaj gazetaro de Esperanto.

Esperanto and international language problems: A research bibliography 3a eld. 1972. Humphrey Tonkin. 23p. 22cm. 2,82 gld. Anglalingva gvidlibreto por seriozaj studentoj pri Esperanto kaj la lingva problemoj.

Hejmo de la franca arto en Prago (1968) 8p. Ilus. 21cm. Broŝ. 0,90 gld. Kun franclingva resumo. Pri francaj pentraĵoj en la praga Nacia Galerio.

Katalog over interlingvistisk litteratur i Universitetsbiblioteket i Oslo (1973) T.A. Høeg. 88p. 23cm. Broŝ. 8,10 gld. Decimala katalogo pri 667 eroj, kun indeksoj pri nomoj kaj temoj.

Kien la poezio? Vidu ĉe "Poezio".

Kio estas tankao? Vidu ĉe "Poezio".

Bibliografio

Konciza komentario pri "Faŭsto" Butin. Vidu ĉe *Teatraĵoj*.
Kvin dokumentoj pri literaturo kaj arto Maŭ Zedong. 0,25 gld.

Literaturo en japana Esperanto-movado (1946-1972) (1973) N. Asahiga kaj Y. Mine. 16p. 21cm. Broŝ. 1,80 gld. Ĉi tiu dua bibliografia kajero registras 392 esperantaĵojn kaj tradukojn el Esperanto, verkitajn kaj/aŭ eldonitajn en Japanujo.

Nederlanda bibliografio; bibliografio pri la tradukaĵoj el la nederlanda literaturo (1909-1972) P. De Smedt. 240p. 16x21cm. 10,- gld. Kun listoj ordigitaj laŭ aŭtoroj, tradukintoj, revuoj kaj ĉefvortoj de titoloj, kaj kun enhavtabelo.

Noo Mikami. Ilus. 15p. 21cm. Broŝ. 0,78 gld. Pri japana versdramo.

Norvega bibliografio (1964) Lars Kåre Hunnes. 39p. 21cm. Mimeo. 1,30 gld. Bibliografio pri norvegaj literaturaj tradukitaj en Esperanton, kun aldono pri norvega scienca literaturo en Esperanto aŭ kun Esperanta resumo.

Portugala literaturo 26p. 0,50 gld. Historio.

Prahistoria arto Da Silva. 16p. Ilus. 0,50 gld.

Religia literaturo en Esperanto Karl-Olof Sandgren. 35p. plus aldonoj. Mimeo. 4,20 gld. Katalogo.

BIOGRAFIO

(Laŭ personoj)

Barbosa, Rui (1849-1923) (1952) Fernando Nery. El la portugala tr. Jozefo Roels. 293p. kaj 10 tutpaĝaj ilustraĵoj. 22cm. broŝ. 5,50 gld. Biografia eseo pri la granda brazila juristo, oratoro kaj politikisto kun multaj liaj citaĵoj.

Birgitta, Sankta (Vidu ĉe *Kredo, Floroj, Dinamito*)

Blicher M. (1884-1963): El mia esperantista vivo 16p. Ilus. Ofset. 21cm. Broŝ. 3,24 gld. Anekdotaĵoj de dana esperantisto.

Biografio

Braga, Iŝmael Gomes (1971) Z. Wantuil. 41p. 18cm. 1,68 gld. Biografio de la konata brazila spiritisto kaj Esperanto-aktivulo (1891-1969).

Coarasa, V.M.: Hispana liriko Tomás Buesa Oliver. El la hispana tradukis F. de Diego (1973). 8p. Ilus. 22cm. 0,60 gld. Biografieto de la poeto Veremundo Mendez Coarasa (1898-1969) kun traduko de unu poemo.

Galileo Galilei (1948) Bento de Jesus Caraça. El la portugala trad. Manuel de Freitas. 62p. 20cm. 1,70 gld. Krom la hontinda verdikto de la Inkvizicio, kiu devigis Galileon forĵuri la heliocentrismon, tiu verketo pritraktas la vivon de la granda scienculo, kaj ankaŭ la skolojn kaj teoriojn, kiuj antaŭis aŭ sekvis la esplorojn de Galileo.

Gandhi, Mahatmo H. Rohden. El la portugala trad. D.P. de Souza (1972). 183p. 19cm. Broŝ. 5,70 gld. Ĉi tiu brazila biografio de Gandhi donas la atenton, laŭ la subtitolo, ĉefe al "ideoj kaj idealoj de mistika politikisto".

Gandhi, Vivo de (1967) Édmond Privat. 168p. 19cm. 6,90 gld. 8 bildoj. Ilustrita biografio de Gandhi, simbolo de la paca rezistado kontraŭ perforto.

Godelieve, la nobelino de Gistelo (1960) F.R. Boschvogel. 35p. 21cm. 0,75 gld. Pri flandra sanktulino en la 11-a jarcento.

Ho Chi Minh: Anekdotoj de vojaĝo, aŭ: Prezidento Ho Chi Minh rakontas . . . T. Lan. 95p. Ilus. 19cm. 1,50 gld. Rerakontitaj epizodoj el la vivo de la vjetnama gvidanto inter 1920 kaj 1945.

Ho Chi Minh, Anekdotoj pri la vivo de (1960) Tran Dan Tien. Trad. Nguyen Minh Kinh. 130p. 3,20 gld. Kun pluraj ilustraĵoj.

Ho Chi Minh: Kun Onklo Ho Diversaj aŭtoroj. Tr. el la vjetnama 398p. 19cm. 4,20 gld. Kolekto de memoraĵoj, impresoj kaj priskriboj de tiuj, kiuj laboris kun Ho Chi Minh. Eld. 1972.

Ho Chi Minh, Prezidanto (1970) 152p. 19cm. 1,56 gld. Resuma biografio eldonita de Fremdlingva Eldonejo en Hanojo.

Ho Chi Minh, Prezidanto; Respektiginda gvidanto de la vjetnama popolo (1966) Truong-Chingh. 87p. 19cm. 1,50 gld. Eldono de Fremdlingva Eldonejo en Hanojo.

Kastrioti-Skanderberg, Gjergj: nacia heroo de Albanio (1405-1468). Frashëri. Tradukis G. Muço, V. Pistoli (1967). 47p. 17cm. Broŝ. 3,60 gld.

Komensky, Jan Amos, pioniro de internacia lingvo (1592-1670). (1970). Hube 16p. 24cm. Broŝ. 1,50 gld.

Konttinen, Profetino Helena (1871-1916) K.K. Sarlin (1871-1957). El la finna koncizige tradukis L. Hanhiniemi (1974). 72p. 19cm. Broŝ. 1,80 gld. La vivo, vizioj kaj faroj de finna profetino.

Nikolao Kopernik, Torunano (1972) C. Iwaniszewska. 6p. 21cm. 0,60 gld. Biografieto pri la fama astronomo, precipe rilate lian agadon en sia naskiĝurbo Toruń.

Kredo, Floroj, Dinamito (1963) Ernst Olsson. Redaktis G. Henriksson. 80p. 21cm. Bind. 6,96 gld. Broŝ. 5,10 gld. Tri biografiaj rakontoj pri Brigitta, sanktulino en la Nordo, pri Linnaeus, la reĝo de la floroj, fondinto de la botanika scienco, kaj pri Nobel, la industriisto kaj inventinto de la dinamito, kiu tamen ankaŭ iniciatis la nobelpremiojn.

Linné, Karl von (Vidu ĉe *Kredo, Floroj, Dinamito*)

Mickiewicz, Adam (1955) M. Jastrun. 78p. 21cm. Broŝ. 4,50 gld. La karieroj arta kaj politika de la fama pola poeto.

Nansen, Vivo de (1948) A. de Silva. El la portugala trad. E. da Mota Padrao. 23p. 18cm. 0,50 gld. Skizo pri la vivo de Fridtjof Nansen, la granda nobelpremiita norvego, kies multaj ekspedicioj kaj nobla helpo al suferantoj vekis la atenton kaj admiron de la mondo.

Němcová, Božena 20p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Malgranda monografio.

Nguyen Van Troi: Tiel li vivis (1965) Tran Dinh Van, laŭ la rakonto de la vidvino Fan Thi Kuyen. 105p. 19cm. 0,80 gld. Rakonto pri la pafmortigo de Nguyen Van Troi akuzita pri intenco dinamiti ponton en Suda Vjetnamujo kie estis trapasonta la usona ministro pri Nacia Defendo McNamara.

Nobel, Alfred (Vidu ĉe *Kredo, Floroj, Dinamito*)

Paine, La releviĝo de Tomaso R.W. Morrell. El la angla, 1972. 4p. Mimeo. 21cm. 0,30 gld. Pri brito, kiu ludis aktivan rolon en la usona milito por sendependiĝo.

Papo Pio X beata (1951) A. Halbedl. 110 p. 19 cm. 2,10 gld. Biografio kompilita laŭ la verko de P. Klement Sonntag (1928). J.M.Sarto (1835–1914) estis elektita kiel papo en 1903. Inter katolikaj esperantistoj li estas aparte konata pro sia aproba beno al la gazeto *Espero katolika* jam en 1906.

Patro Pio de Pietrelcina: Kiu estas patro Pio? (1959). Alberto del Fante. El la itala tr. frato Arni F.C. 47p. Fotoj. 21cm. 2,– gld. Biografieto pri romkatolika religiulo (n. 1887).

Pelé, Mi estas (1971) Tr. F. Almada el la portugala. 164p. Ilus. 24cm. Broŝ. 8,70 gld. Aŭtobiografio de Edson Arantes do Nascimento ("Pelé"), la mondfama "futbalreĝo" el Brazilo.

Penn, William, 1644-1718 Privat. 0,90 gld.

Pissaro, Vivo de (1948) Ludovic Rodo. 28p. 18cm. 0,50 gld. Kun 10 ilustraĵoj. Skizo pri la vivo kaj verko de tiu fama impresionisma pentristo, kaj pri lia batalo kontraŭ la nekomprene kaj antaŭjuĝoj de liaj samtempuloj.

Sinha, Lakŝmisvar: Jaroj sur tero (1966) Aŭtobiografio. 116p. plus 10p. da glosoj kaj biografiaj notoj. 19cm. Broŝ. 7,50 gld.; bind. 11,50 gld. Rakonto pri la interesa kaj ŝanĝoplena vivo de plenalora reprezentanto de la kulturo de sia lando, disĉiplo kaj amiko de Rabindranath Tagore.

Suzuki Ŝin' iĉi: Por la feliĉo de ĉiuj geknaboj 24p. 19cm. Broŝ. 0,60 gld. Pri la iniciatinto de la eduksistemo "Talento-Edukado" fama pro sia emfazo je muzikludado.

Tito, Biografio de (1954). VI. Dedijer. Trad. Mason Stuttard. 521p. 21cm. Bind. 6,85 gld. 39 ilustraĵoj kaj geografia karto. Tre interesa libro pri la historiaj eventoj depost la 1930-aj jaroj kaj pri la agitita vivo de Tito, kiu, unue per sia obstina batalado por liberigi sian patrujon, kaj poste kiel ŝtatestro de Jugoslavio, aktive influis la politikan evoluon en la mondo.

Trompeter, Wilhelm Heinrich (dua eld., 1973). A. Holzhaus. 152p. Ofs. 22cm. Broŝ. 10,20 gld. Biografio de pionira esperantisto per represaĵo de liaj leteroj kaj presitaĵoj, kun komentarioj.

Zamenhof (2-a eldono 1970) E. Drezen. 49p. Broŝ. Fotorepreso. 2,58 gld.

Zamenhof, aŭtoro de Esperanto (1963) M. Boulton. 268 p. + 48 bildoj. Broŝ. 11,40 gld.; bind. 12,90 gld. Admirinda biografio de Zamenhof kun sufiĉe kompleta historio de la Esperanto-movado.

Zamenhof, A vida de (3-a eld., 1961) Edmond Privat. Portugala traduko de Alberto Bonfin. 174p. 18,5 cm. 3,18 gld.

Zamenhof, El la vivo de Ludoviko (1965) Gösta Henriksson. 16 p. 18cm. 2,– gld. Konkiza biografio de Zamenhof, de lia infanaĝo ĝis la eldono de la unua lernolibro.

Zamenhof: Le Docteur Esperanto Maria Ziolkowska. Edition du Centenaire 1859-1959. Laŭ la Esperanta teksto de Isaj Dratwer. Franclingven tradukita de A. Ribot. 165p. 19cm. Broŝ. 4,75 gld. Bind. 9,60 gld.

Zamenhof, Life of (3-a eld., 1963) Edmond Privat. Trad. Ralph Eliott. 157p. 16cm. 4,50 gld. Poŝlibro kun aldonaj ĉapitroj pri la strukturo de Esperanto kaj pri la forto de la Esperanto-movado.

Zamenhof, Ludwik E. Privat. El Esperanto trad. T. Raimar. 101p. 19cm. Broŝ. 1,80 gld. Norvega traduko de la verko *Vivo de Zamenhof*.

Zamenhof, Vivo de Edmond Privat (1889-1962). 134p. 19cm. Ilus. Bind. 5,10 gld. Unu el la unuaj, ĉiam ŝatataj biografioj de Zamenhof en klasika lingvo: krom pri la vivo, la aŭtoro skribas en ĝi pri la filozofiaj, prilingvaj kaj primovadaj ideoj kaj agadoj. La libro estas la rezulto de detala studo, parte surloka.

Zola, Vivo de (1947) A. da Silva. El la portugala trad. Manuel de Freitas. 106p. 19cm. 2, - gld. Pri la konstanta batalo de Zola, nekomprenata kaj misjuĝata de la samtempuloj, kiel naturalisma aŭtoro kontraŭ hipokriteco kaj mensogemo en la socio, kaj pri la kuraĝa defendo de la senkulpe kondamnita franca-juda oficiro Dreyfus.

FILOZOFIO

Ekzistencialistaj herooj...de Sartre C. Llech-Walter. 71p. 18cm. Broŝ. 3,- gld. Dulingva (franca-Esperanta) studo laŭ ses plej konataj verkoj.

Estu homo! Wagner. 97p. 18cm. Broŝ. 1,92 gld. Dikreda moralismo.

Fermentario (1960) Carlos Vaz Ferreira, Urugvajo. El la hispana trad. Manuel Fernández Menéndez. 264p. 21cm. 7,40 gld. Majstroverko de granda urugvajna pensulo. Enhavo riĉa je pensoj kaj ideoj.

Lernolibro de la vivo, La Martin Kojc. El la germana tr. Julia Isbrucker. 111p. 20cm. 3,18 gld. Laŭ la reklamteksto, "ĉiu homo, studanta ĉi tiun libron, povas liberigi sin de malsano, malriĉeco, malfeliĉo kaj senespero".

Libro de Teo, La Okakura Kakuzo (1862-1913). X + 134p. 19cm. Bind. 10,80 gld. La japana filozofio kaj arto profunde kunplektiĝis kun la japana vivmaniero: por pli bone konigi la signifon kaj efikojn de tiu kunplektiĝo, Okakura aperigis jam en 1906 sian plej faman originale anglalingvan verkon, kiun tradukis en Esperanton T. Nakamura.

Mondpercepto de la modernaj natursciencoj (1967). Vidu ĉe 'Scienco kaj Tekniko: diversaj sciencoj'.

Monoteismo kaj pozitiva moralo (1965) E. Gasse. 60 p. 19 cm. 4,20 gld. Kritiko de monoteismo, laŭ la aŭtoro frukto de mistraduko de la Geneza vorto *Elohim*; principoj de laika moralo.

Orienta renesanco, kritikaj konsideroj pri la nuntempa kulturo (1970) H. Fortmann (1912-1970). Tr. el la nederlanda (1972). 56p. 19cm. 3,60 gld. (Serio de Internacia Katolika Informejo, 25). Psikologia analizo de orientaj mondkonceptoj rilate al ilia ebla renkontiĝo kun la racionalisma kaj objektivisma pensmaniero de la okcidento.

Revolucia homo en la kosma epoko, La Brooke. 16p. 20cm. Broŝ. 0,30 gld.

Socia filozofio. I, Universalaj principoj (1955) José Cerato. 16p. 17,5 cm. 0,40 gld. Unua kajero.

Tio, kion mi kredas (1962) Jean Rostand. El la franca trad. Pierre Berlot. 39p. 19cm. 1,80 gld. Sincera, optimisma laŭdo pri la racio, toleremo kaj demokratio.

Kosmologio Martinus

Ĉirkaŭ la naskiĝo de mia misio Martinus (1890-). 61p. 19cm. Bind. 7,32 gld. Pri la okazaĵoj, kiuj instigis Martinuson verki, kaj informo pri iliaj praktikaj sekvoj.

Folioj el la bildolibro de Dio Martinus (1890-). 101p. 19cm. Bind. 7,32 gld. Poezia verko, en kiu amoplena priskribo de transiro inter tago kaj nokto bele ilustras la idealan manieron de renkonto inter du homoj.

Ideala nutraĵo, La Vidu ĉe *Scienco: medicino*.

Idolo plej longe vivanta, La Martinus (1890-). 100p. 19cm. Bind. 4,70 gld. Ĝia temo estas la limigita vivkoncepto de la nuntempa homaro, kaj la grandiozo de la naturo. La idolo plej longe vivanta estas la homo mem.

Informilo pri la spiritscienco de Martinus (1953) 25p. 25cm. Ilus. 1,50 gld. Mallonga informo pri la instruo de Martinus.

Filozofio

Inter du mondepokoj Martinus (1890—). 108p. 19cm. Bind. 4,70 gld. Traktado pri la vojo, kiu kondukas tra tiu transira situacio inter primitiveco kaj humanismo, en kiu vivas la nuntempa homaro.

Internacia mondregno kreiganta Vidu ĉe *Politiko*.

Kio estas la vero? Martinus (1890—). 102p. 19cm. Bind. 4,70 gld. Kun tiu fama demando kiel elirpunkto la libro montras, ke kapablo kompreni la veron de la vivo kaj akiri realan scion pri ĝi estas demando pri evoluo.

Objektiva vivkoncepto (1963) I. Schleicher. 27p. 21cm. Broŝ. 0,60 gld. Simpla enkonduko al la ideoj de Martinus, kun multaj desegnaj klarigoj.

Pasko Martinus (1890—). 80p. 19cm. Bind. 7,80 gld. En tiu libro la mondhistoria pasko-evento estas analizita en ne-ortodoksa maniero.

Sorto de la homaro, La Martinus (1890—). 111p. 19cm. Bind. 4,70 gld. Rigardo en la principojn, laŭ kiuj evoluas la homaro, kaj skizo pri la nova kulturo rezultanta de la nuntempa kulturkrizo.

RELIGIO

(Vidu ankaŭ la listojn de terminaroj kaj de kantoj/himnoj)

Atendata l'Savanto Macubara. 39p. Ilus. 19cm. Broŝ. 1,98 gld. Japana libro, laŭ la titolpaĝo "pri reveninta Savanto".

Bahá'í: La mondkredo por la nuntempa homaro Arthur L. Dahl. El la angla tr. Roan Orloff Stone (1972). 22p. 22 x 9 cm. 1,26 gld. Celoj, historio, instruoj kaj administra sistemo de bahaismo.

Bahaismo, la religio de paco Lidja Zamenhof, 7p. 24cm.

Biblia studplano — por helpo dum la kvietaj tempetoj antaŭ Dio. Eld. Sveda Sekcio de KELI. 2a eld. 1971. 16p. 14cm. 0,72 gld. Po unu teksto por ĉiu tago de la jaro.

Budhismo, La A. de Silva. 23p. 17cm. 0,50 gld. Enkonduko.

Religio

Cent himnoj (1966) 64p. 21cm. Ilus. 4,38 gld. Kolekto de precipe norvegaj-danaj himnoj kristanaj, tradukitaj de Hans Amund Rosbach. Sen muziko.

Ĉiama memor-kalendaro (1970). E. Quentin. 48p. 21cm. Broŝ. 2,04 gld. Kalendaro pri datrevenoj de gravaj religiaj k.a. eventoj, kun indekso.

Ĉies Fatimo (1965) 54p. 16cm. 1,85 gld. Gvidlibro por katolika pilgrimanto kun 8 ilustraĵoj kaj mapo.

Ĉu estas vere, ke la katolikismo malestimas la korpon? (1962) Georges Taymans 24p. 21cm. 0,75 gld. El la franca tradukis Leotado De Ruyver.

De la dubo al la kredo (1960) A. del Fante. 32p. 21cm. 0,75 gld. El la itala tradukis Arni Decorte kaj Leotado De Ruyver. Impresoj notitaj en 1930 okaze de vizito al San Giovanni Rotondo kaj Pietrelcina, kun pluraj fotoj de Patro Pio.

Dokumentoj el Romo 1-5 3,— gld.

Dokumentoj el Romo 6 3,— gld.

Dokumentoj el Romo 7: Dogma konstitucio pri la eklezio en la nuntempa mondo (1971) Eldonis Internacia Katolika Informejo. 52p. 21cm. 3,— gld. La originalo aperis en 1965. Trad. H. Roosen kaj H.G. Wannemakers.

Dokumentoj el Romo: 8-11 (1965, 1968, 1970, 1971). Tr. H. Roosen kaj H.G. Wannemakers (1973). 44p. 21cm. 2,70 gld. Entenas i.a. la enciklikojn *Humanae Vitae* kaj *Mysterium Fidei* kaj bibliografion de oficialaj katolikaj dokumentoj en Esperanto (1920-1971).

Ekumenismo kaj internacilingva problemoj (1973) Georgo J. Korytkowski. 174p. 20cm. Broŝ. 8,70 gld. Historia kaj aktuala superrigardo al la laboro de esperantistoj por la ekumena movado. Kun iom koncizigita angla traduko.

Ekrigardo al Budhismo R.L. Soni. 0,60 gld.

El la Biblio. Ĉapitroj el Psalmo, Sentencoj, Predikanto. Trad. L.L. Zamenhof. 48p. 14cm. 0,30 gld.

Religio

- Enkonduko en la..... spiritisma doktrino** 39p. 19cm. 2,04 gld.
- Esenco de kvakerismo, La** Gerald K. Hibbert (1872-1957). Trad. Marek Waisblum. 37p. 17cm. 0,90 gld. Mallonga kaj klara respondo al la demando, kio estas Kvakerismo.
- Esperanta traduko de la Malnova Testamento, La** (1958) D.B. Gregor. 58p. 21cm. 2,10 gld. La verkinto komparas 518 tekstojn el la Zamenhofa traduko kun pluraj alilingvaj.
- Esperanto au service du Christ, L'** A. Ribot. 20p. 14cm. 0,60 gld. Franclingvaj informoj pri la kristana Esperanto-movado.
- Evangelio laŭ spiritismo** (1864) A. Kardec. El la franca tradukis I.G. Braga (1947). 425p. plus aldonoj. 19cm. 8,10 gld. Klarigoj pri la evangelio, laŭ spiritisma vidpunkto.
- Filoj de Dio, adorantoj de Dio** (1963) Hideo Haga. 284p. 26cm. Ilus. Bind. 18,— gld. La aŭtoro estas renoma fotografo kaj per siaj centoj da fotoj prezentas en ĉi tiu volumo la plej diversajn aspektojn de la vivo de oomotanoj kaj la komunumoj de Oomoto. Antaŭparolo, fotoklarigoj kaj vortoj de la gvidantoj de Oomoto estas esperantigitaj de Nakamura T.
- Fonto de l'Vivo** (1949) Biblia citaĵaro. Komp. G. Furhammar. 64p. Ofs. 15cm. 1,50 gld.
- Greneroj por la animo, dua parto** (1973) S.V. 23p. 15cm. Broŝ. 0,90 gld. Ses edifaj artikoletoj represitaj el *Dia Regno*.
- Himnaro Esperanta** (5-a eld. 1966) Komp. Montagu C. Butler. 215p. 16cm. 3,30 gld. Kolekto de 280 kristanaj himnoj, multaj el angla fonto kaj 56 kun muziko.
- Homaranismo de Zamenhof, La** Van Kleef. 34p. 16cm. Broŝ. 1,50 gld.
- Hombildo de diversaj religioj, La** (1970) Div. aŭtoroj. 36p. 21cm. Broŝ. 1,80 gld. Referaĵoj el la unua Interreligia Kunveno Esperantista, en Helsinko, 1969.

Religio

- Imitado de Kristo, La** en kvar libroj (1471). Thomas Hemerken à Kempis (1379-1471). El la latina esperantigis W. van Zon (1952). 335p. 16cm. Bind. 4,20 gld. Lukse bind. 5,58 gld. La plej fama libro de la nederlanda aŭtoro, kiu ekhavis post la Biblio la plej multajn tradukojn kaj represojn el ĉiuj libroj en la mondo. Sole en Britujo aperis 6 000 eldonoj.
- Imperativoj de la vivo** H. Rohden. 156p. 2,70 gld. La filozofio de Kristo por la ĉiutaga vivo.
- Jen estas helpo por vi** (1965) "Kristana Venkanto" (pseŭd. de usona pastro) 56p. 20,5 cm. Ofset. 0,50 gld. La broŝuro celas helpi al homoj trovi la vojon al Kristo.
- Johano Vianney, la sankta pastreto de Ars** (1958) 32p. 17,5cm. 0,75 gld. La rimarkinda kaj gracoplena vivo (1786-1859) de sankta paroĥestro en la franca vilaĝo Ars.
- Kaj tamen Dio estas amo** F.W.A. Korff. 29p. 19cm. 1,25 gld. Tradukita el la nederlanda de W. Versteeg-Graftdijk. Edifa, biblistuda verko.
- Kial mi kredas je l' Islamo?** Mahmud. 15p. Broŝ. 0,30 gld.
- Kio estas la baha religio . . .** (1969) 60p. 18cm. 2,10 gld. Enkonduko kun multaj citaĵoj el la bahaaj sanktaj tekstoj.
- Kio estas spiritismo?** Allan Kardec. 158p. 19cm. 4,20 gld. El la portugala tr. L.C. Porto Carreiro Neto kaj Ismael Gomes Braga. "Enkonduko en la scion pri la nevidebla mondo per manifestigoj de la spiritoj, enhavanta la resumon de la principoj de la spiritisma doktrino kaj respondon al la ĉefaj kontraŭdiroj."
- Konsiloj kaj demandoj** (1968) 29p. 17cm. 1,— gld. Konsilaro el la Religia Societo de Amikoj (kvakeroj), precipe en Britujo, tradukita de Ann Kinghorn kaj Montagu C. Butler.
- Kredo al Dio en la atomepoko** (1965) Gustav Lundberg. 46p. 19cm. 3,— gld. El la sveda tradukita de Erik Carlén. Moderna naturscienco kaj kristanismo, prezentita de sveda teknika profesoro.

Religio

Kristana agendo Franciscô Cândido Xavier (1910-). 102p. 18cm. 3,75 gld. El la portugala tr. A.K. Afonso Costa. Kolekto da aforismoj pri la moralo de Jesuo Kristo, "ne nur por spiritistoj, sed ja por ĉiu kristano, por ĉiu pensulo". Brazila.

Kristana kulturlaboro (1957) Erik Hj. Linder. 32p. 18,5cm. 0,80 gld. El la sveda tradukita de K.O. Sandgren. Prelego en kunveno de la svedaj sendependaj eklezioj, farita de konata sveda literaturisto.

Kristanismo kaj patriotismo Vidu ĉe *Politiko*.

Kristo interne de vi (1958) 80p. 22cm. 3,- gld. 27 + 9 + 9 lecionoj el la angla tradukitaj de A.M.-F. Onnen-Onnen. Verkon el la medio de liberaj katolikoj, kiu prezentas spirirtisman vidpunkton.

Kvinteto (1964) 62p. 23cm. 1,90 gld. Vortoj de Nao, Onisabro, Sumi, Hidemaru, Naohi (de Oomoto), esperantigitaj de Nakamura T.

Latentaj nombrofenomenoj de la Sankta Skribo (1962) "Kling-Klang" (pseŭd. de ĉeĥa pastoro). 16p. 21cm. 1,60 gld. Klopodo prezenti la nombrovaloron de bibliaj vortoj per diagramoj kaj bildoj.

Leo Tolstoj kaj la montprediko (1964) Hendrik van Oyen. Trad. de D.P. Faux. 14p. 20cm. 0,50 gld.

Letero de kvakero Tucker. 15p. 18cm. Broŝ. 0,30 gld.

Letero el la transcendo (1952) A.B. Krempel. El la germana tradukis M.M. Mielert. 36p. 19cm. 1,20 gld. Letero rivelanta la misterojn de la infero laŭ atesto de damnita animo.

Libro de la medioj, La (1861). Kardec. Trad. el la franca (1964). 430p. 19cm. Broŝ. 7,02 gld. Unu el la klasikaj libroj de

Libro de la spiritoj, La (1857). Kardec (H.D. Rivail, 1804-1869). Trad. el la franca (1946) 531p. 19cm. Bind. 7,02 gld. Unu el la klasikaj libroj de spiritismo.

Librokonstantaĵo de fila pieco, La Konfucio. 23, 12p. 19cm. 0,48 gld.

PAŬLO KAJ STEFANO



Mediuma verko,
psikografie ricevita
de Francisco Candido Xavier,
en traduko de
D-ro L. C. Porto Carreiro Neto, akademiano.

Trafa biografio
pri la amiko de l'nacianoj:
Sankta Paŭlo
kaj pri Sankta Stefano,
la unua martiro de naskiĝanta kristanismo.

Petu katalogon al

FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA
Rua Souza Valente, 17 - ZC 08
BR-20000 Rio de Janeiro , Brazilo

Mendebla ĉe U.E.A.

Mi amis junulinon Vd. ĉe "Miksita literaturo".

Neelmezurebla, ni laŭdegas Vin Preĝoj por ĉiu kristano en la spirito de la Ĥrisostoma liturgio kaj de Nenomitaj (1962). Tradukita de A. Stalherm. Kompilis W. Becker kaj G. Frei. 32p. 15cm. Plaste bind. 1,98 gld. Eŭkaristiaj preĝoj, jam eldonitaj en 19 diversaj lingvoj.

Nobla Korano, La (2a eld.) Trad. Chiussi. 654p. Bind. 35,— gld. La sankta libro de Islamo. Tradukita el la araba originalo, kiu aperas paralele kun la Esperanta teksto. Kun detalaj klarigaj notoj kaj luksa artleđa bindo.

Nova Testamento, La (1969) Trad. Brita Biblia Komitato. 358 p. 12cm. Plaste bind. 4,50 gld. Poŝformata.

Nova Testamento, La Kajeroj 1 kaj 7. Kajero 1: ĝenerala enkonduko, la Evangelio laŭ Mateo. 23cm. 8,70 gld. Kajero 7: Korintanoj 1 kaj 2; 80p. 22cm. 3,— gld. Eldono de la Internacia Katolika Informejo. Tekstoj kun multaj referencoj kaj komentoj.

Nova Testamento, La Kajero 8. 100p. 22cm. 4,50 gld. Galatoj, Efesanoj, Filipianoj, Koloseanoj, 1 kaj 2 Tesalonikanoj. Eld. Int. Katolika Informejo. Kun referencoj kaj komentoj.

Nuna stato de l'evoluismo, La (1950) J. Rostand. 110p. 20cm. Bind. 3,— gld.

Pacon, sinjoro! Vidu ĉe "Poezio".

Paroloj al miaj gefiloj W. Francini. 40p. 0,50 gld.

Patro, la horo alvenis Ekumenaj preĝoj (1966). El la germana tradukis Kurt Schweizer. 56p. 1,75 gld. El kristana trezorejo de diversaj konfesioj Paul-Werner Scheele elektis pli ol 300 preĝojn en la germana eldono. K. Schweizer faris modestan elekton.

Perspektivoj. Aperturoj por la menso kaj por la koro (1963). F. Lelotte. El la franca tradukis L. De Ruyver, reviziis H.G. Wannemakers. 57p. 19cm. 0,80 gld. Konsideroj kaj meditoj pri la vivo kaj la universo.

Populorum progressio (1967). Papo Paŭlo 6. La tradukon prizorgis J.A. Tuinder. 24p. 21cm. 0,45 gld. Encikliko de la 26a de marto 1967 pri la evoluo de la popoloj.

Prajnaparamita hrjdaja sutro El la sanskrita tr. Ikeda Hiroŝi. 27p. 21cm. 2,10 gld. Budhana prateksto pri la ideo de 'ŝunjato', kun antaŭparolo, notoj kaj sanskrita originalo.

Preĝlibro por spiritistoj Kardec. 79p. 16cm. Broŝ. 0,30 gld.

Preĝo, SOS kaj sekureco (1963) Margareta Malmgren. 20p. 18,5 cm. 1,50 gld. El la sveda tradukita de K.O. Sandgren. Matenedifoj en Sveda Radio, faritaj de studrektorino de sveda malalteklezia unuiĝo.

Preparoj al Diservo (1967) H.A. Rosbach. 88p. 21cm. 4,32 gld. Biblia teksto kaj pripenso por ĉiu tago ekde semajno antaŭ Kristnasko ĝis Pasko. Helpo por mediti pri la Vorto de Dio. Ofsetpreso.

Pri sentemo por ĉies situacio (1972) Charles F. Carter. El la angla tr. Marjorie Boulton. 48p. 21cm. 3,78 gld. Unu el la prelegoj Swarthmore de la Societo de Amikoj (Kvakeroj).

Reala vivo de nia sinjoro kaj savinto Jesuo Kristo, La (1947). Dragona. 123p. 23cm. Broŝ. 3,84 gld.

Rolo de la virgulino Maria en nia katolikismo, La (1962) F. Lelotte. El la franca tradukis L. De Ruyver. 16p. 21cm. 0,75 gld. Konsideroj pri Maria kiel patrino de Kristo, kiel kunsavantino kaj disdonantino.

Sankta Biblio, La (1966) 998p. 18,5cm. Plaste bind. 11,40 gld. Lukse bind. 36,— gld. La Malnova Testamento laŭ la masora teksto tradukita de Zamenhof kaj la Nova Testamento laŭ la teksto de Nestle tradukita de la Brita Biblia Komitato. Ambaŭ reviziitaj de ĉi tiu komitato kaj eldonitaj de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo, Londono.

Sankta Biblio, La (1967) 771p. 9cm. Bind. 6,— gld. Fotorepreso de la Malnova Testamento laŭ la eldono de la Brita kaj Alilanda Biblia Societo. Miniaturo, sen lupeo malfacile legebla.

Sankta eŭkaristio La ĉefaj preĝoj (1966). 56p. 16,5cm. 1,25 gld. Laŭvorta traduko de la latina liturgio por komuna uzado.

Religio

Sankta meso (1966) 16p. 21cm. 0,85 gld. Kun meskantoj komponitaj de Kurt Schweizer por la 31a IKUE-kongreso en St. Gallen en 1966.

Scienco kaj kvakerismo, La (1969) K. Lonsdale. Trad. J. Leather. 8p. 17cm. 0,09 gld. Verketo de profesorino pri kemio en la Universitato de Londono.

Sovaĝaj plumoj (1963) L. Hodgkin. Trad. N. Curtis. 18p. 21cm. 1,25 gld. Rakonto pri la vivo de kvakeroj en iama sovaĝa regiono de Ameriko, el libro *Quaker Saints* eldonita en 1917.

Studoj kaj klarigoj; vol. 1. 20,5cm. 1,10 gld. Religia prahistorio de la mondo; mirakloj en Lourdes; ekumena koncilio; sankta meso; toleremo kaj netoleremo.

Studoj kaj klarigoj 2 Internacia Katolika Informejo. Nenumerita. 20cm. Broŝ. 1,80 gld. Artikoloj historiaj kaj doktrinaj pri la Biblio, precipe la Nova Testamento.

Tiel parolis la Budho kaj liaj disĉiploj T.T. Anuruddha (komp.) Tr. el la lingvoj palia, sanskrita kaj angla. 98p. Mimeo. 18cm. 2,22 gld. Kolekto de budhismaj versaĵoj kaj sentencoj, eld. en Suda Vjetnamujo.

Turmentego de la memmortigintoj, La; iliaj nepriskribeblaj suferoj (1970) Almerindo Martins de Castro. El la portugala tr. Benedicto Silva. 158p. 19cm. 3,60 gld. Brazila, spiritisma verko.

Unu komuna Internacia Lingvo kaj unu scienca universala religio Nassif Isaac. 56p. 24cm. Ilus. 2,25 gld.

Vizio de la monaĥejo en Kioto, La (1973) Hiuga Y. (1922 -). El la japana trad. Nisida R. 13p. 26cm. Broŝ. 2,40 gld. Pri la inspiro kaj celoj de nova budhana monaĥejo en Kioto.

Voĉo de l' silento, La — kaj aliaj fragmentoj el la "Libro de la oraj preskriboj" Tr. H.P.B. 62p. Mimeo. 21cm. 6,— gld. Elektaĵo el tibeta sankta libro, kies origino troviĝas parte en la antaŭbudha, parte en la postbudha epoko. Kun detala komentario.

Vojo al mondpaco, La 40p. 20cm. Broŝ. 3,18 gld. Kristana reformismo.

Religio

Vojo al Nirvano, La, aŭ la Dhammapado El la palia tradukis T.T. Anuruddha (1973). 94p. 20cm. Broŝ. 2,70 gld. Klasika teksto de Budhismo, kun enkonduko kaj klarigaj notoj.

Vojoj de la eklezio, La (1965) Papo Paŭlo 6. El la latina tradukis William Perrenoud, kunlaboris W. Flammer. 77p. 19,5cm. 3,50 gld. Encikliko *Ecclesiam suam* de la 6a de aŭg. 1964, per kiu vojo la katolika eklezio devas nuntempe plenumi sian taskon.

Teozofia perkoresponda studgrupo tradukis en Esperanton:

H.P. BLATAVSKY, **La voĉo de l' silento**
("The Voice of the Silence")

Ĉi tiu traduko, stencilita kaj libroforme broŝurita (21 x 16½cm), estas disponebla por interesigantoj. Oni mendu ĉe:

Prezo: 4,40 gld.,
ekskluzive de afranko
kaj ekspedokostoj

S-ino A. Miedema-Schram,
Geuzenkade 19/II,
Amsterdam

SCIENCO KAJ TEKNIKO

(Vidu ankaŭ sub la rubriko "Terminaroj")

Agrokulturo kaj bestokulturo

Atakoj kontraŭ ĝardenplantoj (1954) P. Neergaard. 234p. 22,5 cm. Ilus. Bind. 7,50 gld. La unua libro en Esperanto, kiu pri-traktas temojn kiel hortikulturon, plantpatologion kaj plantdamaĝajn insektojn. Riĉe ilustrita per fotoj en la teksto; 9 koloraj aldonoj kompletigas la libron.

El la polvo de la tero (1967) W.F.Rolt. 130p. 18cm. Ilus. 6,48 gld. Pri origino, komponaĵo, strukturo, klasifiko, kultivado de grundo kaj humo, pri graveco de akvo, sterko, grunda ekvilibriĝo. Problemo de monda malsato.

Scienco kaj tekniko

Arkeologio

Elfosadaj trovaĵoj el la distrikto Wedding de Berlin (1974) G. Wettstädt. 68p. 21cm. Broŝ. 7,50 gld. Abunde ilustrita raporto pri elfosado farita en 1973, kun resumo en Esperanto, germana, franca kaj angla lingvoj.

Astronomio

Pri la kometo 1939 IV P/Väisälä; serĉefemerido por 1971-1972 (1970) Liisi Oterma. 9p. 25cm. 2,-- gld. Eld. Astronomia-Optika Societo, Turku, Finnlando.

Biokemio kaj biologio

Elementa Ekologio (1974) C. Støp-Bowitz. 95p. 29cm. Broŝ. 19,80 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Serĉado de la vivo, La (1971) Fujio Egami. El la japana tradukis Kikunobu Matuba. 167p. 19cm. 12,-- gld. Popularaj priskriboj pri lastaj atingoj de biokemio, verkitaj de monde konata sciencisto. Kio estas la vivo? La origino de la vivo kaj la kosmobiologio. La sintezo de la vivo. Ktp. Ilus. per tabeloj, diagramoj.

Volvotigo de amikeco, La Ŝ. Hori. 9,25 gld. Populara.

Botaniko

Planktono kaj mara produktado (1974) E. Balech. 88p. 29cm. Broŝ. 18,90 gld. Kursoteksto el la Someraj Universitataj Kursoj de 1974.

Studoj pri ameloj de legumenoj (1963) Kawamura Sin'itirô. 49 p. 26cm. Ilus. Tabeloj. 6,60 gld. Eld. Agrokultura Fakultato de Kagawa Universitato, Japanujo.

Vivo de la plantoj, La (1957) P. Neergaard (1907-) 126p. 25cm. Broŝ. 7,20 gld. Popularstila prezento.

Dommastrado

Internacia kuirlibro (1971) Johanna Shorter-Eyck. 193p. 21cm. 10,20 gld. 500 receptoj el 100 landoj, aranĝitaj laŭ specoj kaj kun indekso laŭ la samaj rubrikoj. Unupaĝa glosaro.

Scienco kaj tekniko

Ekonomiko

Pri la problemoj de agrikultura kooperigo 0,42 gld. Pekina.

Fiziko

Fundamentoj de elektrokemio kaj elektrodeponado (1968) Samuel Glasstone. Trad. John McCarthy. 124p. 20cm. Bind. 10,50 gld. Sur p. 105-122: Teknikaj terminoj rilate al elektrodeponado.

Geologio

Bela subtera mondo, La (1959) Leander Tell. 95 p. 24cm. 6,48 gld. Popularscienca verko de internacie konata fakulo pri grotoj. Ilustrita per belaj fotoj de naturfenomenoj kaj arheologiaj trovaĵoj en grotoj tra la tuta mondo.

Elementoj de Geologio Vd. ĉe "Terminaroj".

Geologio Internacia, volumo 1 (1968). Div. aŭtoroj. 192p. Ofset. 20cm. 6,60 gld. Artikolaro okaze de 23a Internacia Geologia Kongreso, Prago, 1968.

Geologio internacia, volumo 2 (1972) 144p. 21cm. Ilus. 6,60 gld. Naŭ studoj geologiaj originale verkitaj en Esperanto de diverslandaj aŭtoroj.

Heredoscienco

Mistero de l'sango, La O. Forst de Battaglia. Elgermanigis T. Jung (1933). 156p. Ilus. 15cm. Bind. 4,20 gld.

Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso (1937) P. Neergaard. 55p. 16cm. Broŝ. 0,72 gld.

Inĝenierado

Manlibro pri transporto de fluidaĵoj (1973) J. Manceau. 251p. Ksero. Ilus. 22cm. Ringe broŝ. 18,70 gld.

Kemio

Fundamentaj konceptoj en kemio (1974) S. Kawamura. 78p. 29cm. Broŝ. 17,10 gld. Kursoteksto de la Someraj Universitataj Kursoj 1974.

Kemio internacia Unuopaj ekzempleroj de la revuo *Kemio internacia*, eldonita en Urugvajo kun fakaj studoj originalaj kaj tradukitaj. Vol. 1 (n-roj 1, 2), vol. 2 (n-roj 1, 2, 3), vol. 3 (n-roj 1, 2, 3), vol. 4 (n-roj 1, 2, 3). Ĉiu numero 1,92 gld.

Lingvistiko

Enkonduko en la komputeran lingvistikon (1973) Heinz D. Maas. 50p. Diagramoj. 29cm. 14,10 gld. (Someraĵ Universitataj Kursoj 1972). **Tekniko – Manipulado de lingvaj datenoj – Kompilaĵo de vortolistoj – Aŭtomata frazanalizo – Aŭtomata tradukado.**

Konciza historio pri la kornvala lingvo kaj ĝia literaturo (1969) Geoffrey H. Sutton. 16p. 19cm. Ilus. 2,– gld. Historio pritraktanta mortintan lingvon en Britujo, kies plej proksimaj vivantaj lingvofamilianoj estas la bretona kaj kimra lingvoj.

Matematiko

Kiel uzi la abakon Soroban 36p. 7x18cm. Broŝ. 0,30 gld. Gvidilo por uzi la konatan japanan kalkulilon.

Medicino, higieno, psikologio

ABZ de amo . . . Inge kaj Sten Hegeler. El la dana tr. Ib Schleicher kaj August Weide. 274p. Desegnaĵoj. 25cm. Bindita per ledimita plasto. 33,78 gld. Enciklopedio pri la seksa vivo, por maturaj paroj en la aĝo de 30 ĝis 50 jaroj.

Anatomio de la homa korpo (1972) T. Nakayama. 52p. Mimeo. 29cm. Broŝ. 15,– gld. Kursoteksto de Someraĵ Universitataj Kursoj 1972.

Arto de memdisciplino, La: Psikagogio (1926) C. Baudouin. 92p. 17cm. Broŝ. 1,20 gld. (Biblioteko Tutmonda, n-roj 5-6). Pri metodoj etikaj kaj psikaj de memregio: ampleksigita teksto de prelegoj donitaj en la 27a Universala Kongreso.

Arto fariĝi centjara, La (1953). L. Wegener 59p. 19cm. Broŝ. 2,04 gld.

Esenco de la problemo pri la maljuniĝo; la hipotezo pri la vario de la korpa solvaĵo kaj la kolektiĝo de la kompleksigaj substancoj (1968) Dza-Trang. 19p. 27cm. Mimeo. 1,50 gld. Tre interesa por kemiistoj, biokemiistoj kaj medicinistoj.

Geriatrion kaj la ĝenerala zorgo por gemultjaruloj (1971) J.Th.R. Schreuder kaj A.Diatlowicki-Tobi. 43p. 22cm. 2,50 gld. Artikoloj de nederlandaj specialistoj, celitaj por flegistinoj.

Ideala nutraĵo, La Martinus (1890 –). Trad. C. Graversen (2a eld. 1965). 105p. 19cm. Ilus. Bind. 4,70 gld. En ĝi estas montrite, ke la homa nutromaniero evoluas en direkto al malpli da mortigado kaj pli da humaneco.

Kiel kuracas la naturista medicino Scolnik. 28p. 21cm. 2,16 gld.

Konsiloj pri higieno R. Stolle. Trad. J. Borel (2a eld., 1923). 36p. 14cm. Broŝ. 0,30 gld. Konsiloj sciencaj kaj folkloraj, evidentaj kaj malpli evidentaj.

Lernolibro pri oftalmologio Seiiĉi Kato. 124p. 21cm. Ilus. 6,30 gld. La aŭtoro pretigis ĉi tiun lernolibron por siaj lernantoj en Matumoto. Bone redaktita libro, kiu resume prezentas la fakon; tre taŭga por prepariĝi por la medicinaj ŝtatekzamenoj, almenaŭ en formo de lastmomenta resumlibro.

Mortado, La (1900). H. Nothnagel (1841-1905). Elgermanigis B. Selzer. 26p. 23cm. Broŝ. 0,96 gld.

Natura nutrado Ole Ramby. 14p. 0,90 gld.

Pri varmokulturo W. Wunsch. 69p. 22cm. Broŝ. 0,78 gld.

Regado de si mem, La E. Coué (1857-1926) El la franca trad. J. Borel. 56p. 14cm. 0,30 gld. Klarigoj pri la iam fama metodo de Coué por venki malsanojn per aŭtosugestio.

Tagiĝo de la eŭropa medicino en Japanio Komp. kaj tr. Seiho Nishi. 110p. Ilus. 18cm. 8,10 gld. Enhavo: *Komenco de holandaj sciencoj* de Sugita Genpaku (1733 – 1817); samtema novelo de Kikuĉi Kan (1888–1948); artikoloj pri dissekcado en la tiama Japanujo; ktp. (*Ĉiamaj libroj*, n-ro 2).

Scienco kaj tekniko

Pedagogio

Estonta eduko (1929) Ad. Ferrière. El la franca trad. H. Danneil. 72p. 17cm. 0,90 gld. Kritiko kontraŭ la lernejsistemo kun proponoj interesaj laŭ vidpunkto de moderna pedagogio.

Ĝenerala instruado en V.D.R., La (1971) 142p. 19cm. 1,80 gld. Ses artikoloj pri diversaj aspektoj de la kleriga sistemo en la Demokratia Respubliko Vjetnamio.

Instruprogramo de Esperanto por polaj lernejoj (1969) 20p. mult. 28cm. 0,78 gld. (v. ankaŭ 'Program nauczania Esperanto')

Kiel aŭtodidakto al pedagogia scienco Wiczorek. 39p. 21cm. 1,80 gld.

Program nauczania Esperanto (1969) 19p. 21cm. 1,50 gld. Instruprogramo de Esperanto por polaj lernejoj: la pola originalo.

Vjetnama kaj ĝia utiligo por la supera instruado en V.D.R., La (1969) Fremdlingva Eldonejo, Hanojo. 137p. 19cm. 1,- gld.

Retoriko

Retoriko (3a eld. 1971) Ivo Lapenna. 294p. 20cm. Tolbind. 25,- gld. 1-a parto: Lingvo; 2-a parto: Retoriko. Antaŭparoloj de Reto Rossetti kaj G. Waringhien. Verko science redaktita, oportune utiligebla, pense riĉiga.

Stenografio kaj skribsistemoj

Esperanta resumo de la stenologio kaj stenografio de prof. Delfi Dalmau (1961) 15p. 15cm. 0,75 gld. Stenografio unika en la mondo, kiu estas preta por kiu ajn lingvo, ĉar ĝi enhavas sciencon fonetikan internacian alfabeton.

Unesteno, universala Esperanta stenografio J.J. Sturzenegger, H. Matzinger. 294p. 22cm. Bind. 17,40 gld. Originala, ampleksa lernolibro de stenografio Unesteno por komencantoj, progresintoj kaj "parlamentaj" stenografoj, kun multaj ekzercoj kaj ekzemploj.

Universala skribo M. Halvelik. 128p. 21cm. Broŝ. 6,90 gld. Provo de unueca skribmaniero por ĉiuj lingvoj.



unesteno

Universala Esperanta Stenografio

Lernolibro por memlernado aperis sub la aŭspicioj de UEA kaj de EKI.
Mondo, Am Wasser 60, CH-8049 Zürich 10.

Telekomuniko

Evoluo de Telefonio (1928). Inĝ. J. Isbrücker. 62p. ilus. 17cm. 1,00 gld. Pro la verkdato la libreto havas jam historian intereson.

Trafiko

Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj (1973) G. Sredić. Trad. J. Zupanić. 39p. Ilus. 14x21 cm. Broŝ. 3,- gld. Dulingva teksto, Esperanta-serbokroata.

Internacia konvencio pri la fervoja vartrafiko (CIM) de la 25-a de februaro 1961 kun la unuecaj kompletigaj preskriboj (UKP) (1968) Internacia Fervoja Transportkomitato. 75p. 29cm. Mimeo. 3,80 gld.

Zoologio

Bildlibro pri bestoj (1961). Div. aŭtoroj. Trad. W.A. Gething. 72p. 33cm. Bind. 4,80 gld. Bele aranĝita kolora bildlibro pri la tuta animala regno, kun detalaj klarigoj. Aperas la nomoj de pli ol 400 animaloj.

Sekretoj de la marestajoj Petro Giunio. Elkroatigis M. Gjivoje (1960). 140p. ilus. 22cm. 5,- gld. Bela libro pri maraj bestoj kaj plantoj kun koloraj bildoj.

Diversaj sciencoj

Akvo kaj la homo en Hungarlando, La (1966). I. Wisnovszky, E. Almássy. Elhungarigis D. Bözsöny. 48p. Ilus. mapoj. 20cm. 1,20 gld. Preparita okaze de la 51a UK., la libreto tuŝas ĉiun flankon de la akvomastromado de Hungarujo.

Scienco kaj tekniko

Estiĝo de la tero kaj de la homo (1971) Leander Tell. 124p. 19 cm. Ilus. 7,20 gld. Serio Stafeto: Beletraj Kajeroj, 38. Popular-sciencia eseo. Antaŭparolo de C. Stöp-Bowitz.

Kongresa Universitato 43p. 18cm. 0,75 gld. 38a japana kongreso.

Mondpercepto de la modernaj natursciencoj, La (1967) Kontribuaĵoj de ĉiuj prelegintoj en la 10-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo. 170p. 21cm. 9,60 gld. La libro ampleksas vastan gamon de natursciencaj temoj kaj estas riĉe ilustrita per desegnaĵoj, tabeloj kaj la originalaj fotoj de la lunvojaĝoj de la usonaj sondiloj *Ranger*.

Sciencaj studoj (1958) Red. P. Neergaard. 241p. 26cm. Ilus. 15,30 gld. Originalaj esploroj kaj observoj eldonitaj okaze de la 50-jara jubileo de Internacia Sciencia Asocio Esperantista.

Senĝenaj dialogoj (1971) Alberto Fernández (1930–). 200p. 22 cm. 12,50 gld. Ilustrita: 11 tutpaĝaj desegnaĵoj, 5 klarigaj bildoj. Popolarsciencia esploro de fundamentaj demandoj (pri gravito, mikrofamilio, entropio ktp.). Facilaj klarigoj pri natursciencaj fenomenoj per dialogoj. Popolarsciencia eldonserio de "Stafeto", n-ro 4. Leginda ne nur por studentoj, sed ankaŭ por ĉiuj en la nuna, sciencevolua epoko.

Vendreda klubo, La 112p. 22cm, 1,50 gld. Diverstemaj artikoloj.

Verkoj de d-ro Nakamura Nakamura. Bind. 1,20 gld.

POLITIKO

ABC de sennaciismo (1926) V. Elsudo (=V. Kolčinski). 59p. 17 cm. 0,80 gld. La broŝuro "celas iom la teorion plifirmigon de la koncepto pri sennaciismo en nia spirito" kaj klopodas pruvi, ke SAT "staras sur vojo, science-determinita".

Agadprogramo de Komunista Parto de Ĉeĥoslovakio (1968) 112p. 20 cm. 1,25 gld. Dokumento, jam historia, pri la renovigo en ĈSSR, intertempe forlasita de la nuna gvidantaro de KPĈ.

Politiko

Aktualaj problemoj de la nuntempa internacia vivo (1952) Ivo Lapenna (1909–). 144p. 20cm. 10,— gld. Fundamentaj nocioj. Lukto por la paco per juraj rimedoj. Internaciaj organizaĵoj.

Centa datreveno de la naskiĝo de Vladimir Iljiĉ' Lenin: tezoj de Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio (1970) 40p. 26 cm. 0,60 gld. Artikolaro.

Ĉarto de Unuigintaj Nacioj kaj Statuto de la Internacia Kortumo Tr. R. Harry, I. Lapenna, E. Svane. (1970) 93p. 11cm. 2,70 gld. Gravaj dokumentoj en la internacia politiko, legendaj por ĉiuj en la nuntempa internacia socio.

Ĉu interkonsento en la meza oriento? : Voĉoj por kaj kontraŭ Israelo (1968). T. Bijlsma, H. van Praag, M. Suudi. El la nederlanda tradukis W.A. Verloren van Themaat (1973). 61p. Ksero. 21cm. Ringe broŝ. 5,46 gld.

Ĉu socialisma libereco aŭ kapitalisma servuteco? (1950). 31p. 18,5cm. 0,90 gld. Deklaro de Usona Socialista Laborista Partio.

Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio? (1935) E. Lanti kaj M. Ivon. 52p. 21cm. 0,90 gld. Akuzo kontraŭ personkultaj deformiĝoj en Sovetunio sub Stalin.

Ĉu vi scias? Dudek bazaj faktoj pri la Palestina problemo (1967). Sayegh. 8p. 18cm. Broŝ. 1,74 gld.

De japanaj studentoj (1957). 40p. 18cm. Ilus. 1,— gld. Artikoloj pri studentaj problemoj kaj kronologio de la studenta movado postmilita en Japanujo.

Direktivoj de la 23-a kongreso de KPSU por la kvinjara plano de disvolvo de la popola ekonomio en USSR dum la jaroj 1966-1970 (1966). 74p. 20,3cm. 1,50 gld.

Direktivoj de la 24a kongreso de KPSU por la kvinjara plano de disvolvo de la popola mastrumado de USSR dum la jaroj 1971-1975 58p. 22cm. 1,20 gld.

En la nubon ŝi sorbiĝis for! (1973) 62p. 19cm. Broŝ. 3,60 gld. Pri la faligo de atombombo sur Nagasaki en 1945 kaj ties sekvoj; la libro celas infanojn en lernejo.

Faktoj pri Israelo 19p. Ofs. 24cm. Broŝ. 0,60 gld.

Federala sperto (1958) Edmond Privat (1889-1962). 78p. 20cm. 3,- gld. Studo pri du sukcesoj kaj unu malsukceso. Komparo inter Usono, Svislando kaj Ligo de Nacioj. Privat konkludis, ke federacio povas sukcesi nur, se la unuopaj ŝtatoj pretas rezigni absolutan suverenecon favore al la centraj organoj, kiuj tenu decidan potencon en komunaj aferoj.

Germanaj orientaj teritorioj, La: eŭropa problemo (1960). 48p. 17cm. 0,75 gld. Eldonaĵo el la Federacia Respubliko pri la teritorioj nun apartenantaj al Pollando.

Gramdan: la tera revolucio de Hindujo (1969) Div. aŭtoroj. VI, 27p. Mim. 27cm. Broŝ. 1,20 gld. Artikolaro pri la hinda socia-politika Gramdan-movado, kies bazo estas la filozofio de Gandhi.

Hilelismo, projekto pri solvo de la hebrea demando (1901) L.L. Zamenhof. El la rusa originalo tr. A. Holzhaus (1972). 86p. Frontispico. 21cm. 18,72 gld. Paralelaj tekstoj rusa kaj Esperanta. Zamenhof proponis purigi la hebrean religion kaj krei por hebreoj proprajn lingvon kaj teritorion.

Historia kaj filozofia fono de la moderna pacifismo Harold Bing. Esperanta eldono 1971. 28p. 17cm. 1,26 gld. Eld. Internacio de Militrezistantoj.

Infanoj de l' atombombo (1952) Osada arata. 70p. 18cm. Ilus. 2,- gld. Memoraĵoj de geknaboj en Hiroŝima travivintaj la atombomban katastrofon.

IKLS — kio ĝi estas, kiel ĝi funkcias, kion ĝi faras? (1968) 24p. 18cm. 0,78 gld. Eldonita de Internacia Konfederacio de Liberaj Sindikatoj, Bruselo.

Internacia mondregno kreiganta (1962) Martinus. 92p. 19cm. 4,70 gld. La libro celas "doni al la interesita leganto tiun inspiron kaj tiun perspektivon, kiuj estas kondiĉo por estiĝo de harmonio inter li kaj la realaĵoj, sur kiuj povas baziĝi kaj konserviĝi komuna socia mondfeliĉo por ĉiuj homoj".

Junularo (1972) 63p. Ilus. 23cm. Broŝ. 1,62 gld. Artikolaro pri la vivo de junularo en GDR.

Kio estas, kion volas, kion faras la Eŭropa movado (1974) 14p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Ĝeneralaj informoj pri la Eŭropa movado, precipe en Nederlando.

Komentoj al la Komunista Manifesto (1933). 56p. 17cm. 1,20 gld. Komentoj kaj artikolo de la usona socialisto Arnold Petersen; antaŭparolo al la Komunista Manifesto de F. Engels. Tradukis el la angla kaj kompilis T. Veder.

Komunismo kaj la Patrolando Zihertl. Elslovenigis K. Jože (1950). 32p. 14cm. Broŝ. 0,60 gld.

Krimo de l' milito, La (eseo) (orig. 1934). Juan Bautista Alberdi (1810-1884). El la hispana tr. E. de Bonaero (1973). 212p. 15cm. 9,- gld. Argentina verko pri politikaj, historiaj, juraj kaj filozofiaj aspektoj de milito.

Kristanismo kaj patriotismo (1931) L.N. Tolstoj (1828-1910). 111p. 15,2cm. 0,90 gld. Verkita en 1894 de la granda rusa verkisto kaj anarkisto Tolstoj. Pasia akuzo kontraŭ la patriotismo. Kun postparolo de la tradukinto I. Maĉernis.

50a datreveno de la Granda Oktobra socialisma revolucio (1967). 77p. 20cm. 0,75 gld. Tezoj de Centra Komitato de KPSU.

Lanti pri sennaciismo (1961) 15p. 21cm. 1,- gld. Ekstrakto el la verko *Vortoj de kamarado Lanti* (1931).

Leĝoj de la homa socio I (1968) 79p. 13cm. 1,80 gld. Kontraŭmarksisma libreto, verkita en 1934. Tradukita el la serbokroata de U. Ungert.

Lenin kaj la revolucia movado en Latvio (1969) A. Drizulis. 26p. 21cm. 1,- gld. Eld. Komisiono pri Internaciaj Ligoj de Latviaj Esperantistoj.

Liberecana socio, La (1932) G. Bastien. 50p. 17cm. 0,95 gld. Studo, kiu celas "jeti ioman lumon en la pozitivajn kaj praktikajn konceptojn de la liberecana komunismo". Tradukita el la franca de A. Ozre.

Politiko

Manifesto de la sennaciistoj kaj Dokumentoj pri sennaciismo (2-a eldono 1951) E. Lanti (1879-1947). 83p. 16,7cm. 1,20 gld. Fundamenta broŝuro, verkita en 1930, per kiu Lanti pledas por nova organizformo de la mondo. Enhavas i.a. artikolojn pri internaciismo kaj sennaciismo, difinoj kaj aforismoj pri Esperanto.

Ni devas diri ĝin (1947) Hermann Wagner. 84p. 21cm. 1,15 gld. Artikoloj, parolado kaj leteroj de germana antifaŝisto kaj esperantisto, i.a. pri la estiĝ-kialoj de faŝismo en lia lando kaj pri "Esperanto kaj mondkoncepto". Parte germanlingva.

Organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj, La. (1972) Diversaj aŭtoroj. 27p. Ilus. 20cm. 2,70 gld. Originalaj studentaj referaĵoj de la Scienca Esperanto-Rondo en Wrocław, Pollando.

Paco — afero de ĉiuj (1973) 25p. 20cm. Broŝ. 0,60 gld. Dokumentaro eldonita prepare al la Monda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo, en oktobro de 1973.

Potencrilatoj en Eŭropo sur lingva kaj kultura terenoj (1974) Div. aŭtoroj. 16p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Kvin artikoloj pri la socia, politika kaj ekonomika flankoj de la lingva problemo interne de Eŭropo.

Potencrilatoj inter Eŭropo kaj aliaj kontinentoj sur lingva kaj kultura terenoj (1974) Div. aŭtoroj. 29p. 30cm. Broŝ. 0,60 gld. Tri artikoloj pri problemoj de lingva-kultura imperiismo.

Problemoj de ekonomia evoluado (1970). Div. aŭtoroj. 31p. Mim. 23cm. Broŝ. 1,74 gld. Raportoj el Internacia Gandhi-Seminario en 1970, pri ekonomiaj kaj sociaj efikoj de ekonomia disvolviĝo, precipe en evolulandoj.

Problemoj de etnaj minoritatoj en Hispanio (1971) Arangis: U.J. Moritz. 40p. 21cm. 3,50 gld. Lingvaj kaj aliaj aspektoj de la situacio de la kataluna, galega kaj vaska popoloj. Bibliografio.

Sepa Nokto, La (1968) L. Mňačko. El la nederlanda trad. A. Kooij van Holst (1974). 131p. 30cm. Ringe broŝ. 6,60 gld. Memoroj el sep tagnoktoj en Prago, printempo 1968.

Skizo pri la filozofio de la homa digno (1935) Paul Gille. El la franca tradukis E. Lanti. 145p. 18,5cm. 3,90 gld. Anarkiisma traktaĵo. Ideisma kritiko de la materiismo de Marx, de la empiriisma pragmatismo de James kaj de la mistika intuicio de Bergson.

Ŝtato kaj revolucio (1967) N. Lenin (V. Uljanov, 1870-1924). Fotorepreso de la eldono de 1926. 150p. 17,4cm. 4,86 gld. "Marksisma instruo pri la ŝtato kaj taskoj de la proletaro en revolucio". La plej grava verko de Lenin, verkita en aŭgusto-septembro 1917. Ĝi transprenas la marksisman ŝtat-teorion, akcentante la revolucion flankon de la ŝtato; post proleta revolucio, por la transiro de kapitalisma al komunisma socio plue necesas ŝtato, t.e. revolucia diktaturo de la proletaro. Nur en komunisma socio la ŝtato ĉesos funkcii. Tradukita de G. Demidjuk.

Tutmonda ĉefestraro, La. Vojo al mondpaco M.W. Polak. 48p. 19,5 cm. 1,25 gld. Pledo por universala mondregistaro. Kun projekto de mond-konstitucio. El la nederlanda tradukis Tj. Postma.

Vilaĝoj en batalkampoj (1970) Honda Katuiti. Trad. Konisi Gaku. 63p. Fotoj de Huziki Takane, Honda Katuiti. 21cm. Ilus. 2,80 gld. Raportaĵo de japana ĵurnalisto Honda pri vjetnamaj batalkampaj vivoj, aperinta serie en ĵurnalo "Asahi Šimbun".

Vivo de ŝpinlaboristinoj, La (1958). 31p. 18cm. 1,14 gld. Personaj spertoj de japaninoj okupitaj en ŝpin-metio.

Eldonaĵoj de Hanojo

Amika Vjetnamio L. Fox Elangligis Dao anh kha, Nguyen minh kinh (1959). 183p. Ilus. 19cm. Broŝ. 3,60 gld.

Antaŭen sub la glora standardo de la oktobra revolucio (1968) Le Duan. 61p. 19cm. 0,50 gld.

Aspektoj de la gerilo en Vjetnamio (1966) 51p. 13cm. 0,50 gld.

Gaseskalado kaj la monda opinio, La (1966) 34p. 19cm. Ilus. 0,96 gld.

Lao-revolucio dudekjara, La (1967) 35p. 23cm. Ilus. 0,75 gld.

Leteroj el Sud-Vjetnamio, Vol. 1 (1964) 121p. 19cm. 1,50 gld.

Leteroj el Sud-Vjetnamio, Vol. 2 (1964) 213p. 19cm: Ilus. 2,70 gld.

